




La Ronda



AmHW

of 70th

El Comité de FR Benham
& Banchory St Essendon Vics. AUS



10th 1941

LIGTER

Es el eta stelo
fontos da bra luma.

manota Gazeta de la
"Nova Espero" y delaide

Jam de longe, pro la Ĥina-Japana milito, oni tre interesiĝas pri Ĥinujo, lando kiu ĉiam estis la dezirita akiro de ĉirkaŭantaj malamikoj. Estis por deteni ilin, ke la miriga muro nomita La Granda Muro estis konstruita.

Nenio ajn, kiun homoj kreis sur la tero, egalas al tiu ĉi grandega, longega muro, ja laŭ amplekso, ja laŭ amaso da masonaĵo, ja laŭ tiom multe da laboro necesa. El la materialo oni povus konstrui malpli grandan muron, altan ok futojn, larĝan tri, tute ĉirkaŭ la mondo ĉe la ekvatoro, t.e.d., dudek kvin milojn da mejloj. La sama materialo sufiĉus por konstrui tridek grandajn piramidojn. La muro de Babilono estis fama tute tra antikva historio. Ĝi havis longon de sesdek mejloj kaj plue estis konstruita sur nivela grundo, sed la Ĥina muro estas longa deknaŭcent mejlojn (kun siaj ekstraj maŝoj) kaj ĉe unu loko, grimpas ĝis pinto kvindekcent futojn super marnivelo. Astronomoj diras, ke la Granda Muro estas la sola homfarita objekto sur nia planedo kiu estus videbla de la luno.

Pekin, en la daŭro de multaj jarcentoj, estis la ĉefurbo de Ĥinujo. De tie, ~~vagade~~* ni atingas la pinton de kvadrato konstruita, solida gardturo, sidanta sur la supro de monteto. Ni rigardas ĉirkaŭ ni. Ĉie sterniĝas vidaĵo de krudaj, sovaĝaj, malglataj montoj, kaj tra ili, tordiĝanta kiel giganta serpento kiu baraktas pro agonio, aperas la muro.

Ĝi saltas supren. Ĝi saltas malsupren. Ĝi ondetas kaj turniĝas sur la montoj, tra la valoj, laŭ la foraj montflankoj, ekflugas, tordiĝas kiel kolera pitono. Ĝi kuras al la plej alta montrando. Ĝi evitas, malleviĝas, deklivas, malaperas, ree aperas ĉe la pinto de la malproksima ondo de montsuproj. Ĝi ŝajnas elekti la plej sovaĝan krutegon, spiti ĉielon kaj inferon. De tie ĉi ni povas vidi eble dudek mejlojn de la muro tordiĝantaj al la okcidento, dudek al la oriento, kaj ni povas kalkuli centon da turoj. Sed tra la tuta vasta dezerto de krutaĵoj kaj montpasejoj ni ne povas vidi eĉ unu domon aŭ homan estanton, nur muron, muron, kaj ankoraŭ muron, foren, kaj pli foren, ĝis muro kaj montoj malaperas en malproksima nebuleto. Kaj pli miriga ol ĉio, ni konstatas, ke la parto antaŭ niaj okuloj estas nura frakcio de la tuto. Ni vidas eble kvardek mejlojn de la muro --- estas naŭdekcent. Ni vidas cent turojn --- estas dudek kvar mil kiujn ni ne povas vidi.

Laŭ ĉiu rando de la muro troviĝas parapedo por ŝirmi defendantojn kontraŭ sagpafistoj malsupre. Inter tiaj du parapedoj kuŝas vojo, foje pavimita, dekdu futojn larĝa kaj deknaŭcent mejlojn longa. Sed estas vojo kiun nenia veturilo, eĉ ŝarĝbesto povus utiligi. Nur homo, kaj plue, homo de firme tenanta piedo povus pene grimpi iujn el la deklivaĵoj, tiom krutecaj ke la vojo iĝas ŝtona ŝtuparo. La vojo ankaŭ tunelas ja tute tra la gardturojn. Neniu krutaĵo aŭ kanjono haltas ĝin, nur riveroj. Kaj kiam ĝi atingas riveron, la serpento rompiĝas per gardturoj.

* ĉirkaŭvanta

EL LA REDAKTEJO de LA RONDO.

Tiu ĉi, nia kvara numero, signalas novan paŝon sur la vojo de normala kresko, natura evoluo. Per ĝi legantoj rimarkos, ke la enhavo laŭpromese plivariigis, la amplekso iom pli imponas. Malmultvorte, ĝi prezentas du gazetojn en unu --- LA RONDO edzece unuiĝis kun INTER NI, iama ligilo de kelkaj fervoruloj en Adelaide, kiuj pro la komuna bono lasas sian organeton kunfandiĝi kun LA RONDO, kies ĉefa ekzistencialo estis servi kiel suplemento al la Traduka Kurso kaj kiel novaĵbulteno ĝenerala. Nia pligrandita eldonaĵo estu longviva, utila, sukcesa! Tia ĝi povas esti nur per la fidela subteno de ĉiuj en Aŭstralazio amantaj Esperanton. Al tiuj ni kore alvokas, ke ili abonnu, kaj sendu mallongajn verkaĵojn, novaĵojn, personajn travivaĵojn, aŭ similajn. Por ke tiuj ĉi kontribuadoj estu "presitaj" en la numero de la tuj venonta monato, estas necese, ke ili trafu min ĝis la lasta tago de la antaŭa monato. Zorge prinotu tion, mi petas.

Pro la ferio de la administranto, povas esti, ke la redakta funkciado ne iros en tiu ĉi monato tiel glate kiel estus dezirate, do, pro eventualaj difektoj aŭ misaĵoj ni anticipe petas pardonon.

Neniel laciĝu en via ĝismane kontentiga subtenado. Daŭre doni la atestaĵojn de via aprobo, helpante laŭ via plejeblo. Montru la gazeton al amikoj, cele abonigi ilin, kaj akceptu por tio nian elkoran dankon!

F.R.B.

EL LA REDAKTEJO de INTER NI.

Dum 1940a Esperantistoj en Suda Aŭstralio decidis presi klubjurnalĉon, ĉar ili multe sentis la mankon de Eŭropaj ĵurnaloj. Ĝi estis malgranda kvar paĝa ĵurnaleto, kaj ni nomis ĝin INTER NI. Ni presis ĝin dum dekdu monatoj.

Ankaŭ malfrue en 1940a aperis LA RONDO, kaj same kiel la agariko, ĝi kreskis. INTER NI konsentis, ke Unueco estas Forto, do dum 1941a ni ne plue presos INTER NI --- ni laboros sole kaj tutkore por LA RONDO. Donas al ni plezuron renkonti la legantojn de ĉi tiu ĵurnalo, ĉar ni kredas, ke vi ĉiuj estas sufiĉe entuziasmaj pri ĝia estonteco, voli por ĝi sukceson. Helpu fari ĝin pligranda kaj pli interesa. Verku interesajn kaj amuzajn artikolojn por ĝi. Sendu klubnovaĵon. Legantoj, ĝi estas via ĵurnalo. Faru kion vi povos por progresigi ĝin.

La Suda Aŭstraliaj Esperantistoj nun diras --
Adiaŭ INTER NI kaj Bonŝancon LA RONDO!

W.A.

ja ĉe la riverrando. Tiam, de la kontraŭa bordo de la rivero, ĉi ree alten flugas.

Kiam Ĥin Shik Hwang estis imperiestro de Ĥinuĵo, la Ĥinoj estis treoge civilizita popolo, kaj iliaj luksaj urboj allogadis la Tartarojn kaj Hunojn de la Nordo. Tiuj barbaroj ofte invadis la plej riĉajn guberniojn de Ĥinuĵo kaj rabis ilin. Por deteni tiujn Hwang Ti konstruis la muron, kiu komencas ĉe la marbordo kaj daŭras ĝis la Dezerto Gobi. La laboro postulis milionojn da laborantoj, multcentojn da homoj kiuj devis morti dum la barakto por konstrui ĝin, kaj la kosto povus bankroti la nacion. Sed la imperiestro zorgis pri neniu el ĉi tiuj kondiĉoj. Li konstruis sian muron. Sed oni diras, ke ĉiu tria homo en Ĥinuĵo estis devigata labori por ĝi. Pro tio, la Granda Muro estas nomata la plej granda tombejo en la mondo. Malgraŭ la terurega oferbuĉado kaj suferadoj, la muro ne detenis la barbarojn, kaj dum sesdecent jaroj (de 218 A.K. ĝis 1400 P.K.) ili transiradis la muron, kaj la Ĥinoj decidis, ke ili devas fari ĝin plue. Sekve, ili duobligis la fortikecon de la muro. Ili aldonis pli da gardturoj, kaj malantaŭ la parapetoj enlokigis flavkuprajn kanonojn --- kaj ree pereis cent mil da laborantoj.

Sed por nenio! En 1644 P.K. la Manĉuoj sin ĵetis kontraŭ la muron, svarmis en Ĥinuĵon, kaptis Pekin, kaj faris ĝin sia ĉefurbo. De tiam, la muro estas forlasita. Oni lasas ĝin kadukiĝi. Tra cent mejloj en la direkto de la okcidento ne troviĝas homo. La ŝakaloj faras siajn nestegojn en la falintaj partoj. Antelopoj sin paŝtas sur la herbecaj parapetoj. Agloj nestas en ĉiu turo. Eble, en iu venonta forega tempo, la muro fariĝos mure tordanta altrando el sablo, havanta deknaŭcent mejlojn da longeco.

----- L.E.BAILEY.

LA PERFEKTA ONKLINO.



Mi onkliniĝis multfoje, kvankam mi ne havas naturan nevon aŭ nevinon. Miaj geamikoj eble opinias, ke mi estos bona onklino, do ili prezentas min al la adorataj infanoj kiel onklinon Winnie. Por esti la perfekta onklino, oni devas esti vartistino se necese, kaj esti preta aŭskulti dum la admiranta patrino rakontas ĉion kion faris kaj faras

kaj eble faros la mirinda infano. Vi devas porti interesan minon kaj doni inteligentajn respondojn dum ĉi tiuj rakontoj. Nur jaroj da sperto faras la perfektan onklinon. Vi lernas la korektajn mezursignojn por ŝuoj kaj pantofloj por geinfanoj de ĉiuj aĝoj, kaj vi kutimiĝas aĉeti la plej utilajn ludilojn.

Antaŭ kelkaj tagoj mi denove onkliniĝis, do mi vizitis la hospitalon por vidi lian Reĝan Moŝton, kaj kompreneble ankaŭ lian patrinon. Mi prezentis la kutiman silkan robon - (kvankam li ne ŝajnis esti interesata) kaj bukedon por mia plej kara am-

ikino. Oni ricevas la samajn demandojn de ĉiu nova patrino --
 "Ĉu li similas lian patron aŭ mi?"
 "Ĉu vi opinias ke liaj haroj estos buklaĵ?"
 "Ĉu vi ekvidas ŝiajn malgrandajn manojn?" k.t.p.
 Sed imagu mian surprizon kiam mia amikino demandis --
 "Ĉu vi opinias, ke li estas pli bela ol la aliaj geinfanoj en la hospitalo?"
 Tio senspirigis min, ĉar mi neniam vidis belan kvintagaĝan infanon. Mi vizitis la aliajn patrinojn kaj admiris iliajn trezoretojn -- tiam informis mian amikino, ke ĉiu infaneto aspektis sama al mi -- ruĝa, malgranda, kaj dormema.

----- W. ADDIS.

"PROVOJ AL ĜUSTA TERMINOLOGIO."

Ni ricevis la jenajn bonvenajn rimarkojn de amiko en Svedejo :-

"Kindergarten" mi tradukas per "Infangardeno" tute laŭ vorte. Vi certe scias, ke la germana pedagogo Froebel en 1839 fondis la unuan "Kindergarten" kaj kreis la vorton por esprimi sian deziron, ke "la infanoj en ĉi tiu ejo kresku kaj floru kaj estu flegataj same kiel floroj en ĝardeno." La vorto ŝajnas tiom trafa, ke oni transprenis en la anglan lingvon la germanan vorton, tradukis ĝin laŭvorte en la francan: "jardin d'enfants", do en Eŭropo ni ĉiam tradukis ĝin per "infangardeno." Ni havas iom da sperto pri ĉi tiu vorto, ĉar mia edzino estis "ŝtate ekzamenita infangardenistino."

Gimnazejo - Mi ne konas, oficiala radiko estas "gimnazio".

("gimnazejo" estis pres-eraro por "gimnazio". F.R.B.)

Reala lernejo aŭ reallernejo estas en Germanio lernejo laŭ grade inter popollernejo kaj gimnazio. Pri simila lernejo ŝajne skribis Zamenhof, ĉar certe li ne vizitis komercan lernejon (commercial school) antaŭ ol li transiris al la Varsovia gimnazio. (Dum la lasta milito en 1915 mi kuŝis vundito en Bjelostoko en la komerca lernejo, sed bedaŭrinde mi tiam ne sciis ion pri Esperanto.)

La germana "Hochschule" estas komuna esprimo por

"Universität" universitato (kie oni studas la fakultatojn teologian, medicinan, filozofian, ĵuran)

Technische Hochschule -- teknika altlernejo (samgrada al universitato, ne al via technical high school), kie oni instruas pri arkitekturo, inĝenierkonstruo, akvokonstruo, ŝipkonstruo, aeroplankonstruo, k.t.p.

Handelshochschule -- komerca akademio.

Muzikhochschule -- muzikakademio.

Tierärztliche Hochschule -- veterinarakademio.

Hochschule für bildende Künste -- artakademio.

----- P. SCHWERIN.

! ATENTU !

Kiel devizon por nia organo, ni serĉas trafan frazon, belan, eŭfonian, kiu kvazaŭ kristaligu en si nian esperon kaj idealon. Legantoj sentantaj sin inspiritaj, bonvole sendu sian pensajon al la redaktoro kiel eble plej frue, por ke li aperigu ĝin en la Februara LA RONDO. Ricevinte la sugestaĵojn li submetas ilin al voĉdonado de la legantaro.

NOTOJ POR KURSANOJ.

Kiel atestaĵon de daŭra intereso, bonvolu sendi en ĉiu monato almenaŭ kelke da linioj tradukitaj el la Angla peco. Lasu $1\frac{1}{2}$ colan marginon por ke mi oportune metu rimarkojn.

ERAROJ. Tradukaĵo 10, linio 19 vartemon (vantemon)
" 11, " 13 kantanta
" " 38, estis la maro.

Pri Backhand. (trad. 10) Mi jam ricevis la sekvantajn provojn; maldekstraflankajn frapojn; malantaŭmanajn; postmanajn; frapoj per returnita mano; frapludo kun la mano turnita malantaŭen; maldekstraj batoj. F.R.B.

"Backhand" frapo estas farata je tiu flanko de la korpo kontraŭ la mano uzata, t.e., se oni tenas la frapilon en la dekstra mano oni faras la "b.h." frapon je la maldekstra flanko, kaj male maldekstrulo faras ĝin je la dekstra flanko.

Farante la "forehand" frapon (t.e., je la sama flanko kiel la mano tenanta la frapilon), oni tenas la frapilon tiamaniere, ke la manplato estas al la reto. Frapante je la mala flanko, la dorso de la mano estas al la reto.

Kompreneble oni nur mal ofte frapas kun la dorso al la reto, sed pli kutime bona ludanto frapas kun unu aŭ alia flanko al la reto.

Pripensinte ĉion, mi trovas, ke la esprimo de S-ro Gordon ŝajnas bone bildi la efektivan metodon de frapado; precipe se oni memoras, ke la "dorso" rilatas al la mano kaj ne al la korpo. Al neludanto de teniso "maldekstra-flanko frapo" eble estus pli klara, sed uzante duon-teknikan vorton, ĉu oni devas uzi vorton facile kompreneblan al laiko? G. HILLERMAN.

I cannot suggest a completely descriptive equivalent of a back-hand, nor do I think one is necessary. It is not a technical term in the rules and certainly is not completely

descriptive. "Transkorpa bato" would, I think, be good enough, though such a stroke is not always with the back of the racket. "Mandors-al-reta bato" would be a possible description, but it is too long. On p. 28 of "The Australasian" of 14 Dec. is a photo of a player making a stroke there named "backhand". It is the stroke described by me as "dors-al-reta" and is not across the body. G. GORDON.

Por tiuj sciantaj almenaŭ iome la germanan kaj francan, mi aldonas ke backhand stroke -- (coup de) revers
to take the ball on the backhand -- reprendre la balle en revers.

to be good on the backhand -- etre bon pour le revers

to serve on to one's opponent's bh -- servir sur la revers adverse.

die Rückhand -- backhand.

mit Rückhand gespielt -- backhand (adj.) Derek SCALES.

LINGVAJ DEMANDOJ.

Joab Eljot. "Mi iom dubas pri la aserto, ke bonaj vortoj mankas en Esp-o por traduki kion ajn. Kio ofte mankas, tio nur estas la funkompreno pri frazo ANTAŬ LA TRADUKO. Mi do provu traduki la frazojn, por ke evidentiĝu, ĉu mi bone komprenis la anglan aŭ ne.

To outline on paper some original conception: surpaperigi konturon de originala koncepto.

To make a sketch or drawing: (1. skizkopi desegnon.

(2. provdesegni: desegneti

To draw a drawing: fari desegnon

(1. elmensigi planon

To design a design: (2. elpensi desegnaĵon
ellabori planon."

S-ino Douglas. "suspiri" signifas "profunda, aŭdebla spiro de malgajo, sopiro, laco, kaj simila". Vidu piednoton ĉe p. 43 "Romano pri Afrika Bieno."

G. Hillerman. La demando pri geografiaj nomoj en Esp-o ankoraŭ restas nesolvita; sed tio estas vera ankaŭ ĉe la naciaj lingvoj. "New South Wales" laŭ Fulcher & Long "Nova Sudkimrujo" aŭ "Nova Sudkimrio"; Taschenwörterbuch (Jung) Nova Suda Kimrujo". Mi ne memoras esti vidinta formon por la loĝantoj en tiu landparto, sed mi supozas, ke oni uzus "ĉtatano, loĝanto, indiĝeno de Nov...."

De S-ro Hillerman. En via ĉefartikolo de la unua numero de LA RONDO vi admonis nin, deligente teni nin pretaj por la pacaj jaroj. Jes, tio estas nia Esperanta devo --pretigi, plibonigi, kaj labori por la tempo, kiu nepre venos.

Tio ĉi tio estas afero por ĉiu Esperantisto en Aŭstralio, ne nur por tiuj, kiuj daŭre studas la tradukan arton. Pro tio ni forte bedaŭras, ke LA RONDO cirkulas nur inter la malgranda studrando. Mi trovas ĝin bona, la ĝusta komunikilo bezonata en ĉio Esperanta grupo sur nia kontinento. Tial mi esperas ke ĝi kresku, kaj ĝuu pli grandan legantaron.

La movado en Aŭstralio ankoraŭ estas neforta, kaj dispartigita, malgraŭ la komuna idealo. S-ro C.C.Cowling, unu el niaj plej fervoraj samideanoj, nun estras la novan penon, restarigi la Aŭstralian Esperantan Asocion. Iom post iom ĝi kreskas, kaj la veraj samideanoj aliĝas. Tiu asocio certe plifirmigos la movadon, kaj donos spinon al la ankoraŭ disaj ostoj de la Aŭstralia Esperanta skeleto.

Tri fojon ankaŭ, oni penis establi fortan nacian asocion, sed ni ĉiuj estis tro okupataj per niaj lokaj aferoj por prizorgi nacian movadon, kaj pro nia malatento kaj egoismo ĝi pereis. Stranga estas, ke Nov-Zelando, nia malgranda fratlando, povas sukcese funkciigi nacian movadon, dum Aŭstralianoj ankoraŭ estas tro mallarĝemaj por unigi.

Tio, mi kredas, estas nia ĉefa devo dum la militaj jaroj -- unuigi en unu granda nacia movado por la batalo de paco. La lingvo ja estas en danĝero. Ni uzu la militempon por plibonigi la organizadon. Tiukaze la ŝancoj de la estonto ne perdiĝos.

De S-ino Douglas. Multan dankon pro la revueto kiun vi sendis al mi, kaj ankaŭ la traduka peco, kiun mi ĝojis ricevi unufoje denove.

Mi gratulas vin pro la revueto. Ĝi estas bona komunikilo, kiun ni certe bezonas nuntempe, ĉar, kiel vi diris, ni ja sentas la mankon de tiaj kontaktiloj.

Ĉe nia ĝenerala kunveno ni diskutis la starigon de tia revueto, por teni kontakton inter niaj T.E.A. anoj. Ankaŭ longatempo s-ro Cowling celis tion, kaj mi ne kontentigos ĝis ĝi efektiviĝos.

LA RONDO estas bone aranĝita kaj enhavas multon interesan kaj instruan. Ĝi longe daŭrigu.

De S-ro Joab Eljot. Trean dankon pro la "Traduka Peco" kaj plie pro la intereso, utila RONDO. Ĉu vi intence uzis la infinitivon en la artikoleto "Interŝtataj Korrespondantoj" Nro. 2, de LA RONDO? Vi kutimis uzi la infinitivon iom aliel ol mi. Jen ĉe la 9a linio de la menciita artikoleto: "kiuj inter si inciti kaj fortigi intereson..." Mi estus skribinta: incitu kaj fortigu. Aŭ ĉu pres-erare forlasita "penu": penu inciti kaj fortigi?

En la Tradukaĵo (Nov. 1940) mi trovis aŭ strangaĵon aŭ preseraron. En la dudeka linio el la malsupro de la foliaĵo staras jeno: ŝi alvenis la korton numero 2 (numeron 2). La 13 tradukoj faritaj de la kursanoj je la vorto "fussy" bone montras, kiom da signifo-nuancoj angla vorto povas esti en la menso.

"inciti" kaj "fortigi" estas ~~per~~ eraroj. Devas esti u..u.. "ŝi elvenis la korton numero 2", simple egalas...la korton 2. La vorto "numero" tute ne estas apozicia substantivo al "korton", sed estas parto de la nedeklinaciata "2". F.R.B.

El letero de amikino-abonanto. Antaŭ tri jaroj mi malsaniĝis mense. Guste je tiu tempo mi interesiĝis pri Esperanto, kaj eklernis ĝin, kaj la studado de la bela lingvo tiom helpis al mia mensa resaniĝo, ke mi nomis Esperanton "Sanigilo de la menso."

De S-ro R. Brown. Estas bona ideo starigi korespondantan rondon en la tuta Aŭstralio por anstataŭi niajn perditajn ali-landajn korespondantojn; tial mi konsilas ĉiujn Esperantistojn abonu al la RONDO kaj sendu siajn nom-adresojn al s-ro Banham por aperigo en LA RONDO.

S-ino Hintze skribas, ke la artikoleto "La Vortĉasado" en la Decembra ~~numero~~ de INTER NI antaŭe aperis en "La Granda Familio" (Nederlando)

KORESPONDFAKO. Deziras korespondi kun aliŝtataj samideanoj:-
Fr-o Telfer, 9 Sherbourne Rd., Medindie Gdns. Adelaide, S.AUS.
S-ro Shelton, 33 Eighth Avenue, St. Peters, S.AUS.
Gesroj R. Brown, 162 Wellington Rd., Pajneham, S.AUS.

ESPERANTO VIVAS!

Laŭ "O Brasil Esperantista" niaj brazilaj amikoj vigle laboras. La brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, Praca Maua 7-11, Rio de Janiero, ankaŭ en la nuna jaro eldonas statistikan resumon, kaj senpagaj ekzempleroj estas haveblaj de la Instituto.

"Bulgara Esperantisto" raportas Esp. Konferencon en Plovdiv, 200 ĉeestis. Kursoj en div. urboj.

"Voĉoj el Oriento" diras, ke Esp. ekpozicio en Chengtu havis brillan sukceson. 5000 personoj vizitis ĝin en 1½ tagoj. Varbiĝis 180 lernantoj al 4 kursoj.

33a Kong. de Esp. Asocio de N.Ameriko, Lima, Ohio. Eldono de tut-amerika E. gazeto anoncita. E. Kurso ĉe Harvard Univ. Iom da espero pri klopodoj helpi al Lidja Zamenhof forlasi Polujon kaj iri Amerikon. (Amerika E-isto".)

Ĉu vi iam akvumas la ĝardenon? Kaj se jes, ĉu vi portas por tiu aĉa afero viajn plej belajn vestojn? Ne mi ankaŭ!

Okazis unu tagon, ke mi devis tagmanĝi ĉe amikoj -- tre modaj amikoj, kaj poste viziti aliajn amikojn. Pro tio, mi revenus tro malfrue por la akvumado, do mi decidis fari tion antaŭ ol foriri. La suno brilis, tial mi portis ĉapelon kiu naskiĝis antaŭ multaj jaroj. La robo ankaŭ estis malnova, ankaŭ la ŝtrumpoj kaj ŝuoj -- la plej malelegantaj ŝuoj kiujn vi iam ajn vidis, tamen tute konvenaj por la akvumado. Kiam mi finfaris tion, mi eniris la domon kaj alivestis min por viziti la modajn amikojn. Nun bone vestita, mi rigardis min kontraŭ la spegulo, kaj diris al mi "Nu! Mi ne estas tro malbela!" Tiam mi trafis la tramon, kiu bonŝance, estis malplena, Dank' al Dio! Ĉar kiam mi jam preskaŭ atingis finon de mia tramvojaĝo, okaze mi rigardis malsupren, kaj Ho ve! Mi tube forgesis ŝanĝi la ŝtrumpojn kaj aĉajn ŝuojn!

Plue. Mi aĉetis novan aŭtomobilon. Ho! Mi tre fieris pri mia nova aŭtomobilo! Tiel brila! Tio granda, altpreza kaj aristokrataspekta! De la plej nova modo! Kompreneble, kiam mi ricevis inviton viziti amikojn en la kamparo, mi faris la ducentmejlajn vojaĝon per la nova aŭto, senpacienca por la momento kiam mi alvenos kaj fiere parados la novan ludilon.

Certe, miaj amikoj tre admiris ĝin, kaj s-ro G. tuj anoncis, ke li nepre vizitos la proksiman kamparan urbon per ĝi en la venonta vendredo, kaj ke li parados ĝin kiel sian propran aŭton. "Bone!" mi diris.


Mi nun klarigas, ke s-ro G. estas mondkonata verkisto. Kiam li estas en nia ĉefurbo li ĉiam devas esti bonvestita, sed kiam li loĝas kun sia filo, farmisto, li treege amas porti la kiel eble plej mizerajn vestojn. En tiaj vestoj, kiam li finis ĉapitron de sia nova libro, li marŝas al la bona korto, kie li fajfas al la hundidoj, gratas per bastoneto la dorson de Jane, granda, grasa porkino, parolas al Mabel, la nova bovido, kaj frotas la nazon de ĉiu ĉevalo en la fojnkorto; tiam li revenas al sia studĉambro por komenci la venontan ĉapitron de la libro, ankoraŭ portante la amatajn, sed aĉajn vestojn.

Por ŝerco, en la venonta vendredo, ni ĉiuj vestis nin per niaj plej modaj vestoj por viziti la proksiman malgrandam urbon. Tiam alveninte, mi haltis la aŭton kie pasadis, tien kaj reen, granda amaso da homoj. Ni ĉiuj atingis la trotuaron krom s-ro G. kiu, tre altkreska, maldika, aristokrata, pompe staris ĉe la aŭto. Sian brakon, kvazaŭ senzorge, li kuŝigis sur la malfermita pordo, li krucigis la kruojn, altlevis la nazon, kaj ŝajnigis, fiere, aroge, rigardi la pasantajn homojn kvazaŭ tiuj ĉi ne taŭgas vivi en la sama mondo kiel li kaj lia aŭto! Belega! Sed --

"Ho rigardu!" mi ekkriis, "li forgesis ŝanĝi la ŝuacojn!"

Mi neniam antaŭe vidis homon tiel rapide ĵeti sin en aŭton por kaŝi aĉe vestitajn piedojn en la mallumo de aŭtoplanko!

La Ronco.



Feb. 1941.

N-ro 5

Eldorita de FR Barham.
2 Banchoy St. Essendon Ws. Victoria.
- AUSTRALIA -

("The Lady Icenway": el la novelkolekto
"A Group of Noble Dames")

DE THOMAS HARDY.
Tradukita de F.R.BANHAM.

Thomas Hardy (1840-1928), majstra verkisto, "la lasta literaturgiganto de la Viktoria epoko." Iu kritikisto nomis lin krome la plej subtila kaj fortimpresa en la kampo de la tragedio de post Euripido. Nur tiuj, kiuj studis liajn romanojn (ekz. Tess of the D'Urbervilles, Jude the Obscure, aŭ Far from the Madding Crowd), povas diskuti tiun aserton, sed en tiu ĉi rakonto, malgraŭ ĝia ekstrema esprimsimpla, oni nepre devas senti iom el la mordanta ironio kaj satira pesimismo asociitaj kun ĉiuj liaj verkoj.

Ni ne povas diri, ke la instruo de Hardy multe helpas al ni kompreni la vivon aŭ ĝin ĝui. Li substrekas la malnovan aksiomon pri la pago por la peko, sed nuligas la impreson, insistante, ke la homoj estas kvazaŭ aŭtomatoj, marionetoj movataj de la mano de kaprica Fato. Li instruas al ni pri la virto Karitato, sed pri tiu ni antaŭ dumil jaroj ricevis la vorton de aŭtoritato. Sed neniam anglo ĉesos danki lin pro liaj grandiozaj donacoj al la angla literaturo, kaj multaj ankaŭ neniam ĉesos bedaŭri, ke lia kompatema, aminda animo ne trovis pli altan filozofion de l'ekzisto. (Rim. de la trad.)

Lordino Icenway, doloranta sub la riproĉado de sia nobela edzo, tial ĉar ŝi ne povas naski al li filon, serĉas de alia viro helpon en tio, sed ankaŭ ĉe tio havas nur ĉagrenon.

(Rimarko de la tradukinto)

EN LA REGADO de Lia Plejmajesta Moŝto Reĝo Georgeo III, Defendanto de la Fido, loĝis en bela grandsinjora biendomo, en unu el la plej verdaj pecoj de arbar-tero inter urboj Bristol kaj Exonbury, junulino, kiu havis multajn talentojn kaj tre altan belecon. Kun tiuj dotaĵoj de la Naturo ŝi havis ankaŭ iom forte ordoneman temperamenton kaj arbitrecan menson, malgraŭ ke ŝia spertado pri la mondo vere ne egalas tion, kion fremdulo rajtus konkludi el ŝia decidema maniero. Estante orfino, ŝi loĝadis kun la onklo, kiu, kvankam li estis al ŝi bonkora, kiom koncernas ŝiajn ĉiutagajn bezonaĵojn, tamen ne tre okupis sin pri ŝiaj preferoj en la konduto de ŝia vivo.

Kiam tiu belulino havis ĉirkaŭ deknaŭ jarojn, ŝi, estante sentima ĉevalamanto rajdis, kun nur knabo kiel servanto, en

Per ĉi tiu numero ni informas legantojn pri ŝanĝoj necesaj por forigi anomalion.

LA RONDO, kiu komencis kiel negranda senpaga suplemento al la Kurso, jam kreskis en eldonadojn certe pli ampleksan ol la modesta, kiu determinis la bazplanojn de la fabrikantoj. Ne longe post ĝia ekapero, kelkaj E-istoj deziris ricevi ĝin, tamen sen aliĝo al la Kurso. Tion ni konsentis, fiksinte abonon de du ŝil. jare. Post tiom ni devis levi la kurskotizon ĝis 4 ŝil. Tiam, pro fandiĝo de la du gazetoj, kio proksimume duobligis la enhavon, ni sentis saĝon kaj rajton pligi la abonon ĝis 3 ŝil. Per tio absurdigis la kotiza kurso, ĉar laŭ tiu aranĝo la tradukuloj, pagante nur 4 ŝil., nun kvazaŭ ricevas la kurson kontraŭ nenia pago (3 ŝil. por gazeto, 1 ŝil. por afranko!). Ni tiel devas apartigi la abonon for de la kotizo -- 3 ŝil. por la gazeto sola; 2 ŝil. por la kurso sola. Tio ĉi kompreneble ne tuŝas kursanojn kaj abonintojn, kiuj pagis antaŭ ricevo de ĉi-gazeto.

Legantoj rimarkos, ke nia nova procedo estas per duplikatoro anstataŭ per la elmodiĝinta kromografika procedo. La metodo per duplikatoro estas ĉiel preferinda; unu ĝia ĉefa avantaĝo estas, ke de nun ni povas presi tiom da ekzempleroj kiom ni deziras. Tamen la nova procedo iam altiges la kostonojn, kaj la produktantoj, tenante en penso la malkonstantajn prezojn de tiu ĉi perturba tempo, finfine decidis, ke plej farinde estas persisti ĉe la oldonado, esperante pri novaj abonantoj kaj pagante el propra poŝo eventualan deficiton, kiu, ĉiuokaze, povas esti nur provizora. En ĉiu monato ni publikigos konton en- kaj elspezan, por ke legantoj povu mem konstati pri la preciza financa stato. Ke bonvelaj samcelantoj, kiam ili sentos la urĝon helpi, sendos de temp' al tempo donacetojn al la Eldona Kaso, tion ni ne dubas.

Fino W. Addis, 25 Greville Av., Flinders Park, Adelaide, sindone enoficiĝis kiel sekretario kaj kasisto por nia afero.

Felietono komencas en ĉi tiu numero. "Lady Iconway", novelo el la kolekto "A Gallery of Noble Dames", de Thomas Hardy, estis tradukita de F.R. Banham por "Literatura Mondo", Budepest. ~~La leviĝo de Hitler kaj la rezultanta socia fer~~ politikala fermento kaŭzis finfine, ke la eldonistoj devis forfuĝi en Francujon, ferminte sian entreprenon en la Hungara ĉefurbo. La tradukaĵo ne aperis. Poste, akceptite de S-ro Teo Jung, eldonanto de "Heroldo de Esperanto" en Nederlando, ĝi denove devis adiaŭi esperojn vidi la lumon, ĉar en Majo la invadintoj ĉesigis Esp. eldonaktiven ankaŭ en tiu lando. Ni aperigos kiom oble plej grandajn partojn en ĉiu monato. Oni trovos ilin sur la du internaj paĝoj de la kovrilo.

Ankoraŭ ekzistas kristanoj, kiuj kredas, ke Dio, kiu malbene konfuzis la lingvojn ĉe Babel, kontraŭas kiu ajn provon malkonfuzi ilin. Sed strange estas, ke la sama Dio ordonis: "Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn...instruante ilin." kiu ordono enhavas la implicitaĵon: ke la lingvoj de la alpredikotoj devas esti lernitaj por tiu celo.

Jam ne parolante pri la sciencaj konstatoj pri la origino de la lingvoj, kaj adoptante la sintenon de tiuj, kiuj kredas, ke "sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero" (Gen. 11,1), kaj ke "la akvo treege fortiĝis...kovriĝis ĉiuj altaj montoj, kiuj estas sub la ĉielo" (Gen. 7, 19), kaj ke Dio efektive intervenis por babeligi la homojn, mi demandas: Ĉu ne ankaŭ vera estas tio, nome, ke la tuta Biblio montras al ni Dion, kiu ne nur ordonis masbuĉon de virinoj kaj suĉinfanoj (1 Sam. 15,3), sed ankaŭ kiu, en sia propra korpo, suferis ĝisekstreman agonion por la homaro?

Se estas peke, provi forigi la Babelan malbenon, estas peke, lerni fremdan lingvon. La Eklezio de Kristo, tamen, enhavas milojn de poliglotoj; plie, pastroj de la romkatolika eklezio, jam dum jarcentoj kaj eĉ nun, uzas kiel ^{multe} ĉi tiu lingvon la Latinan lingvon, kiu, uzata de kleruloj, povus servi kiel tia, se ili limigus ĝin al la eternaj aferoj kaj objektoj, kiaj pano, trinko, koro, animo, vivo, morto, Dio, homo. Esperanto servus al multe pli grandaj rondoj, ja al ĉiuj homoj kaj por ĉiuj celoj. Fakte Esperanton uzas jam konsiderinda nombro da pastroj kaj religiaj gvidantoj, kaj la 34a Eŭkarista Mondkongreso akceptis ĝin kiel unu el siaj oficialaj lingvoj.

Sajnas malfacile harmoniigi la koncepton pri Dio de la harmonio kaj la unueco kun la koncepto pri Dio, kies volo estas eternigi unu el la ĉefaj kaŭzoj de miskompreno, malamo kaj eĉ fratmurdado. Amo al konfuzateco estas prefere karakterizaĵo de la Diabolo. Ĉu ne la Dio de Gen. 11,1 estas ankaŭ la Dio de Cefanja 3, 17 "Tiam mi redonos al la popoloj lingvon puran..!" kaj de Pentekosto (Agoj2,6).

Lingva diverseco estas speco de homa malperfekteco. "Vi estu perfektaj", instruis al homoj la Dio de la Dua Persono en la Triunuo. Mi kredas, ke Dio, la Eterna Inteligento, ne nur ordonas sed ankaŭ volas helpi nin al la perfekteco, ne nur de individua karaktero sed ankaŭ de interhoma komprenado kaj frata simpatio.

Esperanto estas gravega faktoro en la longa evoluprocezo al tutmonda harmonio, socia kaj spirita, kaj postulas atenton de ĉiu vere sopiĝanta tiun staton de benateco.

h

Plejparte, kiam oni pensas pri birdo, oni vidas image estaĵon kiu povas flugi. Sed troviĝas en la mondo multaj specoj da birdoj kiuj tute ne povas flugi. En Aŭstralio ekzistas tri, kaj pri tiuj tri interesaj tipoj mi intencas skribi kelkajn notojn. La nomoj estas:

1. Emuo (Emu)
2. Kasuaro (Cassowary)
3. Tasmania Galinolo (Tasmanian Water-hen)

La Emuo loĝas - aŭ loĝis - en la tuta kontinento, en Tasmanio kaj en la plej grandaj apudaj insuloj. Depost nia raso okupis Aŭstralion, kelkaj specoj tute malaperis de la tero, inter ili la famaj Tasmania Emuo kaj Kanguruo-Insula Emuo. De la unua restas nur du-tri specimenoj en eŭropaj muzeoj. De la dua ne restas eĉ unu specimeno - nur la ostoj en muzeoj. Tio estas la rezulto de sensenca buĉado farita de nia sportamanta popolo.

Emuoj vivas per la manĝado de sovaĝaj fruktoj, kreskaĵoj, raŭpoj k.s. La Emuo estas unu el la plej primitivaj birdoj, kaj dube estas, ĉu tiu ĉi speco iam flugis eĉ en longe pasintaj epokoj. La plumoj ne estas bone formitaj sed iom similas harojn. Ili povas kuri tiel rapide kiel bona ĉevalo. La ineksuloj estas la pli grandaj kaj fortaj, kaj stranga afero estas ke la patrino birdo, post la demeto de la 8 - 18 ovojn en la neston, plejparte lasas al la patra birdo prizorgi ilin ĝis elkovo. Poste estas nur li kiu prizorgas la idojn ĝis ili estas pretaj vivi sen helpo. La malheleverdaj ovojn havas grandecon de $5\frac{1}{2} \times 3\frac{1}{2}$ coloj, kaj pezas ĉirkaŭe $1\frac{1}{2}$ funtojn. En Centra Aŭstralio oni uzas ilin anstataŭ la ovojn de dom-kokinoj. Tie oni diras ke unu ovo de emuo egalas sep ovojn de kokino. Nur aldonu unu kuleron da vinagro al la granda ovo kaj neniu povas diveni la diferencon!

La Kasuaro, ankaŭ unu el la plej grandaj birdoj de la mondo, loĝas en la nord-orienta parto de Aŭstralio kaj en apudaj insuloj. Ĝi ĉiam frekventas densajn tropikajn arbarojn. Sur la kapo kreskas forta osta kasko, kiu ŝirmas la kapon dum kurado tra densaj arbaroj. La nesto estas ordinare sur la tero apud arbo kaj entenas 3 ĝis 5 heleverdajn ovojn. La maniero similas tiun de la emuo, kaj ankaŭ simile virseksa birdo prizorgas la idojn.

La Tasmania Galinolo estas multnombra speco kaj ne troviĝas ekster tiu insulo. Dum vizito al Tasmanio mi ofte vidis ilin apud riveroj kaj lagoj. Malgraŭ ke ili ne povas flugi, ili povas tre rapide kuri kaj pro tio eviti malamikojn. Mi estas certa ke la plimulto de la popolo en Tasmanio ne scias ke la birdo ne povas flugi. La nesto kuŝas sur la tero sub arbusto kaj ordinare entenas 5 - 8 ovojn.

"THE SOLDIER".

Ni invitas tradukojn, en rimo aŭ ritmo, de THE SOLDIER. Noel Coward rigardas ilin kiel la plej belajn liniojn verkitajn de moderna poeto pri Anglujo ("the most beautiful lines on England written by a modern poet"). Ni aperigos kun permeso la elektitajn provojn.

THE SOLDIER.

Rupert Brooke. 1915.

If I should die, think only this of me:
That there's some corner of a foreign field
That is for ever England. There shall be
In that rich earth a richer dust concealed;
A dust that England bore, shaped, made aware,
Gave, once, her flowers to love, her ways to roam,
A body of England's, breathing English air,
Washed by the rivers, blest by suns of home.

And think, this heart, all evil shed away,
A pulse in the eternal mind, no less
Gives somewhere back the thoughts by England given;
Her sights and sounds; dreams happy as her day;
And laughter, learnt of friends; and gentleness,
In hearts at peace, under an English heaven.

ATENTU.

SRO. OTTO BENNEMANN, INTERNIGITO.

Ni ricevis de Jack Walton, 63 Station-av., Fence Houses, Durham, peton ke ni laŭpove helpu al fidela Esperantisto kaj kontraŭfaŝisto, kiu nun sidas en Aŭstralia internigejo. Sendu al li de tempo al tempo kelke da gazetoj, libroj kaj aliaj presajoj, Esperantaj aŭ Anglaj. Per tio vi donos iom da plezuro al kompatinda homo kaj faros bonan geston por nia Esperantista solidareco. Adreso: Mr. Otto Bennemann, Compound 1 Hut 24, No. 7 Camp, Eastern Command, N.S.W.

NEDERLANDAJ SAMIDEANOJ -- Laŭ informo ricevita el Portugalujo, D-ino Veendelaal-Bowes (red. de "La Juna Vivo") restas sana -- kaj optimista! En "Amerika E-isto" (Sept.) ni samon legas pri s-ro Teo Jung, kiu tamen tre suferas pro manko de enspezo. Laŭ letero skribita en Junio (do post la invado), li esperas iaman reeldonon de "Heroldo".

La trajno devis kelkan tempon atendi en la vilaĝo pro malfruo de la alidirekta trajno el la apuda montaro.

La pasaĝeroj povis de ĉi promeni. Mi eliris el la ĉefa strato, kun hotelo-drinkejo, kaj du-tri butikoj, ĉiuj el ligno, kun malsolida aspekto, kaj ekiris sur kampara vojo. Flanke estis la montaro aŭ pliguste flanko de alta plataĵo, kaj ĉirkaŭe la verde de fekunda distrikto.

El ligna domo, du-triĉambra, en ioma distanco, eksonis ŝira krio de virino, kolera kaj acida. Respondis tuj basa, aroganta, kruela tono de viro. La dialogo daŭris dum mi alproksimiĝis al la domo, kaj pliakrigis. Kredeble ĝi baldaŭ atingos la stadion de korpa porforto. Oni aŭdis ekbrulon, kvazaŭ ia ligna objekto estus falinta aŭ ĵetita. La virinaj tonoj plialtiĝis, ŝia koloro portis ilin en altojn sopiratajn de multaj kantistinoj. Oni povis imagi sur ŝia vizaĝo la sulkojn de moka, vitriola rikano. La vira tono fariĝis malica kaj minaca.

Ĉu malhelpi la batalon? Ne, ne. Sin intermeti inter godzoj estas danĝere. La virino kapablas malfideli eĉ al la malfidelo, kaj ŝovaĝe ataki paciganton.

La vero subite aperis. Tio ĉi ne estas batalo inter godzoj. Tiuj voĉoj estas de instruistoj, oficialoj de la Ministerio de la Edukado, kiuj, en du kursoj, edukas la filojn de Aŭstralio.

Du knaboj eliris el la flanko, kio la virino ŝirkriis.

"Mi estas nova tie ĉi," diris unu. "Ĉu ŝi estas ĉiam la sama hundinaĉo?"

"Jes," respondis la alia, indiferente.

Mi reiris. La krioj sekvis min. Laste sonis de la vira voĉo la tono de la kruelo, kaj de la virina voĉo...acida moko. "Eduki" signifas interalie "instrui pri la manieroj kaj kutimoj de la gentileco kaj deĉeco."

A. DELEUDO.

BONA KONSILO!

For every evil under the sun
There is a remedy - or there is none.
If there is one, try to find it;
If there isn't never mind it.

Por ĉia malbonaj' sur tero nia
Ekzistas aŭ kuraco aŭ ne tia.
Se jes, prisercu do la veron;
Se ne, forpelu for l'aferon.

B. K. BLYTH.

Sidis mi ĉe matenmanĝo,
 Kiam frapo sur la pordon
 Kaj, en mia mano, jen LA
 RONDO, transdonite, kuŝas.
 Tiel ĝi min interesis,
 Ke la kafo malvarmiĝis
 Kaj la tramo maltrafiĝis
 Kaj mi en la oficojon
 Nur malfrue enŝteliĝis.
 Vano! Jam la oficestro,
 Rimarkinto min, alpaŝas.
 Laŭ intuicia gusto
 Tuj sub nazon lian ŝovis
 Mi LA RONDON, kaj ... saviĝis!
 Ĉar, pro forta intereso,
 Li entute absorbiĝis
 Kaj forgesis, min riproĉi.
 Ne, mi ne mensogas. Konfu-
 cio diris, ke la revo
 Pli reala ofte estas
 Ol oĉ tio, kion homo
 Opinions realeco!

JOEDIKO.

EL MIA TAGLIBRO.

Mi saltleviĝis el la liton. Kiam mi malformis la fenest-
 ron mi vidis, ke la taglumo ne ankoraŭ venis. Sur la ĉielo
 la nuboj estis videblaj. Iliaj koloroj kaj formoj estis vere
 belegaj. Mi ne posedas la povon ilin priskribi en mia nacia
 lingvo, kiel, do, mi faros tion en preskaŭ nokonata lingvo?
 Dum mi baniĝis kaj min rasis, fariĝis pli luma. Rigardante
 tra la fenestro mi vidis ĉe la piedoj belan valon kun mal-
 granda rivereto serpontonanta je la malsupraĵo. Malproksime
 la kontraŭa flanko de la valo altiĝis ĝis la horizonto. Arboj
 staras ĉi tie kaj tie, ankaŭ troviĝis du-tri antaŭurbaj domoj.
 La ĉielo ekflamiĝis en gloraj koloroj simile al maro da bol-
 anta oro. Subite, ĉe la horizonto, aperis radio de blanka
 lumo, jen alia, kaj aliaj, kiuj faris formon de brilanta dia-
 demo. Tiam la arĝenta disko de la glora suno sin ŝovis en la
 vidaĵon. La nuboj paliĝis en la nuancoj de la velkantaj aŭ-
 tunaj folioj. Tiel la suno altiĝis. Nun la arboj kaj la dom-
 oj ankaŭ la malproksima montflanko jetis siajn ombrojn trans
 la rivereton kaj sur la pli proksiman kampon ĉe miaj piedoj.
 Post nur kelke da minutoj la ombraĵoj sin rotiris kaj la hela,
 blanka lumo de la suno atingis la kvazaŭ diamantojn - la ros-
 on - kiu kuŝis kiel tapiŝo sur la herbo. Ĝi estis bela vid-

aĵo; laŭ mia opinio unu el la plej belaj vidaĵoj en la naturo estas tagiĝo en la frua vintro.

----- C.W.BALLARD.

EPITAFIO POR HITLER.



"Absolute mia lasta tera postulo en Eŭropo."

LA DU MUŜOJ.

Ĉu vi scias la diferencon inter pesimisto kaj optimisto?

Nu, du muŝoj falis en sitelon da lakto. Unu el ili estis pesimisto, la alia, optimisto.

La pesimisto naĝis malvigle kaj tro malgaje sur la lakto dum li ekĝemis kaj diris al si, "Ve, Ve! Mi neniam povos liberigi min el tiu ĉi aĉega lakto. Mi certe mortos!" Pli kaj pli malrapide li naĝis, ĝis baldaŭ, kun malospira ekkrio, li subiĝis kaj dronis.

La optimisto diris al si, "Ve, Ve! Tiu ĉi estas aĉa kaj danĝera afero por la vivo! Ĉu mi povos liberigi min? Mi timas, ke ne! Tamen eble io okazos por savi min. Mi naĝos kiel eble plej longtempe." Rapide kaj pli rapide ĉirkaŭ-ĉirkaue li naĝis. Vigle kaj pli vigle batis liaj ses etaj kruroj tra la lakto ĝis -- Jen! Por tiu persista batado, li formis buleton da butero sur la supraĵo de la lakto. Dankeme, li grimpis sur ĝin, kaj tie restis momente por ripozi, ĉar li estis preskaŭ ellacigita pro la granda lukto. Tiam li etendis la flugilojn, du-tri foje li flirtis ilin, kaj tiam li foren flugis, la plej gaja muŝeto en la mondo!

----- L.E.BAILEY.

Turisto: Mi ja opinias Lago Geneva tre pli bela ol Lago Leman.

Gvidisto: Sed Lago Geneva kaj Lago Leman estas sinonimaj!

Turisto: Eble jes, tamen mi opinias Lago Geneva multe pli sinonima ol Lago Leman.

LA NOV-ZELANDA ESP. ASOCIO, P.O. Box 330, Wellington, N. Z.
havas por vendi

Plena Vortaro de S.A.T. 16/-
Lingvaj Respondoj de Zamenhof 1/6
Rabeno de Baharaĥ kaj Gimnazio (Zam.trad.) 1/9
La Revizoro (Zamenhof trad.) 3/6

Mi forte konsilas al legantoj aĉetu la suprajn, se ili povas. Ankaŭ peti katalogon. "The British Esp-ist" ĵus anoncis, ke stokoj de ĉiuj Zamenhofaj verkoj jam elĉerpiĝis.

JARKUNVENO DE SYDNEY-A ESPERANTO-SOCIETO.

La jarkunveno de la Sydney-a Esperanto-Societo okazis la 30-an de januaro. Oni reelektis kun aklamado sinjoron E. W. Chandler prezidanto. La financa raporto montriĝis, ke la societo, malgraŭ siaj financaj implikoj, estas solvanta. Ĉar la kunveno estas sur la suda flanko de la haveno, oni decidis lui provizore ĉambron en la urbocentro, por okstra kunvenado de la societanoj.

Oni elektis la jenan estraron: Prezidanto, sinjoro E.W. Chandler; vic-prezidantoj sinjoroj L. Fekonja, A.J.Prior, kaj J.V.Rutland; sekretario, fraŭlino V.Dohnke; vic-sekretario sinjoro M.Hyde; kasisto, sinjorino Kruschendorf, kuratoto kaj bibliotekisto, sinjoro W. Lamb.

LA KASO DE LA RONDO --- Jan. 1941.

Enspezoj.

Abonoj kaj donacoj ricevitaĵ de
F-inoj Chatterton, Smith,
Godfrey, Cade. S-inoj
Hill, Blackwood, Westbrook
S-roj Rutland, Chandler
Masel, Porter, Ballard
Gordon 2/-.....£1--6-0
F-ino Bailey, Kemp, S-ino
Rawson, Hopewell, S-ro
Schmidt 3/-.....15-0
S-roj Schwerin, Brown,
Sholton 4/-.....12-0
Amikoj 3/6.....7-0
S-ro Drummond aldonis al
abono 1/-.....1-0
Vendo de ĵurnaĵeto.....3-0
£3--4-0

Elspezoj.

poŝtmarkoj.....s9-10
papero.....7-0
karbona papero.....1-8
staples.....1-0
ceteraĵoj.....2-0
£1-1-6

mono en la kaso
£2-2-6

£3-4-0

W.ADDIS.

SIR OLIVER LODGE, kies morton la tuta mondo funebrias, subtenis Esperanton, kaj en 1930 kaj 1931 estis membro de la Brita Esp. As.

S-ro Kenneth G. Linton.

Mi deziras esprimi mian ŝategon al LA RONDO, kaj voli al ĝi longan kaj grandan sukcesadon en ĝia multe bezonata rolo.

En la Januara numero aperis kelkaj vortoj kiuj min cerbumigas. Ili estas "deknaŭcent", la unua vorto en la dekkvara lĉnio de "La Granda Muro de Ĥinujo," kaj "sesdekcent" en la dekseca linio sur la sekvanta paĝo. Ĉu "sesdekcent" signifas sesmil aŭ ĉu devus esti milsescent?

("deknaŭcent" devas esti mil naŭcent, kaj "sesdekcent" devas esti mil sescent. L.E.B.)

S-ro M. Hyde. Mi ricevis la pligrandan kaj plibonan LA RONDO. Mi kore gratulas pri la ŝanĝo.

En kafejo (Sydney) nekonata viro komencis kun mi konversacion en nia lingvo. Unu Worrall, nevo de pastro iam fama en Melbourne. Tre agrabla renkontiĝo.

S-ino Hintze. Okaze de la Novjaro 1941, mi volas gratuli al la kunlaborantoj de INTER NI, kaj LA RONDO, kiuj prenis sur sin la respondecon eldoni la gazetojn, kaj tiel starigis novan ligilon inter gesamideanoj en ĉiu parto de Aŭstralio... Ekde la militeksplodo, la eksterlandaj Esperantaj gazetoj unu post la aliaj malaperis, do, por multaj samideanoj mankis intereso en la movado, kaj disigo minacis al ni. Sed, stelo aperis en la mallumo! Jen! Nova Esperanto Gazeto, LA RONDO. Do, gesamideanoj, en ĉiu parto de Aŭstralio, ni ne preterlasu la okazon fari konkretan laboradon por Esperanto. Abonu kaj abonigu al la nova gazeto, tiel farante duoblan taskon, kaj al subtenante al la sindonema laborado de la eldonantoj, kaj al la disvastigado de la Lingvo Internacia. Kaj

FORMOJ STRANGE UZITAJ DE D-RO ZAMENHOF.

Adjektivoj: instruita traktato, korporacio (Originala Verkaro 259, 278) -- learned treatise, institute. Tia titolo metus malbonan lumon sur vin (488) -- such a title would put you in a bad light. Maljuna biero (Fab. de And. vol.3, p.45) old beer. Nudavortaj malamikoj (O.V.206) -- outspoken adversaries. Venenitaj tagoj (Gimnazio 35) -- bitter days; unhappy, poisoned days. Tikla afero (George Dandin 13) -- ticklish affair (Komparu: ĉu vin tiklas gloro? Rabistoj 86/1 -- have you an itch for glory?) Profunaĝa viro, per sia dispecigita (tremulous) voĉo..." (Rabeno de Baŝ.34). Per akre hakata tono (incisively curt), Same 42.

Hiperboloj, parolotrojoj: "Eterneco" ĉefsignife - "sen komenco kaj sen fino," sed Zam. tre ofte uzis "eterna", "eterno" en tempeca senco de "tre longa," "tre longe", "miljara (e)" aŭ simila, kiel atestas jenc:

Se ni scios, ke la vivo de nia organo estas por eterne" O.V.125. Sufiĉe por je eterne certigi progresadon de nia afero..O.V. 128. fratoj fariĝis tute fremdaj unuaj al aliaj ..kaj komenciĝis eterna milito (la unua kong. Boulogne) ĝis la lastaj ombroj de la eterna malhumo malaperos por ĉiam. (same). eterna problemo estos solvita (same).

NOTO pri la (mal)GRANDLITERADO ĉe la POPOLONOMOJ.

En siaj verkoj ĝis "Marta" (1911) Zam. skribis: hebreoj, francoj, rusoj, anglóĵ, k.c. sed en liaj postmortaj verkoj oni trovas aplikita la anglan skribmanieron, kiu atribuas majuskulon al la landnomoj kaj ties ĉiuj derivaĵoj; vera Dano, Hungara kavaliro (Andersen-fabeloj), Filistoj, Haldco (Biblio). Ĉu tiu skribmaniero estas efektive lia, aŭ ĉu oni ĝin "pruntis" al li, oni rajtas heziti. Malgraŭ tiuj lastaj ekzemploj, estas rekomendinde skribi per minusklo ĉiujn multe konatajn kaj plene asimilitajn, sed ne malmulte konatajn, neasimilitajn; do, hungara kavaliro, franca libro, sed Paria marmoró, Bearna saŭco, Angura kato. Kromc, skribu Hetido, Priamido, Gvelfo, Piasto, Sasanido; sed kelto, goto, alemano, huno, skito, ruso, k.c.

Notinde tamen, ke povus leviĝi dubo pri: Cicerona elokventeco -- elokventeco de C. mem. cicerona elok. -- elok. tia, kia estis tiu de C. Tantalaj turmentoj, Drakonaj legoj estas analogaj ekzemploj.

Oficialaj reguloj pri la uzo-neuzo de grandlit. en Esp. ne ekzistas, kaj regas malordo. Tamen ekzistas emo uzi minusklojn, kie tio estas klara.

FUSITAS-METAFOROJ: utileco palpebla (utileco, kiun oni povas palpi!?)

El gutoj fariĝas maro, sed se ĉiu konservos sian guton en sia poŝo...O.V. 191. (Mi ne povus aŭ volus longe konservi...F.R.B. Tiuj mizerulinoj...proksimiĝadis al...vivo krima...morala marĉo. Marta 126/12. (malmorala marĉo?)

arbareto apud la domo de sia onklo; ŝia ĉevalo, dum trotado, stumbliis kontraŭ radiko de falinta arbo. ne grave vundita, ŝi leviĝis de tero kaj estis helpita hejmon de sinjoro, kiu aperis ĝuste en la momento de ŝia akcidento. Tiu sinjoro, por ŝi tute fremda, estis vizitanto ĉe la domo de najbara bienhavanto. El Nederlanda deveno, li nur neofte vizitis Anglujon aferade aŭ plezure el siaj plantejoj en Gujano, en la norda marbordo de Suda Ameriko, kie li kutime loĝis.

Tial, en graflando Wessex preskaŭ neniu lin konis, kaj nur malmulte eĉ ĉe la domo de lia vizitanto. Sed iom post iom la amikeco inter li kaj la familio Hejmere (la nomo de la onklo kaj nevino) plivarmiĝis, des pli facile ĉar en tiu tempo loĝis en la najbaraĵo nur tre malmultaj homoj de bon-societa rango, kio kaŭzis, ke iu ajn noveveninto, se li estis sufiĉe bonmaniera kaj honestreputacia, nepre ricevis salut-an manpremon.


Tenera sento (kiel nomas ĝin la romantikemaj) ekestiĝis ĉe la du junuloj, kaj post iom ĝi maturiĝis en intimecon. Anderling, la fremda sinjoro, havis facile impreseblan temperamenton, kaj malgraŭ ke li penis kaŝi siajn sentojn, oni povis rimarki, ke fraŭlino Maria Hejmere jam impresis lin ĝis iom tre alta grado. Ŝajnis, ke li tute ne povis liberigi sin el ŝia sorĉeco; kaj lia nekapablo fari tion -- spite lian teruran streĉon, ĉar laŭ sia kredo li ne havis eĉ ŝanceton reciprokigi ŝiaflankan amon al li -- donis al Maria la plezuron de es (rineco super li. Tamen ŝi iom pli ol simple simpatiis, kiam ŝi aŭdis lin elpuŝi defunde tiritajn sopirojn, kiujn li malprave supozis neaŭdeblaj.

Plilongiginte sian viziton per ĉia imagebla artifiko, li finfine puŝis sin al tiu punkto de kuraĝo necesa por proponi al ŝi manon kaj koron. Malgraŭ ke Maria ne sentis sin tiom fervora kiel li, ŝi tamen ne malinklinis al li, kaj, ricevinte permeson de la onklo, ŝi konsentis dividi kun Anderling la sorton, bone-malbone, en la forega kolonio, kie, laŭ lia aserto, lia rizo, kafo, maizo kaj ligno produktis por li abundajn vivrimedojn -- kiun aserton certigis vera la najbaro de la onklo. Pro neceso reveni al lia bieno, ili fiksis edziĝtagon iom pli frue ol estas kutime aŭ saĝe inter homoj, kiuj tiel malmulte konis unu la alian.

La soleno okazis, kaj Maria fervejaĝis kun sia edzo for de la domo de sia onklo. Ili iris unue al Londono, de kie post du semajnoj ili ekforvelis sur la granda oceano direkte al sia malproksima hejmo, kiu, tamen, li certigis al ŝi, ne longtempe restos ŝia hejmo, ĉar li intencas vendi la tutan bienon en Gujano tuj kiam la milito finiĝos kaj li povos profite vendi. Tiam, ĉion ordiginte, ili revenos Eŭropon, por loĝadi en iu preferata ĉefurbo.

(Daŭrigota)

La Ronda.



Marzo 1911

N-ro 6

Eldonita de F.R. Barham.
2 Banchory St. Essendon W. Victoria.
- AUSTRALIA -

LA LORDINO ICENWAY.

DE THOMAS HARDY.

TRADUKITA DE F.R.BANHAM.

Daŭrigita.

Dum la progreso de la malrapida veturado ŝi rimarkis, ke li fariĝas pli kaj pli neparolema, kaj, kiam ili jam proksimiĝis al la Ekvatoro, forte atakis lin melankolio simila al tiu, kiu karakterizis lin ĝuste antaŭ lia edziĝpropono. Unu-du tagojn antaŭ alboriĝo ĉe Paramaribo li ĉirkaŭbrakis ŝin plore kaj pasie kaj diris, ke li volas fari jenan konfesion:— Tre malbonfortune, en frua vivo, li edziĝis en Kebeko virinon, kies vivo poste montriĝis esti malmorala kaj skandala. Tiu malkovro estis por li preskaŭ mortiga, sed li fine foriris de ŝi kaj ne plu ŝin vidis. Li estis esperinta kaj preĝinta, ke la malfeliĉulino estu morta; sed antaŭ ne longe en Londono, ĝuste antaŭ komenco de tiu ĉi forvelo, li eksciis, ke ankoraŭ ŝi vivas.

En la unuaj momentoj li decidis kaŝi tiun malluman sciigon for de la amataj oreloj de sia edzino, sed li poste sentis, ke tion li ne plu povas. Li esprimis esperon, ke tia aferstato faros nenian diferencon en ŝiaj sentoj al li, ĉar nepre ne necesas, ke ilia kuna vivo ricevu de ĝi¹ iometon da malbona impresio.

— Ce tio la spirito de fiera kaj estrinema Maria montris sin en furioza kolero, simile al la mugado de nordokcidenta fulmotondro --- kaj ŝi havis rajton. Dio scias! Sed ŝia naturo estis tro bonkvalita² ke ĝi dissplitiĝus pro tiu konfeso, kvankam tiu de multaj grandsinjorinoj, kiujn mi konas, ja rompiĝus sub tia frapo, sub tiu varmega suno, tiel fora de la hejmlando. El la du homoj, li certe estis la plej malfeliĉa kaj spirite rompita, ĉar li amis ŝin funde, kaj pro la fremda elemento en sia naturo (i) li estis tentita fari la krimon pro ŝia superega beleco, kontraŭ kiu li luktis tage kaj nokte, ĝis plu restis en li neniom da rezistopovo. Estis ja ŝi, kiu la unua venis al decido kion fari -- ĉu saĝe aŭ ne, tion mi ne provos juĝi. Post multe da senutilaj sinriproĉoj kaj protestaĵoj liabuŝaj, ŝi diris:

"Mi demandas al vi: se restas en vi eĉ iometo da vireco ^{honesto}, ĉu vi ne konsentas, ke vi devas fari ekzakte tion, kion mi rigardas kiel la plej saĝan, en ĉi tiu malfeliĉo, kiun vi portis al mi?" Li promesis plenumi ŝian volon, kio ajn ĝi estu. Maria do petis lin permesi ŝin reveni Anglujon, kaj aserti, ke, pro febro, li mortis tuj ĉe ilia alveno al Paramaribo; ke ŝi aperu en sia naskloko portanta la kostumon de lia vidvino; ke li neniam vizitu ŝin aŭ revenu al tiu mondparto dum ŝia tuta vivo. En ĉi tiu lasta kondiĉo helpu lin la penso, ke eventuale tre gravaj sekvoj laŭ la lego trafus lin, se li rompus la vorton.

Kun la iam-post-iam stabiligo kaj pliampleksigo de nia revuo, ni sentas ĉiam pli kaj pli la dezirindon, se ne neceson, stimuli la kreskadon de la abonanto-cifero. Inter niaj legantoj ankoraŭ ne trovas sin, scie-nescie, kelkaj veteranoj, al kies dispono ni sopiras meti nian servon. Tia kreskigo ne nur fortikigus al ni la kason, sed, pligrave, ankaŭ ebligus al pli granda rondo de Esp-istoj frandon ĉe la tablo da pikantaĵoj, pensinstigaĵaj kaj humortiklaĵaj, kiun ni preparadas por ilia regalo. Tio ĉi kompreneble estas nia efektiva celo -- doni al niaj amikoj senton, ke ili estas samidee ligitaj unu kun alia en frata solidaro, kaj certigon, ke ili havas organon, kiu akurate portos al ili ĉian informon Esp-an haveblan en ĉi-lando. La sane grava kaso estas nur la rimedo, la garantio, ke ni povos daŭrigi la laboron.

Ni petas kursanoj, ke ili tenu sian membrecon en konstanta valideco, pagante la kotizon en ĝusta tempo, nome, post ricevo de 12 foli-kompletoj.

Multaj Esp-aj vortaroj kaj klasikaĵoj estas nun tute elĉerpitaj aŭ nur malfacile aĉeteblaj. Tio faras laboron ĉe nia kurso malpli kontentiga ol ĝi estus, se ĉiu membro havus submane la ĉefajn studilojn. La bonega Plena Vortaro de S.A.T., la plej aŭtoritata vortaro en Esp-ujo, estas havebla ĉe la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Kosto ĉ. 16ŝ., sed ĝi portus pli grandan dividendon ol sterlingo en banko. La ekstreme valora Esperanta Biblio vendiĝas ĉe The Bible House, Flinders-Lane, Melbourne; sed jam ĉe vendistoj de uzitaj libroj oni devas serĉi Cox, Millidge, Fulcher and Long, Rhodes kaj la aliaj. Vane oni pripetus ilin en la novlibraj butikoj. Mi esperas baldaŭ aperigi liston de modestekostaj Esp-aj verkoj ĉe S-ro Rawson, Exhibition St., Melb.

Nepre informu nin pri plendindaĵoj, se tiaj ĝermiĝas en vi, koncerne LA RONDON, ĝian enhavon aŭ malhavon. Flugigu pipran leteron sur ĝiajn paĝojn. Ne plaĉas al ni la tropasiveco; kritiku konstrue, fervoru racie.

Ĉiu simpla abonanto ricevas sian ekzempleron rekte el Adelaide, de F-ino Addis, por eviti nenecesan poŝtporton.

Ni ŝanĝis la person pri The Soldier; tradukoj aperos ne konkurse, sed simple kiel provoj pli-malpli trafaj.

La piednoto (1) al la felietono devas teksti:-

(1) "fremda elemento": evidente estas, ke la vilaĝano-rakontanto partoprenas la ĝeneralan kredon, cetere strangan, ke alilanduloj estas sekse pli flamiĝemaj ol la Angloj. (Rim. de la Trad.)

Laŭ "Esperanto-Internacia (Nov-Dec.) ĵus ricevita, S-roj Teo Jung (red. Heroldo), kaj Isbrucker (prez. de Lingva Komitato), Pastro A. Cseh kaj S-ino Veenandaal-Bowes (red. La Juna Vivo) estas ĉiuj sanaj en Nederlando.

Ni esperas, ke tiuj, kaj ĉiuj aliaj dumtempe apartigitaj samideanoj, restos en bona sano ĝis la feliĉa rekuniĝo post la milito.

vantan tagon li trovis, ke nokte la homoj kronis ĝin girlande:
tio okazis malgraŭ ke la hispanoj ekstermis fajre kaj glave la
malnovan religion de la indiĝenoj, kies mensojn ili dum tri jar-
centoj pacience plugadis kaj erpadis, enplantante la semojn de
Kristanismo."

----- F.R.BANHAM.

LA SOLDATO.
de Rupert Brooke.

Se mortus mi, nur pensu vi, ke ie
troviĝas en fremdlanda kamp' feliĉa
terpeco ĉiam angla. Kuŝos tie
en riĉa tero polvo eĉ pli riĉa;
fil' de Anglujo, kaj de ŝi dotita
je am' al floroj, ventoj, vojoj ŝiaj;
en vejnoj angla sango, kaj banita
de l'hejma sun', riveroj la naciaj.

Kaj pensu: tiu kor', en pura belo,
ne malpli pulso de l'eterna menso,
revibras ie amon por Anglujo;
por vidoj, sonoj, sonĝoj de taghelo;
amika rido, paco, milda penso,
konitaj sub ĉielo de l'Patrujo.

Tradukis MONTAGU C.BUTLER.

LA SOLDATO.

Se mortos mi, pri mi nur pensu jene:
Ke fore kuŝas certa fremda lok'
Eterne Angla. En kies riĉa ter'
Enkuŝas kaŝe eĉ pli riĉa polv';
Anglujo naskis, formis, kaj sentojn al ĝi donis,
Prezentis florodorojn, kaj vojojn tre amindajn;
Homkorpo Anglatera, spiranta Anglan venton;
Ĝin lavis hejm-riveroj, kaj hejma suno benis.

Kaj pensu nur: ĉi-kor', jam sen la pekoj ---
Nun puls' perfekta en l'Eterna Menso ---
Redonas ĝi en Iu Land' la pensojn,
Impresojn, sonĝojn naske de Anglujo,
La ridojn de l'amikoj, ĝentilecon
De koroj pacaj sub ĉielo Angla.

Tradukis F.R.BANHAM.

"It has become one of the chief tasks of science to attain unity, unity of standard and measure and nomenclature; this has been the object of numberless conferences. It is to attain this end that the efforts to manufacture a universal language have obtained some support, fruitless as they hitherto have been. It was by a wholesome instinct that men formerly clung to Latin as the universal language of educated Christendom; the humanizing intercourse which by means of a common language broke through the barriers of race, forms one of the most charming features of the early Middle Ages. The equally wholesome instinct of individual development has intervened; but the other again becomes dominant, and the universal language becomes more and more inevitable every day. Around it will centre the chief struggle and the chief triumph of the scientific spirit.

Jam fariĝis, ke unu el la ĉefaj taskoj de la scienco estas atingi unuecon, unuecon de normoj, mezuroj kaj nomoj; sen nombraj konferencoj pri traktis tiun demandon. Por atingi tiun celon, kelka subteno doniĝis al la diversaj provoj fabriki universalan lingvon, malgraŭ ilia ĝisnuna senfrukteco. Pro sana instinkto homoj iam tenadis al la Latina, kiel la universala lingvo de kleruloj en kristanaj landoj; la humaniga interrilatado, kiu, pere de la komuna lingvo, rompis tra la baroj de la rasodiferenco, formas unu el la plej ĉarmaj karakterizaĵoj de la frua Mezepoko. La egala sana instinkto de individua disvolviĝo intervenis, sed la alia fariĝas reganta, kaj kun la paso de ĉiu tago montiĝas pli kaj pli klare, ke nepre venos universala lingvo. Ĉirkaŭ ĝi centriĝos la ĉefa lukto kaj la ĉefa triumfo de la scienca spirito.

(Introduction to
"The New Spirit", 1890.)

EN TASMANIO vivas kraboj, kies korpo havas larĝon de ĉirkaŭ futo, kaj kruroj-tentiloj de tridek coloj. Estas kronikite, ke tiaj kraboj atakis, mortigis kaj manĝis homojn. Viro kun sana korpo povus forpeli kelke da tiuj timindaj kreitaĵoj, sed ŝiprompiĝulo, malfortigita de vetervipado, malsato kaj soifo, preskaŭ senbarakte fariĝus viktimo. Se atakus lin el ĉiu flanko centoj de tiuj monstroj, eĉ forta viro, armita per klubo aŭ pliefika batalilo, devus fronti teruran lukton.

A. Hyatt Verrill, "Wonder Creatures of the Sea,"
(Appleton-Century.)

"Ĉu mi devos gardi ĝin dum vi ĉiuj forestos?" demandis la mezaĝa fraŭlo.

"Ne ĝin! Lin! Lin!" respondis vinagre la patrino de la diskutata infaneto. "Li ja estas knabeto, ne senviva objekto. Vi viroj tedas min. Vi simple devos sidi apud li, kaj se li vekigos, vi ludos kun li kaj amuzos lin. Jen mi devas forrapidi. Mi revenos kun la aliaj, kiom eble baldaŭ. Ĝis revido!"

Ŝi eliris, kaj tuj kiam la ĉefpordo de la domo fermiĝis, la infaneto en la lulilo malfermis la okulojn, kaj rigardis la fraŭlon. Li ekparolis, kvazaŭ plenagulo: "Dankon al Dio! Ni havos horon da paco." Klare kaj precize li eldiris la vortojn.

La fraŭlo preskaŭ senkonsciigis de miro. "Kiel...? li balbutis; "Ĉu vi povas paroli?"

"Paroli, jes. Sed mi kaŝas ĝin de la ceteraj. Mi ne volas esti la miraklo-infano de la urbo."

La fraŭlo estis muta, ne komprenante ĉi tiun mirindaĵon.

"Jes," daŭrigis la infano; "tiu infaneta lingvaĉo, kiun ili parolas al mi, estas simple naŭza. Tiaj kriplaj vortaĉoj... riaj absurdaj nomoj... Ĉu vi konas mian onklinon Sara?"

"Jes."

"Ŝia vortkolekto por infanoj estas simple senfina. Kaj ĉio tiel stulta. Kiam ŝi kisas min, la kiso simple fluas trans mia vizaĝo."

"Vere?"

"Jes. Kaj ŝia filino, mia kuzino Muriel, havas lipojn el koloro de ruĝa inko en komikaj gazetoj. Mi ĉiam timas, ke ŝi postlasos sur mi iom el la ŝminko."

"Esti infaneto estas nepre tre ĝena afero," diris la fraŭlo.

"Jes, sed ĝi havas kompensaĵon. Oni aŭdas tutajn historiojn pri diversaj homoj, kaj la mensogetojn de la virinoj, kaj iliajn opiniojn unu pri la alia...Dio, kiel ili amas klaĉi!"

La konversacio daŭris; la infano ripetis kelkajn skandalojn; kaj aŭdiĝis sono de ŝlosilo en la ĉefpordo. La infano plene ekkuŝis, fermis la okulojn kaj alprenis esprimon de kerubo.

La patrino eniris. "Ĉu li dormas?"

"Jes, bone dormas."

"Ĉu li dormis la tutan tempon? Mi esperas, ke li ne ĝenis vin?"

"Ho, tute ne; li estis tre bona. Li tute ne ĝenis. Efektive mi tre ĝuis lian kon...konducon." Li preskaŭ diris "konversacion."

"Ho," diris la patrino, reprenante sian vinagran tonon, "mi rimarkas, ke li instruis vin nomi lin LI, kaj ne ĝi. Gratulon," kaj ŝi eliris el la ĉambro.

La infaneto malfermis la okulojn, formetis la keruban esprimon, kaj kun vasta vangomovo, palpebrumis al la fraŭlo.

କେ ଦୁଇଟି ବିଭିନ୍ନ ଭାଷା
କିମ୍ବା ତିନିଟି ବିଭିନ୍ନ ଭାଷା ।

Ĉu vi konas tiun lingvon? Kelkfoje, oni nomas ĝin la lingvo de Kranioj kaj Krucigitaj Ostoĵ - la litero bha estas tiom kiel kranio - କ - ĉu ne?

Oni diras, ke la loĝantaroj de Hindujo parolas ĉirkaŭ tricent lingvojn, krom dialektojn. Tio estas diri, tricent apartajn lingvojn, tute ne interkompreneblajn. Tamen oni povas kunmeti ilin laŭ grupoj, kiuj posedas similajn vortojn, same kiel la lingvoj de Italujo, Anglujo, Francujo, posedas similajn vortojn. Lingvoj kiuj kune metitaj, formas grupon, devenas de unu fonto, kaj Orija, la lingvo de mia infaneco, estas unu el la lingvoj kiuj devenas de Sanskrito. Oni parolas ĝin en Orissa, gubernio en la sudo de Bengal. Eble nur dudek milionoj da personoj parolas ĝin, sed kiom interesaj ili estas, ĉar ili diferencas inter si de la plej eruditaj kleruloj de la ebenaĵoj, ĝis la primitivuloj de la montoj, eĉ hodiaŭ loĝantaj en rondaj barakoj ĝuste kiel la barakoj de la Ŝtona Aĝo, kaj konantaj nur ŝtonajn ilojn.

Eble vi demandas al mi "Se Orija devenas de Sanskrito; kial ĝia skribmaniero estas tiom malsimila?" Jen la tre interesa kialo.


La skribantoj de Orissa skribas sur palmaĵ folioj, sekigitaj de la suno, tiam ili tranĉas ilin laŭ samgrandaj strioj. Nu, estas kompreneble, ke oni ne povas skribi rektajn liniojn, similaj al la linioj de Sanskrita skribaĵo, per metala pinto, kiun uzas la Orissuloj sur siaj palmfolioj, ĉar tiamaniere traktite, la folioj disfendiĝus. Por eviti tion, oni pli kaj plie rondiĝis la literojn, ĝis fine la rektaj linioj de Sanskrito devenis la rondaj literoj de Orija.

Kiam la skribanto skribas, kiel mi supre diris, li uzas metalan pinton. La gratoj tiam faritaj estas palaj, kaj ne bone videblaj. Tial li frotas ilin per oleo, kaj la gratoj tiam devenas malpalaj, kaj tute facile videblaj. Li skribas sur ambaŭ flankoj de la folioj, zorgante, ke unu flanko de la paĝo estas renverse al la alia. Kiam la folioj estas pretaj, li boras etan truon tra ĉiu folio ĉe la centro, kaj tra la truoj li tiras ŝnureton, kiun li antaŭe ligis al strio de ligno, de samgrandeco kiel la folioj, kaj nun la libro estas finita.

Por legi ĝin, oni legas unue, la eksteran flankon de la unua strio, tiam oni antaŭen tiras ĝin kaj legas la skribaĵon

aŭ permesas ĝin gliti tute tra kaj for de la folioj, ĉar la tuta libro disfalos. Mi posedas bonegan kaj maloftan ekzemplon de la Bhagavadgita, unu el la du sanktaj libroj de Hindujo - la alia estas la Mahabharata - granda libro kun multaj folioj. Imagu nur mian konsternon kiam mi rompis la ŝnureton, kaj tuj vidis sur la plankon la tutan libron kuŝanta konfuzamase! Ĝi postulis multajn horojn da laboro antaŭ ol la folioj estis korekte rekunigitaj.

L.E.BAILEY.



AKCIDENTO SUR LA TRAMVOJO.

Unue mi devas klarigi, ke mi estas tramveturigisto en Adelaide. Antaŭ kelkaj jaroj, en unu malplaĉa kaj pluvega nokto, mi veturigas tramon de Tramere al la tramejo. Guste kiam la tramo estis pasanta "Osmond Terrace", viro sur biciklo alvenis el tiu strato kaj veturis ĉe la flanko de la strato tuj antaŭ la tramo. Aŭtomobilo staris ĉe la stratflanko, kaj ĝuste kiam la biciklisto estis ekpasanta la aŭtomobilon, iu malsaĝulo interne ĝi malfermis la pordon, kiun la biciklisto frapis. Li falis sur la relojn tuj antaŭ la tramo. Ho! La okazo eksaltigis la koron en la buŝon, mi forte funkciigis la haltigilojn kaj fluigis sablon sur la relojn, sed bedaŭrinde mi ne povis sufiĉe frue haltigi la tramon. Post kiam ĝi haltigis, mi malsupreniris sur la vojon, atendente trovi senvivan viron sub la tramo, sed la vivsavilo estis kaptinta lin. Mi lin eltiris, kaj li ĝemis; tiam mi ĉirkaŭrigardis dum kelke da sekundoj por rimarki, ĉu la aŭtomobilo estas ankoraŭ tie, kaj kiam mi denove turnis la okulojn al la viro, li staris sur la piedoj, ŝajne nevundita krom nur sola vundeto sur la vizaĝo, malgraŭ la travivaĵo. Mi opinias, ke li estis tre bonŝanca homo, ĉu ne?

R. BROWN.

La lando estas ĉambro
kaj reĝo---mi sen kron!
sed el reĝin-okuloj
rebrilas al mi tron'.
Orblondaj ondaj haroj
servadas por mantel',
nektar' min ebriligas:
la dolĉ' de l'kismiel'.

Popolo estas---bubo,
tre vigla brava knab',
rajdante sur genuoj
li estas---tuta stab'.
La scepro estas---vergo
kaj kiel saĝa reĝ',
mi batas la popolon,
se tedas lin---la leg'.

Sed se maten' krepuskas
kaj krias kok' en kort',
ekmigras tuj la reĝo
el lando sen eskort'.
Dum la reĝin' fabelas:
"Trans granda ocean'..."
la reĝo kuras vane
por---ĉiutaga pan'.

My kingdom's but a room,
I a king without a crown;
But a throne and orb shine out
From my own queen's eyes of brown.
And all my royal mantle
Is her golden wavy hair;
And the nectar of her kisses---
A wine without compare.

My people is a boy
With loyal and lusty laugh;
And riding on my knee
He is my General Staff.
But like a prudent king
(For my sceptre is a cane),
I beat and teach my people...
Laws are not made in vain!

And when the dawn is breaking
And the cock crows in the yard,
The king fares forth abroad
With escort nor with guard.
And while the Queen tells fables:
"Across the sea there sped..."
The king fares forth and vainly
In search of daily bread.

INKECA INKUBO.

Mi malfermis la ĉefpordon. Du homoj. Unu el ili, S-ro la
Aferisto. "Jen nia Ĉefmeĥanikisto," li diris kun mangesto.
Ili envenis, la *Aferisto*, malgranda, lama homo, la alia granda,
kun vizaĝo nebela sed bonhumora.
"Nu, kio estas al la maŝino?"
"Estas por vi diri al mi, kio estas," mi respondis ĝentilece,
"Vi estas la spertuloj, ne mi," kaj mi enkondukis ilin en la tag-
mangan ĉambron, kie staris la Duplikatoraĉo sur flanka tablo.
"Unue, do, diru al ni viajn plendojn," diris S-ro *Aferisto*.
"Kun multe da plezuro," mi respondis. "Rigardu tiun monton da
papero! Staras tie du pakajoj, ĉiu folio difektita de via aĉa
maŝino. Kelkaj el ili ne havas marginon, aliaj tro. Tiuj estas
makulitaj sur la antaŭaĵo, aliaj sur la dorso. Jen tro da inko
ĉe la supro, jen tro ĉe la malsupro. Tiuj trapasis la maŝinon sen
ricevi kianajn impreson. Tiuj tie ĉi oni ne povas legi, efektive
ili aspektas kvazaŭ ili suferas pro ia speco de inka ekzantemo."

"Estas nur ĉar vi estas sensperta," diris S-ro Aferisto indulge. "Nu! Permesu min ree klarigi. Jen la funkciga tenilo. Metu ĝin ĉe la sesa. Malsuprigi la papero-tablon kaj la ricevantan platon. Almetu la metalan bastonon. Funkciigi la inkantan cilindron ĉe la dorso, super la premanta cilindro. Tiam metu la tenilon ĉe la centro de la inka vojeto. Levi la kaptantan stangon --- ?"

"Certe, certe!" Mi rapidis diri.

"Bone! Volvi la paperojn-premilon kaj etendaĵon. Jen la nombro kaj ĝia liberigilo - kiam vi premas tion, zorgu neniam forgesi metu la fingron tiel ĉi - alimaniere estas danĝere - enlokigi la manĝigantan bastonon. Jen la inkvolviga premilo. Mi konsilas vin uzi tion kaj ne la tenilon de la inkruĵo, kiu eble farus vin inkeca. Ĉu vi komprenas?" Li paŭzis por gajni la spiron.

"Yes, jes," mi respondis - tamen, "Ne, ne!" pli taŭgus.

"Bone! Nun mi montros al vi kiel meti inkon en la cilindro."

Li malŝtraŭbis la kapon for de grandega tubo, kiun li tiam premis. Elfalis naŭzega fluido, oleeca, nigra, dika, kredeble la razkremo de la Diablo - "Oni almetas la inkon tiel ĉi...nu, tio sufiĉas, kaj li donis al mi la tubon, kiun mi senpripense kuŝigis sur la ruĝa drapo de la manĝotablo. "Ĉu vi havas broson?"

"Ĉu mi havas broson!" Mi ja havas multe da brosoj - estas brosoj por la meblaro, por purigi la arĝentaron, por la vestoj, tapiŝetoj, ŝuoj, por la kuireja planko broso kun tri haroj - mi ne scias kion la taglaboristino faris pri la aliaj - broso kun longega tenilo por forviŝi araneaĵojn for de la plafono.....

"Malgranda broso," klarigis la Aferisto.

Kompreneble, la pastaĵbroso! Mi alportis ĝin kaj adiaŭis la blankecon de ĝiaj haregoj dum mi transdonis ĝin al la Aferisto.

En tiu momento mi stumblis pro skatolo, kiu staris, nevidebla, malantaŭ la tablodrapo. Por savi min, mi ekĉirkaŭis la malgrandan Aferiston per la maldekstra brako, samtempe kiel mia dekstra mano falis sur - jes, vi ĝuste divenas - ekzakte sur la inkotubon. Ĝi ne povis subteni la subitan kaj fortan premon. Ĝi disfendiĝis kaj dise elŝpruciĝis, kiel abomena kaskado, la naŭzega fluido, sur la tablodrapo, mia mano, mia robo. Kun vekrio de konsterno mi forsaltis, prenante kun mi la kompatindan lamulon, kaj kune ni forte trafis S-ron Ĉefmeĥanikisto, kiu ŝajne ne povis deteni sin de larĝa rideto.

"Vi ne devus starigi vian ilujon meze de planko," al li diris dignoplene la Aferisto, dum ni malplektis nin el nia tro amanta cirkaŭpremo.

La Ĉefmeĥanikisto formetis la rideton de la vizaĝo.....

Malkara afero, la Duplikatoro! Perdita inko 12/6, difektita papero 8/6, purigo de la drapo kaj mia robo 20/- (se efektive ili estus purigeblaj!).....

"Kiu pagos por ĉio ĉi?" mi demandis al la Kasistino.

"Ne la abonantoj," ŝi firme certigis min.

"Vi rajtas," mi konsentis malgaje, "estas mi kiu pagos, MI, la Senmona Mecenatino!"

----- PRESISTINO.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY. Anoj denove kunvenis en la ĉambrego de "Overseas League" ĉe Perth lundon la unua en februaro. Dekses gesamideanoj ĉe-estis. s-ro Masel kaj f-ino K.C.Crawford estas prezidanto kaj sekretario respektive. s-ro Masel, s-ino Byatt kaj s-ro Ashton instruas lernantojn. s-ro Saar estas delegito de U.E.A. kaj s-ino Motteram delegito de I.E.L. Nia societo vige funkcias, ĉiu ano forte laboradas kiel eble plej multe por disvastigi konon de nia lingvo. Ĉiu el ni klopodas plinombrigi la anojn. Gesamideanoj en Okcidenta Aŭstralio kiuj ricevas LA RONDO dankeme legas kaj studas la bonegajn artikolojn kaj notojn. Vere tiu gazeto estas esperanta gvidilo por ni ĉiuj. (de Henry Byatt, 10 Mc.Kenzie St., Wembley Park W.A.)

MELBOURNA ESPERANTO KLUBO. Ĉe la jarkunveno de Melbourn Esperanto Klubo, la Prezidanto S-ro Drummond ekzigris post sindona servado dum dek unu jaroj. S-ino F.Rawson elektigris unuanime kiel la unua "Sinjorino Prezidanto" de la klubo. Sincere adepto de Esperanto dum pluraj jaroj, ŝi ĉiam gvidas stud-rondon ĉe la klubo. S-ro Hanks klopodas denove pri plua Oseh klaso. La tri antaŭaj grupoj estis sukceso plenaj. (A.C.Hintze.)

LETEROJ AL LA REDAKTORO.

S-ro HENRY BYATT. LA RONDO tro plaĉas al mi; permesu al mi gratuli vin pro la enhavaĵo kaj stilo ordigita.

De kiam la "Suda Kruco" malaperis ni ĉiuj treege sentis la mankon de iu Esp. gazeto en Aŭstralio.

Bonvolu ricevi la enmetitan sumon (5/-) kiel helpilo kaj abono al via bonega gazeto, elkore mi subtenas vian penadon.

S-ro HEARNE. Mi deziras gratuli vin pro la pligrandigata "RONDO". Estas grava afero havi kunligilon inter ni en ĉi malfacilaj tagoj.

Mi sendas kelkajn sugestojn por la nova titolo. Laŭ mia penso estus bona ideo teni la nomon "Rondo". Jen miaj sugestoj --

La Suda Rondo.

La Aŭstralia Rondo.

Esperanta Rondo.

(S-ro Hearne miskomprenas. Ni bezonas ne novan titolon, sed moton, "agitfrazon," sentecon da kelke da trafaj vortoj. F.R.B.)

MAURICE HYDE. Mi ricevis vian novan novan RONDON kaj gratulas pri ĝia plipliboniĝo. La ŝabonitaj literoj estas pli klaraj kaj facile legeblaj ol la gelatenitaj. La peco el Hardy estas leginda, kaj ankoraŭ ne deprima, kiel ordinare estas liaj verkoj.

La artikoleto pri la neflugpovaj birdoj estas interesa. La aŭtoro eble povus klarigi al ni la Tasmanian diablön, pri kiu estas anekdoto: Oni demandas al viro: Ĉu vi scias, kia estas

Tasmania diablo? "Jes, mi edziniĝis kun unu el ili."

Pri "morala marĉo", mi opinias, ke tio ne estas fuŝita. Oni povus diri: "Ŝia moralo estas simple marĉo". La adjektivo certe estas alispeca ol ekzemple "Irlanda marĉo", kaj Kalocsay certe dividus tiun specon de adjektivo en ses sub-dividojn.

La vortoj "kromografika" kaj "duplikatoro" frapas min, sed ŝajne ĝis nun ne frapis ian vortariston. Mi dirus "gelatenita" aŭ eble "gelaten-kopiita", aŭ "ŝablonita".

ĜIS NUN SUGESTITAJ MOTOJ:-

Esperanto je ĉies servo.

La Esperanto celas rĉciprokan komprenadon inter ĉiuj homoj.

Ni ŝirmu la sanktan flamon.

Ĉiam antaŭen, ĉiam fidela.

Por la vera celo, de la verda stelo.

. Unu por la aliaj, ĉio por la verda stelo.

PRI KINDERGARTEN. (Vidu al Jan. RONDO.)

Koncerne la rimarkojn de s-ro Schwerin, kiu tradukas "kindergarten" per "infangardeno", mi atentigas, ke ne la intencoj de Froebel la fondinto, sed la efektiva naturo de la moderna aŭ hodiaŭa "kindergarten" devas determini la formon kaj sencon de la tradukaĵo. Tro multaj aŭstraliaj "kindergartens" tute ne estas "gardenoj", sed pliguste nebelaj konstruaĵoj apartene kuŝantaj apud preĝoj aŭ similaj, kaj situantaj en dense loĝataj stratoj. "Infangardeno" cetere povas, kaj rajtas, bildigi antaŭ la menso gardenon en kiu infanoj ludas, ne instruiĝas, do "playground" aŭ "playpark". "Kindergarten" nepre devas esti traduktita per vorto en kiu reliefiĝas la nocio pri per luda instruado, edukado, mensa, spirita kaj korpa, al junaj infanoj, sed ne ekstreme junaj, suĉ- aŭ grimpinfanoj, kiuj iras en (publikan) infanet(gard)(vart)(zorg) ejon, t.e. crĉche. La formo "kindergarten" kun sinonimo "lernludejo" estas en la Enciklopedio de Wŭster.

----- F.R.BANHAM.

ĈU VERE?

TRE GRANDA kaj vasta estas jam nia literaturo... (la unua kong. Boulogne). Ĉu tio estis vera en 1905? F.R.B.

MI NE DONIS multajn vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj lingvoj kaj jam per si mem konataj de ĉiuj. Originala Verk. p41. (kiuj vortoj estas egale uzataj en ĉiuj lingvoj?!) F.R.B.

ankoraŭ unu aŭ -ESTAS VERO, ke vi preskaŭ ĉiutage legas en la gazetoj, ke aperis ankoraŭ kelkaj artaj lingvoj. 300 O.V. (Tio simple ne estas vero) F.R.B.

NOTO PRI "ĴUS", "TUJ", "ĜUSTE", kaj la ANGLA ADVERBO "JUST".
 "Ĵus" estas tempa adverbo signifanta "ĝuste antaŭ nun" aŭ "antaŭ tiam".

- (1) The third hour had just struck when I entered the town...Ĵus batis la tria horo, kiam mi eniris en la urbon.
 I am now coming...Mi ĵus alvenas.
- (2) "Tuj" estas tempa adv. signifanta "senprokraste post tiu momento", kaj loka adv. sig. "tute proksime de io, tute apude."
 He immediately did what I wanted...Li tuj faris, kion mi deziris.
 Wait! I will come immediately...Atendu! Mi tuj venos.
 Just behind the door is a cupboard...Tuj post la pordo estas ŝranko.
- (3) Rightly to define a word...Ĝuste difini vorton.
 Just a month ago he died...Ĝuste antaŭ monato li mortis.

En tiuj du ekzemploj ankaŭ "precize" estus korekta.

----- F.R.BANHAM.

KASO DE LA RONDO. Feb. 1941.

<u>ENSPEZOJ</u>		<u>ELSPEZOJ</u>	
En la Kaso de Jan	£2-2-6	poŝtmarkoj.....	sl2-9.
Abonaj kaj donacoj ri -		papero.....	6-0
cevataj de		inko.....	12-0
Sroj. Card, Hussey 3/-..	6-0	bindpingloj.....	1-3
Sro. Ballard 2/-.....	2-0	ŝablonaĵoj.....	6-6
Sro. Byatt 6/-.....	6/-	grifelakrajono.....	7-6
Vend. de ĵurnaleto.....	7/-	presado perdup.....	5-0
	<u>£3 - 3 - 6</u>		<u>£2-10-6</u>
		Mono en la kaso	
		13/-	
			<u>£3 - 3 - 6</u>

Kotizo por la Kurso de
 R. Brown..... 2/-

W.ADDIS, (Kasistino)
 25 Greville Ave.
 Flinders Park, S. AUS.

Pagantoj bonvole lasu senskribaj la poŝtajn monbiletojn, per tio faciligante al la administracio.

ABONO 3 ŝil. jare.

Oni povas supozi, ke internacia Esp-a movado ne ekzistas en la nuna tempo, sed tia estas eraro. Estas fakto, ke en la pli granda parto de Eŭropo la movado preskaŭ malaperis. Sed Eŭropo ne estas la tuta mondo, kaj en aliaj lokoj Esperanto ankoraŭ vivas, kvankam estus troige diri, ke ĝi floras.

Troviĝas iom vigla movado en Ameriko, kie efektive ĵus aperis la unua n-ro de tut-amerika gazeto -- komuna eldono por Argentino, Brazilo, Kanado kaj Usono. Kelkaj anoncoj de la filmo "La Diktatoro" estas skribitaj en Esp-o. En kelkaj urboj de Brazilo estas vigla agado; ĵus aperis 280-paĝa vortaro Esperanto-Portugala, kaj la Instituto de Statistiko tiulanda ankoraŭ aperigas resumon en Esperanto en sia granda ĉiujara verko.

Oni ne povas skribi pri elstaraj sukcesoj en Aŭstralio, kaj Nov-Zelando; tamen tie estas multaj fervoruloj, kaj la nombro de adeptoj konstante kreskas. La Esperanta Asocio de Tasmanio meritas mencion pro bona laboro.

En kelkaj urboj en Ĉinujo la movado bone progresas, malgraŭ la terura milito. "Heroldo de Ĉinio" ĵus eldonis "Ĉinio batalas ĝisfine", 216 p., krom siaj regule aperantaj legaĵoj. En Germanujo, Sovieto kaj Japanujo la koroj de miloj da samideanoj ankoraŭ batas por nia afero. En Alexandria okazas kursoj, en Portugalujo la nombro de membroj de I.E.L. multe kreskis en la lastaj du jaroj, kaj en Britujo mem, spite la bombadojn, novaj kursoj fondiĝas ĉe evakuitoj, soldatejoj, aviadejoj. La Ligo eldonas la solan internacian Esp-an gazeton regule aperantan, kaj ĝia jarlibro eldoniĝas ĝustatempe, malgraŭ malfaciloj. Kontakto estas konstanta kun ĉiu lando, en kiu Esp-o estas permesata.

Kompilita laŭ BEA raporto.

AL KURSANOJ.

Kelkaj kursanoj jam petis min doni per letero pli-malpli detalan instruon pri la Esperanta gramatiko; ekzemple, antaŭ kelkaj tagoj trafis min peto klarigi la participojn kaj la ĝustan uzon de la prepozicioj. Kontentige fari tion postulus multe da tempo kaj streĉa laboro, ĉar mi ne povus plenumi la taskon pli bone ol per simpla kopiado de la koncernaj ĉapitroj el fidinda lernolibro, kia "The Esperanto Home Student", "First Steps" (M. Butler), aŭ la konata verko de Cox.

Mi ne povas akcepti la taskon pritrakti la diversajn gramatikajn kategoriojn, kiaj participoj, vortkunmetado, interpunkcio, kaj la ceteraj. Ĝio tio estas trovebla en la studlibroj, kiujn devus nepre posedi kaj uzadi ĉiu homo vere deziranta progresi en nia lingvo.

La afero estas alia, kiam temas pri simpla, rekto kaj klare formulita demando sendita kun la tradukitaĵo de kursano, aŭ de leganto de LA RONDO kun preparita resend-koverto. Tiam mi plezure respondas laŭ mia ekstrema eblo.

F.R.B.

Kursanoj montris fortajn diversecon en la traduko de tiu frazo. Jen la kolektitaj ekzemploj: reĥajmira, hejĵm-celanta, hejĵmreven(ant)a, hejĵmena, hejĵmenema, hejĵmanta, domema, hejĵm-ir(ant)a, vojaĝanta; instinkto hejĵmeniri, hejĵminstinkto. S-ro Gordon uzis "hejĵmirema".

GRAVA! En Trad. 13, linio 35, post ankaŭ ĉe (18) oni enskribu la jenajn vortojn: "multaj specoj de la lacertoj (25), kaj atingas disvolviĝon (19) en la plej alta grado ĉe (18)."

ESPERANTO BOOKS.

Obtainable from Rawson's Book Shop, 169 Exhibition St., Melbourne C.1.
Published by the Sennacieca Asocio Tutmonda.

-
- La Morto de Blanĵo de Jean Tousseul..... 9d.
Nia Teatro - Du Teatraĵoj. Parolhoroj. Versoj por Deklamo.. 9d.
Kion Rakontas la Amikoj de Pecjo. Fabeloj.....
El la Mondbildo de la Nova Fiziko..... 6d.
Vortoj de Kamarado E. Lanti..... 2/3
A.B.C. de Sennaciismo..... 9d.
Por la Neŭtralismon E. Lanti..... 4d.
La Laborista Esperantismo E.Lanti..... 6d.
Adsolutismo Parolado de E. Lanti.....6d.
Skizo de Ekonomia Geografio verkita de J.F.Horrabin..... 3/6
Je la Nomo de l'Vivo Filozofi-lirikaj Fragmentoj E.Izgur..2/6.
Prologo Mihalski Jubileako
- Kolekto de originalaj Poemoj 9d.
Gvidilo Tra la Esperanto-Movado G.P. De Bruin 2/-
Orienta Blovo Malgranda Krestomatio de Sennacieca Revuo.... 6d.
La Komunista Manifesto de Marks kaj Engels.....9d.
La Vojo de Formiĝo kaj Disvastiĝo de la Lingvo Internacia-
Drezen.....9d.
Petro Kursa Lernolibro por laboristoj..... 2/-
The Esperanto Home Student.....9d.
A Practical Course in Esperanto Szilagyi..... 2/3
"The Edinburgh" Pocket Dictionary Esp-Eng Eng-Esp.....3/9
Colomba (Prosper Merimee) Romano 1/6
La Tempo-Maŝino kaj La Lando de la Blinduloj Wells..... 1/6
Nova Tasko - Chinese Short Stories 2/-
Princeno de Marso (Burroughs) 2/- and 1/6

Please add 10% for postage.

Li volonte konsentis, kiel li ja volonte konsentus al kiu ajn por ŝia bona reputacio en la socio, ĉar vere li adoris ŝin, eĉ ĝis forofero de la vivo mem. Por igi ŝin en staton de tuja sendependo, li donis al ŝi, en obligacioj kaj juveloj, konsiderindan sumon, ĉar vere li estis riĉa viro. Sur la sekvanta ŝipo ŝi forvelis al Anglujo, ne alveninte pli proksime al Gujano ol Paramaribo. Forirante, ŝi aŭdis de li decidon, vendi ĉian lian posedon kontraŭ kontanta mono kaj vagadi la tutan teron ĝis li mortos, kiel pentosuforigo pro tio, ke li tiel malbone ŝin traktis.

Maria alvenis Anglujon, kaj, vidvine vestita, tuj aliĝis al la onklo sian revenon. Ŝi ricevis kondolencon de la najbaroj, kiuj jam aŭdis la deciditan fabelon; nur al la onklo ŝi eldiris la veran staton de aferoj, kaj la motivon pro kiu ŝi kaŝas ĝin. Ĉar, kvankam ŝi neniel morale kulpis, Maria estis tiel fiera, ke ŝi ne povis toleri eĉ la penson esti trompita aŭ mistrasfigita en siaj mondumaj celoj.

Kelkan tempon ŝi kviete loĝis kun sia parenco; siatempe filo al ŝi naskiĝis. Ŝi estis funde respektata pro siaj digno kaj sinretenemeco, kaj la facile uzebla riĉo, kiun al ŝi donis ŝia portempa edzo, ebligis al ŝi komforte loĝi en alo de la biendomo sen ajna helpo de la onklo. Tamen, sciante la falsecon de sia pozicio, ŝi estis ne tute trankvilanima, kaj ofte diris en si; "Kiel terure, se oni ĉi tie eksciis, ke li ankoraŭ vivas, kaj se malkovriĝus la fiero, la malhumilo, kiu motivigas min kaŝi mian honton! Estus pli malbone, ol se mi en la komenco eldirus la plenan veron, kion efektive mi estus dirinta, se mi ne devis gardi la rajton de mia infano!"

Tiaj gravaj pensoj okupis ŝin kun kreskanta trudemo; ĝuste tiam ŝi renkontis indan homon de nobelaj deveno kaj rango --- Lordo Icenway --- kies kampara biendomo situis apud Wintoncester, en la tute kontraŭa ekstremo de graflando Wessex. Li emis amindumi ŝin, kaj Maria, kvankam li ne estis tre bela homo, kaj pli aĝava ol ŝi, volonte akceptis liajn amprovojn, ĉar ŝi ekvidis en dua edziniĝo rimedon fortikigi sian pozicion kontraŭ eventualaj malagrablajoj. Post kelke da monatoj la soleno okazis, kaj Maria fariĝis Lordino Icenway. Ŝia kaj ŝiaj edzo kaj infano foriris al lia iom fora domo, en kies ĉirkaŭo ŝi estis tute nekonata.

Pravigo aŭ kondamno de ŝia faro (laŭ via vidpunkto) montriĝis post ne longe en letereto, kiun ŝi ricevis de sia unua edzo. Ĝi estis rapide skribita kaj tenera letereto, kaj feliĉe por ŝi ĝi alvenis dum foresto de Lordo Icenway. Anderling informis, ke lia diboĉa edzino lastatempe mortis en Kebeko; li rapidis tien kaj vidis la malbonsortulinon enterigita; li nun vojaĝas senprokraste al Anglujo, por tie forigi la maljustaĵon pri kiu li kulpis kontraŭ sia kara. Li petis ŝin renkonti lin ĉe Southampton, la alvenan havenon. Ŝi timu nenion, ĉar li ŝanĝis nomon kaj estas de neniu konata en Eŭropo. Li plu diris, ke li tuj reedziniĝos ŝin kaj loĝos kun ŝi en kiu ajn parto de la Kontinento, same kiel ili komence intencis, kaj tie li, pro sia granda amo al ŝi, dediĉos al ŝia servo la ceteron de la vivo.


(Daŭrigota.)

Price 3d.

Published by

FRANK BANHAM, 2 Banchory St., W5 VIC.

Le Rondo.



(April 1914).

N-107

Eldonita de F.R. Barham.
22 Bonetory St Essendon W's. Victoria.
- AUSTRALIA -

Tradukita de F.R BANHAM.

Daŭrigita.

Lordino Icenway, malgraŭ sia natura sinregado, sentis sin maltrankvila pro tiu novaĵo kaj rapidis renkonti lin, senakompane, tuj kiam ŝi aŭdis, ke lia ŝipo jam envidiĝis. Vid-al-vide, ŝi perceptis, ke ankoraŭ ŝi posedas ĉiom de la malnova influo sur lin, sed ke lia povo iel plezurigi ŝin nun plene mankas. Pro la intensa bedaŭro, ke li tiel ofendis ŝin, li estis fariĝinta homo de rigidaj moroj kaj religio, asketa kiel Paska sanktulo, kvankam antaŭe li estis bonvivanto libera kaj gaja. Juriginte lin, ke li rekompence faros al ŝi, kiom ajn ŝi petos (li supozis, ke tio povas temi nur pri reedzinigo), Maria rekte informis lin, ke jam ŝi estas la edzino de bonega homo de antikvaj nobeleco kaj grandbieno, homo kies rangon ŝi nun partoprenas kaj pri kiu ŝi juste fieras.

Je tio la vizaĝo de la kompatinda sinjoro fariĝis malvarma kiel argilo, kaj lia koro velkiĝis, ĉar ĝuste tial, ke estis ŝiaj beleco kaj korpogracieco, kiuj en la komenco kaŭzis lin peki por havi ŝin, nun, kiam ŝia beleco estis en pli riĉa florado, kaj ŝia gracieco plimajestiĝis pro rangaltiĝo, li sentis ŝian sorĉpovon preskaŭ pli forta ol sia povo rezisti. Tamen, ĵurinte promeson, li ligis sin obedi ŝiajn ordonojn, kiuj estis simple renovigo de la antaŭa insisto --- ke li foriru al iu fremda lando kaj neniam sciigu sian ekziston al ŝiaj amikoj, ŝia edzo aŭ kiu ajn persono en Anglujo; mallongadire, neniam plu portu al ŝi eĉ la plej malgrandan embarason, ĉar el ĝi povus surfali ŝin granda malutilo en la alta sociopozicio, se la vero iel suspektiĝus.

Li klinis la kapon: "Kio pri la infano? Nia infano?"

"Li estas tute bonsana," ŝi respondis.

La malfeliĉa sinjoro tiam foriris, multe pli korpeza ol kiam li vojaĝis al Anglujo, ĉar li tiam ne povis eĉ supozeti, ke virino, kiu tiom alte tenis la honoron, kiom Maria antaŭe pretendis, kaj kiu estas patrino de lia infano, estus preninta tian rimedon por rehavigi al si tiun honoron, precipe tiel baldaŭ post la unua edzinigo. Antaŭ la intervidiĝo, Anderling estis preskaŭ certa, ke li ne trovos malfacilon reedziniĝiŝin laŭ leĝo kaj vero, kaj vivadi en gaja unueco kun ŝi kaj ŝia infano, por kiu ĉi li sentis defundan kaj kreskantan teneron, kvankam li neniam ekvidis la etulon.

Maria revenis al sia biendomo apud Wintoncester, sed pri la intervidiĝo diris nenion al sia nobela edzo, kiu dum tiu tago bonhazarde estis for, sin amuzante per kokbataloj kaj ratĉasoj per hundoj en loko Weydon Priors; li do ne sciis pri ŝia foriro. Kvankam ŝia adiaŭo al kompatinda Anderling enhavis en si iom tre da acideco, tamen poste ŝi ofte akre rigardadis en la vizaĝon de la infano de sia tielnomita vidvineco, por serĉi: ĉu iaj trajtoj de la patro tie troviĝas. Por tiu okupo ŝi havis abundan oportunon en la sekvanta aŭtuno kaj vintro, ĉar la nobela edzo estis homo, kiu pasigis la plejparton de sia tempo en kamparaj sportoj kaj terkultivo.

Antaŭ du semajnoj nekonato sendis al mi "La Folio", 100an (Decebran) numeron de kluborgano de la Eistoj en Malmo (Svedujo) 18-paĝan samformatan kiel LA RONDO. Per ĝi mi ĝoje sciigis, ke libere laboras por Eo en Svedujo hungaro Szilagy, bona poeto kaj aŭtoro de Ĉe-lernilo uzata ĉe Melbourne E. Klubo, kaj Otto Simon, iama red. de Viena "La Socialisto". D-ro Szilagy estas Eisto jam de 1908 -- O. Simon de 1902, kiam li ekpioniris la movadon en Aŭstrio. Ankaŭ el Svedujo (Box 286 Insjon) venas voĉo de Karl Karlsson, red. de "Día Regno", kristana organo. Li voke serĉas sian dispelitan aŭ izolitan gregon. Pro "samdirektigo" Hitlera li eksciigis el la Germ. E. Asocio kaj fine fuĝis.

De Cecil Goldsmith venis letero (23-1-41), en kiu li esperas, ke AEA ligiĝos kun IEL; ke la BEA "alten tenas la mentonon" kaj havis rekordan nombron da novaj membroj en Jan-o. De M.C. Butler ankaŭ; li avizas de Nro. 1. LA RONDO kaj gratulas nian entreprenon. De Juan Sabato, Ayacucho 1073, Buenos Aires, venis "SAT-Amikaro", kvarpaĝa bulteno, kiu penas rekontakti kun "perdiĝintaj" membroj de SAT, celante rekonstruon de la frakasita asocio.

De P.O. Box 175, Chungking, venis "Nova Vivo", rapertoj pro kooperativoj en Ĉinio, kaj "Heraldo de Ĉinio" (16,17,18), du-semajna organo pri la nacia lukto por ekzisto.

De Okcidenta Aŭstralio ~~gra~~ abonoj -- dankon! Ni ja bezonas pli. Faru la oblon. Jam kvar tradukoj de "The Soldier" alflugis nin. Ŝajnas interese, precipe por la poeziemaj, kiaj tre multaj homoj povus esti, se ili ofte havus okazon aŭdi deklamon de bonaj poemoj. Nur kelketaj el ni scias kiel legi poeziaĵon. "Icerway" laŭkalkule finiĝos en Majo. Sekvos ĝin "Tradicio el la jaro 1804", rimarkinda legendo pri la Napoleona sono invadi Anglujon. Ĝis la oka!

ANGULO DE LA LIBROVERMOJ.

Sub tiu rubriko ni intencas anonci librojn aĉeteblajn aŭ vendeblajn, kaj demandojn pri Esperantaj eldonaĵoj, k.t.p. Se vi havas verkojn, kiujn vi ial volas disponigi al amikoj-legantoj de tiu ĉi revuo, nepre reklam ilin per tiu ĉi angulo, metante viajn prezpostulojn. Se vi deziras aĉeti certajn librojn, pripetu ilin simile.

Hanley's, Bourke St., Melbourne, havas vende:
Uzitajn "Millidge" (4/-), "Cox" (2/-), Connor (1/-)
Hall's, samadrese, havas:
"Rhodes" (5/-), "Edinburgh" (2/6, 1/6)

Aldonu afranon!



LIBERTEMPOJ.
de C.E.Montague.

Kiam la Pasko liberigas la infanon, en la provinca antaŭurbo, de lia persista sklaveco al gramatiko kaj aritmetiko, vi trovos, ke li refreŝigas sin per luda vivigo de unu el la plej fruaj maltrankviloj de la homo. Ĉirkaŭserĉante kiel pigo aŭ korniko, li kolektas diversajn pecojn de forĵetitaj gudrotuko kaj saktuko, polvotukojn, malnovajn subjupojn, rompitaĵajn balail-bastonojn kaj fragmentojn de ondolado. Kunportinte ĉi tiujn konstruajn materialojn sur ian praktikan pecon de neuzata herbo, prefere en la najbaraĵo de la akvo, li starigas por si simplan loĝejon. La beno de malgranda fajro kronas ĉi tiun provizon da hajma feliĉo; kaj mirinda nombro da malgrandaj personoj povas esti vidataj, kiuj sidas ĉirkaŭ ĉi tiuj primitivaj kamenoj, konversaciante kun la seriozo de Sioux-ĉefoj, aŭ, je minaco de pluvo, sin pakante en nekredeble malgrandajn kubajn spacojn de vigvamo.

Tradukis A.DELSUDO.
El "La Ĝusta Loko" (The Right Place"-: Libro de Plezuroj) Ĉapitro II.

PASKA SALUTO.

Al niaj legantoj ni donas sezonan saluton! Verkante liniojn pri tiu ĉi sankta festotempo, mi sentas preman limigitecon, ĉar vere mankas al mi kaj ni tio, kio plimalpli inspiras ĉiun homon en la malnova mondo -- la sento pri la renaskiĝanta Naturo kaj tiu strange kunrilata plivigliĝo en ni mem, kiu pelas nin re-freŝiĝitajn al novaj aventuroj. Ĉe ni Aŭstralianoj la natura mondo sin preparas por longa dormado, kaj Pasko staras ĉe la komenco de tiu periodo. Sed la gloro de la homo brilas en tio, ke lia spirito povas suprenflugi la korpon; per la imago ni povas trans tempo kaj spaco nin movadi inter la kunhomoj en la soleneca atmosfero de nuntaga Eŭropo.

Printempo-Pasko por la militantaj popoloj sendube akcelos la tro konatajn laborojn de malhumaneco. Pelate sub la serpentovipoj de la diabloj de l'neceso, ili kuhe marŝas en ĥaoson. Sed eĉ tiuj sangoriĉaj Paskoj, kiel terursonĝoj de Homaro kompatinde infaneca, pasos for, simile ĉion alian... kaj por milionoj la ĉionvenka vivo de la Naturo, ĝia eterna releviĝo el la ruinoj, atestos al eĉ pli profunda vero --- ke la esencan naturon de la homo nenio povas tute forpremi, sed ke ankaŭ ĝi nun devas blinde lukti, finfine eniros en "la Eternan Sabaton", en kiu por la animoj ne plu ekzistos noktoj. La venontan epokon vi sendube nomos per diversaj titoloj, laŭ via religia, filozofia aŭ ekonomia fido, sed en la Bibliojoj de ĉiuj kredoj ĝi, kaj la maniero de ĝia aperigo, estas la ĉefmotivo.

malgraŭ la mallumoj tra kio ĝi

----- F.R.BANHAM.

KASO de la RONDO. Marto, 1941.

Konte transprenita	£ - 13-0	presado.....	£ 5-0
Abonoj kaj donacoj ricevataj de Deaconess		bindpingloj.....	1-3
M. Magarey - S-inoj		papero.....	12-0
Douglas, Dunn, Crockett,		sablonaĵoj.....	13-4
F-inoj K. Dalton,		poŝtmarkoj.....	9-4
O. Stempel, Gibson,		Melb. elspezaĵoj.....	9-8
S-roj A. Chamberlain,			
Edgar Walker - 3/-.....	1-7-0		
	£2-0-0		
deficito	sl0-7		
	<u>£2-10-7</u>		

£2-10-7

Kotizo por traduka Kurso de S-ino Douglas..... 2/-

W. Addis, (Kasistino)
25 Greville Avenue,
Flinders Park,
S. Aŭstralia.

LA SOLDATO. (de Rupert Brooke.)

Se mortus mi, nur pensu tion ĉi:
angulo ie, en fremda kampo fora,
estas Anglujo ĉiam; riĉa pli
ĝia polvo, ol polv' de l' kamp' valora;
ĉi polvon Anglujo naskis, muldis, inspiris;
ĝi florojn ami, vojojn vagi havis;
jen Angla korpo Anglan aeron spiris,
hejm-sunoj benis ĝin, riveroj lavis.

De koro ĉi, pri malico tute penta,
nur puls' en mens' eterna, ĝia ŝildo,
Anglujon iras re pensar' hejmsanga;
ŝiaj vidoj, sonoj, songaro ĝojkontenta,
kaj rid' lernita ĉe amikoj, mildo,
en koroj pacaj, sub ĉielo Angla.

Tradukis A.DELSUDO.

Se mortus mi, nur jene pensu vi:
En fremda kamp' estas iu angul'
Restanta ĉiam Angla. -- Tiu ter'
Kaŝejo estu al pli riĉa polv';
Al ĝi Anglujo donis naskon, formon,
Por ami florojn, vojojn por vagad',
Jen Angla korp' -- , spiranta Anglan aeron,
Riverlavita, de l' hejm-sun' benita. --

Kaj pensu: tiu kor' -- sen peko nun, -
Pulso en mens' eterna, ne malpli
Ie redonas pensojn de Angluj' donitajn,
La vidojn, sonojn, tagfeliĉajn songojn,
Ridon lernitan ĉe amikoj, kaj mildecon
En koroj pacaj, sub ĉielo Angla.

Tradukis P. SCHWERIN.

Se mi iam mortus, pensu pri mi nur
Ke estas iu angulo en fremda lando
Kiu, tamen, por ĉiam estas angla,
Tie, kaŝita, troviĝas en tiu kara tero,
Pli kara hompolvo, kian naskis Anglujo,
Konturis, sciigis, donis iufoje florojn por ami,
Kaj por vagi feliĉe vojetojn kaj kampojn
Korpon anglanan spiranta atmosferon anglan,
Banata per la riveroj, benata per anglaj sunoj.

Kaj pensu, tiu koro, ĉia malbonaĵo forigita,
Pulso en la menso de la Eternulo, vere,
Redonas ie la pensojn de Anglujo donitaj
Kaj la vidaĵojn kaj sonojn, songojn feliĉaj
Kiel la anglaj tagoj, kaj ridadon akirita de amikoj
Kaj mildeco kun paco en la koroj sub angla ĉielo.

Tradukis HO-BO.



En tiuj ĉi tagoj estas turni la penson al la Pola kauranta en la ombro de malmalgraŭ ĝia glora defendo. la sankta polvo de la Koperano kaj dumviva suferinto pro Lazaro Ludoviko Zamenhof. En as en paco lia cindro, iama vesto de lia nevenkebla spirito. Ni denove legu, kun sentoj de honoro kaj dankemo, la vortojn per kiuj Edmond Privat, Svisa Esperantomajstro, priskribis la lastajn horojn antaŭ la enterigo:

pia devo de ĉiu Esperantisto ĉefurbo, ankoraŭ unu fojon humilo, doloro kaj malvenko, Interne de ĝiaj muroj kuŝas niko de filologio, pura homar-la malfeliĉoj de liaj kunhomoj, la Hebrea tombejo tiurba rest-

"En tago pluva, malhela, malvarma, la varsoviaj Esperantistoj akompanis la ĉerkon al tombejo. Malgaje kantis poeto Belmont:

Ne venis Polujo kadavron honori
De filo pollanda, de monda saĝul'...
Ho kiel sangigis en mia pola kor'...
Malriĉaj Hebreoj nur venis post ĉerko,
Ĉar mortis bonkora helpant' okulisto.

"Al tiu vasta rondo familia, kies delegitoj ĉiujare lin ak-lamis en kongresoj, la landlimoj restis fermitaj. Nur kelkaj Poloj Grabowski, Belmont, germana ŝipestro Neŭbart, povis diri adiaŭon en la nomo de tiu ĉiulanda popolo, kiu lin amis kaj priploris en la tuta mondo. De registaro, neniu. Honorigo, neniam. Nur la amaso popola, la humila klientaro de l'hebrea kvartalo, en siaj laborvestoj. Multaj junuloj dankemaj. Multaj geviroj kortuŝitaj.

"Kiel enterigo de Tolstoj inter ĉirkaŭaj vilaĝanoj, ĝi estis la plej alta, la plej taŭga simbolo. Efektive nur mortis la homo, la viro 57-jara, la malriĉa okulisto. Sed la granda verko restis. Ankaŭ la inspiro el animo pura. Ne povas tio morti. Malaperos la registroj, malaperos la malgrandaj granduloj, kiuj lin ignoris. Sed eterne vivos kaj diskreskos ĉie lia semo pensa. Jam dekmiloj da homoj sanktigis lian nomon. Jam tuta homaro rekonos lin gvidanto al frata repaciĝo."

En la tago de la naŭa datreveno, okazis solena malkovro de monumento en ĉeesto de reprezentantoj de la Pola registaro. Ĉu ĝi ankoraŭ staras, tion ni ne scias. Sed tion ĉi ni firme kredas, nome, ke, simile al tio, kion fondis alia Filo de Izrael, la baz-ŝtonon metitan de Zamenhof eĉ "la pordegoj de Hades" neniam superfortos.

Kiam mi venis al la oficejo matene, mi trovis telegramon de mia juna amiko mil kilometrojn for sur la okcidenta ebena, kie li laboras sur granda ebena de ŝafoj:

"Bonvolu telefoni min hodiaŭ vespere sepan kaj duonon."

Mi mendis la telefonan interparolon, kaj post la vespermanĝo atendis en la iom klaŭstra telefonejo, kie pastrinaj oficistinoj deĵoris, diskrete transdonante la mendojn al foraj, nevideblaj kolegoj.

Oni anoncis: "Cunnamulla; kabineto dek-sepa," kaj mi iris en tiun kvazaŭ-konfesejon, ne por fari, sed eble por aŭdi, konfeson.

"Delsudo parolas."

Sonis konata, baseta voĉo: "Ĉu estas vi, Toĉjo?" -- lia propra mallongigo de "Antoni", anstataŭ la internacia "Toni".

Komence la telefono ne estas tute klara; li parolis pri apotekejo sur George-strato en la ĉefurbo; mi timis, ke li malsanas, kaj la medikamento eble mankas en la biendomo kaj en Cunnamulla.

"Ne! Mi estas tute sana. Sed en la sama domo, sur la dua etaĝo, estas loko, kie oni vendas kaj pruntas kostumojn por maskobaloj kaj spektakloj. Ĉu vi bonvolas iri tien kaj mendi du kostumojn, por mia kunulo kaj mi, por la Granda Balo?"

"Kiajn kostumojn vi havos?"

"Por mi, La Diablo", en tono montranta, ke la decido estas frukto de serioza, longa meditado sur la vastaj okcidentaj ebenaĵoj,

"Kaj lia figuro, kian figuron li havos?"

"Ho, iom pli-malpli tian, kian mi. -- Mia amiko, aminda homo, ne estas sklavo de la precizemo."

"Kaj kian kostumon li volas?"

"Ho, ni tute ne povis decidi. Vi devos ion elpensi."

"Mi faros mian eblon, kaj mendos ilin por la vendreda trajno -- Estas nur du trajnoj semajne."

Post babilo kaj amikaĵoj ni finis; la triminuta templimo tro rapide venis.

Mi mendis la kostumojn; sed mia intelekto ne superis la taskon elekti ion por la homo de nedefinita figuro. La magazinisto, kutimiĝinta tiajn situaciojn, promesis mem fari bonan elekton. Laŭ posta raporto de mia amiko, lia elekto estis tute bona; la du kostumoj aldonis vaste al la gloro de la Granda Balo de la Okcidento.

Dum mi parolis, mi bildigis al mi la elektrajn incitojn de mia voĉvibro tra la drato pasanta sub la urbaj stratoj en tuneloj, ĝis la urbrando, kie ĝi grimpis kun milo da aliaj sur fortikan foston kaj estis kondukata inter arbaroj kaj bienetoj: la netaj ordaj bienetoj de la Aŭstralianoj; tra densiĝanta arbaro, kaj krute supren sur la alt-ebena-flanko, simila al montaro, tra agrabla provinca urbo Toowoomba ĉe la fando; tra la serena belo de la vastaj grenkampoj: la verdo kaj flavo de la kreskanta greno, kaj la nigra bruno de kampoj plugataj aŭ semataj; tra arbaro, tra arbustaro ĝis la fino, kie la elektraj incitoj sonis apud la orelo de mia amiko, kaj liajn voĉovibrojn portatajn al mi en kontraŭa direkto.

direkto.

La fizika scienco faras al ni multan malbonon; pri la aparatoj de amasa murdo ne estas bezone paroli. Sed en paca tempo brulanta aeroplano povas fali sur iun ajn domon. La radio faras preskaŭ neblaj la konversacion, la legadon, la pensadon. La filmoj, ekster sia vulgareco, kreas strangan rason, kiu emas kondukti, ne kiel homoj, sed kiel la stilzaj (1) kaj lamaj ombroj, kiuj stumblas trans la ekranon. La ordinara telefono, per sia nervskua ektinto...kiom da bonaj pensoj ĝi estingis, kiom da interkonsentoj ĝi prokrastis, por bono aŭ malbono, kiom da miskomprenoj faris per sia truda interrompo, kiom da.....

Sed estas kompensaĵo aŭdi amatan voĉon trans mil kilometroj.

A. DELSUDO.

(1). G. stelze (uzata figure): bombasta, troaplomba. Sed ŝajnas ke la aŭtoro uzas la radikon en ĝia ĉefa senco (stangirilo), ĉar samfraze li uzas "lam'" kaj "stumbl'". (Red.)

IN THE BLACK-OUT.

With grime of greed and bloody sweat of wars
We stain earth's loveliness -- for Thy command,
O God, I thank Thee, that set high the Stars
Beyond the reach of our despoiling hand.

REGINALD C. EVA. (John o' London 17.11.39.)

Free Esperanto Translation;
PENSO DUM MILITA URB-MALLUMIGO.

Per koto malama kaj sango blasfema
Makulas ni belon de l'tero, la hejma.
Aĥ, dankon al Dio, pro Ties ordono,
Lau kio la stelojn en ĉielplafono
Neniam atingos la manoj de l'Homo,
La Homo stultaĉa -- kaj sinmortigema.

Line 1.

F. R. BANHAM.

Koto malama - the slime of hatred: (compare: "mud slinging")
mud representing debased mentality or spirit-state.
I prefer "koto malama" to "koto avara", which latter would be
nearer the original, but to my mind doesn't serve so well to my
purpose.

sango blasfema - blood represented as vocal. Compare "la
voĉo de la sango de via frato krias al Mi..." Gen. 4/10.

Blood, the principle of life, misused, turned from its
proper function by the folly and hatred of men. As gift of lan-
guage may be abused by blaspheming men, so blood may be used to
dishonor God - instead of coursing normally in the veins of men
devoted to His service, is splasht in defilement of his earth.

li instige kantis ĝia la dudek kvara linio. Per tio li senscie verŝis honton sur pli ol unu veteranon, kiu, fritate en ruĝiĝoj, zum-zumi devis --- tra-la-la.

Ni kore salutas la unuan prezidant-in-on, S-ino Rawson, longjara instruisto ĉe la klubo.

ATENTU! En nia No. 5 troviĝas misinformo. Ne la N.Z.E.A. havas librojn por vendi, sed la "Librofako La Interna Ideo," P.O. Box 330, Wellington. La du organizoj estas apartaj. Feliĉe la adreso estas la sama. Mendantoj bonvole aldonu afrankon.

S-ro P.SCHWERIN ricevis leteron de S-ro Munz (iama ĉefdelegito de Berlino, nun vivanta en Londono), kiu interalie skribas:

"Vi verŝajne scias, ke Lydia Z. en la Concentration Camp de la Nazis mortis - neniu el la familio havis la eblecon vidi ŝin. La d-ro Adamo estas ĝis nun malliberigita....."

Cetere li skribas, ke "la Londona klubo vigle daŭrigas la laboron, tiel ke la esperanta vivo en Anglujo ne nur estas daŭrigata, sed bone progresas."

Kara RONDO: Mi volas fari demandon al vi. "Rigardu la Teron" (van Loon) enhavas ĉapitron pri Aŭstralio, kaj sur paĝo troviĝas: "En la jaro 1901 tiuj ses ŝtatoj kun 6,000,000 loĝantoj...fondis komunriĉaĵojn de Aŭstralio..." Tiu vorto volas signifi "commonwealth", sed "wealth" en tiu senco signifas "welfare", "good", kaj rute ne "riĉaĵoj". Legante tiun vorton, alilandoj tre povus erara bildigi al si grandegan keston, kiu kapablas enhavi la tutan riĉon de ĉiuj Aŭstralianoj, kaj kiun oni nomas "komunan ujon de riĉaĵoj". Kion vi opinias? (Gordon Chatterton).

Respondo: "Commonwealth" laŭ Oxford Dict. signifas (1) Public welfare, general good. (2) a State, especially viewed as a body in which the whole people have a voice or interest. (3) A Republic. (4) The Republican Govt. of Cromwell. Vi estas prava. "Weal(th)" tiusence egalas "welfare". "Komunriĉaĵo" estas erariga, ĉar en Aŭstralio, kiel en aliaj landoj, la riĉaĵoj ne estas komune posedataj. Male, eĉ tiuj produktoj (fruktoj, legomoj, kaj multe alia) kiujn kreskigis homo per la forto de la propraj manoj, ne estas lia posedaĵo en vera senco de la termino, ĉar li ne havas rajton libere kaj propravole vendi ilin.

Millidge listas la vorton sub civit' kaj soc', sed ne donas al vi helpon. Eble "...la ŝtatoj federaciigis, sub formo de unu superŝtato, la Commonwealth of Aŭstralia, tamen ankoraŭ retenante lokan aŭtonomion."

Haefker ("Jarmiloj Pasaĝoj", p. 352) uzas "komunprosperaĵo, t.e. respubliko, por nomi la periodon de Cromvelo, sed Aŭstralio ne estas respubliko. Ĉiu politike demokrata (tiom pli ŝtato jam en-korpiganta en si iom da vera ekonomia kaj industria demokrateco) rajtas nomi sin "Commonwealth", kiu vorto nepre enhavu puran sopiron al fakta ŝtato en kiu socia bonfaro kaj ekonomia justeco atingos la plejble altan punkton de evoluo.

F.R.B.

LINGVAJ DEMANDOJ.

- N. en I. "Left alone with..." "Ŝi lasis min duopa kun Sinjoro St. John". (Jane Eyre, trad. Bulthuis.)
- Mo. en B. "Vi ne devas fari"; "Vi devas ne fari". Logike la unua signifas, ne estas necese, ke vi faru: kaj la dua, estas necese, ke vi ne faru. Tamen Zam. kaj la granda plimulto de verkistoj uzas la unuan anstataŭ la duan, kaj pro tio oni devas akcepti ĝin kiel Esp-an idiotismon. Persone plaĉas al mi vidi la formon uzata korekte.
- T. en M. "Parker" estas radikoj de la U.V. kaj signifas tion, kion la Angloj volas komprenigi per "by heart". "Perkore" ne havus tian signifon ĉar oni ne lernas per la koro, sed per la memorkapablo de la cerbo. Zam. tre verŝajne estis influita de la Franca "par coeur" en sia elekto. Rimarku krome, ke li donis al ni la radikojn "volont", kiu tute ne estas same kiel la Participe "vol".
- Al. en Y. Formato 14 x 20 koloroj. Oni povas skribi tiel, kaj prononci "pér".
- C. en H. "Pins and needles." Formication. La Francoj diras: la main me fourmille; avoir les fourmis dans les jambes. La Germanoj "Ameisenschauer" (formiktremo). Kial ne diri: Formikoj marŝas (promenas) en miaj piedoj? Ĉu legantoj ektrovis bonan solvon en la literaturo?
- Tomo en L. "Stilted". Ne uzu "stilza". Prefere "pozaĉa", "afekt-aĉa", nenature kondutanta (sintenanta), laŭ teksto.

EKONOMIO, EKONOMISTO.

En noto 17 G.G. skribis, ke kiam nomo de scienco finiĝas per -io, la nomo de la profesoroj de tiu scienco estas la sama vorto sen la litero -i. Tiel "teologio", "teologo" k.a. Sed li forgesis atentigi kursanojn pri la radikoj "ekonom", kiu donas ekonomo (steward, manager, seneschal; administranto de bieno aŭ domo; intendanto) kaj ekonomisto (economist; sciencisto pri produktado kaj disdividado de la riĉaĵoj, kaj pri la situacio de regnoj laŭ vidpunkto de (natura) riĉeco kaj materia prospero).

La ĉefa vorto ĉe la fino: Kiam vi kunmetas vortojn, zorgu meti la ĉefan ĉe la fino. Ekzemple, "jarcento", ĉar la frazo estas "cento da jaroj"; "akvofalo", ĉar "falo de akvo". Pensu pri aliaj ekzemploj.

Smile a little, smile a little,
As you go along,
Not alone if things go easy,
But if things go wrong.

Ridetadu iomete
Ĉiam sur la ter',
Ne nur se la viv' facila
Sed en malprosper'.

P.SCHWERIN.

UNu vintran tagon, li malproksimen foriris por aliĝi aron de ĉashundistoj - li kutime ĉasis vulpon du-tri fojojn en semajno en tiu sezono. Lia edzino, sola, promenante en sunlumo sur teraso antaŭ la fenestroj, vidis fali ĉe la piedoj iun blankan objekton, kiu estis ĵetita de trans apuda muro. Ĝi estis ŝtoneto premvolvita en peco de surskribita papero. Lordino Icenway legis ĝin kaj kun malagrabra mieno tuj paŝis rapide laŭ la teraso kaj tra la murpordo en arbustejon, de kie la letereto venis. Ŝia unua edzo staris en la kreskaĵo antaŭ ŝi. Estis facilvideble, pro lia aspekto, ke io malbona trafis lin.

"Vi rimarkas ŝanĝon en mi, bonamata," li diris. "Jes, Maria, mi jam perdis ĉiom mian riĉon, ĉefe per la freneza kartludado en la Eŭropaj inferoj, al kiuj vi ekzilis min. Sed unu afero en la mondo ankoraŭ restas al mi -- la infano -- estas li, pro kiu mi entrudis ĉi tien. Ne timu min, kara! Mi ne ĝenos vin longe; mi tro bone amas vin por tion fari! Sed mi pensas pri la knabo tage kaj nokte -- mi ne povas ne pensi pri li -- mi ne povas subpremi mian senton pri li; mi sopiregas lin vidi, kaj paroli vorton al li almenaŭ unu fojon en mia vivo!"

"Sed via sankta promeso?" ŝi diris. "Vi ĵuris neniam montri eĉ signeton....."

"Mi montros nenion. Mi nur ekvidu la infanon. Mi scias pri mia donita vorto, kruela estrino, kaj mi nepre ĝin tenos! Se mi tion ne intencus, mi ja estus elpensinta ian artifikon. Sed mi preferis la malkaŝan vojon -- peti de vi permeson."

Ŝi hezitis, kun la fiera severeco, kiu jam kreske fariĝis elemento de ŝia karaktero, kaj kiun ŝia rangaltiĝo ĝis nobeleco certe pligrandigis. Ŝi diris, ke ŝi meditos pri la afero kaj donos respondon postmorgaŭ, je sama horo kaj loko, kiam la edzo-nobelo estos for de la hejmo, ĉasante kun hundej.

La sinjoro atendis pacience. Lordino Icenway, kiu nun havis por li eĉ ne iometon da konscia amo, konsideris la demandon kaj fine decidis, ke estus malsaĝe puŝi ĝis ekstremo viron de tiele pasia koro. Je la horo difinita ŝi renkontis lin laŭ promeso.

"Mi permesos vin vidi lin, sed kompreneble sub rigida kondiĉo, ke vi ne vin montru. Tial, kvankam vi vidos lin, li devos ne vidi vin, alie via maniero tre povos perfidi vin kaj min. Mi endormigos lin en la posttagmezo, tiam mi venos al vi ĉi tie por konduki en la domon per privata vojo."

La malfeliĉa patro, kies iama malbonago jam havis por li punan sekvon en maniero por li ne antaŭe supozebla, promesis teni al la kondiĉoj, kaj do atendis ŝin en la arbustejo ĝis la momento, kiam ŝi alvenos. Ŝi aperis ĉirkaŭ la 15a horo kaj kondukis lin per ĝardenpordo supren ĝis lulejo, kie la infano kuŝis. Li estis en liteto, spirante kviete, kun silkecaj bukloj premitaj sur la kuseno. Lia patro, kies aspekto estis tre kortuŝa, sin klinis super li, lasante fali larmon sur kovrilon.

Ŝi levis retenantan manon, dum li febre direktis la buŝon al la lipoj de la knabeto.

"Ho, kiel ne?" li petegis.


"Nu, bone do," ŝi cedis, "sed tre milde."

Li kisis la infanon sen veki lin, sin turnis, kaj el la ĉambro sekvis ŝin, kiu kondukis ĝis ekster la domo laŭ la sama vojo per kiu li envenis. (daŭrigota.)

Price 3d.

Edited by F.R. BANHAM
2 Banchory St.,
Essendon W.5. VIC.
AUSTRALIA

La Ronco.



Majo 19/41.

N-ro 8

Eldorrita de F.R. Banham.
2 Banchorry St. Essendon W5. Victoria.
- AUSTRALIA -

(Daŭrigita.)

Sed tia kuraco kontraŭ la korpema sento, esti fremdulo por sia propra filo, nur plifortigis la malsanon; en la frua tempo, neniam vidinta la knabon, li amis lin nur nebulece, image, sed nun, vidinta lin, li fariĝis forte ligita al li pro konscia rilateco de karno-osto, same kiel aliaj patroj. La scio, ke li havas nenion pli ol malfirman permeson vidi sian infanon nur tre malofte kaj nur dum kelke da momentoj, preskaŭ perdigis al li la prudenton -- mensostato, kiu minacis pereigi lian promeson al Maria, ke li ne montros sin al la knabo. Sed li tiom kavaliroce respektis Lordinon Icenway, kaj tiom bedaŭris sian krimon kontraŭ ŝi, ke li konstante draŝis sian koron en submetiĝon. Pro lia trea soleco, ĉiom lia pasia fervoro -- ja tio estis multa -- nun fluas en la ŝanelon de patra kaj edzeca amo -- direkte al infano, kiu lin ne konis, kaj al virino, kiu lin ĉesis ami.

Finfine tiu stranga punado fariĝis tiel turmenta al la kompatinda fremdulo, ke li decidis malpliigi ĝin malgraŭ ĉio, krom nur sub unu kondiĉo, nome, ke li ne malutilu al sia antaŭa edzino, por kiu lia amo ŝajnis kreski proporcie kun ŝia drasta traktado al li. En sia pli frua vivo li multe interesis pri tulipkultivo, kaj ĝardenado ĝenerale; post la perdo de sia riĉo-kaj sia alveno en Angluj, li faris modestan enspezon, utiliganta sian scion en la-forcejoj ĉe hortikulturistoj kaj similaj. Kun la nova ideo en kapo, li vigle dediĉis sin al funda studo de la ĝardenmetio, kaj fine akiris altan lertecon en la arto hortikultura. Atendinte ĝis lia lorda moŝto Icenway deziris dungi subĝardeniston, li proponis sin por la ofico, kaj estis akceptita pro siaj ĝentilo kaj inteligento, antaŭ ol Lordino Icenway povis scii ion pri la afero. Ŝi estis do treege mirigita, kiam ŝi ekvidis lin en plantodometo de la bieno ĉirkaŭ semajnon post dungiĝo. La punon de tuja forsendo, per kiu ŝi grandsinjorine minacis lin, ŝi decidis post medito ne efektiviĝi. Dum li servos ŝin en tia ofico, ŝi sciis, ke li ne malutilos al ŝi per eĉ vorteto; sed, se li estus forpelita, li tre povus, sub sento de forta ĉagreno, intence aŭ neintence montri al aliaj tion, kion bonkora traktado helpas al li reteni en la kapo.

Ŝi do permesis lin resti ĉe la bieno kaj donis al li kabanon apud la ĝardenmuro, kiu estis la loĝejo de liaj antaŭuloj en la ofico. Ti li loĝis absolute sola kaj pasigis horojn el sia libera tempo legante, sed eĉ pli multan tempon observante la fenestrojn kaj gazenojn de la domo de sia sinjorino, por ke li havu ekvidon al la infano. Pro ĉi tiu li forlasis la kredon de sia propra eklezio, la romkatolika, en kiu li edukiĝis, por fariĝi tre akurata frekventanto ĉe la diservoj en la paroĥa preĝejo anglikana apude, kie, sidante sur la benko ĝuste post tiu de la lordino, la lordo, kaj la duonfilo de la lordo, la ĝardenisto povis penseme studi la trajtojn kaj movojn de la junuleto je distanco de nur kelke da futoj, sen

(vidu p. 9)

Plaĉis al ni la ŝatesprimoj inter la komentoj pri la Aprila numero. El tio ni rajtas supozi, ke post ne longe abonantoj arigos ĉirkaŭ nia entrepreno en sufiĉa denso por certigi eldonadon sen ĝeno de mona manko. Atende la feliĉan horon en kiu ni trovos nin ekster ĉia embaraso, ni fiksas la normalan amplekson de LA RONDO je ses paĝoj. La nombron da paĝoj en ĉiu numero diktos la kasenhavo. Al niaj legantoj ni sidas sub nenia garantio rilate amplekson aŭ formaton de LA RONDO; la pli-multo da ili ekabonis ĝin, aprobe, bonamike, en tempo kiam ĝi aspektis pigmeo ne tre sana. Feliĉe ĝi pruviĝis esti heroldo de la nuna pli impona, kian ni daŭre produktos, se vi ^{pruvas} varbi por la afero ankoraŭ da pagantoj.

Ĉe la Traduka Kurso ni jam penas presi la tekstojn sur du folioj anstataŭ tri, por ŝpari paperon k.a.

Niaj legantoj ciferas laŭ-ŝtate: Viktorio 26, Nov-Sud-Kim. 12, Okc. Aŭs., 11, Sud-Aŭst. 7, Tasmanio 7, Nov-Zelando 2, Papuo 1, Britujo 2, Usono 1, Argentino 1, Meksikio 1.

Vizitanto D-ro F. Williams transdonis al ni adresojn de eventualaj abonantoj; ni kontaktigos.

Ni aperigas resumon de letero de E. Lanti, nun en Meksikio. Ĝi revekos ĉe kelkiuj rememorojn pri tiu nudparola observanto, kosmopolito, spirita kaj korpa vaganto, homo sen patrio, eĉ (unike en nia "adoranta" mondo) sen heroo. Li estas majstra Esp-isto kaj originala pensanto. Sukceso lubriku lian agadon en la Nova Mondo!

La "Vendreda Klubo" fondita de S-ino Hintze en Melb. konsistas nur el progresintoj kaj fluuzantoj de Esp-o. Ĝiaj tut-espaj konversacioj donas bonan oportunon al ni iufoje ricevi helpon en tradukdemandoj postulantaj konsideron de pli ol unu kapo. En Sidnejo simila funkcias; en kafejo dum nebrujaj horoj, super malvarmiĝintaj tasoj, kelkaj amikoj kontraŭŝtate komplotas, skandalumas, aŭ diskutas meritojn de tiu aŭ tiuĉi marko cigareda.

----- F.R.B.

NEKROLOGA NOTO PRI LIDJA ZAMENHOF.

Atendante pli ampleksan el Eŭropo, ni rapidas doni kelke da informoj pri nia kara gvidantino, kiu pereis mizere en nazia koncentrejo.

Ŝi estis la plej juna filino de sia fama patro, naskiĝis 29 Jan. 1906. Kiel naŭjara knabino ŝi lernis E-on, kaj fininte en 1925 la universitaton (jura fakultato), ŝi tute fordonis sin al la lingvo internacia. Fariĝis sekretario de "Konkordo" (Varsovio), paroladis, kursgvidis. Ekde la Univ. Kong. en Vieno 1924, ŝi ĉeestis ĉiun UK, faris propagandan vojaĝon kaj gvidis en diversaj landoj multajn kursojn. Tradukis ampleksan libron pri Bahaismo: "Baha' u'llah kaj la Nova Epoko" de Esslement; "Parizaj Paroladoj de Abdul Baha"; originale verkis "Homo, Dio, Profeto". Ankaŭ tradukis la Polan klasikajon "Iridiono" (Krasinski), novelojn de Prus, kaj "Quo Vadis" de Sienkiewicz. Multgazete kunlaboris, ankaŭ ĉe kompilo de la Esperanta Enciklopedio.

MIGRANTAJ BIRDOJ.

Inter la plej interesaj specoj estas birdoj kiuj venas ĉiusomere de la norda hemisfero, loĝas en sudaj kontinentoj ĝis venas aŭtuno kaj vintro, kaj reiras Norden por vivi, ami, kaj nesti. Ne ĉiuj el la migrantaj specoj iras el Aŭstralio. Kukuloj, hirundoj, kaj multaj aliaj specoj, venas al suda Aŭstralio dum printempo kaj somero, kaj foriras nur al norda Aŭstralio kaj Nova Gvineo.

Do, ekzistas du grupoj de migfantoj. Unu grupo venas de aliaj kontinentoj, sed neniam nestas tie ĉi, kaj la dua grupo venas de norda Aŭstralio kaj ĉiam nestas en la sudo de nia kontinento.

Pri la du-dek naŭ specoj kiuj venas de aliaj kontinentoj mi deziras skribi.

Ili venas el la norda parto de Azio kaj el la insuloj apud Japanio. Plejparte ili estas specoj kiuj frekventas mar- kaj lag-bordojn kaj ni nomas ilin VADANTAJ BIRDOJ. Anglaj nomoj de kelkaj: - Whimbrel, Curlew, Godwit, Sandpiper, Sanderling, kaj Knot.

Migraj birdoj ĉiam nestas en la plej malvarma parto de migrado, kaj ĉiuj dudek naŭ specoj kiuj vizitadas Aŭstralion el malvarma norda Azio ĉiam nestas tie kaj neniam ĉe ni.

Inter Aŭstraliaj specoj la migrado estas preskaŭ, sed ne ĉiam, de la nordo ĝis la sudo kaj returne. Kiel la birdoj lernis fari tian teruran vojaĝon?

La teorio ke la nuntempaj birdoj sekvas la marbordojn de longe malaperintaj insuloj kaj kontinento, eble povas klarigi la migradon inter Azio kaj Aŭstralio, tiun inter Eŭropo kaj Afriko, kaj tiun inter Norda - kaj Suda-Ameriko, sed estas alia migrado farita de kelkaj specoj -- de okcidento al oriento kaj returne.

Kial okazas la mirinda migrado trans la oceanoj? La plej kred-ebla teorio ŝajnas esti, ke la malvarma sennutra vintro de la nordaj landoj pelis la birdojn al pli varmaj manĝohavantaj landoj. Kompreneble la marbordaj birdoj ĉiam sekvas la marbordojn de la antaŭaj kontinentoj. Sed tra la geologiaj epokoj la maroj kaj la kontinentoj multe ŝanĝiĝis. Marbordoj iĝis insuloj kaj poste eĉ tiuj insuloj malaperis kaj aliaj kontinentoj aperis. Kie unue la migrada vojaĝo estis laŭlonge de marbordoj, poste la sama vojaĝo estis de insulo al insulo, kaj iĝis flugado tra ĉiam pli kaj pli grandaj distancoj, ĝis fine la birdoj faras preskaŭ nekredeblan vojaĝon trans la nunajn oceanojn.

Pri orienta migrado ni ne havas kontentigan teorion. Unu malgranda Pluvio (angle: Double-banded Dotterel) migradas al Novzelando el Aŭstralio kaj returne - ŝajne tute sen kialo. Certe ne estas pro manko de nutraĵo.

Migrantaj birdoj en Aŭstralio plejparte estas malhelkoloraj. Tipaj estas la Knot, Whimbrel, kaj Curlew.

Dum restado tie ĉi ili estas brunaj kaj grizaj, sed en la tundroj de Siberio, kie ili pariĝas kaj nestas, la plumoj estas belaj kaj brilaj. Oni malfacile kredas, ke ili estas la samaj specoj.

Post la nestado kelkaj specoj, kiam la idoj estas sufiĉe fortaj, kune migradas. Sed ĉe aliaj specoj la maturaj birdoj foriras unue, kaj la idoj sekvas ilin post iom da tempo. La junaj birdoj devas fari la longan vojaĝon senvide, senhelpe. Kiel ili povas direkti

sin trans tiun oceano? Ni nur povas respondi -- "Per instinkto!" sed kiamaniere ili ricevis tiun instinkton?

Fine de Septembro 1935 mi estis en Cairns, Kvinslando, kie, nur etdistance de la urbdomo, mi vidis grandan amason da ĵus alvenintaj migrantoj de diversaj specoj. Ili serĉis nutraĵon sur la kota marbordo malkovrita de la tajdo.

En 1938 en Nederlando, esperantistoj aranĝis, ke nederlanda ornitologo gvidu min por studi la marbordajn birdojn de la Zuider Zee. Tre interesa tago! Mirinde estis vidi, ofte en koloraj plumoj, la specojn kiujn ni kutime vidis somere sur Aŭstraliaj marbordoj ĉe Cairns, Western Port, Wilson's Promontory, kaj Coorong.

----- E.S.HANKS.

VENDITA KONTANTE.

Ĉiu min informas, ke estas neeble nuntempe vendi domon en evakua areo, ĝis mi renkontis sinjoron Medlar. Medlar estis domagento kaj mia amiko. Li ankoraŭ estas domagento.

"Ĉu neeble?" li enis. "Mi vendus tiun vian domon eĉ se ĝi apudus la Sigfridan Linion! Kiom da mono vi deziras por ĝi?"

"Mil ducent," mi tuj respondis.

"Diru mil kvindek," li konsilis, "kaj vi havos ian esperon."

Mi diris mil kvindek kaj komencis esperi....

Tri tagojn poste mi ĉesis esperi. Medlar telefonis min ĉe mia oficejo kaj tion konsilis.

"Mi nun estas vian domon montranta al fraŭlino," li diris funebre, "sed ŝi tute rifuzas aŭskulti al mil kvindek. Plibone ke vi diru nur mil." *Ĉi ĝi gluti kaj ĝi nomi nur mil.*

"Cetere," li aldonis, "ĉu vi scias, ke la kuireja muro estas malseka?"

"Tio estas apenaŭ videbla," mi protestis.

"Ŝi ĝin rimarkis," li rebatis, "ŝi ĝin viŝis permane, kaj al mi la manon montris."

"Vi devus esti ĝin batinta," mi diris severe.

"Ankaŭ estas truo en la planko sub la banujo," li daŭrigis melankolie, "ŝi nun surmane kaj genue ĝin rigardas."

Mi sciigis al li kion fari, kaj remetis la aŭskultilon, sed antaŭ ol forpasis dek minutoj li jam denove parolis.

"Ĉu vi akceptus je naŭcent kvindek?" li demandis abrupte.

"Ne," mi respondis eĉ pli abrupte.

"Ŝi ekvidis tiun fendaĵon en la muro de la antaŭe dormĉambro," li kuragis diri.

"Montru al ŝi tiun en la mangoĉambro," mi instruis lin, "tiu estas pligranda. Oni povas rigardi tute tra ĝi en la kuirejon."

"Ĉi-momente," li diris, "ŝi staras sur seĝo en la vestejo, frapetante la plafonon por provi, ĉu ĝi estas senerara."

"Se ŝi difektas tiun plafonon," mi akre diris, "ŝi tutcerte pagos la riparkoston. Diru al ŝi, ke ĝi estas nur domo, ne mikroskopa kliŝo."

"Mi faros mian plejblan," li promesis, "sed vi neniam ricevos

la milon. Vi ja scias ke ĝi estas konstruita sur argila tero."

"Ne gravus al mi se ĝi estus konstruita sur dinamito," mi morde respondis, "milo estas mia prezo."

"Estus alie, se ĝi havus centran varmigan sistemon," li plendis.

"Aŭskultu al mi," mi diris sovaĝe, "naŭcent kvindek, kaj ne unu penco malpli."

"Mi faros mian plejblon," li promesis.

Li faris sian plejblon dum duona horo, kaj tiam retelefonis min.

"Ŝi estas tia malplaĉebla marĉandulino," li diris enuige, "ĝuste kiam mi preskaŭ efektive jam vendis ĝin, ŝi ekvidis tiun rompitan stukajon en la vestiblo."

"Frapu ŝin per ĝi," mi sovaĝiĝis, "Frapu ŝin per la stukajo kaj mi volonte pagos la duonon de la kompensaĵo."

"Ŝi nun rifuzas aŭskulti ion pri naŭcent kvindek," li bedaŭris.

"Kion mi diru al ŝi?"

"Ne tentu min," mi siblis, "la telefonistino eble aŭskultas."

"Ĉu vi ne konsideros pri naŭcent," li sugestis.

Mia respondo estis spirego en la telefono.

"Ĉar neniu nuntempe deziras pruntedoni hipoteke pri domoj," li avertis, "vi estas ja bonŝanca trovi aĉetanton je ia prezo."

"Nu, diru al ŝi naŭcent," mi cedis.

"Mi diros," li promesis, "ŝi saltas ĉie sur la plankoj ĉi-momente, provante la tabulojn."

"Adiaŭ," mi muĝis.

Mi sidigis ĉe la telefono kaj atendis, kaj kiam li reaŭdigis, estis ĝoja sono en lia voĉo.

"Bonege," li triumfis, "mi devas fari definitivon proponon."

"Proponon?" mi eĥis, "Kion vi intencas?"

"Okcent kvindek, kontante," li proponis.

"Kion pri la naŭcento?" mi kriegis.

"Nekonsiderinde. Vi ne diris eĉ vorton pri la tegmento," li akuzis, "ĝi enlasas akvon."

"Nur kiam pluvos," mi protestis.

"Aŭskultu," li avertis, "se vi ne akceptas nun, eble poste tro-malfruigos. Mi mem ne donus kvincent por la loĝejo."

"Ho ve!..."Diru al ŝi, ke mi akceptas proteste," mi ĝemis.

Lastfoje kiam mi preterpasis la domon, iu tondis la kreskaĵarilon en la antaŭgardeno. Estis Medlar mem.

"Mi forĝesis diri al vi," li ridetaĉis responde al mia mirigita rigardo, "ke la fraŭlino, kiu aĉetis vian domon estis mia fianĉino. Ni geedziĝis lastan semajnon. Bonvolu al mi."

"Bonvolu al vi?" mi grincis, "vi ne ĝin bezonas."

----- KENNETH LINTON.

Tradukis el "Humour."

ABSOLUTE VERA RAKONTETO.

PASKA LUNDO. Instruistino al lernantino de Esperanto:-

"Ho! Vi venas por via leciono malgraŭ la ferio?"

"Certe jes! Mi pli preferus veni al vi por mia Esperanta leciono ol iri al la kino!"

3-2-4. z/d S-ro Jesus Amaya, Ap.59, Meksiko D.F.(Meksikio)

.....En Meksiko estas dudeko da Esp-istoj, sed neniam ili kunvenas. Jam de preskaŭ du monatoj mi estas ĉi tie kaj mi havis la okazon paroli nur kun 5 el ili.

Surŝipe mi eksciis, ke oni povas pli rapide atingi Meksikon, elŝipiĝinte ĉe Akapulko anstataŭ en Manzanillo, kiun mi atingus du tagojn poste. Mi do elŝipiĝis en Akapulko. Sed tie la migra oficejo ne estis informita pri mia alveno kaj mi devis resti tie ĝis la koncerna instanco estos ricevinta instrukciojn el la ĉefurbo. Felice, ke mi povis telefoni al Jesus Amaya, kiu klopodis por aranĝi la aferon. Se ne estus tiel, mi povus atendi dum kelkaj semajnoj se mi ne pagus al la oficistoj, por ke ili rapidigu la aferon. Tia estas la kutimo, la moroj en ĉi tiu lando kaj eĉ en la tuta hispanlingva Ameriko. Ĉi tie oni nomas tiun sistemon "mordida" (mordo); policistoj, oficistoj k.s. "mordadas", stratvendistoj pagas kelkajn monerojn al policistoj por havi permeson...ĝeni la trafikon.

Meksiko kuŝas 2240 metrojn super marnivelo, kaj en Ĉilio oni avertis min, ke, konsidere mian aĝon, mi ne devus iri al Meksiko, ke almenaŭ mi devus unue resti dum kelka tempo en iu loko 1000-aŭ 1500-metran(1) alta. Okazas ja, ke ĉe granda alto la koro ne plu funkcias normale; maljunaj aŭ malsanaj personoj mortis pro tio kaŭzo. Mi ne atentis la konsilojn kaj indifereinte atendis, por scii, kio okazos al mi; nenio malagraba okazis tiurilate...nur malvarmeto, kio estis al mi tre agraba post tritaga ŝvitado en Akapulko.

Mi estas gasto ĉe S-o Amaya; komence li ne volis akcepti pagon kaj mi devis tre insisti pri tio. Fine li difinis prezon laŭ kiu li ne havis malprofiton nek profiton.

...kio ĉefe frapis min en Aŭstralio, precipe en Sidnejo, tio estis la granda nombro da drinkuloj; nu, Meksiko povus konkuri kun Sidnejo, kaj ĉi tie la drinkuloj ĝenerale estas ĉifone vestitaj. Ili trinkas alkoholaĵon "Pulque", kiu devenas de arbusto nomata "magey". Oni trinkas ĝin en specialaj ejoj, kien ne povas eniri virinoj kaj neplenaĝuloj. Tial ke mi estas eĉ troplenaĝa, mi do povis eniri dufoje. La spektaklo estas vere naŭza...La virinoj povas ricevi la pulkeon el iu giĉeto kaj porti hejmen. nemalofte oni vidas sur trotuaro kvar, kvin, ses aŭ pli da personoj, kiuj trinkas unu post la alia el la sama granda kruĉo; jes ja, la spektaklo estas eĉ pli naŭza ol en Sidnejo. Sed ne konkludu el miaj diroj, ke Meksiko ne estas bela urbo; se tion vi farus, grave vi erarus....

SAT-rondo en Los Angeles decidis eldoni Bultenon; ili petis, ke mi estu la ĉefa kunlaboranto kaj mi ne povis rifuzi...SAT vivas... en la koroj de ĝiaj anoj.

(1) Tiel en la teksto. Supozinde, ke la vorto "distancon", aŭ "mezuron" estas subkomprenata.

PROGRESS ESPERANTO READER (Part One) by BERTRAM POTTS, F.B.E.A.

Based on the "75% of Esperanto roots familiar to educated English speaking people", the remaining 25% to be picked up from "whatever

Esperanto textbook the learner is using."

Thousands are brought to study Esperanto by some general hankering after words, etymology and the like. These eagerly grasp at new forms. But other thousands are not mentally cast that way; their fragile persistence needs nursing through the early stages of language acquisition, and this little book may well serve to relieve such of the need of charging the memory with the vocabulary at the same time as they are feeling out the grammatical structure. We wish this "Reader" well, but at the same time feel that the ingenuity and patience of the veteran author might have brightened the text with a few sleek anecdotes.

F.R.B.

(Price 10d., La Interna Ideo (Libro Fako), Box 330, Wellington Cl.N.Z.)

DUM LA URBA NIGRIGO. (de REGINALD C.EVA.)
(La originalo estas en la Aprila numero.)

Per feĉo de avaro, kaj sanga ŝvit' de militoj
ni murdas teran belon; por via komando,
ho, Dio, mi dankas, Vi alte lokis en orbitoj
la stelojn for de nia preda mano.

-----Tradukis A.DELSUDO

KUNOKAZOJ.

De tempo al tempo, oni aŭdas la ekkrion "Ho! Kia stranga afero!"
Jen tri el miaj propraj travivaĵoj.

Mi estis gravege malsana! Neniu atendis, ke mi resaniĝos. Mi mem bone konstatis la gravecon de mia sanstato. Okazis en unu dimanĉa vespero, ke mi momente estis sola. Mi demandis al mi - Ĉu mi mortos morgaŭ? Post morgaŭ? Eble mardo? Eble merkredo? Ĉu nokte, ĉu tage? Mi bildigis al mi ĉerkveturilon kiu malrapide antaŭen iras laŭ la strato. Ĉu funebraj girlandoj kuŝos sur ĝi? Interne, mi vidas longan ĉerkon...mian ĉerkon...Kiom da funebrveturiloj sekvas la ĉerkon - mian ĉerkon? Ĉu miaj amikoj...Ah! Mi estis profunde malgaja!

En tiu momento, la muzikistaro de la "Savarmeo" marŝis laŭ la strato...nun preter mia fenestro. Ĝi ludis "The Dead March in Saul." Estis ja tro! Mi turnis min en la lito kaj amare ploris....

Jen la dua. En somera vespero, geamikoj venis min inviti iri kun ili al la teatro. "Ne," mi rifuzis, "mi ne inklinas al tio." "Do!" ili diris, "diru al ni kion vi preferus, kaj ni nepre faros tion."

"Nu!" mi sugestis, "Ni iru en la aŭto de S-ro Ken, kiu veturige sin turnos laŭvice, jen en la dekstran, jen en la maldekstran straton, kaj precize post duonhoru, ni troviĝos -- kiu scias kie?"

Estis freneza ideo, tamen la geamikoj gaje akklamis ĝin, kaj ni tuj komencis ĝin efektiviĝi. Tiu tordeca aŭtoiro kondukis nin al la plejeble strangaj lokoj, sed fine, precize post duonhoru, ni haltis--kie? Estas preskaŭ nekredible! En fora suburbo, ja ĉe nefinita domo kiun oni en tiu tempo konstruas por mi!

Jen la tria. Mi estis ĉe la muziklernejo, preta por iri al hejmo, kiam mi ektrovis, ke mi perdis la monujon. Kion fari? Mi tiam vidis violonistinon, kiun mi iom konis pro tio, ke mi (ĉelistino) ludis

tercetojn kun ŝi kaj pianisto. Mi klarigis al ŝi mian embarasan situacion, kaj petis ŝin prunti al mi tri pencojn por mia trampago. Nu, ŝiaj gepatroj estas riĉaj, kaj ŝi bone sciis, ke mi ne estas malriĉa, do mi miris rimarki, ke ŝi aspektas nekonsentema. Tamen ŝi cedis al mi la tri pencojn.

Je la morgaŭ mi vidis ŝin, kaj mi diris:-

"Ho, Mario! Mi deziras repagi al vi viajn tri pencojn, sed mal-feliĉe, momente, mi havas nur pundbileton. Post lunĉo mi vizitos la butikojn, kaj tiam havigos la monrestaĵon por vi."

Ŝi ne respondis, kaj aspektis ĉagrenita, do mi sarkasme demandis:

"Eble vi preferus ke mi tuj iru por la sola celo havigi la tri pencojn por vi?" Kaj kradu min, ŝi respondis "Jes."

Nu, ĉar la tago estis treege varma, kaj la butikoj ne proksimaj, ŝia stulteco min koleris; malgraŭ tio, mi tuj eliris kaj ekpromenis laŭ direkto al la butikoj. Sed jen mirinda okazo! Kiam mi jam atingis nur la peronon de la Universitato mi vidis - tie, ja ĉe miaj piedoj, kuŝanta sur la gruzo, eta kaj brila, arĝentan moneron, tri pencojn valre! Ne necesas diri al vi kion mi faris pri ĝi!

----- L.E.BAILEY.

Ĉu aliaj legantoj de LA RONDO volonte rakontos al ni interesajn, strangajn, kunokazaĵojn el siaj propraj travivaĵoj? (Redakt.)

NOVAĴOJ!

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

3 4. D-ro F.J.WILLIAMS de Papua. "Spertoj en Esperantujo." La gastparolanto, rakontis interesajn epizodojn el sia laboro por Esperanto. En Eŭropo, Azio, Ameriko kaj Aŭstralio li kontaktiĝis kun samideanojn, vizitis klubojn kaj en 1937 partoprenis la Jubilean Kongreson en Varsovio, kie li staris antaŭ la tombo de Zamenhof.

10.4. S-ro BOYLE: "La Tajdo."

Temis pri la tajdo en la interrilata vivo de la popoloj. La evoluo de modernaj maŝinoj elfunde ŝanĝis la iaman percepton de loko kaj tempo; bonaj internaciaj rilatoj necesas pli ol iam. Organizaĵoj kiel ekz. la Ligo de Nacioj, Ruĝa Kruco, Internacia Laboroficejo, jam signalas la vekigantan homaran konscion.

17.4. S-ro SCHWERIN: "Virino, kiu estas feliĉa."

Tio traduko de malica rakonto el Oriento konvinkis nin, ke en la tuta regno de l'Kalifo Harun-al-Raschid ne ekzistis eĉ unu vere feliĉa virino.

24.4. S-ino SCHWERIN. "Granda negoco per falsa mono."

Eltrovisto kiu vane provis krei teks-industrion en Aŭstrio, pro konsumo de siaj rimedoj fariĝis la unua falsisto de monbiletoj. Kondamnita al morto, amnestiita al dumviva enkarcerigo, li faras en malliberejo novajn eltrovaĵojn, riparas horloĝon favoratan de la imperiestro, kiu fine pardonas.

URBA ESPERANTO-SOCIETO de SYDNEJO:

Pro plendoj, ke Milson's Point estas tro malproksima por samideanoj loĝantaj sur la norda flanko de la haveno, la Esperanto-Societo de Sydney malfermis filion en la ĉambro de Baha-Organizo, Ĉambro n-ro 2, sur 9-a etaĝo, Kembla Buildings, Margaret-strato, apud George-

strato; oni kunvenas marde vespere.

Tiu ĉi grupo adoptas novan metodon; anoj estas nur tiuj, kiuj sukcesas en ekzameno...la societo mem devas konsisti el Esperantistoj kaj ne el senutilaj diletantoj. Lernantoj pagos ses pencojn vespere.

A.D.

KASO de la RONDO.

Aprilo 1941.

Abonoj kaj donacoj ricevitaĵ de

S-ro Ed. Pryke.....s3.-.
S-ro Percy Hudson..... 3.-.
D-ro F.R.Williams..... 5.-.
S-ro Schmidt..... 3.-.
Amikino..... 5.-.
Vendaĵoj..... 5.3.

£14.3.

deficito 16/4

£2.7.

DEFICITO de MARTO...s10.7.
presado..... 5.-.
papero..... 7.-.
sablonajoj..... 10.-.
bindpingloj..... 1.3.
poŝtmarkoj..... 6.9.

£21.7.

W. A. ADDIS.

PROBLEMO.

Plezuriga vaporŝipo estis virprovizata de kvin homoj -- la kapitano, inĝeniero, provizisto, kaj du homoj por la ferdeko. Iliaj nomoj estis Robinson, Smith, Brown, Williams kaj Jones, sed ne necesas ke tiuj nomoj estu respektivaj. Kaj unu kaj la alia el la ferdekistoj povis funkciigi la ŝipdirektilon, aŭ labori en la maŝinĉambro. Dum iu vojaĝeto, inter la pasaĝeroj troviĝis S-roj Brown, Robinson, Smith kaj Jones, sed unu el la ferdekistoj ne havis samnomulon surŝipe.

Dum la vojaĝeto, la samnomo de la provizisto, kiu estis dika porkbuĉisto el Manchester, pasigis plejparton de sia tempo en la kajuto. S-ro Robinson, kiu loĝis en Londono, implikiĝis en diskuto pri la respektivaj meritoj de vivo en la urbo kaj en la komparo. S-ro Smith, posedanto de ĉion-vendejo en malgranda vilaĝo, lerte porbatalis la partion de la kampara vivo.

La provizisto rajte devus kolekti la biletojn de la pasaĝeroj, sed li estis alie okupata, do, la kapitano petis Smith diri al unu el la ferdekistoj, ke tiu ĉi faru tion. La homo kiun oni demandis tion fari ektrovis, ke tiom multe da pasaĝeroj estis surŝipe, ke li devas peti al Williams helpi lin. Kiam la biletoj estis kolektitaj, oni transdonis ilin al la provizisto kiu demandis al Jones, ke li kalkulu ilin. Jones faris tion dum kontrole rigardis tiu ferdekisto, kiu estis ordonita kolekti la biletojn.

Troviĝis sesdek kvar biletoj.

Kio estas la nomo de la inĝeniero?

Respondo en la venonta numero de LA RONDO.

L. E. BAILEY (Trad.)

AL KURSANOJ. Ne sufiĉe pripensinte, mi dubindigis sur kelkies tradukoj la terminon "najbaraĵo". Nun mi trovas ĝin iom tre internacia, La esprimo "in the vicinity (neighbourhood) of "E-igās per "en la ĉirkaŭaĵo (najbaraĵo) de". La radiko signifanta "najbar" kune kun sufikso estas uzata almenaŭ en la Angla, Franca, Germana, Hispana kaj Itala lingvoj (neighbourhood, voisinage; Nachbarschaft, vecindad, vicinanza). Tamen de multaj "ĉirkaŭaĵo" estas preferata, ĉar ĝi ŝajnas esti pli logika.

"PREDO:" Vorto enkondukita de Kalocsay en lia "Parnasa Gvidlibro." Ĝi signifas "prey" (L. praĉda). Supoze ke "preda" "rilatanta al predo, predanta". "Preda mano" rabakirema, insidatakema mano. "PERFIDIOUS Gulf of C." Kursanoj pliparte preferis traduki per "Perfidema," "malfidinda", "trompanta" aŭ simila; Gordon per "ofte dangere ventega", kiu estas efektiva senco. Mi inklinas konsili, ke en simpla prozo oni preferu atenti ĉefe pri la senco, evitante metaforan lingvaĵon, kiun pliĝuste oni uzas en solena, majesta, aŭ poezia literaturo. En tiu ĉi la homoj penas levi sin super la laŭfakteco de la ĉiutago kaj frape esprimi sin per epitetoj koloraj, simbolaj, aludecaj. Jam de la ploj fora antikvo verkantoj amis kvazaŭ transdoni al naturaj fortoj kaj elementoj karakterizaĵojn proprajn de la homo.

DANKON, gesroj Hanks! Ke en Aŭstralio ne troviĝas igvanoj kaj histrikoj estas sciigo, kiu frapas ĉiujn Aŭstralianojn ekster la malmultaj fakuloj. Krome, ke la "flying fox" estas fruktomanga vesperto kun kapo simila al vulpa. La rare nomita "iguana" aŭ "goanna" estas granda lacerto aŭ monitoro. La vera igvano (Hajtia nomo) vivas en Ameriko; la histriko en Ameriko kaj Eŭropo; la "porcupine anteater" de Aŭstralio estas ekidno.

GOLF. "Golfio" kaj "gaŭfo" estas eksperimentaj nomoj ne plu uzataj. Oni nun ordinare nomas la ludon "golfo", kaj la Encik. de Wuster listas ĝin.

----- F.R.B.

Lakordino Icenway
suspekto aŭ malhelpo.

Dum du jaroj li faris servon, sentante en si plezuron, kiu, kvankam malgaja, estis tamen iel dolĉa. Lia sinjorino ne pardonis lin aŭ permesis lin roli por la infano alie ol simpla ĝardenisto; Tamen, unu-dufoje la knabo diris: "La okuloj de tiu ĝardenisto estas tiom malĝojaj! Kial li tiel malgaje rigardas min?" Anderling ricevis ŝian malestimon kvazaŭ ĝi estus pura amo, kaj liaj oreloj en-sorbis ŝiajn sekajn unusilabaĵojn kvazaŭ ili estus karesa rapsodio.

Jam de nun strange estis, ke la malvarmeco per kiu ŝi traktis la fremdulon fariĝis ankaŭ tiu, per kiu Lordo Icenway traktis ŝin. Li multe ĉagreniĝis, ĉar ankoraŭ ne naskiĝis posteulo, kiu ricevos la nobelecon, kiam li, lu nuna tenanto, forpasos. Nenia signo promesis naskon. Unu tagon li akre plendis al ŝi pri sia malbona situacio. Ĉiom posedos tiu stultulo-kuzo!" li kriis. "Mi prefere vidus la nomon kaj bienon sur la fando de la maro!"

La lordino, retenante sian malbonan humoron, penis dolĉigi lin, kaj tiam enpensigis. Iom poste ŝi iris al la kabano de la ĝardenisto, por demandi pri lia farto, ĉar ŝi antaŭe sciigis, ke li estas malsana, sed, laŭ supozo, ne tre grave. Kvankam ŝi ofte vizitis la malriĉulojn, ŝi ĝis tiam neniam eniris la kabanon de la ĝardenisto, kaj ŝi ricevis surprizon, eĉ konstornon, vidante lin tro kaduka por sin levi de la lito. Ŝi rapide reiris al la hejmo, kaj revenis kun nutreca supo. Lia stato estis tiel grave malforta, kaj lia vizaĝo tiel skelete malgrasa, ke ŝia nun moliĝinta koro estis skuita. Rigardante lin ŝi diris: "Vi devas resaniĝi - vi nepre devas, ESTAS GRAVEGA KIALO! Mi malbone traktis vin ĝis nun -- mi konfesas tion. Sed mi neniam plu faros tion!"

La malsana kaj mortanta homo -- ĉar efektive li estis apud la tombo -- prenis ŝian manon kaj premis ĝin al siaj lipoj. "Tro malfrue -- jam tro malfrue, mia kara!" li murmuris senforte.

"Sed vi DEVAS NE morti! Ho vi devas ne morti!" ŝi plorĝemis. Impete ŝi kliniĝis por flustri al li kelke da vortoj, ruĝiĝante pro tio, kiel ŝi antaŭe ruĝiĝis en la fraŭlinaj tagoj.

Li respondis per pena pala rideto. "Aĥ, kial vi ne diris tion pli frue? Estis iam tempo, kiam -- sed ĝi estas jam forpasinta -- Mi devas morti!"

Li mortis post kelke da tagoj, dum la suno subiris malantaŭ la ĝardenmuro. Tiam ŝi forte riproĉis al si pro sia malafableco, kaj multe suferis pro pikoj de la konscienco, sekrete, solece.

Ŝia plej ĉefa deziro nun estis: konstruigi kiel tributon al li ian monumenton, sen tio, ke homoj rekonu ĝin ŝia faraĵo. Post du-tri monatoj alvenis, por instalado en la preĝejo, valora fenestro-vitro multkolora. Kiam ĝi staris malkovrita el siaj pakvolvaĵoj kaj preta por fiksmeto, Lordo Icenway vagis en la ejon kun sia edzino. Li legis enskribon en la vitro: "Starigita de lia malgaja vidvino, por ke li estu ĉiam en memoro."

"Mi ne sciis, ke li havis edzinon. Mi neniam vidis ŝin."

"Ho jes," respondis lia edzino, en milda tono, kiu tamen maskis multon, "devas esti, ke vi ŝin vidis, Icenway. Sed vi forgesas. Sciis, ke ŝi ne loĝis kun li kaj neniam vizitis lin publike, ĉar estis inter ili ia malkonsento; tio, kiel ordinare marŝas la afero, nun multe premas al ŝi ĉar ŝi koron."

"Per tiu multekosta rubena kaj azura vitrodeseĝno ŝi do pensas necesa ŝin malriĉigi, ĉu ne?"

"Eble ne; ŝi havas iom tre da mono, laŭ onidiro."

Dum Lordo Icenway pli maljuniĝis li pli malbonhumoriĝis, kaj ĉiam, kiam liaj okuloj ekfalis sur la filon de sia edzino, naskigitan de la alia edzo, li plende ekkriis: "Strange estas, ke vi povis plaĉi al la antaŭa edzo, sed vi ne povis simile komplezi al mi!"

"Aĥ, se mi nur estus okpensinta pri mia plano pli frue!" ŝi murmuris al si.

"Kion vi diris?" demandis li.

"Nenion, kara," respondis Lordino Icenway.

The MELBOURNE ESP.SOC., c/o Hon. Librarian, Miss V. Cox,
 31 Albany Cres., Surrey Hills, Victoria,
 Has for sale the following books: (Postage on all orders, extra)

<u>MISCELLANEOUS.</u>	
Tuck's post cards, pkt of 6 (coloured).....	6d.pkt.
Kongress Autograf-libro.....	4d.each
Kvar voĉaj kantoj.....	9d.
International Radio Manuel...H.A.Epton.....	6d.
Commercial Esperanto...Page.....	2/-
Esperanto Keys (English, none).....	2d.& 3d.each
Star brooches, lapel buttons, pendants, tie pins, 1/3 & 1/6 each	
<u>RELIGIOUS WORKS.</u>	
Rakontoj el la Biblio.....	1/6
St. Mark.....St. John.....	1½d.each
Kantoj de Salomono.....	3d.
Himnaro...Butler (paper).....	1/3
" " (limp).....	1/9
Preĝareto -- Katolika (Carolfi).....	9d.
Parts of the Bibl ^o : Eliro, Nombroj, Levidoj, Readmono... 3d, each	
<u>TEXT BOOKS.</u>	
Step by Step in Esperanto, M.C. Butler.....	2/6
Esperanto for Beginners.....	3d.
Esperanto for all.....	3d.
Esperanto Legolibro... (Setala).....	2/3
Fundamenta Krestomatio (in Esp.)..Zamenhof.. (paper)...	7/3
German-Esperanto Teachers... (Borel).....	1/6
<u>DICTIONARIES.</u>	
Rhodes.. (Eng. Esp.).....	5/-
O'Connor's.....	1/-
Also German and French Dictionaries.	
<u>DRAMA and VERSE.</u>	
Aŭtunaj Agordoj.....	4d.
En la Dolomitoj... Styler.....	6d.
Johano la Brava.....	3d.
La Kamena Angulo.. (Craven).....	1/3
Lia Lasta Ŝanco.. (Gego).....	1/-
Novaj Versaĵoj.....	1/-
The Object Lesson, Playlet.. Morrison.....	3d.
Poeziaĵoj... Schiller.....	6d.
Reĝo Lear... Shakespeare.....	2/6
Sonĝo de Someromeza ".....	1/6
<u>GENERAL LITERATURE.</u>	
Almozulino de la Pont des Arts.....	1/3
Antaŭen kun Kredo.....	6d.
Al Mokantoj... Dobraŭski.....	3d.
Arbaro Bruas... Sidlovskaja.....	6d.
Anekdotaro.....	6d.
Batalo pri la Domo.....	1/9
Blonda Ekberto... Fischer.....	6d.
Bukedo... Zanoni..... Part I, 1/-, Part II, 8d.	
De Apeninoj ĝis Andoj.....	6d.
Devoj de la Homo.....	6d.
Dua Legolibreto.....	6d.
Dekdu.....	3d.


En Svislando...Ramo.....	2/6
Esperantaj prozaĵoj.....	2/3
El la Konstituciaj Tagoj...St. Rayment.....	6d.
Fatala Suldo.....	1/3
Fundo de l'Mizero...Kabe.....	9d.
Fina Batalilo...Wilson.....	2/3
Funebra Parolado.....	9d.
Forbuĉataj Popoloj...Rolland.....	4d.
Gyges kaj lia Ringo...Hebbel.....	2/6
Galerio de Zamenhof.....	1/3
Grekaĵ Papirusoj.....	1/3
Gemo de unu Soleca Animo.....	6d.
La Kantistino...Hauff.....	1/3
Kaŝitaj Vortoj.....	6d.
Kanto de Triumfanta Amo.....	1/-
Kremacio Kontraŭ Enterigo.....	3d.
La Lasta...Kabe.....	6d.
Lastaj Tagoj de Zamenhof.....	1/3
Legu kaj Parolu...Supicova.....	3/6
La Lasta Afero...Frydio.....	6d.
Lilio...Romance...Sinnote.....	2/-
Lasta Kravato de Aleksy.....	4d.
Malŝparulo, La...Raimund.....	2/3
Mimi...Giesy.....	1/3
Mia Liro...L.Zamenhof.....	6d.
Mizeruloj, La...V.Hugo.....	1/6
La Neĝo.....	1/-
Oficiala Radikaro, La...Wuster.....	9d.
Perdita kaj Retrovita...Boirac.....	6d.
Pri Cervantes.....	9d.
Pekoj de Infaneco...Prus.....	1/-
La Pafo.....	3d.
Pax.....	9d.
Pri Origino de l'homo...Brosurita 2/-, ...Bindita.....	2/9
Rozujo Ciumljara...Wagnall.....	1/6
Solandro...Bonsels.....	6d.
Taglibro de Vilag-Pedelo...Blicher (Bulthuis).....	1/-
Teorio pri Evolucio de Kono...Kolorat.....	6d.
Unua Kajero.....	9d.
Vortoj de Zamenhof.....	1/6
Vintra Fabeloj...Seidel.....	1/3
Verdaj Fajeroj.....	1/-
Zamenhofaj Vortoj.....	7d.

BLACKBOARD, in good order, size 4ft.x 3 ft., also an easel
for sale.

EDITED by F.R.BANHAM,
2 Banchory St.,
Essendon, W.5,
VICTORIA.

Price 3d.

La RONDO.



Jun. 1941.

N-ro 9.

Eldorrita de F.R. Barham.
2 Banchory St. Essendon W5. Victoria.
- AUSTRALIA -

GRANDA NEGOCO per FALSA MONO.

Densige laŭ artikolo en "Magazine Digest - June 1939".)

Kiam monbiletoj estis enkondukitaj unuafoje en Aŭstrio - estis sub la imperiestro Franz Jozef komence de la 19-a jarcento - la homoj pensis, ke la fino de l'mondo venis. Kia stranga leĝo, kiu devigas homojn, interŝanĝi solidajn varojn kaj arĥentajn guldenojn kontraŭ senvaloraj paperpecetoj!.....

Eĉ altaj ŝtataj funkciuloj ektimegis pro la ebleco, ke oni povus bankrotigi la ŝtaton per falsado de tiuj monbiletoj. Ili rapidis, por deklari tian agadon terura krimo punebla je morto. Sed kontraŭe al la ĝenerala supozo, ĉio funkciis bone dum longa tempo, kaj la Aŭstrianoj alkiutimegis al la papera mono.

Subite en Marto 1826 la lando skuigis de sensacio la plej granda dum jaroj. La unua monfalsisto postlasis sian vizitkarton. La sciigo disvastiĝis kiel fajro; ĉiu rifuzis, akcepti monbiletojn. Miloj da homoj amasiĝis ĉirkaŭ la Nacia Banko kaj postulis interŝanĝon de la biletoj kontraŭ arĝento. La tuta komerca strukturo de la regno ŝanceliĝis. Vane la polico klopodis, subpremi la famojn; fine ĝi devis precize raporti, kio vere okazis:

Unu viro aĉetis en butikoj kelkajn feraĵojn kaj pagis per 25-gulden-bileto. La butikisto rimarkis, ke ĝi estas eksterordinare dika. Kiam li ekzamenis per malseka fingro la paperon, la koloro deliĝis. Li firmitenis la klienton, kiu deklaris sian senkulpecon. kaj transdonis lin al la polico. Fakte la viro ne sciis ion pri la falsado. Li estis laboristo en nove fondita ŝpinojo kaj devis aĉeti ion por la fabriko. La monon li ricevis de la fabrikestro, Franz Xavier Wurm.

Tuj oni arestis Wurm, kiu tute ne malkonfesis. Li estis bone konata figuro. Antaŭ kelkaj jaroj li estis publikiginta siajn ideojn pri kreado de teks-industrio laŭ Brita modelo. Dum tiu tempo grandskala industrio unue aperis en Eŭropo; trikejoj kaj teksejoj ekestiĝis en Francujo kaj Anglujo, kaj Wurm studis ilin. Ne nur laŭ komerca vidpunkto; li mem estis teknika spertulo kaj interalie estis eltrovinta teksilon, kiu superis ĉiujn aliajn uzitajn. Kvankam oni ne ŝatis lin en lia hejmlando, li ricevis multnombrajn allogajn ofertojn pro siaj patentoj de alilandaj teks-kompanioj. Li povus esti riĉulo, sed li ne deziris ion por si mem, li celis nur la bonfarton de sia patrolando. Sed tie oni rifuzis liajn ideojn.

Longjare li baraktis kontraŭ la malfavoraj cirkonstancoj. Inter-tempe la Britoj havigis al si preskaŭ monopolon por teksaĵoj, kaj li intencis, nuligi tion minimume en Aŭstrio. Fine, antaŭ tri jaroj li estis malferminta ŝpinfabron ĉe Vieno. La maŝinoj, de li el-trovitaj kaj instalitaj, laboris bone kaj li mem prizorgis la tutan negocon. Lia revo efektiviĝis,..malrapide,..sed sendube.

La publiko ne plu aŭdis pri li, ĝis kiam la gazetoj sciigis pri lia arestado. Liaj kontraŭuloj kaj anti-industriistoj triumfis, vidu - ili mokis - kien la novaj industriaj ideoj kondukas: rekte en krimon! Sed aliaj demandis al si, kial Wurm faris la krimon, ĉar private li vivis tute modeste kaj honeste. Li mem sincere kaj gentile klarigis tion:

Dum li vane provis utiligi siajn inventaĵojn por Aŭstrio, la Britoj jam uzis ilin. Li procesis kontraŭ ili, sed tio senfine daŭrigadis kaj konsumis ĉiujn siajn monrimedojn, kvankam li ja fine ricevis la deziritan verdikton. Eĉ la mono investita en la fabriko estis perdita! Ĉu li nun maldaŭrigu? Li sciis, ke bonegaj oficoj estis liberaj por li ĉie en Eŭropo, kiam ajn li deziris ilin, sed tion li neniam intencis.

Hazarde tiam Destino kontaktigis lin kun viro travivinta similan sorton, nome kun la teknikisto Besetzny. Tiu posedis la samajn progresajn ideojn kaj same malmulte da mono, por realigi siajn projektojn. Iam antaŭe Besetzny staris antaŭ la imperiestro kaj raportis pri procedo de li eltrovita, per kiu oni povus fari bankbiletojn tiel artifice, ke eĉ la plej lerta falsisto ne povus imiti ilin. Por pruvi al la imperiestro, ke la tiamaj biletoj estas facile imiteblaj, li demonstracis falsan monbileton de li mem faritan. Malgraŭ liaj bonaj motivoj la imperiestro terure ekkoleris kaj malgentile forordenis lin.

Kiam Besetzny rakontis tion al Wurm, tiu subite ekvidis ŝancon, helpe de falsa mono daŭrigi la eksperimentojn, konstrui novaĵojn kaj pli bonajn maŝinojn, kontinuiigi la fabrikadon de teksaĵoj. Li alkroĉis sin al tiu ideo, kaj nun...li deynos pagi pro la ago per sia vivo.....

La proceso kontraŭ la unua Aŭstria monfalsisto estis nacia okazaĵo. Dum la tuta juĝkunsido la akuzito kondukis tiel digna, ke la juĝisto diris: "La akuzito estas Aŭstria patrioto, kies unusola intereso estas - kaj ĉiam estis - lia patrujo!" Ĉiu agnoskis lian altruismon; neniu atribuis lian agadon al malnoblaĵoj motivoj. Sed oni devis obei la leĝon, kaj fine de Marto li estis kondamnita al morto. Dum kvin monatoj li vivis en mizera ĉelo pensante en ĉiu tago, ke ĝi estas la lasta. Nur post grandaj klopodoj la imperiestro cedis al la deziro de l'popolo kaj transformis la mortpunon en daŭran enkarcerigon.

Malgraŭ ĉiuj humiligoj Wurm nun - eble unuafoje en sia vivo - estiĝis feliĉa. Oni transportis lin al alia malliberejo, kies direktoro humane havigis al la kaptito grandan, bone lumigitan ĉambron, kie li povis daŭrigi siajn eksperimentojn. Li ricevis paperon, plumojn, inkon, ĥinon inkon por la desegnaĵoj, ĉiujn materialojn necesajn. Fine li estis liberigita de materiaj zorgoj kaj povis laŭlabori siajn planojn enpace. Finfine li povis ĝui la ŝtatan subvencion, kiun li vane estis petinta dum jaroj.

En rapida sinsekvo Wurm perfektigis nombron da gravaj eltrovaĵoj; li plibonigis sian ŝpin-maŝinon; li eltrovis procedon, eligi sukerojn el fojno; li faris hidraŭlikan morteron kaj skribmaŝinon por blinduloj. Sed lia ĉefverko estis matematika-astronomia horloĝo, kiu ricevis la aplaŭdon de tutmondaj majstro-horloĝistoj. Fabrikistoj, teknikistoj kaj altrangaj oficistoj vizitis lin en lia ĉelo-laborejo. Junaj esploristoj humile petis lian konsilon; ĉie oni rigardis lin la plej eminenta aŭstria eltrovisto de sia tempo.

Kaj nun Destino ree intervenis, por ŝanĝi lian ekzistadon. Unutage la preferata horloĝo de l'imperiestro - novaĵo, kiun li kunportis el Parizo - sen iu ekkonebla kaŭzo ĉesis funkcii. Neniu horloĝisto en Vieno kapablis ripari ĝin. Rememorante pri la fama

horloĝo de Wurm, la adjutanto konsultis lin en lia ĉelo. Wurm ne nur riparis la horloĝon, sed krome aldonis mekanismon, kiu ludis je ĉiu plenhoro la plej amatan valson de la imperiestro. La kutime sobra imperiestro estis ĝoje ravita kiel infano; tiom, ke li tuj pardonis al Wurm.

Wurm eliris la malliberejon kiel eŭropa famulo. Forgesita estis la tuta afero pri monfalsado. Kun vizaĝo ankoraŭ pala pro la longaj jaroj en malliberejo, li iradis en la plej altrangaj socirondoj de Vieno, ĝis kiam li mortis honorita de la sama lando, kiu iam furiozis kontraŭ li kaj kondamnis lin, kaj fine prenis lin al sia koro.

----- P. SCHWERIN. (Trad.)

LA SOLDATO. (Rupert Brooke)

Ah! kredis, se pereos mi, pri jeno;
 en fremda kampo kuŝas tereneto
 eterne angla. Ties polvon beno
 de l'anglaj suno kaj printemp-pluveto
 karese flegis; polvo, kiu iam
 konsciis vivoriĉajn hejmajn horojn,
 sed jam ĉi-tie donis sin, ĝis ĉiam
 revante anglajn revojn, celojn, florojn.

Ah! kredis plu, ke, plene purigita
 kaj unu kun la universa tuto,
 tio, nun koro de ĉi kampo-peco,
 per sang-ofero fine kulp-lavita,
 milde elvokas tra la morto-muto
 pri Angllando, paco, beniteco.

----- (Esperantigis) JOEDIKO.

JODA TINKTURO. (de Charles S. Gilmour.)

El la Aŭstralia Literaturo.

Mi naĝis reen en konscion tra maro da inkubaj sonĝoj, kaj malfermis la okulojn antaŭ ĉielo, kies brilego igis ilin dolori. Mi tuj fermis ilin kaj komencis pensi, ĉar malgraŭ ke mia menso strange maltrankviliĝis, mia memoro estis klara. Tiun matenon, aŭ povis esti, la antaŭan tagon, ni bajonete atakis la Turkajn tranĉeojn.

Mi rememoris, ke mi stumbladis sur malebena tero, falis du fojojn kaj relevis min, pezo kuris kun kamaradaj figuroj dekstre-maldekstre. Tiam subite mi troviĝis en infero de l'bruo, kaj dum glitis en mian koron malvarma sento de teruro, mi suferis akran skuon kaj jen --- nigbeco.

La Turkoj estis min paftr^aŝfintaj, kaj mi demandis min pri la sorto de la kunbatalintoj: ĉu ili ankoraŭ vivas? Mi ne sentis malsaton aŭ soifon, ne konsciis doloron. Sed mi sciolis: ĉu mi grave vundiĝis? kaj penis levi la kapon. Tion mi ne povis; mi nur sukcesis turni ĝin flanken, kaj denove malfermis la okulojn. Proksimume

El "Wessex Tales" de Thomas Hardy.
(Tradukita de F.R.BANHAM.)

Tial ĉar en la nuna tempo oni vaste diskutas la eplon, ĉu jes, ĉu ne Anglujo povus esti invadita pere de tunelo sub la Ŝanelo, mi ofte revokas en la menson rakonton, kiun eldiris maljuna Solomon Selby.

Unu vesperon, enirinte por ŝirmo kontraŭ pluvo, mi trovis min inter kelke da homoj en la gastdoma kuirejo, en kies granda kamenangulo Solomon estis sidanta. Prenante sian piptubon el la interdenta niĉo, en kiu ĝi kutime kuŝis, li ripozigis la dorson komforte kaj ridetis en la fajron. La rideto ne estis gaja aŭ malgaja, nek tute bonhumora, nek tute pensdrona. Liaj intimoj tuj rekonis ĝin; ĝi estis la rideto, kiun li faris kiam en rakontema humoro. Do, ĉesiginte niajn banalaĵojn, ni kuntiris nin pli proksimen al li, kiu komencis jene:

Mia patro estis paŝtisto dum tuta vivo kaj loĝis apud la golfeto kvar mejlojn for. Tie mi naskiĝis kaj loĝadis ĝis mi venis ĉi tien tuj antaŭ edziĝo. La dometo, en kiu mi unue vidis la lumon, staris je la supra parto de la erikejo, apud la maro; en la distanco de mejlo kaj duono ne estis alia domo. La loko estis en vintro malvarma kaj malgaja, sed en somero ĝi estis sufiĉe bona, malgraŭ ke la tiea ĝardeno ne portis multon, ĉar ni ne povis ŝirmi ĝin kontraŭ la vento, kiu difektis ĝin.

El miaj junulaj vivjaroj la plej klare restintaj en mia memoro estas 1803, 1804, 1805. Jen la kialoj: Mi tiam havis aĝon, kiam la okuloj kaj oreloj de infano rimarkas kaj prinotas ĉion, kio lin ĉirkaŭas, kaj tiu tempo enhavis multe pli da rimarkindaĵoj ol la cetera tempo de mia vivo. Ĝi estis, kompreneble la periodo post la unua paco, la tempo, kiam Napoleono planis sian invadon de Anglujo. Li jam transiris la Alpoj, batalis en Egiptujo, venkis la Turkojn, la Aŭstrojn kaj la Prusojn, kaj nun intencis bati nin. Sur alia flanko de la Ŝanelo, apenaŭ el la vido de homoj starantaj sur nia Angla bordo, Franca armeo de cent sesdek mil soldatoj kaj dekkvin mil ĉevaloj kunarigis de el ĉiuj partoj, kaj sin ĉiutage ekzercis. Napoleono dum tri jaroj faris la preparojn, kaj cele transigi tiujn soldatojn li konstruigis du mil platfundajn boatojn. Tiuj boatoj estis negrandaj, sed bone fabrikitaj. Kelkaj el ili estis konstruitaj en maniero, kiu ebligis transporton de staletoj por du ĉevaloj, kiuj devis tiri la kanonon portitan en la ŝipmalantaŭo. La tasko aranĝi ĉion tion, postulis kvin aŭ ses mil ĉarpentistojn, feraĵistojn, radfaristojn, selistojn kaj cetero. Ho ĝi estis stranga tempo!

Ĉiun matenon Napoleono arigadis siajn soldatojn sur la sablejo, por envicigi ilin kaj ekzerci ilin en la maniero de surŝipigado, ankaŭ kun la ĉevaloj, ĝis ili povis glate fari la operacion sen ajna malhelpeto. Mia patro kondukis gregon da ŝafoj en Sussex tiun jaron, kaj, irante laŭ la paŝtista vojeto sur la pli alta parto de la erikejo, li povis ekvideti tiun dresadon -- la armaĵoj de la soldatoj ekbriletis kvazaŭ arĝento en la suno. Mia onklo Ijob, serĝento infanteria, kiu bone sciis pri tiaj aferoj, forte opiniis, ke Bonaparto intencis transiri per remboatoj en serena nokto. La ĉefa demando estis: Kie li albordeĝus? Multe el la simpla popolo opiniis, ke ĉe Dover; aliaj

futon
 for de mi kuŝis alia homo, juna oficiro, evidente grave trafita.
 Li movis la kapon, kaj ĝemis.

Inter ni, apud mia kubuto, sin trovis familiara objekto, malgranda botelo da joda tinkturo, el la kampa hospitalo. Je la vido mi ekpensis pri konsilo de trupŝipa kuracisto: en okazo de vundiĝo uzu ĝin sen prokrasto. Mi penis etendi la manon al la boteleto, sed sentis min nekapabla movi la brakon. Estas ja terure, havi la volon movi membron, sed malhavi la povon.

La boteleto da tinkturo, tiele proksima, turmentegis miajn pensojn. La juna oficiro, kiu kuŝis tie, tordata de doloro kaj soifo, kriis obtuze je akvo, sed min okupis nenio ekster la pasia deziro tuŝkapti la botelon per miaj fingroj. Mi kredis, ke se mi povus tion, ĉio estus bona ĉe mi; mi tial baraktis penante levi la manon. Sed ondo de vomemo tiris min en abismon, kaj mi denove falis en senkonsciecon.

Kiam mi vekigis, estis ŝajne posttagmeze, kaj mi sentis iom da iritanta doloro en la kapo. Mi trovis, tamen, ke mi povas levi ĝin ĝis gradeto, malfermis la okulojn kaj turnrigardis. La homo sternita apud mi jam kuŝis sur la flanko; liaj okuloj sin fiksas sur la boteleto, al kiu lia mano malrapide almoviĝis.

"Tio estas mia," mi raŭkis. Li rigardis min kaj ridetis malforte. Mi vidis lian manon, kun la fingroj disetenditaj, limake aliranta la botelon.

"Damnu vin," mi sakris. "Tio estas mia."

Mi ree kaj ree baraktis por moviĝi kaj preskaŭ svenis denove, kiam mi sentis la dekstran brakon iom rektiĝi. Do nun starigis konkurso inter ni, oficiro kaj simpla soldato, ambaŭ grave vunditaj, por atingi la etan botelon, kiu, en niaj febraj pensoj, posedis tiel grandegan signifon. La kupre-brula suno senkompate fajris sur nin.

Estis al mi nun indiferente, ĉu mi vivos aŭ mortos, sed mi nepre devas havi tiun jodaĵon por verŝi sur miajn vundojn. Mi tord-perfortis la kapon kiom mi nur povis, kaj okulmanĝis lin kun malamo kaj jaluzo, furioze penegante atingi la botelon per mia rampetanta mano, kiu antaŭen-igis per ĉiu ekpuŝo onon da colo.

Sed mia rivalo jam estis pli apuda al ĝi ol mi, kaj malgraŭ alternaj ondoj de kapturniĝo kaj nigro, mi freneze pliluktis, senmovi krom la izolaj agitoj de mia mano. Ankoraŭ rigardante mian konkuranton, mi supozis ankaŭ lin preskaŭ svenanta; sed io simila al triumfo brilis en liaj okuloj, kiam ili renkontis miajn.

Pluen rampis lia mano pli rapide ol mia povis, ĝis ĝi alproksimiĝis je duoncolo al la botelo. Mi nun sciis, ke neniam mi posedos la tinkturon, kaj mi ploris amarhumore pro ĉagreno.

Sed nenia triumfo brilis nun en la griza vizago, kiu estis tiel proksima al mia, kaj mi denove rigardis liajn tenemajn fingrojn, nun preskaŭ ekprenontajn la botelon. Unu momenton mia spirito ĝoje eksaltis, ĉar mi kredis, ke li finfine ne povos atingi ĝin; tiam, fiksrigardante min, li per siaj fingroj ĉirkaŭprenis ĝin.

Mi gapis, malamegante lin ekster ĉia imago; tiam, kun konvulsia kolekto de fortoj, li puŝis la botelon en mian manon.

Ses semajnojn poste mi rekonsciiĝis en Londona hospitalo. Sed mi neniam plu vidis la oficiron. Eble li mortis tie, ĉe Lone Pine. (1)

. . .
STRATĖTA KATO.
de Nancy Byrd-Turner.

Mi fava, magra, marsas nokte tegolojn,
kaj fava dano mia renkonte venas;
antaŭ naŭ vivoj (naŭcent, iuj divenas)
ni pli fiere faris la patrolojn.

Ni sanktaj, glataj, sur ametist-tegmento
kaj eburaj randoj, vagis kun gracilo;
lotusa luno svingis sin laŭ Nilo,
kaj Memfis dormis en nebul-argento.

Ho, ĉiele estis antifone brui,
sidante sub ia reĝa ĉambr' en pigro,
ĝis aŭdi, malgraŭ ŝankta stato nia,
hieroglifajn, laŭtajn damnojn flui,
sandalon brute peli sin tra l'nigro,
brulvarman el la mano de Ramzes Tria.

Tradukis A. DELSUDO.

Notoj: Damo: sinjorino (Parnasa Gvidlibro)
Magra: malgrasa (" ")
Pigro: mallaboro, malviglo (sama)
Eburaj randoj: de la tegmentoj.

LA KATOJ.

Multe da viroj, precipe la inteligentaj viroj, skribis iu observanto, amas la katojn.

Mi ne pretendas esti en la kategorio de "intelligentaj viroj"; sed multaj solinfanoj aŭ infanoj alie solecaj, trovas en la hejma kato fidelan kaj kompreneman amikon. Kiam la gepatroj koleras, la instruistoj kriaĉas, kaj la kunlernantoj persekutas, la sola infano trovas la katon bonhumora kunulo.

Miaj plej fruaj rememoroj tuŝas nian nigran katon "Tit-Bits"; mi venis unu tagon malsupren de la ŝtuparo en la kuirejon, kaj jen li ĉasas raton sur la planko. Nin ne longe ratoj aŭ musoj ĝenis en tiu domo. Pli poste mi eksperimentis pri lia tenopovo, kaj trofaris, kaj fine puŝis tiel, ke li falis de balkono sur asfaltan korton. Li suferis, sed fine resaniĝis; kaj ne montris eĉ la plej etan vengemon. Li ŝajne komprenis, ke mia faro estis ne kruelo sed infana esplorejo.

Hundo estas ĉiam servisto; sed kato estas sendependa, kaj kiu ne akiras lian aprobon, ne estas lia amiko. Laŭ mia sperto la kato elektas kiel amikojn ne nepre tiujn, kiuj nutras lin; kaj ne estas vere, ke li preferas lokojn ol homojn.

En la gazetoj ni legis, ke la katoj marŝis pli ol tricent kilometrojn for de London-pro la bombardado. Individuaj ekzemploj de kata spirit-ĉeesto ne mankas. En nia hejmo ekbrulis dumnokte vestoj en komodo; la kato vekis mian patrinon, batante per la

Caulker

piedoĵ ŝiajn lipojn.

Pli grava ekzemplo estas en bela malgranda libro pri Nederlando, de la Franco George Duhamel, aperinta antaŭ kelke da jaroj en Esperanta traduko. En vilaĝo vivis kalfatrisko kun juna edzino kaj fileto, kaj kato nomata Poes. La patro faris lulilon por la infaneto, kaj kalfatris ĝin tiel zorge kiel oceanan ŝipon. Li provizis fortan kanapon, sur kiu kutime dormis Poes. Venis inundo; la lulilo forfloris kun infaneto kaj kato, kaj la gepatroj sukcesis rifuĝi en arbo. La fluo fine reportis la lulilon; sur la kanapo staris Poes en sia tuta kata digno: la kruroj vaste etenditej por ekvilibrigi la lulilon, la vosto rekta kiel masto, la lipharoj elstarantaj, kaj la kapo alte en aero. Interne kuŝis la fileto, suĉante la dikfingron kun Nederlanda flegmo. Poes estis alte honorata, kaj surskribo sur ŝtona tabulo en muro estas arkivo de lia faro.

Kiom da katoj, tiom da karakteroj. Unu kato konsideris tion sia devo, inspekti ĉiujn vizitantojn al la domo, kaj foje per korŝira miaŭo esprimis malaprobom. Se mi eliris nokte piede, li atendis min en ioma distanco de la domo kaj eskortis min hejmen. Se mi ŝajnis ne vidi lin, estis teruraj krioj de ĉagreno kaj riproĉo.

Se mi venus hejmen per aŭtomobilo, du verdaj okuloj sur pordega-^{9a} fosto reflektis la lanternojn. Kiam mi malfermis la duoblan pordegon, li sidis en la enirejo ŝajne nemovebla kiel la montoj. Kiam la aŭto estis jam en distanco de duonmetro, li ekmarŝas antaŭ ĝi kun vosto rekta, kiel oficiro marŝanta antaŭ milita orkestro, kaj dum mi faris kelkajn kurbojn en la korto, li sidis kun aŭtoritata mieno, kiel policano sur ĉefa strato. Kiam la aŭto estis jam "enlitigita" en remizo, kaj la posta lanterneto estingita, li jam estis denove la universala kato, kaj frōtis miajn krurojn por memori min pri la kuirejo, kie estas lakto.

Alia kato simple rigardis la aŭto-n kun tio mieno, pri kiu alilandanoj akuzas la Anglojn: "mieno de senpena supereco, kiu bezonas nenian aserton." Tiu ĉi estis ankaŭ la "aŭtora kato" kiun iu pri-skribis: li kuŝis sur la tablo, observante la plumon, kaj de tempo al tempo helpis ĝian progreson per diskreta ektuŝo. La skribmaŝinon li simple ignoris.

Ekzistas Franca pentraĵo titolita "Les Félics", kiu montras akran avaran virinon, kiu kuŝas sur sofo kun kato. Ĝi estas kalumnio kontraŭ la kato. Kiu kato, eĉ katino defendanta siajn idojn, povas egali furiozan virinon? Ĉu Congreve ne diris: "La infero havas nenian furion egalan al virino malestime forigita"?

A. DELSUDO.

MAJA PROBLEMO. La nomo de la inĝeniero estis Smith.

SUGESTITAJ MOTOJ: En nigra mondo, eta stel'.
Esperanto, la Lumo en la Mallumo.
Dum ni spiras, ni esperas.

TROFEO: Kiu ajn povas alfundirigi tri fojojn la Ark Royal, tiu povas ĝin havi.

Sink

VERA RAKONTO PRI MODERNA LIFTO.

En nova deketaĝa konstruaĵo en Melburno estas moderna lifto, laŭ onidiro, la plej bona en la suda hemisfero. Fabrikis ĝin granda Usona firmo, kaj la ĉefingeniero, kiu estris la instaladon, estis Usonano. Li estis bonhumora, laŭteparola kaj ege fanfaronema, vera tipo de tiu, kiun la angloj nomas "Yankee".

Li diris al mi, "Tiu ĉi lifto estas la plej forta kaj rapida el ĉiuj en via lando. Malgraŭ tio ĝi funkcias pli glate, pli facile, kaj en komenco kaj en halto, ol iu alia en la urbo. Venu, kaj vidu! Jen estas la kontrolĉambro!"

Ni staris en ĉambreto sub la ŝtuparo. Tie troviĝis la multnombraj elektraĵoj iloj de moderna aŭtomata lifto. La Usonano metis la manojn sur manipulilojn kaj en forta laŭta voĉo klarigis kion li faris.

"Rigardu! La lifto estas ĉe la sesa etaĝo. Mi elektas ke ĝi venu eksprese al la unua - kaj nun mi senhalte resendadas ĝin al la deka - jen, senhalte al la kvina etaĝo. Sinjoro, ĉu vi povas citi alian liftan en Melburno kiu povas fari tion? Tute ne! Mi vetos centon da dolaroj ke vi ne povas citi unu, eĉ en la suda hemisfero! Kaj nun, mi sendas ĝin, eksprese, supren kaj malsupren senhalte. Nun ĝi ne haltas ĉe la etaĝoj sed nur inter ili. Se mi lasus la ilojn en tiu pozicio, la lifto funkcias tiel dum la tuta tago. Mirinda maŝino, Sinjoro! Kaj la delikata kontrolo! Kompreneble dum ordinara uzado modera rapideco estas fiksita; sed, Sinjoro, rigardu la indikilon, kaj mi montris tion, kion ĝi vere povas fari."

Mi atente rigardis indikilon kiu precize montris la lokon de la lifto. "Jen malrapide!" li tondris, kaj la ilo montris preskaŭ helikan malrapidecon. "Nu, rapide!" kaj la lifto daŭre kuregis - eĉ flugis - supren-malsupren sen halto. Persono kiu povas kompreni devas admiri tiun mirindan maŝinon, kaj mi tion diris.

"Nun ni veturu en ĝi," li respondis. "Vidu! Mi metas la direktilon en la naŭtralan pozicion, kaj denove la lifto povas esti funkciigata de interne."

La mirinda lifto alproksimiĝis nian etaĝon, sed kio estas al ĝi? De interne venis granda bruoj. Je nia surprizego dika impona sinjoro saltis el ĝi, kaj komencis bleki kaj blasfemi. Lia ruĝa vizaĝo ŝvitis pro timo kaj kolero.

"Kie estas la estro de tiu ĉi konstruaĵo?" li kriegis, "Mi faros proceson kontraŭ li! Ho, estis terure! La abomena lifto frenezigiĝis! Tuj post mi eniris ĝi komencis iri supren-malsupren, kaj mi tute ne povis haltigi ĝin. La rapida falo preskaŭ vomigis min. Estas skandalo! Tia sperto povas mortigi homon!"

Kolere blekanta kaj blasfemanta li iris al la oficejo.....

La Usonano prenis mian brakon, kaj, la unuan fojon dum mi konis lin, parolis mallaŭte.

"Ni malaperu, amiko!" li flustris, "Ni bezonas iom da freŝa aero!"

----- E.S.HANKS.

DONACO: Generalo Francesco, kaptita ĉe Bardia, diris "Kio koncernas min, la dezerto estas via. Mi estas poeto; mi!"

BABILADO

De la horo en kiu mi skribis la Aprilan Babiladon ĝis la nuna momento, trafis min neniam E. eldonaĵo de ekster Aŭstralio. Sen tio, je bonvolulo en Sidnejo sendis al mi etformatan periodaĵon en kiu troviĝas interesaĵoj, mi devus rezigni pri novaĵoj en ĉi-numero. Sed liaj kelkaj Esp-ajoj el Argentino, Bulgario (Nov.Lyon(Dec), Jugoslavio, Meksiko, portis informojn sciigindajn. (1) Eĉ meze de la sociaj perturboj en Franc., Prof-o Boucon en Annecy povis en Aŭgusto 1940 presigi sian tradukon "Kleraj Virinoj" (Les Femmes Savantes, Moliere), (2) Kolonelo Julio Mangada Rosehorn, lojala armeano kaj eksredaktoro de "Hispana E-isto", sin savinte el sanga Hispanujo en Francan Marokon, de tie ankoraŭ plifugiĝis al loko sufiĉe sekura por lasi lin verki "Plena Vortaro Hispana-Esp-a." (3) Bone alvenis en Uragvajon D-ro Emil Pfeffer kaj familio. Li estis vicprez. de la Aŭstria E. Asocio kaj konata E. eldonisto. (vidu Encik.). Liaj bonegaj nortaretoj kuŝas facilprene sur mia breto. Ni gratulas al li kaj liaj. (4) Sur 49 metroj ĉiusebate ĉe la 19a laŭ Nov-Jorka tempo, Radio XEWI brodkastas Esp-e el Meksikio. Sciante per leteroj de Lanti, ke mizeras E. vivo en Meksiko, ni iom skuĝis, kiam mi legis tian anoncon. Ni esperu, ke la voĉa kvalito de la parolistoj impone impresas al ĉiu aŭdanto. Atentu tion, ke la dorsa kovrilo de LA RONDO estas luebla por anoncoj, reklamoj, Ni jam subnazigas al E-istoj vaste dissemataj pli ol 100 ekz-ojn de nia revueto, tial via alvoko, dirvolaĵo, havus ŝancon enbori en almenaŭ tiom da cerboj. La koston diktita valorsento plus via simpatio, sciante, ke ĉiu ŝilingo ĉe ni ŝanĝiĝos en benzinon por puŝi nian ĉaron tra la nuna glueca marĉo.

F.R.B.

KASO de la RONDO.

ENSPEZOJ. Donacoj ricevataj por ĉuligi la deficiton. Anon, S-roj Hillerman, Shelton, Brown, Leb. Nova Espero 5/-..... £1-10-0
 Abonoj kaj Kotizoj..S-ino Hewson
 S-roj Shanhan, K.Linton 3/-..... 9- 0
 S-roj Hillerman, Chatterton,
 S-ino Hill 5/-..S-ro Shain.2/-.... 17- 0
 Vendoj por Aprilo kaj Majo..... 7-10
 £3- 3-10

Deficito 3/2

£3- 7- 0

ELSPEZOJ.

Deficito de Majo....16-4
 Inko.....12-6
 Papero..... 7-0
 Sablonaĵoj..... 9-9
 Bindpingloj..... 1-3
 Poŝto..... 6-6
 Luo de Dup..... 5-0
 Melb. Elspezoj..... 8-8
 £3-7-0

W.ADDIS (Kas.)

(Lastmomente) SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

Majo 3. Societa Vespero. Majo 8. S-ro Schwerin, "Flugo de Eŭropo al Aŭstralio." (3a tago: Alexandria-Lydda-Baghdad-Basra.) Majo 15a. S-ro Chandler. "La akvo-sistemo de Sydney."

Majo 20a. Gaja sciigo: la plej nova Esperantistino, filino de nia prezidanto S-ro Chandler kaj ties ŝatata edzino, feliĉe alvenis en ĉi tiu mondo.
 (Schwerin)

KORAJN GRATULOJN de LA RONDO!

kiuj sciis, ke lerta generalo evitus albordiĝi sur lokon, ĝuste kie oni atendas lin, diris, ke li irus aŭ orienten en la Riveron Tamezo, aŭ okcidenten al oportuna loko, eble al iu el la golfetoj: interne de la Insulo Portland, inter Beal kaj Stka. Alban-promontoro. Sirmita for de ĉiu okulo, la golfeto estus bona elekto. Ĝi ŝajnis esti farita de la naturo ĝuste por tiu celo. Kiel junulo mi tie tre ofte en malluma nokto grimpadis kun du bareloj da brando sur la ŝultroj. Kelkaj homoj jam aŭdis famon, ke parto de la Franca ŝiparo irus tute ĉirkaŭ Skotlando kaj venus laŭ la ŝanelo ĝis bona haveno. Sed pri la afero estis multe da dubo; tio estis komprenebla, ĉar post kelke da jaroj ni eksciis, ke eĉ Napoleono ne povis decidiĝi pri la ĉefa demando; kie albordiĝi? Lia hezitemo kuŝis ĝuste en tio ĉi, ke li neniel povis ricevi novaĵojn pri la strategia aranĝado de niaj soldatoj, kaj plue tre malforta estis lia scio pri ĝustaj lokoj, kie liaj pranoj povus silente alteriĝi kaj bonorde ellasi liajn soldatojn.

Ĉar la boatoj estis platfundaj, ili ne bezonis dokon por allasi la soldatojn, sed nur kaŝitan, ĝuste deklivan strandon, de kiu irus bona vojo al London. Nur tre malmultaj homoj sciis kiel la demando cerbumigis la grandan Korsikan tiranon (kiel ni nomis lin), kiel forte li penis decidi ĝin, kaj, super ĉio, kian teruran riskon li entreprenis en unu nokto, klopodante fari finon al la afero. Certe estas, ke neniu gazetisto aŭ presisto sciis pri ĝi, alie mia rakonto ne estus tiel nekredeme ricevita de kapoj, kiaj kredas nur kion ili legas en presaĵo.

La grego, kiun prizorgis mia patro, vage paŝtis en la herbtero ĉirkaŭ nia domo, kiu vastdistance superrigardis la maron kaj bordon. En vintro kaj frua printempo, la patro ofte devis vigli pro la ŝafakuŝoj. En tiaj tempoj li frue enlitigis, kaj ellitigis ĉirkaŭ noktomezo. Alifoje, li viglis ĝis noktomezo aŭ pli malfrue, kaj tiam enlitigis. Tuj kiam mi havis aĝon sufiĉan, mi helpis al li, precipe gardante la ŝafojn, kiam li jam foriris al ripozo. Jen mia tasko en iu monato en jaro 1804 aŭ 1805. Ĉiun nokton en tiu tempo mi deĵoris ĉe la ŝafoj, je ĉirkaŭ duonmejno, eble pli, for de nia dometo. Nenia vivanta estaĵo estis kun mi, krom la ŝafinoj kaj ties idoj. Ĉu mi timis? Ne, neniam mi timis pro soleco en tiuj tagoj, ĉar mi pasigis la fruajn jarojn en tiel malmultehoma loko, ke la malesto de homoj en la nokto estis multe malpli timiga ol la ekvido al ili. Mi tre timigis en okazoj se miaj okuloj trafis figuron de homo, kiam en soleca loko mallumo jam densiĝis.

Unu tagon en tiu monato ni ricevis senatendite viziton de mia onklo Ijob, la serĝento, kiu apartenis al regimento tiam bivake en la erikejo kelkmejnlojn for. Onklo Ijob vizitis nin je la krepusko kaj iris kun mia patro al la ŝafejo por unu-du horoj. Tiam li revenis, iom trinkis da brando el la barelo, kiun la kontrabandistoj provizadis al ni pro nia hekpoka kaŝtenaĵvarojn. Poste li soje kuŝiĝis por dormi. Mi iris liton; je la unua horo la patro enhejmiĝis kaj, vekinte min por lin anstataŭi lin deĵore, enlitigis. Dum mi elpaŝis la domon, mi rimarkis onklon Ijob sur la sofo. Li malfermis la okulojn, kaj kiam mi informis lin pri kie mi iras, li diris, ke honte estas, lasi tiel junan knabon marŝi tien sola. Ordiginte sian kravaton kaj zonon, li akompanis min. (Daŭrigota)

REKLAMO.

TRIUMPH PRESS. Mr. Johnson, Sunbury Crescent, Surrey Hills, ELO.VIC-TORIA, does good Esperanto printing of all kinds. The Editor would undertake to supervise on behalf of interstate and country readers any work they may wish done by Mr. Johnson. All care, but no responsibility.

NOVAĴOJ.

TASMANIA ESP. ASOCIO. Nia nova klaso por komencantoj, kiun instruas nia vigla samideano, S-ro Couche, bone progresas.

En ĉi tiuj tagoj estas malfacile varbi anojn pro tio, ke ĉiuj havas tiom da kromokupoj, kaj mankas al ili tempo por sin okupi pri pacaj aferoj. Tamen, ni havas dek-duon da komencantoj. Ankaŭ, ni ĵus komencis novan rondon por progresintoj kaj la ceteraj Esperantistoj. Ĉiu ano ŝajnas entuziasma kaj preta fari sian eblon por antaŭenigi la movadon.

Ni penas interesi ĉiujn pri LA RONDO kaj mi ĉirkuligis ekzemplerojn ĉe nia lasta kunveno. Ni kunvenas ĉiumerkrede, kaj invitas ĉiujn Esperantistojn lokajn ĉeesti mian hejmon, 8 Station St.

ALICE DOUGLAS. Tas. Esp. Asocio.

R. MOLERA, Str. Hospital 13, Moja, Barcelona, Hispanujo, korespondas pri iu ajn temo kaj interŝanĝas ĉiujn aĵojn.

KONTRAŬ SILINGO nia E. veterano PASTRO INOCENT SERIŜEV sendos al vi sian "jubilenumeron de "Eklizio kaj Scienco", en Angla lingvaĵo tikle kripla. Box 2988NN, Sydney.

MEKSIKA RADIO: D-ro VARGAS, M.C. Rodriguez, la Hispano Azorin, kaj Lanti brodkastis el XEW1 ekde 5 Aprilo.

ESPERANTO kaj la JAPANA RADIO: "Revuo Orienta" (Jan.) bonvenigas E-on en la brodkast-programojn de la Japana Brodkasta Korporacio. Ĝi ne donas detalojn.


EN BRISTOL. Folk House, hejmo de E-o en Bristol, bombita. Biblioteko savita. I.E.L. delegito John Turnbull kaj edzino mortigitaj; ankaŭ Frank Hall, en Walthamstow. F.R.B.

GAZONO.

Troviĝis en la Maja numero la vorto "gazono". Tiu devus esti gazono. (Vidu p. 1 de la felietono.)

GAZONO: Devene de Franca "gazon", la vorto troviĝas en la Vortaro Pola-Espa de Grabowski kaj en la Plena Vortaro Franca-Espa de Boirac. Ĝi signifas "herbobedo", "lawn", "sward". La vorto ne ĝeneraliĝis, sed el/puŝiĝis de la Germandevena "razeno" (G.Rasen), kiun akceptis la Plena Vortaro. Fulcher & Long erare enhavas "razenejo."

La Ronda.



Jul. 1941.

N-ro. 10

El donante de
2 Banchory St. Essendon Ws. Victoria.
- AUSTRALIA -

F.R. Barham.

El "Wessex Tales" de Thomas Hardy.
(Tradukita de F.R.BANHAM.)

Post iom da tempo ni alproksimiĝis al la ŝafejo, kontrolis ĝin esti en bona ordo, kaj tiam, por teni nin varmaj, kuŝiĝis en amaso da pajlo. Tiu punkto estis unu el tiuj tre trankvilaj, kiam, se vi staras sur monteto nur du-tri mejlojn for de la maro, vi povas aŭdi la tien-reenon de la ondoj sur la strando -- regulajn mugojn similantajn la ronkadon de dormanta mondo. Ĉe la pli malalta grundo estis klaraere, kaj la luno, en sia fazo, verŝis sufiĉe bonan lumon sur la herbon kaj disjetitan pajlon.

Dum ni kuŝis tie, Onklo Ijob amuzis min, rakontante strangajn historiojn pri la militoj en kiuj li servis kaj la vundoj, kiujn li ricevis. En Nederlando li jam batalis kontraŭ Francoj kaj esperis fari similan ankoraŭ fojon. Liaj rakontoj estis tiel longaj, ke fine mi preskaŭ povis kredi ankaŭ min soldato, kiu spertis la servon, pri kiu li diris. La mirinda de liaj rakontoj tute konfuzis mian cerbon, ĝis fine mi dormiĝis, songante pri batalo, fumo kaj forkurantaj soldatoj, kio bele harmoniis kun liaj vortbildoj.

Kiom longe mi dormis, tion mi ne povas diri, sed mi vekiĝis pri ia mildaj etsonoj aliaj ol la susuro de la ŝafinoj en la pajlo, la blekoj de la idoj, kaj la tintado de la ŝafsonorilo. Onklo Ijob ankoraŭ kuŝis miaflanke, sed jam dormis. Mi elrigardis el la pajlo, kaj tuj vidis tion, kio min vekis. Du viroj portantaj marmantelon, trikornĉapelon kaj glavon, staris apud la bariloj, ĉirkaŭ dudek jardojn for.

Mi streĉis la orelojn por kapti kion ili diris, sed malgraŭ ke mi aŭdis ĉiun vorton, eĉ ne unu mi povis kompreni. Ili parolis en lingvo ne nia -- en la Franca, mi poste sciigis. Kvankam mi ne povis kompreni eĉ vorton, mi estis sufiĉe ruza por ekscii iom pri la temo de la konversacio. Per la lunlumo mi povis vidi, ke unu el ili mane portis paperrulaĵon dum li rapide parolis al sia kunulo kaj fingre montris al punktoj laŭlonge de la strando. Estis evidente, ke li klarigas al li la formojn kaj tertraĵojn de la marbordo. Dum tio okazis, mi ne vekis Onklon Ijob, sed nun mi ektimis, ke ili min trovos, ĉar Onklo tiel forte spiris tra la nazo. Mi metis manon al lia orelo kaj flustris "Onklo Ijob."

"Kio estas, knabo?" li diris vigle, malgraŭ ke li nur ĵus vekiĝis.

"Sŝ," mi respondis. "Du Francaj generaloj...."

"Francaj?" li eĥis.

"Jes," mi diris. "Ili venis por vidi, kien alterigi sian armeon."

Mi montris al li, sed mi ne povis plu paroli, ĉar ili jam paŝis pli proksimen al ni. Kiam ili estis for de ni nur ok aŭ dek jardojn, la oficiro kun la rulaĵo kliniĝis al duonfalinta barilo kaj malfalde sternis la rulon sur ĝin. Tiam li ĵetis lumon de ŝirmlanterno sur la paperon, kiu montriĝis esti mapo.

"Kion ili rigardas?" mi flustris.

"Karton pri la Ŝanelo," respondis la serĝento, bone sciante pri tiaj.

ARGILAJ FABOJ.

El Ĉapitro 17 de la libro "400,000,000 Customers," de Carl Crow.)

La granda Ĥina fabo, konata en la komerco kiel "ĉeval-fabo", estas la plej modesta el la faba familio. Ĝi riĉe kreskas sur teraĉo en kiun ĝiaj pli aristokrataj parencoj hontus enpuŝi la radikojn, kaj ĝi abunde donas rikolton tiel krudan, ke, malgraŭ manĝeblo kaj nutro, neniu homa estaĵo enbuŝigus ĝin, se ne puŝate de terura malsato. Oni eksportas ĝin nur al karbominejaj regionoj, kie manĝas ĝin la malfeliĉaj minmuloj, kiuj, pro siaj okupoj, devas vivi en la mallumo de subteraj tuneloj. Ial, la Ĥina ĉevalfabo estas la preferata manĝo de minmuloj tra la mondo, tenas la kompatindajn bestojn en sufiĉe bona sano, kaj iom plilongigas al ili la vivon.

Fabeksportisto diris al mi, ke estas en tiu fabo vitamino D, kiu kompensas pri la manko de sunlumo. Ĉar la faboj tiel ĝenerale abundas, ili estas treege malkaraj. Hankow estas la ĉefa produktocentro, kaj funto da ili kostas tie neniam pli ol du-tri kupraĵetojn. Fakte, la faboj probable estas la plej malkara manĝaĵo en la komerco, kaj estus preskaŭ nepenseble, ke iu povas tiri profiton, imitaĵe fimiksante; sed mia eksportisto trovis, ke jes. Eksportinte fabojn dum jaroj, li ricevis plendojn, ke la faboj en lastatempa ŝarĝo havas kovraĵon da argilo kaj ke en la sakoj troviĝas buletoj da koto. Jen por li mistero, ĉar antaŭ ŝipŝarĝo oni kiel kutime kontrolis la sakojn, kiuj ŝajne enhavis nenion ol bonajn sekfabojn kaj la kutiman kvanton da polvo kaj rubaĵo negravan en malkara kargo tiaspeca.

Tamen liaj suspektoj vekiĝis, kaj li faris zorgan inspekton de kelkaj sakoj da faboj, kiuj atendis surŝipigon. Je unua vido ĉio ŝajnis bonorda. Kiam sako estis elverŝita, la enhavo evidente estis el sekfaboj, sed pli zorga ekzameno vidigis kelkajn fabojn dissplititaj! Efektiva fabo neniam rompiĝas. Li nun faris tre strangan malkaŝon -- proksimume unu el ĉiu dudeko de la ŝajne bonaj faboj en la sako estis peco da sunbakita argilo en formo, koloro kaj pezo de fabo. La trompo malkaŝiĝis per tio, ke iu senzorgulo lasis kelkajn sakojn tiel saturiĝi per akvo, ke la sunsekitaj falsajoj sin returnis en la originalan koton el kiu ili estis kreitaj.

La eksportisto nun ekmeditis, ke li jam jarojn sendis tiujn fabojn al klientoj, kiuj bonfide pagis al li fabprezojn por multaj tunoj da koto el Jangcirivero, kaj ke miloj da kompatindaj muloj manĝis argilfabojn. Tre kolera, li ekiris al amatordetektiva laboro. Parte pro persisto, parte pro bonŝanco, li trovis en najbaraĵo de Hankow argilfaban fabrikejon. Ekipitaj per multe da lignaj muldiloj, la laboristoj fosis koton el la riverrandoj, puŝis ĝin en la muldilojn por fariĝi fabformaĵetoj. Tiuj ĉi estis sternitaj en la suno por sekiĝi, kaj, se la suno sufiĉe varmigis (kiel kutime estas dum la fabrikoltsezono), estas ne tre karkosta entreprenado fabriki ĉiom da argilfaboj, kiom tiu branĉo de komerco povis absorbi.

La makleristo, kiu kontraktis provizi la eksportiston je faboj, malkare aĉetis tiujn imitaĵojn el argilo kaj miksis ilin kun efektivaĵoj en tiome malavara proporcio, kiom lia konscienco kaj singardemo permesis al li. Estis por li profita entreprenado, kaj neniu suferis perdon krom minmuloj. Malgraŭ tio, ke li malkaŝis la trompon, la eksportisto tamen ankoraŭ sentis sin en malfacilo. La imitaĵoj estis preskaŭ tute samaspektaj kiel la veraj faboj, forme, mezure,

peze, kolore. La ununura metodo rimarki la diferencan estus per individua, unu-post-alia ekzameno de la aparta vivhistorio de ĉiu fabo, kio kompreneble okupus tro da tempo-laboro. Li tiam ekpensis pri ideo, kiu estis frakasa al la falsfaba industrio, sed kiu donis al la muloj tutajn la vitaminojn, kiom iliaj posedantoj porpagis. En sia tenejo li konstruis malgrandan platformon aŭ mezaninan (interetaĝan) plankon, proksimume 15-20 futojn super la terplanko. Ricevinte la sekvan liveraĵon da faboj, li ordonis meti la sakojn sur la platformon, malfermi ilin kaj verŝi la fabojn malsupren sur betonan teretaĝon. Laŭ atendo de la eksportisto, la veraj faboj povis integre elteni tian drastan traktadon, sed la argilaj rompiĝis en pecojn. En funda honto, la makleristo balaigis la rompitajn, konsentis malpliigi la koston, kaj la argilfaba industrio definitive fermis la pordojn.

Laŭ nia scio, la muloj jam jarojn ne manĝas plu imitfabojn, sed la eksportisto ankoraŭ tenas la platformon bonorda, kaj de temp' al tempo malsupren elverŝas sakon da faboj, simple por sendubetigi sin mem kaj por disradii moralan influon, se tio estas ebla.

----- F.R. BANHAM.

KRETE -- REGINO de la ESTINTECO.

Ĝis antaŭ nelonge, la insulo Krete tenis per ni ne multan intereson, sed ĉiam ĝi allogis la atenton de historiistoj, ĉar en ĝi kuŝis unu el la sep mirindaĵoj de la antikva mondo, La Labirinto.

Antaŭ multaj centjaroj la Insulo Krete estis centro de mirinda civilizacio. Dum la regado de Minos, ĝia plej fama reĝo, ĝi venkis ĉiujn apudestajn ŝtatojn, kaj reĝis la Mezmaron per treege granda militŝiparo. Knossos, ĝia ĉefurbo, estis la plej granda urbo en la koneta mondo, kaj la majesta palaco, la plej frapa mirindaĵo de la tempaĝo. Tie ankaŭ troviĝis la labirinto, kie vagadis terura monstro, serĉanta kiel manĝaĵon, karnon de vivantaj homoj.

Minos havis du infanojn, Androgeos kaj Ariadne. Androgeos fariĝis fama atleto, kaj en Ateno konkuris je la ludoj. Li gajnis ĉiun premion, kaj pro tio, la jakusa reĝo de Ateno, Aegeus, dungis murdistojn por mortigi lin. Tiam, kiel venĝo, Minos bruligis Atenon, kaj devigis la civitanojn pagi al li, ĉiujare, tributon po sep junuloj kaj sep junulinoj, kiujn li alĵetis al sia monstro. Du fofojn tiu tributo estis pagita. Tiam Theseus, filo de Aegeus, offeris sin mem kiel viktimon, esperante ke li povos mortigi iamaniere la monstron.

Kiam oni trenis Theseus kaj la aliajn gekaptitojn antaŭ Minos, flanke de la reĝo staris lia filino, Ariadne, kiu, vidante Theseus, ekamis lin, kaj forte deziris lin savi el lia terura sorto. Lerta ideo venis al ŝi en la kapon. En la karceron de Theseus ŝi kaŝe puŝis ŝnureton el la plej maldika fadeno, kaj glavon. La glavon Theseus kaŝis en la tuniko, kaj kiam li kaj la aliaj malfeliĉaj gefoferuloj sin trovis en la labirinto, li ligis finon de la fadeno al la enirejo, malvolvante ĝin dum ili antaŭen vagadis laŭ la vojetoj de la labirinto. Kiam ili finfine renkontis la monstron,

spite ties timiganta blekegado kaj kureganta alveno, Theseus atakis ĝin per sia glavo kaj ĝin pikis ĝismorte.. Tiam, ĉiuj, sin turninte, sekvis la fadenon ĝis la elirejo kaj eskapis.

Tempo forpasadis. La urbo Knossos estis ruinigita kaj tute perdita, kaj Reĝo Minos iĝis nura mito -- neniu ja kredis ke li vere iam vivis.

En la jaro 1900 P.K., Sir Arthur Evans, arkeologiisto, trovis grandegan terremparon apud la nuntempa urbo Kandia en Krete. Ĝin kovris arboj kaj malgrandaj bienetoj, sed malgraŭ tio, li konstatis, ke la terremparo aspektas homefarita. Li dungis centon da laboristoj kiuj forfosis dudek futojn da rubo kaj -- fine aperis la bazoj kaj muroj de treege granda palaco, tiom granda, ke nur grava kaj potenca reĝo povus esti konstruinta kaj okupinta ĝin.

Sir Arthur fosis pli kaj pli profunde, kaj post iom da tempo, li malkovris la tutan palacon. Mirinda estis ĝia grandeco kaj riĉeco. Unu post unu aperis koridoroj, kortoj je diversaj niveloj, senelirejaj galerioj, konfuza sistemo de malgrandaj ĉambroj kaj--- la labirinto! Tiam, post la palaco, li trovis tutan urbon, sufiĉe grandan por enloĝigi centmil personojn. Tamen, kvankam li serĉis, nenie li trovis murojn ĉirkaŭ la urbo. Tio pruvis ke li ja trovis Knossos, ĉar oni bone scias, ke Knossos, unika el ĉiuj antikvaj urboj, ne posedis murojn; Minos fidis al la lignaj "muroj" de sia militŝiparo.

Dum centjaroj, tiuj militŝipoj defendis la urbon, sed en 1400 A.K. ŝtormego detruis la urbon kaj disbatis ĝis la tero la palacon. Sablo kaj rubo, iom post iom, kovris la lokon kaj enterigis la galeriojn, kortojn, teatrojn, kaj la tronĉambron, sed, feliĉe, tiamaniere konservadis ilin dum trimil tricent jaroj.

Antaŭ la nuna milito, oni povis viziti la ruinojn malkovritajn de Sir Arthur. Por ilin atingi, oni promenis laŭ vojo uzita dekkvarcent jarojn antaŭ ol fondiĝis Romo -- la vojo laŭ kiu Theseus forkuris kun Ariadne. Tiu vojo kun siaj pavimŝtonoj estis en perfekta stato, sed larĝa nur kvar futojn, ĉar ĉevaloj ne troviĝis en Knossos, ĉiuj piediris. Estis videble ankaŭ multaj rekonstruitaj konstruaĵoj, kaj eĉ la provizodomo por oliva oleo. Ĝi konsistis el kelo, tenanta ducent boteletojn, iuj el ili naŭ futojn altaj. Kiam Sir Arthur malkovris la kelon, iuj el la boteloj ankoraŭ staris. Multaj trezoroj estis starigitaj en muzeo, kiel ekzemple, bildoj sur stuko, iliaj koloroj tiel helaj, kiel en 2000 A.K., la tronĉambro, kaj la vera trono de Reĝo Minos mem. Ĝi estis kredeble la plej maljuna trono en la mondo. Ĝi estis hakita el solida roko, antaŭ 4000 jaroj, kaj dum 400 jaroj estis la trono de la reĝoj de Krète. Kiaj grandaj, strangaj aferoj okazis kontraŭ ĝi! Kia preskaŭ timiga intereso por ni, se ni povus momente ĉeesti eĉ unu el tiuj okazoj! Kaj nun.....?

Nun....sur la marbordo de tiu insulo, kie antaŭ kvar mil jaroj disterniĝis la disbatitaj restaĵoj de ligna militŝiparo, nun troviĝas tiuj de hodiaŭ el ŝtalo. Nun, ŝtona trono, gigantaj oleuoj, kaj helaj bildoj el forgesita civilizacio kredeble ne plu atestas

ĝian praagan ekziston - ili mizere sin miksas kun aĉaj eroj de militaerĉipoj, bomboj, pafilegoj. Nun la sankta polvo de herooj kiuj antaŭ longe batalis por sia hejma insulo milde falas sur la kripligitaj kadavroj de herooj, kiuj ĉi tien venis batali por sia kontinenta insulo en alia hemisfero.

En Knossos la monstro de Minos mortis antaŭ kvar mil jaroj. Li nun ree vivas. Elekeganta, kraĉanta, li piedobatas la perfortitan korpon de Kandia, filino de Knossos.

----- L.E.BAILEY.

ANETO en ĜARDENO.

En bela ĝardeno sub plenaj sunbriloj,
Dum viglaj abeloj zumadas,
Hezitas libelo kun brilaj flugiloj,
Aneto sesjara dormadas.

La rozo ĵaluza ekĝemis: "ol mi,
Pli ruĝa la eta fraŭlino,"
Kaj spiras la blanka lilio, "ol mi
Pli pura la dolĉa etino."

Ho, vento facila, forpasu senbrue,
Ne rompu al ŝi la dormeton,
La bonaj feinoj vagante malfrue,
Adoras la karulineton.

Maljuna saliko sin klinas afable,
Por ŝirmi la malgrandulinon,
Ekridas la suno: "Ho, estus agrable
Kisadi la dormbelulinon."

Li forte trapikas tra branĉoj densombraj,
Nuligas la karan ŝirmeton,
Tiel arde karesas per kisoj sennombraj:
Vekigas la ĉarman dormanton.

----- PHYLLIS BYATT.
(Originale verkita.)

AN ALLEY CAT. (Angle, laŭ peto.)
Nancy Byrd Turner.

Mangy and gaunt I walk the tiles to-night,
And mangy comes my lady to her tryst;
And nine lives back (nine hundred some have guessed)
With prouder mien we rambled, ranging light.

Sacred and sleek, on roofs of amethyst
And eaves of ivory we wandered while
A lotus-coloured moon swung up the Nile,
And Memphis slumbered in a silver mist.

O it was heaven just to sit and be
Antiphonal beneath some royal room
Until, for all our sacredness, we heard
Loud hieroglyphic curses flowing free,
And marked a sandal hurtling thro' the gloom
Hot from the hand of Rameses the Third.



JUNA PASTRO MARŜAS EN SIA ĜARDENO.

Unu el la bildoj ĉe Knossos.

(Vidu p. 3)

BONVENIGO al B. E. S.

En Junio F-ino Carrick, Sekretariino de Brisbane Esperanto Society avizis nin pri la aliĝo de tiu societo al A.E.A. Ni bonvenigas la Brisbananojn, kaj esperas ke multaj el ili fariĝos individuaj membroj, tiel certigante ke en 1942 A.E.A. povos fariĝu laŭda asocio de la Internacia Esperanto Ligo.

ELEKTO de OFICISTOJ.

Kiel mi informis membrojn en la lasta bulteno, ĉiu individua membro rajtis nomi kandidatojn por asociaj oficoj ĝis la unua de Julio. Jen la nomoj ricevitaj:-

Prezidanto: S-ro Allan Turner,
P.O. Box 81, Shepparton, VIC.
Sek-Kasisto: S-ro George Hillerman,
C/o Bank of N.S.W., Hobart, Tas.
Komitatanoj: Captain J. Couche,
C/o Anglesea Barracks, Hobart, TAS.
S-ino A. C. Hintze,
7 Deane St., Coburg, VIC.
S-ro D. Guilbert,
C/e Lands Dept. Hobart, TAS.

Pro tio, ke la nombro de kandidatoj egalas la membrojn de vakaj oficoj, voĉdonado ne estos necesa, kaj mi deklaras ilin la novaj oficistoj de la Asocio. Miajn gratulojn al vi ĉiuj. Ĉar neniam antaŭe unueco kaj kunlaboro estis tiel necesaj, kiel nun, viaj laboroj povos grave influi la estontecon de Esperanto en Aŭstralio.

Mi admonas ĉiun membron doni al la novaj oficistoj sian pluan subtenon kaj helpon. Nun, dum la milito, ni devas pretiĝi por la multegaj ŝancoj, kiujn la postmilita periodo sendube prezentos al ni. Se ĉiu membro varbus novajn anojn kaj al A. E. A. kaj al LA RONDO, post ne longe Aŭstralio ludus gravan rolon en Esperanto-aferoj.

Fine mi deziras danki ĉiujn, kiuj helpis min kaj la malnovan komitaton dum la stariga periodo de la Asocio. Sen tiu helpo la asocio ne ekzistus.

C.C.COWLING.
St. Marys,
Tasmania.

A.E.A. kaj LA RONDO kun-LABORAS.

La organiza periodo de Aŭstralia Esperanto-Asocio finiĝis, kaj kvankam ankoraŭ malgranda, la nova Asocio estas preta por ludi gravan rolon en Esperantaj aferoj.

La du ŝtataj organizaĵoj, Westralian Esperanto Society kaj Tasmania Esperanto-Asocio farigis sekcioj de A.E.A., kaj la grandaj grupoj diskutas kooperadon. Krom la sekciaj membroj, A.E.A. havas 30-40 individuajn membrojn. La kasisto tenas proks. 10 pundojn.

La ideo de tutlanda asocio altiris la atenton de multaj gekonatoj, kaj inter la individua membraro sin trovas la jenaj:-

S-ro Pastro Cowling, Prez. de A.E.A., S-ro Pfahl, ĉefdeligito de I.E.L., S-ro A. Turner, kiu disaŭdigis Esperante de 3SR. S-ino Douglas, Prez. de T.E.A., kaj kiu dumpace disaŭdigis de 7HO., S-ino Hintze, Deligito por "Lingvaj Respondoj"; S-ro Banham, Redaktoro de LA RONDO; F-ino Addis, Kasistino de nia gazeto D-roj T.J. Williams (Papua) kaj S.J. Woolnough (Sydney) ambaŭ longe konataj. El Sydney Esperanto Soc. jam aniĝis S-ro E.W. Chandler (Prez.) S-ro Schwerin, kaj S-ro Lamb.

En tempo kia la nuna, estas nia devo plifirmigi la movadon, pretigante ĝin por la paco. Tion penas fari kaj LA RONDO kaj A.E.A. La unua per gazeto kaj traduka kurso; la dua per unuigado de Esperantistoj el ĉiu landparto.

Tial ne estas mirige, ke ambaŭ organizaĵoj decidis kunlabori. La abonkosto de LA RONDO estas 3ŝ. ĉiujare, kaj la kotizo de A.E.A., ankaŭ estas 3ŝ., sed en la estonteco tiu, kiu subtenas ambaŭ organizaĵojn pagos 5ŝ. ĉiujare. Oficialaj informoj, novaĵoj k.t.p. de A.E.A. aperos monate en LA RONDO. Sendu kotizojn al A.E.A., S-ro G. HILLERMAN, c/o Bank of NSW, Hobart, Tas. aŭ LA RONDO atentigante la senditon, ke la mono estas por la duobla kotizo.

La tuja celo de la nova asocio estas kunigi la diversajn grupojn en unu grandan asocion, kaj varbi sufiĉe da individuaj membroj por aliĝi al Internacia Esperanto-Ligo. En lastatempaj leteroj S-ro Goldsmith, Sek. de I.E.L., diris "Se A.E.A. povos aliĝi al I.E.L. ni estos tre kontentaj, tio lom anstataŭcs la Landajn asociojn jam malaperintajn pro invadoj." --- "Ju pli la movado kuniĝos des pli efike ĝi povos agi. Ni ĵus ricevis peton pri aliĝo de la Societo en Nederlandindio."

Ĉiu samideano bone scias la malfeliĉon, kiun alportis al Esperanto, la milito. Ni en liberaj landoj devas duoble subteni la movadon por anstataŭi la venkitajn landojn. Nov-Zelando, Nederlandindio, niaj du pli proksimaj najbarlandoj plene ludas sian rolon. Ĉu ne Aŭstralio?

Neniam antaŭe estis tiel necese, ke ĉiu samideano kooperu por ŝirmi la sanktan flamon eklumigitan de Zamenhof; neniam antaŭe la armeoj de barbarismo tiel minacis la esperon al internacia kompreno. Kiam paco finfine venos, niaj ŝancoj estos pli grandaj ol iam estinte. Ni devas pretiĝi.

Samideanoj, aliĝu kaj al LA RONDO kaj A.E.A., tiel certigante, ke vi faras vian plej eblon por Esperanto kaj sukceso.

----- G. HILLERMAN.

LINGVAJ DEMANDOJ.

Al la

est. Red. de LA RONDO. En la "Traduka Kurso", Notaro 16, Noto (9), mia kompatinda kranio koliziis kontraŭ tiu kaprica afero, kiu ofte erarigas eĉ multajn verkistojn, nome, la diferenco inter "kelkaj" kaj "kelke da". Do, hodiaŭ mi manĝis du da ovojn kaj du ovojn; kaj, mi esperas, ke almenaŭ la kursanoj kaj la pli bonaj verkistoj (tiuj, kiuj evitas erarojn) ne miskomprenos min.

Verdire, ju pli mi konas la Esperantan gramatikon, des pli mi scias, ke mi ne povas rekoni ĝin!

Antaŭengalopa estu la tre gratulinda LA RONDO! JOEDIKO.

RESPONDO. Vi bojas en la malĝustan truon, mistraktas la aferon. Zam. en "Lingvaj Respondoj" skribis klare, ke "la formoj MULTE DA kaj MULTA estas egale bonaj". Sed li ja diris samlibre, ke "estas diferenco inter multaj homoj kaj multe da homoj. La unua egalas diversaj homoj (ĉiu aparte); la dua egalas granda nombro da homoj (kune)". Du tre malsamaj aferoj estas por mi, ke mi devas trinki (1) multe da ricindoj kaj (2) multajn ricindojn. La unua min mortigus!

Tial ke multaj (eble plimulto da) verkantoj kaj sam-oj aŭ nescias aŭ ignoras la Zamenhofan distingon, iu nesage farus se iu metus sur unu el tiuj frazaĵoj hazarde en la literaturo, dirante, ke la aŭtoro volis komprenigi tiun aŭ tiun ĉi nuancon kaj konscie uzis la esprimon en la senco difinita aŭ indikita de Zam. Miloj da E-istoj uzas unu aŭ alian tute indiferente. Tiom pli dezirinde, ke sciantoj uzu la formojn korekte.

F.R.B.

SI, SIA. La refleksiva pronomo estas unu el la plej komplikaj esprimoj en E-o. La du reguloj pri ĝi estas:

(1) Ĝi ne povas formi parton de la subjekto.

(2) Uzata akuzative, ĝi rilatas al la subjekto de la frazo.

Malgraŭ la unua, ni trovas "Al ĉiu sia propra estas ĉarma" (Proverbaro E-a, 347); "Sia estas kara pli ol najbara" (447, 765).

La ekzemplo de gramatika korekteco, en Cox 135, "Li diris al mi, ke lia hundo ĵus mortis" estas malklare, ĉar leganto ne scias, ĉu lia hundo, mortis, aŭ hundo de alia virseksulo. Karlo Bodo tradukmaĵstro (Lit. Mondo, Okt., '25, paĝo 127) skribis, nekorekte sed tre klare: "Sed se estas iu, kiun ne ebriligis sia propra gloro" (but if there is one whom his own glory did not intoxicate).

Jen ekzemplo pri la dua regulo: "Liaj okuloj falis sur sian filon." Gramatike "sian" devas esti "lian", ĉar "sian" ne povas rilati (resendiĝi) al "liaj okuloj"; tamen sente kaj sence "sian" estas pli kompreniga, kaj multaj verkantoj instinkte uzus ĝin, ĉar "liaj okuloj falis sur" egalas precize "li ekvidis". La frazo estas unuavide komprenebla, do ne malbona. Diris Profesoro Cart antaŭ la supra kurso E-a ĉe la Sorbonne:

"Kio estas klara, tio esti nekorekta, sed neniam malbona. Unu malpermeso: skribi malklare. Kio ne estas klara, tio povas iafaje esti korekta, sed neniam bona." (Revuo Orienta, Jan. '35; Suda Kruco, Dec. '32, p.23; Lingva Kritiko, Apr. '33; D-ro Lippmann en Esp-a Dokumentaro, '26, la plej detala studo.) F.R.B.

KARA RONDO: Mi petas pri la vortoj anglaj "I want." Ĉu oni diras Esperante "Mi volas" aŭ "Mi deziras?" Laŭ mia opinio saĝe estas diri: Mi volas eliri, labori, manĝi. Mi deziras domon, ĉevalon, aŭton. Alivorte, mi deziras signifas konkretan ideon -- mi volas signifas abstraktan ideon.

Ho-Bo.

RESPONDO. Por via gvido mi ne povas fari alian ol direkti vian atenton al difinoj en La Plena Vortaro, Millidge, kaj la uzado de konataj verkistoj. Per konkordanco de la angla Biblio, serĉu en la Esperanta Biblio, kiel tradukigis la multaj "wish", "will", "desiro" (verboj). Mi tamen donu propran opinion. Eble bedaŭrinde estas, ke la sekvanta ne fariĝis ĝenerala: "voli" uziĝu laŭ senso "to will", "to be willing", eĉ kontraŭ propra intereso aŭ plezuro fizika, kora, mensa. Ekzemple:

Mi volas kapitulaci.

Mi volas (t.e., konsentas, cedas) doni ĝin al vi, sed mi ne deziras ĝin doni.

Mi petadis lin lavi la plankon, ĝis fine li malbonvole volis fari ĝin, nevolonte.

Por eviti punon, mi volas, sed ne deziras, pagi nejustan imposton.

"Se vi volas, vi povas min purigi"... "Mi volas; estus purigita."
(Mateo 8, 2/3)

La baza nocio en "deziri" estas plezuro, ĝuo, kontentiĝo, facil-
iĝo fizika, mensa aŭ anima. Homo deziras peti pardonon; grati la kap-
on; kisi negrinon; ricevi aŭton, sukeraĵon, laŭdon. La tradukintoj
de la Nova Testamento, uzante jen "vol'" jen "dezir'", por vesti la
Anglan "desire", ne sekvas la supran gvidlinion. Sed diskutado pri
la lingvaĵo de la N.T. konsekvence entiras la Grekan, pri kiu mi
nenion scias ekster la alfabeto.

F.R.B.

SEMO AU SEMERO? Logike se la vorto "seed" nomas unu solan grajnon
(kiel haro, a single hair) tiam la plurnombro estas "semoj", aŭ are
"semaro". Sed se "semo" havas aran signifon, tiam la ununombro estas
"semero". Ne ekzistas aŭtoritata decido, kaj la uzado de verkistoj
ne estas sama. Ekzemple, rimarku la nekonsekvencan uzon en la Nova
Testamento: Mateo 17/20, Luko 17/6, "semero de sinapo", sed Mateo
13/31, Marko 4/31, Luko 13/19, "sinapa semeto". Ordinare la kuntek-
sto indikas, ĉu "semo" signifas unu grajnon aŭ ĉu ĝi estas are uzata
(unu semo, funto da semo). En Genezo 1, 11, 12, 29, Zamenhof klare
uzas "semo" en ara senso; tiel ankaŭ ĉe Gen. 47/19, Levidoj 11/37.
La Biblia Konkordanco de Cruden estas granda helpilo en okazoj de dubo
pri la traduko de vortoj pri kiuj oni scias, ke ili troviĝas en la
Biblio. Millidge difinas "seed" per "semo", do nedecidige, kaj donas
"semaĵo" sed ne "semero"; Plena Vortaro rekte difinas "semo" per "gra-
jnoj", sed ankaŭ ĝi ne donas "semero", formo iom tre vaste uzata.

F.R.B.

ATENTU!

NI DEZIRAS: Ni deziras la adreson de D-ro Emil Pfeffer, nun en
Uragvaĵo.

NOVAĴOJ.

TASMANIA E.-ASOCIO: De pli ol jaro ni havas, kiel klubejon, ĉambron apartenantan al la W.E.A. (Workers' Educ. Ass.) en Hobart, kaj ni daŭre penis interesi ilin pri E-o. Fine ili konsentis starigi kurson, kiun gvidos S-ro Couche. Per tio ni esperas teni "nian sanktan lingvon" antaŭ la publiko, ĉar la W.E.A.-estraro anoncadas la aferon en sia monata gazeto. F-ino Castle kaj S-roj Couche kaj Hillerman elektigis komitato por aranĝi la kurson.

Kun bedaŭro ni ricevis eksigpeton de S-ro G. Hillerman, nia sekretario kaj kasisto, kiu post nelonge devos translokiĝi al norda Tasmanio. Li estas unu el niaj plej fervoraj anoj; ni akre sentos mankon de liaj helpo kaj instigo. Tamen, nia perdo estos alies gajno; certe li daŭrigos sian laboron en la nova vivloko.

Saluton al LA RONDO, kiu forigis forte sentatan mankon en nia Esperanto-vivo.

ALICE DOUGLAS, prez. Tas. E.A.

MELBURNA ESPERANTA GRUPO, MAJA KUNVENO: La dato de nia Aprilo kunveno koĉncidis kun Anzac Day, kaj ni tre malfrue ricevis sciigon, ke la konstruaĵo malfermiĝos. Ni faris nian eblon informi la anaron, sed bedaŭras, ke almenaŭ du ĉeestis por vidi fermitan pordon.

La maja kunveno okazis je la 31a. S-o Ballard legis pri sia libertempo en Sidnejo, kie li plezure renkontiĝis kun la tieaj E. amikoj. S-ro Hanks donis originalan ŝercaĵon pri lifto, kiu aperis poste en LA RONDO. S-ro Cohen, nia kasisto, interese prelegis pri nova revoluciaĵo ŝu-fabrikada, la Lastex streĉebla ledo, kiu portos komforton al la suferantaj piedoj.

Kun granda bedaŭro ni sciigis, ke nia prezidanto, S-ro Linton, translokiĝis al Hamilton, sed ni esperas, ke liaj aferoj bone progresos tie, kaj ke ni ricevos de li interesajn leterojn.

Oni diskutis la nomon de nia grupo, kaj petas sugestojn por nova mallonga kaj taŭga nomo. Ni aranĝis konkurson por mallonga originala E. verketo. S-ro Ballard afable proponis donaci bonan E. libron al la gajnonto. La verko devas esti ne longa, sed almenaŭ el 250 vortoj. La konkurso daŭros dum la nuna jaro.

MELBURNA KONVERSACIA GRUPO: Ĉi tiu grupo provas forigi mankon inter la E-istaro de Melb. Ĝi estas klubo, kie ĉiu E-isto, kiu jam lernis la lingvon, povas absorbi la atmosferon de E-ujo, plibonigi la parolon kaj trovi interesan uzon por la lingvo. Oni tute ne permesas, ke oni paroli Angle. Multaj E-istoj bone lernas la lingvon, sed iom post iom forlasas la E. rondojn. Jen estas loko, kie unufoje en ĉiu monato ili povas intermiksiĝi. La grupo kunveniĝas je la oka vespere en la lasta vendredo de la monato, ĉe Business & Professional Women's Club ĉambrej, McEwan's Bldgs., 4a etaĝo, angule Lit. Collins kaj Elizabeth stratoj. Al ĉiu rustiĝinta E-isto man^{an} bonvenani!

Korespondu al Hon.Sek., E.Hearne, 19 Smith St., Coburg. N14, Vic.

SYDNEY ESPERANTO SOCIETO.

29.5.41 S-ro Scawring: "La plej grandioza altdrat-akto." Rimarkinda kapitro el la libro "Coco, the Clown" vidigis al ni nervskuan agon de

kuraĝo kaj lerteco. Falante el alteco de 42 futoj, la kvar ekvilibristoj sur la metalsnurego aliigis dangeregan akcidenton en triumfon de heroeco kaj memrego.

5.6.41: F-ino Smith: "La viro en la fulmotendro."

Interesa historio pri simpla sapofaristo (Franklin), kiu per observado de infanaj flugdrakoj trovis la fundamenton de nia scio pri la elektoforto en aero kaj poste havigis la unuan fulm-kondukilon al la homaro.

7.6.41. Societa Vespero.

Komforta salono kaj bonega prezentado de muzikaĵoj por soprano-fluto-piano zorgis por varmharmunia humoro. Poste dancado, societludoj kaj interamika babilado amuzis la gastojn ĝis post noktmeze.

REDAKTORA BABILADO.

Mi petas al certaj kontribuantoj, kursanoj, korespondantoj, ke ili iomete pens-pensu la fareblecon uzi almenaŭ kvar-kvin kolorojn pli da papero en siaj plumlaboroj; per tio indulgante al la tre streĉitaj vidorganoj de la kompatindaj kontroluloj.

Venas al ni folioj tiel dense skribitaj maŝine, ke inter la liniojn mi ne povus enpuŝi fajle maldikigitan pinglon. La pale stampitaj literoj kaprice saltas supren-malsupren, ebrie kolizias inter si, aŭ ame fandiĝas unu al la alia.

Verketoj proponataj por aperigo en L.R. aŭ tradukaĵoj por korekto alpaŝu nin aŭ nete-maŝine aŭ bone-mane skribitaj, kun margeno kaj spaco inter ĉiuj linioj. Alie mi vidas min antaŭ tasko reskribi la malnetaĵojn, por ke la kolegiinoj en fora Adelaide ne taŭztorau la cerbon super malfacile deĉifreblaj manuskriptoj dum ŝi, kun trestreĉa animo, faras la nenuligeblan agon -- elfrap-frapi la ŝablonon, kiu donos definitivan formon al 120 ekzempleroj. Se vi efektive ŝatas la infanojn de via inkujo, do vestu ilin per inde konformaj roboj; alivorte skribu kaj "tajpu" nete, klare!

Sed jam sufiĉe da akraĵoj! Ni, precipe la malnovaj, iom fariĝu rememorigemaj:

La jaro 1905 estis fama jaro pri E. gazetoj. En Januaro eldoniĝis la unua numero de "The British Esperantist," la plej maljuna E. gazeto ankoraŭ aperanta. Sammonate ekaperis la unua numero de "La Germana E-isto", sed tio estis nur nomŝanĝo je "Esperantische Mitteilungen" (E-aj Sciigoj), organo de la Berlina grupo, kiu gazeto fondiĝis en Feb. 1904. Inter la Germana kaj la Brita gazetoj okazis amika rivaleco pri longviveco. Bedaŭrinde la Germana devis morti en 1935 pro la Nazioj. La tria gazeto ĉefa, kiu aperis 1905, estis "Esperanto" (en Junio). Ĝi atingis sian apogecon en 1925 per presnombro 56,000, t.e. 5500 meznombro por ĉiu numero. Organo de la originala UEA, ĝi fine ĉesis ĉirkaŭ 1938. Mi kredas, ke "Sennaciulo", en sia plej floranta tempo, havis la plej altan ciferon de ajna gazeto en E-ujo -- ĉirkaŭ 10,000 ekzempleroj de unu numero. Ĉu iu povas tion konfirmi?

AL KURSANOJ.

La kurso estas jam por ni perdigilo de tempo kaj de mono, en tio, ke pli ol 60 folioj uziĝas aŭ difektiĝas en ĉiu monato -- kun kioma rezulto? Nome, ke nura ok-eto da fervoraj, fidindaj tradukemuloj ricevas instruon, helpon, por kio ili estas sincere dankaj. Sed eĉ tio ĉi ne estas sufiĉa rekompenco por ni. Post ĉi tiu admono-averto ni ne plu ekspedes la foliojn aŭ "LA RONDON" al

- (1) Tiuj, kiuj ne estas plene pagvalidaj -- 5ŝ. jare.
- (2) Tiuj, kiuj (sen klarigo) ne tradukas almenaŭ kelke da linioj en ĉiu monato.

LA ADMINISTRACIO.RONDANOJ!

Pagu por LA RONDO, ne akceptu ĝin almozuĉe! La bonkoraj amikoj, kies donacojn ni danke ricevis, sciu, ke ni volus utiligi tiun monon, plibeligante la gazetaspekton, provizante frape trafan frontkovrilpaĝon, disponigante premiojn al legantoj, k. sim. Sed, pro manko de generala subteno, ni devas iom post iom enmordi la rezervon.

Do tenu vian abonon valida! Kaj abonigu alian!

LETEROJ al la REDAKTORO.

MARIE HAUBENSTEIN. Permesu al mi gratuli vin pro via elektemo. La enhavoj de LA RONDO pruvas, ke la bona entrepreno estas en bonaj manoj. Tre ĉarmas min "My Kingdom," traduko de A. Delsudo, el poemo de Julio Baghy. Krom la bona leciono de klara interpreto, kiun tiele donis la lerta tradukinto -- montrante, kiel oni devas liberigi sin de la tirdneco de nuraj vortoj -- A. Delsudo transportis, delikate, kiel la flugado de papilio, la nepriskribeblan spiriton, kiu neniam troviĝas en nuraj versaĵoj, sed kiu estas la vivo mem de la poezio. Almenaŭ ĉi tiu leganto esperas, ke LA RONDO ofte presos elektindan poemon el Esperanto, kune kun tia altgrada angla interpreto. Estas bone havi la originalon kaj la tradukon, por ke, krom ĉarmo, ni havu lecionon.

W. HEWISON. Mi lernis E-on nur dum tre mallonga tempo, sed en Bristol (Anglujo) mi konis multajn amikojn kiuj studadis ĝin ĉe The Folk House. Tie mi ĉeestis aliajn kursojn dum miaj amikoj ĉeestis la E-kurson. Tial kun profunda bedaŭro mi legis en LA RONDO, ke Folk House estis bombita kaj ke niaj samideanoj Turnbull kaj edzino estis mortigitaj. Se vi skribos al la grupo tie, komuniku mian sinceran kondolencon. Kun bondeziroj al LA RONDO, kiun mi ĝuas.

MAUD HELM. It is good to have again an Esperanto paper in Australia. Let's hope la rondo reading LA RONDO will become a rondegoo! The paper deserves it. All the best of luck.

SUGESTITA MOTO. Komprenante unu la alian.

La alia Franca oficiro same kliniĝis, kaj super la mapo ili longe konsultis, fingre indikante jen al la papero, jen al lokoj sur la bordo. Mi rimarkis, ke unu el ili respekte sin tenas kontraŭ la alia, kiu ŝajne estis tre supera kaj nomiĝis per titolo de mi nekomprenata. La superulo, liaparte, familiare traktis la alian, pli ol unu fojon amike frapante ties ŝultron.

Onklo Ijob, same kiel mi, zorgo observis, sed dum la lumo falis sur mapon, iliaj vizaĝoj restis en ombro. Sed kiam ili rektiĝis, la lumo jetiĝis supren kaj falis trafe en la vizaĝon de unu viro. Tuj tiam Onklo arde ekspiris kaj faliĝis kvazaŭ en konvulsio.

"Kio estas? Kio estas, Onklo Ijob?"

"Ho granda Dio," li murmuris, sub la pajlo.

"Kio?!"

"Bonaparĉjo!" li ĝemis.

"Kiu?" diris mi.

"Bonaparto!" li respondis. "La Korsika monstro. Ho se mi havus mian nove-silikitan pafilon, por mortigi tiun viron! Sed ĝin mi ne havas ĉe mi, tial tiu viro devas resti viva. Silente kuŝu, se vi ŝatas la vivon!"

Mi ja kuŝis silente. Sed mi ne povis ne spionvideti. Tiam ankaŭ mi, kvankam nur knabo, sciis, ke ĝi estas la vizaĝo de Bonaparto. Kompreneble, ke mi rekonis Bonaparton. Mi povus rekonii lin per nur duono da tiu lumo. Mi vidis ne nur unu bildon de liaj vizaĝtrajtoj, sed centon. Jen liaj kugleca kapo, mallonga kolo, rondaĵ flavaĵ vangoj kaj mentono, malgaja vizaĝo kaj grandaj ardaĵ okuloj. Li deprenis la ĉapelon por iom ventumi sin, kaj mi ekvidis la antaŭtufon da haroj meze de la frunto, kiel prezentis ĉiu skizo. Movante sin, li lasis la mantelon iom dividiĝi, kaj mi povis momente ekvidi la blankfrontan jakon kaj unu epoleton.

Sed tio ne daŭris longe. Post minuto li kaj la generalo faldiĝis la mapon, estingiĝis la lanternon kaj forpaŝis direkte al la bordo. Tiam Onklo Ijob revigliĝis.

"Li kaŝe venis en la nokto plani manieron alterigi sian armeon," li diris. "Tiam aploŝon homaĵ okuloj neniam vidos denove. Nevo, mi devas tuj agi, aŭ Anglujo perdiĝos!"

Kiam ili elvidiĝis, mi elgrimpis, sekvis ilian direkton dum iom da tempo. Duonvoje aliĝis al ili du aliaj viroj, kaj ses aŭ sep minutojn poste ili staris ĉe la maro. Tiam, de malantaŭ roko, boato venis en la lunlumen de la golfeto. En tian ili saltis kaj baldaŭ malaperis. Ni iris returne al nia antaŭa loko, kaj de tie mi povis vidi iom pli grandan ŝipon ne tre malproksiman. La boato ĝisiris ĝin kaj versajne ligiĝis al ĝi, ĉar la ŝipo forvelis kaj ni vidis nenion pli.

Reveninte bivakon Onklo Ijob tuj informis siajn superulojn. Sed kion ili opiniis pri lia raporto, tian mi neniam sciis. La armeo de Bonaparto neniam venis, kio estis bona afero por mi, ĉar lia sekreta vizito pruvis, ke li intencis alteriĝi ĉe la golfeto apud la domo de mia patro. Se la plano estus efektiviĝinta, la invadintoj forfalĉus nin marbordulojn, kaj mi ne restus viva por rakonti ĉiun historion.

ESPERANTO BOOKS FOR SALE. ORDER NOW! ADD 10% for freight.
 Charles W. Ballard, 29 Lansdowne Rd., E. St. Kilda, S2. Vic.

Bound: Vivo de Nia Sinjoro Jesuo. Ch. Dickens, trans. Butler: 6/6.
 Petrolo, Upton Sinclair, trans. W. Bailey (2 Vols. each 320 pp.) each
 8/6. La Revuo, 1912-1913, 570 pp., 2/6. Romano de San Michele, Munthe,
 trans. Welcinsky, 510 pp., 12/6. La Faraono, bound in 1 vol. 630pp, 10/-
 Paper covers at 1/-: Historio kaj Teorio de Ido, 141 pp.; Internacia
 Kantaro, Bennemann, 59 pp., with music, 70 pp., 2/-; Verdkata Testamento,
 Schwartz, 125 pp., Genezo, Eliro, Levidoĵ, La Predikanto, trans. Zam.,
 Hector Hodler, Vivo kaj Verko, 168 pp.; Fictorial Esp. Course, Cart, 127
 pp., Esperanto for the English, Franks, 122 pp.; Songo de Someromeza
 Nokto, trans. Briggs, 70 pp.; Dua Ekzercaro de Zam., 31 pp.; Komerca
 Korespondo, Borol, 40 pp.
 Diversaj. Himnaro, 100 hymns, Butler, 9d.; British Songs, Schaefer, 6d.,
 Hungara Antologio, 450 pp., 12/6; Mr. Tot acetas Mil Okulojn, 244 pp.,
 2/6; Tur-Strato 4, Weinhengst, 174 pp., 4/-; Filozofia Vortaro, Kamaryt,
 166 pp., 1/3; Oficiala Klasika Libro, 118 pp., 9d; Bona Sinjorino, Orzesz-
 zko, trans. Kabe, 51 pp., 9d.; Esperanto Teacher, Fryer, 172 pp., 9d.

KASO de la RONDO.

ENSPEZOJ.

DONAĴOJ RICEVITAJ:

S-ino R. Rawson, 10/-
 S-roj. D. Guilbert 5/-,
 A. Sarr, 2/-, E. Hearne, 2/-,
 F-ino M. Helm, 2/-,
 S-ro J. Slavoff 2/-, £1-3-0

ABONOJ.

D. Guilbert, M. Helm, A. Sarr,
 M. Perkins, J. Slavoff,
 F-inoj A. and E. Bailey, 3/- 18 - 0
 S-roj E. Crowe, J. Coulstock 1/6, 3 - 0
VENDOJ por Majo, 4 - 1

£2 - 8 - 1

ELSPEZOJ.

Deficito de Junio 3. 2
 Luo de Dup. 5. 0
 Papero 6. 0
 Sablonaĵoj 9. 2
 Bindpingloj 1. 3
 Poŝto 3. 8
£1. 8. 3

Mono en la Kaso


19/10

£2. 8. 1

W. ADDIS.

Edited by F.R. BANHAM,
 2 Banchory St.,
 Essendon, W5,
 Victoria,
 AUSTRALIA.

La RONCO.



Aug. 1941.

N-ro 11.

Eldonita de F.R. Barham.
2 Banchory St. Essendon Ws. Victoria.
- AUSTRALIA -

Dum la nuna periodo de armita konflikto la homoj tra la mondo mal-avare, eĉ febre, donas monon pro tiu aŭ alia alvoko. Eklezioj, misioj, bonfaraj kaj idealismaj societoj ĝoje raportas, ke iliaj plej esperaj antaŭsupozoj konfirmiĝas unu post alia en ĉi-sensaciaj tempoj. Kial tia atesto?

Ĉu pro ia ŝaŭmanta fermento en la homa spirito spitanta al la frakasaj frapoj, kiuj jam jarojn senindulge falas sur ĝin kaj ĝiajn plej amatajn monumentojn? Ĉu pro ia obtuza sento, ke en la fundamentoj de la socio manifestiĝas jam minacaj fendoj antaŭanoncantaj forpason de nia mamonmondo kaj ties vasta komplikajo da financ-retoj, mon-sistemoj kaj cetere? Ĉu pro vekiganta malegoismo, oferpreteco, sindonemo, kiu en perfekte evoluinta formo karakterizos teranojn indajn enpaŝi tiun Novan Epokon, pri kiu oni tiom ventvorte oratoras?

Fine, ĉu simple tial, ke maro da militelspezo enverŝas en la vivon de la popolo, do mono relative abundas; alivorte, ĉar mono estas "mal-kara" -- kaj morto tiel intime-inside proksima?

Tio ĝisportas min al la kerna penso: nia afero. En Britujo, malgraŭ ŝtormo de fajro-sango, la arbo Esperanta montras mirigan vivpersiston kaj naskiĝemon. Ĉie tra tiu torturata insulo homoj de bona volo ŝirprenas al si ĝiajn foliojn de resanigo, fidante al la tempo kiam samidcaluloj el ĉiuj nacioj denove feliĉos sub la bona ombro de ĝiaj branĉoj?

Oni donas, kaj riĉe, al la B.E.A., kies lasta raporto (1940) spiras dankon kaj kurageon en senprecedente malfacila tempo. Ankaŭ en Aŭstralio ni trovas ĉe niaj amikoj helpan oferecon. Malgraŭ niaj breĉitaj rangoj ni povas per ĉi tiu Dek-unua numero raporti pri kio promesas esti la grade formiĝanta frukto de pacienca laboro por AEA. Finvorte, inter tiu centkelko da ankoraŭ ne aliĝintaj "Sud-Krucanoj" devas resti konsiderinda nombro, kiu ankoraŭ povas legi kaj labori. Ili venu al nia flanko kaj per nove dediĉo sentu en si la reflagron de krea konstruado.

----- F.R.B.

KASO de la RONDO.

ENSPEZOJ.

Mono en la Kaso.....£ -19-10

DONACOJ kaj ABONOJ:-

Rev. C.C.Cowling..... 7- 6

S-roj Pfahl, A.Turner. 3/4 6- 0

S-ro Hillerman..... 1- 0

KOTIZOJ:-

S-ino Hintze..... 2- 0

Rev.C.C.Cowling..... 2- 0

S-ro Ballard..... 2- 0

A.E.A.per S-ro Hillerman 9- 3

£2-9- 7

Deficito 6ŝ 4d.

£2-15-11

ELSPEZOJ.

Luo de Dup..... 5-0

Inko..... 12-6

Papero..... 8-0

Sablonaĵoj..... 11-8

Bindpingloj..... 1-3

Poŝto..... 9-6

Melb.elspezoj..... 8-0

£2-15-11

W. ADDIS,

25 Greville Avenue

Flinders Park

Adelaide.

De Prof-o Walter Murdoch, konata Aŭstralia eseisto, en sia kolekto "The Wild Planet." tradukita de F. R. BANHAM.

En mia lito, antaŭ kelke da noktoj, ne povante dormi, mi provis unu post alia miajn kutimajn konscion-forigilojn -- t.e., mi zumzum-is poezipecojn, ellaboris la parencecon de Reĝino Viktorino kun Vilhelmo la Konkeranto, kompilis liston de roluloj de "Vanity Fair", kaj faris similajn lulajn menslacigojn. Post ia tempo mi sentis miu dolĉe nebulkapa kaj nepre estus dormiĝinta, se mi ne, por finsukcesigi la aferon, komencus serĉi la nomojn de la edzinoj de Henriko Oka. Estis seso da ili, sed nur kvin mi povis rememori. Post kelka frapetado sur la pordojn de la memoro, mi estis denove plenveka, pensklara.

Estis Katerino de Aragono, kompreneble; ŝi pri kies eksedziniĝo la historiistoj jam tiom tantamadis. Ŝi, almenaŭ, estis neforgesebla. Estis Anne Boleyn, nomspeco, kia neforigebla sagas en la memoron jam de la lernubutagoj; krome ŝi patrinis Reĝinon Elizabeto. Estis tiu alia Anne -- de Cleves -- por kiu ŝia agrabla edzo inventis la kromnomon "La Flandra Cevalino" -- jen tragika sorto, ke la mondo memoras virinon nur pro ŝia nebulo. Estis Katerino Howard. Mi memoras ŝin, sed nenion pri ŝi ekster tio, ke ŝia kapo tranĉite falis pro kaŭzoj, kiujn mia instruisto ne pensis bona klarigi al mi; verŝajne kuŝis io nedeca en la rakonto. Estis Katerino Parr, memorinda pro rimarko-merita faro vivi pli longe ol la reĝo -- ne facila tasko. Tri Katerinoj kaj du Annoj faras kvin -- kiu la sesa? Mi ne povis dormi, tion mi sciis, ĝis la demando ricevos respondon. Tial, torturinte la cerbon ankaŭ iom da tempo, mi kolerete saltis el lito, por meti finon al la afero, sed trovis ĉagrene, ke mia historilibro ne enhavas la nomojn de la famaj edzinoj. Finfine mi kaptis la sinjorinon en enciklopedio: Jane Seymour! Estis nenio notinda pri ŝi krom tio, ke ŝia edzo ŝajne iom ametis ŝin ĝis tio, ke ŝia kapo restis surŝultre.

Mi do reengrimpis la liton kaj pripensis la strangecon de la homa menso. Kial mi devis sendormadi, iritate kaj kolera, nur ĉar mi ne povis langi la nomon de iu tute sensignifa virino? Kiom koncernis min Jane Seymour? Kaj mi ŝin? Kial mi devis riproĉvipi min pro nekapablo nomdiri ĉiun edzinon de certa naŭga monarĥo? La afero efektive montris, kiom malmulte ni -- aŭ almenaŭ mi -- posedas la filozofian menson. Mi kredas, ke la plimulto da homoj statas same. Ĉu vi ne, legantoj de ĉi tiuj vortoj, ofte trovas vin plagaĉataj pro fakto, vorto aŭ nomo de vi ne re-alvokigebla?

"Atendu iometon, mi havas ĝin sur langopinto." Sed ĝi obstine rifuzas flosi en la zonan de voĉeblogo. Ĝi obsedas la antaŭĉambrojn de la menso eble dum tagoj, ĝis ĉesigaĵas viaj pensoj eltiri ĝin; tiam, unu tagon, ĝi saltas en la lumon. Ĉe tio vi rekonas ĝin negra, senvalora, tute ne rememorinda.

Oni diras, ke, dum ni plimaljuniĝas, ni plifilozofiemiga. Mi esperas tion vera, sed ne vidas signojn subtenantajn la teorion. Kiam profundaĝa, mi jam havu sufiĉe da prudento, ne plu min torturadi pro memormanko. Ĉar vere, se vi konsideras la demandon, estas

nenio ripoĉinda entio, ke vi forgesas la nomojn de la edzinoj Henriko-Okaj. Kio devus ĝeni vin estas tio, ke vi iam tiel malsaĝe agis, ŝarginte la cerbon per tiom da senutilaj aferoj. Se ne estus ago malfilozofia, "ploraĉi pro perdversita lakto", mi inklinus kolekrii pro la amaso da tute senprofitaj sciaĵoj, kiujn, en la kurtempo de mia vivo, mi penpene akiradis.

Mi apartenas al generacio, kiu instrue lernis grandan nombron da vantaj aferoj. La tiutempaj pedagogoj -- mi esperas, ke la nova edukado ŝanĝis ĉi ĉion -- ŝajnis esti sin dediĉintaj igi la cerbojn de lernantoj sakoĵ plenpakitaj per ĉiaspeca maso da informaj ĉifonoj.

Ŝajne estis eĉ pli malbone ĉe generacioj antaŭaj je mia; ekzemple la fama lernknabo de Macaulay (ĉiu lernknabo scias: kiu enkarcerigis Montezumon, kaj kiu strangolis Atahualpon"). Tiu erudicia lernanto estas por ni ĉiamverda ŝerco, sed ĉu efektive mia lerngeneracio rajtas lin priridi?

Ververe, ni sciis nenion pri Montezumo aŭ Atahualpo, sed tiu ne-scio simple signifis, ke nia instruo iris en alia direkto; ni akiradis aliajn faktojn. Ĉu ili pli valoris ol tiuj pri Montezumo kaj Atahualpo estas diskutoble; mi ne volas dogmeni pri tio. Sed por veni finon, ni, kiuj nun pasis la florojn de l'juno, ja scias, ke nia cerbo estas plenpakita per konoj el kiuj naŭ dekonoj estas nenio ol rubaĵo; ne gravas ĉu ni tenu ĝin aŭ ne. Ni ne plendus, se tiuj senutilaĵoj estus flugintaj senpetite en nian menson, kiel vespertoj en belfridon; sed ili ne. Dolore ni devis akiradi ilin, je multa kosto tempa-labora, de nia flanko kaj de niaj instruistoj, kiuj fariĝis grizaj kaj ostecaj pro la streĉo ilin marteladi en niajn kraniojn.

Jen kie, laŭ mi, nia moderna eduko efektive multe malsuperas la edukon de niaj praavoj kaj de hodiaŭaj primitivuloj. La gefiloj de angla kamparĉo antaŭ 200 jaroj ne ricevis edukon bonan laŭ nia valormezurilo, sed li ricevis de siaj gepatroj almenaŭ la konojn necesajn por la vivo. La junviroj de ruĝhaŭtulaj triboj lernis ĝuste tion necesan por ili; ili fariĝis mirakle lertaj en la propraj artoj per kiuj ili devis vivi. Ilia menso ne plenpakiĝis per diversaj konstumpoj; ĉio lernita rekte rilatis ilian vivmedion. Multe pli ol duono de nia lernakiro havas nenian rilaton al nia vivo. Kiauze valoris al mi la nomo de Jane Seymour?

Sed rimarku: mi ne volas doni al vorto "uzo" ian malvastan, utilisman signifon. Mi ne volas diri, ke tiu poezio, kiun mi povis ripeti al mi antaŭ kelke da noktoj, estas, en ajna senco, senutila. Male, mi sopiras scii pli pli da ĝi. Mia vivo estas pli riĉa pro miaj poeziaj parkeraĵoj; ĝi estus ankoraŭ pli riĉa, se mi povus kanteti al mi dum longaj nokthoroj la tutan Adelaida; kaj multe pli riĉa, se mi povus image reveniĝi la precizan aspekton de la tomboj en la kapelo de San Lorenzo, kaj se mi povus rememori paŝon post paŝo la argumenton de Sokrato en la Phaedo. Homo ne malŝparas tempon-laboron, farante, ke tiaj estu liaj posedaĵoj. Ili estas trezoroj porĉiamaj. Sed mi ne povas rigardi la nomojn de la edzinoj Henriko-Okaj kiel trezoron porĉiaman.

Iuj diros, ke tio estas groteska troigo, kaj ke fakte oni hodiaŭ tute ne instruas en historio laŭ tiuj linioj; la feliĉaj buboj de ĉi-epoko ne havas devon scii la nomojn de la supraj edzinoj. Estu tiel! Mi ne plu mencias tiujn malbonsortajn sinjorinojn; mi nur uzis ilin

por ekzemplo, kaj se tiu ekzemplo estas jam ne moderna, vi povas facile pensi pri alia. Vere, ke en la nuntagaj lernejoj kaj universitatoj oni ankoraŭ devas bati en memoron treegan nombron da faktoj, el kiuj la lernintoj neniam ricevos utilon ekster tio, ke ili eble povos helpi al ili sukcesi ĉe la ekzamenoj. Komforta penso: ke post la ekzamenoj tuj falos en forgeson la granda parto da tia konakiro.

Mi ne per tio sarkasmas kontraŭ niaj lernejoj kaj universitatoj. Mi priparolas pli ĝuste la edukon, kiun ni donas al ni private: kio ĝi estas, kaj kio ĝi devus esti. Mi ĵetas rigardon ĉirkaŭ la bretoj en la ĉambro en kiu mi sidas, kaj demandas: kiom da enhavo de tiuj libroj ankoraŭ restas miakape, kaj kiom da tempo dediĉita al ilia legado montriĝas simpla malŝparo?

Eksidante por legi libron, mi nun prepare demandas al mi: Kiom mi scias pri la temo? Kiom mi volas plu scii pri ĝi? Kiajn demandojn mi volas, ke la aŭtoro respondu? Se post konsidero mi trovas, ke mi neniel volas pridemandi la aŭtoron, mi konstatas la libron ne por mi, kaj do ne legas ĝin. (Sed tio tre malofte okazas; vi preskaŭ ĉiam trovas, post iometa pripenso, ke ankaŭ por vi staras demandoj vokantaj respondon). Foje mi eĉ notas demandojn sur paperon, tiam eklegas la libron, ĉiam tenante la demandojn en penso kaj serĉante la konformajn respondojn. Tralegante la verkon, mi ne ekiras rekte al nova, sed pripensas la ĵus finitan; Mi cerbumas miajn demandojn kaj precize trovas, kiom la aŭtoro respondis ilin. Ĉion ceteran en la libro mi rigardas kiel neaplikeblan kaj do forigas el memoro. Tiu-plane mi stampas sur mian memoron, pli-malpli neforviŝebla, ion gajnitan el la verko. Tiu io povas esti nur tre eta, sed ĝi estas efektiva aĵo; la legado ne tute vanis.

Ekzemple, vi prenas libron pri komunismo. Ĝis nun vi uzis la vorton kiel simplan insulton. Vi nun ektrovas, ke, post ĉio, vi volas demandi pri la temo -- jen: Kion precize signifas komunismo? Kiaj estas ĝiaj bonaj flankoj? Kiaj ĝiaj mankoj? Ĉu popolo iam ĝin praktikis? Se jes, kun kiaj rezultoj? Ĉu mi plaĉus vivi sub tia reĝimo? Ĉu ekzistas io lerninda pere de la komunisto, eĉ malgraŭ tio, ke mi malamas lian teorion rigardatan entutaĵe?

Koncentru vian penson sur tiajn demandojn, legante. Kaj same pri aliaj libroj. Mi ne scias, ĉu la plano bone servus al ĉiuj, sed al mi ĝi igas la legadon malpli fragmenteca kaj sencela, kaj (kio ankoraŭ pli gravas) multe pli ĝua, interesa. Mi sentas min efektive profitanta.

Ĉi plano estas aplikebla nur al unu parto de legado; ne, ekzemple, al romanoj aŭ poemo aŭ teatropecoj, sed nur al tiu nomita de De Quincey "la literaturo de la scio." Sed eĉ sub tiaj limoj vi povus malkonsenti kun mi, dirante, ke en tia plano sidas io snobeca; ke en ĝi odoraĉas tiu nauza afero, kiu iam havis nomon "memkulturigo."

Vi asertas, ke tiu rutina sistemeco forrabus de la legado ĝian senrespondecon, ĝian malpezecon de animo, kaj ĉarmon de papilia sencelco. Se vi trovas, ke vere mia plano tiel efikas, lasu ĝin for; ĝi por vi ja ne taŭgas. Tamen, laŭ mia sperto ĝi ne forprenas la plezuron -- ho, tute ne! Ĉiukaze, ekprovu ĝin por vi mem.

(Prof-o W. Murdoch estis prelegisto en la Universitato de Okcid. Aŭstr. Unu el la plej konataj verkistoj humuraj en nia lando.)

LA PLEJ GRANDIOZA ALTRAT-AKTO.

(El la libro "Coco, the Clown" de N. Poliakoff.)

Inter la danĝeraj kaj riskoplenaj aktoj en cirko la irado sur la alta drato estas tiu, kiu pleje ekscitas la ĉeestantajn. La plej kuraĝa kaj mirinda akto, kiun mi iam vidis, estis altrat-akto. Estis en Glasgow en 1932. La aktoroj estis la famaj Wallendaj. Jam ordinare ilia akto estis unu el la plej nervskvaj, kiujn la Bertram Mills cirko iam konis. Sed en ĉi tiu vespero ili faris multe pli ol sian kutiman akton - ili forigis sin mem de la rando de malfeliĉego, kaj faris tion kiel veraj artistoj. Lasu min rakonti pri tio.

La Wallendaj, kiuj certe prezentis la plej grandiozan altrat-akton de ĉiuj tempoj, estis tri junaj viroj kaj unu knabino, nomita Lulu. La metalŝnurego, sur kiu ili iris, estis lokita 40-45 futojn alta super la areno. Nenio reto estis sube. Ĉe ĉiu fino de l' drato estis eta perono, sur kiu ili staris antaŭ komenco de sia akto kaj kiun ili suriris post la fino.

Ĉiu el la Wallendaj portis longan blankan stangon, kiu helpis konservi la ekvilibron. Por sia ĉefa karakteriza akto, kiu okazis fine de la prezentado, du el la viroj subtenis du paralelajn ŝtalstangojn, ĉirkaŭ 7 futojn longajn, kies finoj restis sur liaj ŝultroj, fiksitaj tie per hokoj. Meze inter ili seĝo estis metita sur la du stangoj. Tre singarde alia el la trupo suprengrimpis kaj sidigis sur la seĝo. Poste Lulu, la knabino, suprengrimpis kaj staris malantaŭ li.

Kiam ili estis pretaj, la viroj portantaj la stangojn komencis malrapide ekiri sur la alta drato, ĝis kiam ili atingis la mezon. Tie, 40 futojn alta super la areno, sen iu reto por interrompi falon, ili ekvilibris sur la drato, tenante la ŝtalstangojn sur la ŝultroj, kun la seĝo en ekvilibro sur la stangoj. Nun tre singarde Lulu grimpis sur la ŝultrojn de la viro sur la seĝo. Fine la viro, dum Lulu ekvilibris sur liaj ŝultroj, mem suprengrimpis, ekstaris sur la plato de l' seĝo kaj poste eksidis sur ties alta apogilo.

Tio en si mem estis rimarkinda faro de ekvilibro, sed ĝi fariĝis eĉ pli ekscita, kiam la tuta grupo komencis malrapide antaŭenmovi sur la drato. La du viroj, portante la stangojn, metis unu piedon antaŭ la alian, ĉiu movo perfekte akordita, ĉiu forto kaj streĉo perfekte kontrolita. Laŭlonge de la drato ili iradis, ĝis kiam ili atingis la finon. Eĉ se tio estis plenumita, ili devas fronti kontraŭ la delikatan taskon, demeti Lulu-on, la viron sur la seĝo kaj la seĝo mem.

En ĉi tiu vespero kiun mi ĉiam respekte memoros, ili estis ĵus atingintaj la finon de la drato kaj pretigis sin por la malŝarĝo, kiam unu el la viroj subite laŭte ekkriis: "Aŝentu!" Sammomente la perono kun ŝira sono ekcedis kaj komencis fali. Ĝajnis, ke nenio povas savi la kvar Wallendajn de 40-futa falo en la arenon kaj de terura vundiĝo, eĉ se ili ne estus tuj mortigataj.

Kio okazis en tiu partumo de sekundo post la falo de la perono, estis unu el la mirakloj de l' cirko. Kvankam la renversiĝo estis absolute neatendita, kvankam ĉiu sento pri ekvilibro kaj kontrolo perdiĝis, kvankam la stangoj kaj la seĝo falis sur kaj ĉirkaŭ ilin, la viroj tuj ekstaris sian unusolan esperon. Fahante tra la aero

ili manetende serĉis la altdraton, sukcesis ekkapti ĝin kaj firmiten-
is ĝin. Plej mirinde el ĉio, la plej maljuna el ili kaptis la knab-
inon per siaj kruroj, volvis ilin ĉirkaŭ sian korpon kaj samtempe
tenadis la draton. Tio estis la plej grandioza artifiko ne antaŭe
provita, kiun mi iam vidis.

Eĉ nun ili estis ankoraŭ en danĝero. Plie la knabino svenis, kaj
la viro, kiu kaptis ŝin, devis teni ŝian malrigidan korpon inter siaj
genuoj kaj maleoloj.

Colon post colo ili glitigis intertempe siajn manojn laŭ la drato
kaj moviĝis kontraŭ la ĉeffostojn de la tendo. Terurite kaj en sen-
spira silento la multnombra vizitanto rigardis ilin. Nun unu post
la alia atingis la ĉeffostojn, surpaŝis la ŝnur-ŝtupetaron kaj grimp-
is malsupren al la sekupeco de la grundo.

Tio sola estis ago de heroeo kaj lerteco, kiun neniu ĉeestinto
iam povos forgesi. Sed tio ne estis la fino. Kio postsekvis, tio
metis la sigelon de granda artisto sur la prezentadon. Kiam ili
malsuprengrimpis la ŝnurŝtupetaron, la knabino reĝis de la sveno.
Ili kuris el la areno sen iu ekscitiĝo aŭ maltrankvilo, absolute
kvazaŭ ĝi estis la normala fino de ilia akto. Poste ili kure reven-
is en la kutima maniero kaj faris siajn riverencojn.

Dum momento la ĉeestantaro estis ensorĉita en silento. Poste
ĉiuj orelŝire ekaplaŭdis. Meze de la klakado kaj aplaŭdo, la muzik-
estro ekludigis "God save the King." Aŭskultantaro, artistoj kaj
servistaro staris rigide, kaj kiam la lasta noto perdiĝis, nova
granda eksplodo de aplaŭdo sekvis.

Mi staris ĉe la elirpordo kaj observis milojn da rigardintoj,
kiuj forlasis la grandan tendon de la cirko. Ĉiuj parolis ekscitite
pri la mirinda travivaĵo. Kaj sur iliaj vizaĝoj videbliĝis rideto
de liberiĝo kaj feliĉo, ateste, ke ili estis vidintaj teruran provon
kaj la triumfon de kurajo. La Wallendaj venkis la morton -- kaj ili
faris siajn riverencojn.

La spektaklo daŭradas. La Wallendaj daŭrigis. Sed la morto
venĝis. En Kopenhago, kelkajn jarojn poste, la Wallendaj falis de-
nove. Du el ili estis grave vunditaj. Tria difektiĝis por la tuta
vivo. La kvara estis mortigita. Jen la imposto de la cirko....

----- P.SCHWERIN. (Tradukis)

F O R Ĵ E T A Ĵ O.
(el "Humour.")

"Vi devus honti pri vi mem," diris Edito, "tial, ke vi mallaboras
ĉitiele en la horo kiam la patrujo vin bezonas."

Efektive, mi neniom mallaboris. Mi sidis konsiderante, ĉu aŭ ne
ekkreskigi liphararon antaŭ ol mi ricevos miajn mobilizpaperojn. Oni
diris al mi aŭtoritate, ke inter ĉiuj terurajoj de la milito, estas
atendate, ke soldato sinrazu ĉiumatene, je iu netereca horo tuj post
tagiĝo.

Cehejme, mi tre malofte razas antaŭ la dekonua matene, kaj eĉ
tiam mi ne tre rapidas, fumante cigaredon kaj okaze enrigardante en
libron dum mi forigas la vizaĝmuskon.

Amiko mia, kiu mobiliziĝis antaŭ kelka tempo, diris al mi, ke

estas tre dube ĉu la armeo tien permesas. Estis do klare, ke granda liphararo, malgrandigante la razotan surfacon, donus belan avantaĝon al soldato.

Aliflanke, kiam mi havis liphararon antaŭ kelkaj jaroj, mi kutimis endormiĝi kun brulanta cigaredo en la buŝo, kaj subite eldormiĝis pro brulaĵo sur la supra lipo.

"Mi ne mallaboris," mi diris al Edito, "mi pensadis. Kaj certe viro, kiu intage povas esti forbalaata en la armeon, rajtas mallabori, se li tion deziras."

"Eble estos post kelkaj semajnoj kiam vi foriros," diris Edito; "kaj estas tutsufiĉe da taskoj farendaj. Komence, oni gvidas ambulancan kurson ĉe la unuhelpa stacio, kaj bezonas volontulojn por agi kiel pacientoj."

Mi kapneis. "Estas nenio farebla. Mi agis kiel paciento por la skoltoj dum la frumilitaj tagoj, sed la portilo disrompiĝis, kaj mi devis resti en la lito dum tuta semajno. Mi ofte suspektis, ke kolonelo Hogg ĝin faris intence."

"Mi certas, ke li ne farus ion ajn tiuspecan," diris Edito, "kvankam mi konfesas, ke li multon sciis pri ambulancaj aferoj tiutempe. Sed nun li estas tute kompetenta. Mi certas, ke li alte taksus vian helpon se vi oferiĝus kiel paciento."

"Mi absolute kaj fine rifuzas," mi respondis. "Nenio min persvados min meti en la ungegojn de kolonelo Hogg kaj liaj sangosofiantaj helpantoj. Rigardu la aferon finita, kaj diru al mi aliajn aferojn farindajn."

"La registaro bezonas ĉian malnovan forĵetaĵon," diris Edito.

"Mi scias," mi respondis. "Tial oni min registrigis por la armeo.

"Ne klopodu estiĝi komika," min riproĉis Edito. "Mi intencas diri, ke ili bezonas forĵetaĵon feran kaj tiuspecan, kaj mi certas, ke via malnova biciklo jam preterpasis la staton ripareblan. Vi ĝin ne uzis dum jaroj, kaj ĝi nur malhelpas la liberan moviĝon en la ĝardenilejo. La parĉestro estigis tenejon por la kolektado de malnova feraĵo, kaj vi povas puŝruligi la biciklon tien."

"Ne estu absurda," mi eksplodis, "ĝi estas perfekte bona biciklo, kaj mi eĉ ne prisonĝus ĝin forlasi kiel forĵetaĵon. Mi nur ĝin ekposedis antaŭ dek jaroj."

"Ĝi estis jam uzita kiam vi ĝin aĉetis," diris Edito, "kaj tiel antikva eĉ tiam, ke vi ne ĝin estus aĉetinta, se vi ne estus tiam ebriiĝinta."

Mi foriris al la ĝardenilejo kaj rigardadis la biciklon. Certe ĝi havis iom aĉan aspekton, sed krom la fakto, ke la radtuboj estis tute malŝvelaj, mi ne povis vidi ion organike difektan. Mi kaptis la pumpilon kaj ŝveligis la radtubojn; iom surprize, ili restis ŝveligitaj. Tiam mi ruligis la maŝinon en la ĝardenon.

"Do vi fine decidis fordoni la aĉaĵon kiel forĵetaĵon," diris Edito.

"Tute ne," mi ridetis. "Efektive estas la ĝusta kontraŭo. Per pruvo al vi, ke ĝi ankoraŭ estas perfekte bona biciklo, mi nun rajdos ĝin al la vilaĝo por aĉeti iom da tabako."

Ŝi kritike rigardadis la maŝinon. "Antaŭ ol foriri," ŝi petis, "nur diri al mi unu aferon."

"Kion?" mi demandis.

"Ĉu vi jam ĝisdatige pagis vian asekuran premiumon?" ŝi diris. Mi dignoplene rajdis eksteren en la straton. La malnova biciklo iom knaris tie kaj ĉi, kvazaŭ ĝi iom suferis pro reŭmatismo, sed baldaŭ mi libere rulveturis malsupren laŭ la kruta monteta vojo, kiu kondukas en la vilaĝon.

Mi aplikis la malantaŭan haltigilon, kaj estis nur tiam, ke mi memoris, ke mia nevo diris al mi, ke li prunteprenis la haltigilojn pecetojn por sia propra biciklo, kiam li lastfoje estis ĉehejme forpermeso.

Tamen, kiel Edito diris poste, estis koincidence, ke la ambulanca stacio kaj la forĵetaĵa kolektejo staris unu ĉe la alia ĉe la malsupro de la monteto. Avidaj manoj kaptis min en la ambulancan stacion por bandaĝi al mi la vundojn, kaj aliaj avidaj manoj formovis la restaĵon de mia biciklo al la forĵetaĵejo.

----- K. LINTON. (Tradukis.)

KORESPONDADO. Deziras korespondi kun samideanoj en Aŭstralio, Nov-Zelando kaj insuloj pri diversaj temoj -- U.S.S.R. Leningrad
121 Pervoznaya
8C, k. 52/1
L. Kislova.

MELBURNA KONVERSACIA GRUPO.

Ĉe la monata kunveno de la supra je la 27a Junio S-ro Ballard elektigis Prez-o ĝis la jarfino. Membroj legis verkaĵojn humerajn, seriozajn, originalajn kaj tradukitajn. Post la 9a horo ĉiu ekzercis lange E-on super taso da teo kaj manĝeto. Dek kvar ĉeestis. Voĉdone oni ŝanĝis la nomon de Vendreda Klubo en "La E-o Rendevuo." Bonvenon al ĉiu sam-o, precipe vizitantoj al aliaj partoj; sed nepre uzu E-on je tiu vespero. Anna Hintze.

OFFICIAL BULLETIN de la NEW ZEALAND ESPERANTO ASSOCIATION.

No. 29, March 1941.

De S-ro D. Kirk ni ricevis la supran bele presitan raporton, kiu enhavas pri la lla N.Z-a E.Kongreso, ĉe Wanganui, en Decembro last-jara, kaj multe da interesaj notoj pri la movado.

Niaj N.Z-aj amikoj sidas sub nejusto en tio, ke ili, sola inter la Britimperiaj landoj, ne rajtas uzi E-on por eksterlanda komuniko. Vana estis pledo al la poŝtaŭtoritato, kiu bedaŭras k.t.p. Eĉ faŝista hispanujo kaj komunista Rusujo permesas sendon alilanden de E-aj skriboj.

Ni admiras la kernece verkitan prezenton de E-o en la fina paĝo. Jes, malgraŭ sia simpla, E-o estas karakterizata per interesaj gramatikaj flankoj, kiuj frue konatiĝas de homoj uzantaj ĝin kiel vivantan lingvon. Elaste, libere, per mil frazturniĝoj, la kompetentulo povas per E-o esprimi eĉ la plej rafinitajn pensojn. En nia lingvo kuŝas multaj subtilaĵoj sintaksaj, stilaj, kiuj, kvankam ili ne grave tuŝas la tuj pratikan uzon de E-o, tamen havas fortan intereson por adeptoj celantaj al efektoj literaturaj aŭ oraciaj. La lingvistikaj apartaĵoj, kaj entute ĝia esenco, provizas riĉan kampon de diskutindaĵoj, kaj elvokas agrablan diversecon de opinio inter lingvemuloj. (F.R.B.)

Statuto. Dum la stariga periodo la Asocio uzis kiel bazon, malnovan ^{pravigoran} statuton. Trejuste la komitato deziris ne starigi daŭran statuton, ĝis la diversaj grupoj jam partoprenos la Asocion, kaj povos helpi pretigi regularon justan al ĉiuj.

Tamen unu-du grupoj ankoraŭ restas ekster nia landa asocio kaj plendas, ke la nuna statuto ne plaĉas ilin. Tial la komitato nun komencas diskutojn kun tiuj grupoj por klarigi la situacion. Ni esperas baldaŭ verki statuton kontentigan al ĉiuj. La novan regularon ni sendos al ĉiu membro, kaj aranĝos voĉdonadon pri ĝi. La komitato volonte konsideros proponojn senditajn de iuj personoj aŭ grupoj, eĉ se ili ankoraŭ restas ekster nia Asocio.

Niaj ĉefaj celoj estas (a) Kunigi E-istojn el ĉiuj partoj de Aŭstralio (b) Aligi al I.E.L., kiel landa asocio (c) Plene subteni kaj kunlabori LA RONDON.

Adresaro. En la lastatempo la komitato decidis pretigi adresaron. Ĝis nun, neniu penis kolekti la nomojn de Aŭst-aj E-istoj, sed tia kolekto povos grave helpi nian laboron. Ni bezonos la helpon de ĉiuj grupoj, kaj reciproke havigos la adresaren al ĉiuj, kiuj helpos. Plenajn detalojn ni avizos en sekvanta numero.

E-o en Internigejo. Nia Prez. S-ro Turner, avizis, ke lastatempe li vizitis al D-ro Prof. Beck, kiu estas en internigejo. Li instruas E-on tie. La Prez-o parolis pri nia lingvo al la oficistoj, kaj sendis al ili lernolibrojn.

E-o en Anglujo. En letero ĵus ricevita, Sero Goldsmith, Sek-o de I.E.L. kaj B.E.A. avizis, ke malgraŭ la milito intereso pri E-o kreskas.

E-o Domo. Kun la escepto de unu-du frakasitaj fenestroj la B.E.A. E-o Domo en London ankoraŭ staras sendifekta.

I.E.L. Jarlibro. La kvina I.E.L. Jarlibro jam atingis Aŭstraliajn membrojn. Ĝi montras kontentigan statistikon. Delegitoj nun troviĝas en 14 Aŭstraliaj urboj.

Morto de E.A. MILLIDGE, (Resumeto el "B.E."). Kun profunda malĝojo ni anoncas la forpason de Akademiano Edward A. Millidge, 75-jara. Li estis tutmonde konata sed ĉiam modeste tenis sian personecon kaŝita.

Li redaktis la "British Esperantist" en 1905 ĝis 1910, sed estas plej konata, kiel aŭtoro de la grava "Esperanto-English Dictionary." Kvankam la verko aperis unue en 1912, de literatura vidpunkto ĝi ankoraŭ restas la plej bona vortaro tia. La verko restas monumento al lia profunda klereco literatura kaj E-a.

Lastatempe li suferis okule, kaj alimaniere, kaj en Nov. lian malsanon pligravigis la eksplodo de bombo en^{at}tuja apudeco.

Kunlaboro. Denove ni memorigas vin pri la kunlaboro de A.E.A. kaj LA RONDO. Kotizo al A.E.A., 3ŝ. Abono al LA RONDO, 3ŝ. DUOBLA KOTIZO AL AMBAU ORGANIZAJOJ 5ŝ. Aliĝu tuj, sendante kotizojn al G. HILLERMAN, c/- Bank of N.S.W., Hobart, Tas. aŭ al LA RONDO. G.H.

SALUTAS al ĉiuj Aŭstraliaj E-istoj S-ro ALLAN TURNER, nun Prez-o de AEA.

Karaj Sam-oj:

Kiel prez-o de AEA mi deziras esprimi dankon pro la honoro esti tia, kaj esperas, ke ni progresos al pli alta nivelo en la evoluo de la movado en ĉi tiu kontinento. Mi petas ĉiujn, ke ili helpu la komitatanojn kaj LA RONDO plenumi tiajn devojn, kiaj necesas por plua sukceso. Ni havas multajn fervorulojn inter ni, kiuj laŭ sia kapablo povus plensukcesigi ĉiun fakon en nia E-a vivado, se ili volus unuiĝi por la komuna bonfaro. Mi nun petas (ke ne necesas petegi, mi estas certa), ke ĉiuj gefratoj esploru sian kompetenton kaj serĉu la kampon sur kiu li aŭ ŝi povos plej efike agadi; kaj eĉ saĝa, simpatia kritikaĉo helpos al tio, ke ni fariĝu feliĉa rondo alligita al la mond-movado.

Mi petvokas al la ĉefurbaj kluboj, al la pioniroj, al ĉiuj miaj korespondantoj, al ĈIU INDIVIDUO, ke ili leviĝu, agu, kaj, forgesante malagrablojn, koncentrigu la fortojn al la celo atinginda, atingebla.

"AUSTRALION NI KONDUKU LAU LA ESPERANTO VOJO"

En via nomo mi dankas al s-ro C.C.Cowling, nia eksprez-o, kaj lia edzino, por la riĉa laboro ĝis nun farita por nia movado, kaj deziras al ili daŭran feliĉon kaj sukcesan agadon por E-o.

Via sincere kaj fratece,

Bcx 81, Shepparton, Victoria.

ALLAN TURNER.

23 7 41

LIDJA ZAMENHOF. Laŭ letero ĵus ricevita el s-ro M.C.Butler, ankoraŭ estas dubo pri la sorto de Lidja Zamenhof, de kiu oni ricevis leteron en London datitan kvar tagojn post ŝia supozita morto.

Fr-ino L.KISLOVA estas studentino.

(vidu P. 7)

LINGVAJ DEMANDOJ.

SUFIĈE. Atentemaj kursanoj sendube rimarkis, ke en tradukota Peco 14 S-ro Gordon ĉe la frazoj "quite considerable distances", "quite long earthworms", evitis misuzon de "sufiĉe", lerte skribante "de iom malproksime" kaj "tre longajn". Uzu "sufiĉe" nur kiam efektive temas pri io "estanta en tia kvanto, kia estas bezona." Ekzemple, "Mi ne havas sufiĉon da mono por aĉeti aŭton," "La vetero ne estas sufiĉe varma por banado." Sed ne por traduki "rather", "a bit", "passably," "somewhat", "enough" (en senco "It's warm enough to-day!" = Estas tro varme hodiaŭ!). Por tiuj uzu "meze," "tre", "tro", "iom tro", "iom tre", "konsiderinde" aŭ alian adverbon laŭ la senco.

Povas esti, ke kelkaj nomus elipsa frazon, kia "kapti sufiĉe longan vermon je sufiĉe longa distanco," sed kiel kompletigi? Eble per: (sufiĉe) por vekti ĉe ni pli-malpli fortan miron.

PRI LA ANGLA FINAĴO -ING. En la Angla lingvo oni ofte trovas purajn adjektivojn kun finaĵo -ing, ekz., charming woman, oscilating valve,

wading boots, writing ink. Por tiuj formoj oni uzu "ĉarma virino, oscila valvo, vadbatoj, skribinko." "Ĉarmanta" estas verba adjektivo kaj signifas dumtempecon, okazecon, agon ne kvaliton. La Plena Vortaro donas "migranta birdo," "oscilanta valvo", sed ĉu ne sufiĉas "migra", "oscila", ĉar "migri" estas eco ennaska de tiuj birdoj, "Angle "migratory," kaj la sola funkcio aŭ ekzistokialo de la valvo estas "oscili"? Simile, "she is a loving woman" kie "loving" = affectionate, do "am(em)a"; "lovable" = aminda.

TAMIZO. En LA RONDO Nro. 9, p.9, linio 2, troviĝas "Tamezo." Mi skribis tiun formon, agante laŭ tio, kion mi pensis esti mia lingva intuicio, do ne konsultante vortaron. Amikino rimarkigis al mi poste, ke "Tamizo" sidas en la vortaroj. Tiel estas. Kial, mi tute ne scias. Ŝajnas al mi, ke pro erara etimologia devenigo. Ĉar "Oxford English Dictionary" informas, ke "Tamisa" estas hipoteza etimologia formo. La Praangla, "Temese"; Latina, "Tamesa", "Tamesis."

LA PARTICIPA ADVERBO. "Ili iris kaj tenis la manojn eltirite en la aero....Fundamento Krest. 23/26.

"La provizejoj sin trovis intermiksate kun la nutrejoj..224/18

"Mi sendas al vi tie ĉi aldonite la staton...229/6.

"Mi aŭdis la grilon daŭriganta sian nelaciĝan kanton, kaŝite sub la herbo...Vojaĝo interne de mia Ĉambro (Trad. Sam. Meyer), p.23.

Kio estas diskutinda en tiuj frazoj?

Jen kio diris Kalocsay (Lingvo-Libro No.3-4, p.6): "Vi (s-ro Marcelle) pledas por particip-adverboj ne rilatantaj al la subjekto (sende la leterojn afrankite)". Vi diras, ke ili estas adverboj, do devas kaj povas esti uzataj kiel la ceteraj adverboj.

Nu, la regulon, ke la particip-adverbo ĉiam rilatas al la subjekto, starigis Zamenhof mem. Estas vere, ke li kelkfoje malobeis sian propran regulon.

Kion do sekvi? Ĉu la regulon aŭ la tra^esporadajn deflankiĝojn?


En tiaj okazoj, laŭ nia opinio oni devas konsideri antaŭ ĉio la oportunecon kaj la klarecon. Nu, estas sendube, ke per la permeso de la nesubjektaj particip-adverboj grave suferus la klareco. Ekz., en la frazo: "Paulo batis Petron alpremite al la muro," kiu estus alpremita, ĉu Petro, aŭ Paŭlo? Aŭ: "Mi sendas al vi ĉi-enfermite novan poemon" -- ĉu la poemo aŭ la poeto en malliberejo estas enfermita?

"Li estas vere feliĉa homo, konsiderante tion, ke li tranagiis la krizon" -- kiu konsideras, ĉu li, aŭ mi, kiu parolas nun pri li? "Dirante la veron, li ĉiam malsukcesas" -- ĉu mi anoncas, ke mi nun diras la veron, aŭ li malsukcesas, ĉar li diras la veron? "Ne trinku akvon varmigite de la suno" -- ĉu la homo aŭ la akvo ne estu varmigita?

(En la dua frazo tirita el F.K. vi rimarkos, ke la particip-adverbo ja rilatas al la subjekto, sed ke ĝi pli bone estus "intermiksitaj", particip-adjektivo.)

----- F.R.BANHAM.

La Ronde.



Sept. 1941.

N-ro 12

Eldorita de F.R. Barham.
2 Banchory St. Essendon Ws. Victoria.
- AUSTRALIA -

En la lasta tempo zumzumis al mi en la kapo ideo pri ebleto, ke mi povos ĝisvivi tempon en kiu aperados mondvasse legata "Digestaĵo de Esperanto." Mi skribis "ebleto", ĉar mi nek kuraĝas kredi la vivi-povon en mi tiel daŭrigema kiel tiu en Metuŝelaĥ, nek volas karesi iluziojn pri la prudento de la homaro, kiu, anstataŭ interkompreniĝi per unu sola lingvo, preferas grandskale mutigi unu la alian per la perfekta procezo: amasigi kadavrojn. Sed obstine trudas sin la plaĉa bildo: homoj sur la tuta tero legantaj samajn revuojn, "digestaĵojn" de kompetentuloj kompilitajn el, ni diru, 150 riĉenhavaj eldonaĵoj en E-o. Ĉu tio estas realigebla? Jes, se koncernaj eldonantoj konsentus sendi al "kribrista" centro siajn gazetojn kun eksplicita permeso represi kion ajn laŭplaĉe. Sed la "digestigistoj" nepre devus esti homoj de firma karaktero kaj bone evoluinta literatura gusto; krome, ne molkore facilindulgaj. Se ili troe impresiĝus per bonfaraj, homamaj aŭ partieceaj alvokoj, la "digestaĵoj" fariĝus nenio ol "propagandservo" por birdamikoj, antitabakuloj, fabmanĝantoj, kaj similaj. La perfekta "digestaĵo" estus ĉiumonata antologio, diversa kolekto el la plej bonaj verkaĵoj aperintaj en la tutmonda E-a revuaro. La sekva paŝo pluen estus "fakaj digestaĵoj": "d. de krimo", aŭ humuro, aventuro, tekniko, scienco, medicino k.t.p. Jam antaŭ jaroj oni taskis fondi specialistajn entreprenojn: "Literatura Mondo" (Budapeŝto), "La Pirato" (Parizo), "La Medicina Revuo" kaj "La Scienca Gazeto," brave flagris pli-malpli longe antaŭ fina estingiĝo. La du unuenomitaj ne estis verdire "digestaĵoj", kia estis embrie, ĝerme, la dua duoj, sed pliĝuste revuoj dediĉitaj sole al iu celo -- respektive literaturo kaj ŝerco (ofte pipra: fantomoj de "L.M." rimarku, ke mi zorgas uzis la singularon ĉe la adjektivo).....

Jam en la horo en kiu vi legos ĉi numeron la nedifineblaj sed nepre senteblaj influoj de la printempo efikos sur vin, amikoj! La kamenon kaj studlibron anstataŭos ĉe multaj la pilkbatilo kaj ludejo -- aŭ la mola plezuro de "dolĉa nenionfarado" sur bonodora herbo. La rubekolo ricevos pli helan brustruĝon, la vanelo prifloras novan kreston, gejunuloj miele dronas en revoj de amo idilia. Silenta, nevidebla, tiu mistera potenco ekfermentas en plantoj, birdoj, bestoj, transformante ilin aŭ donante novajn belojn, kantojn, dezirojn.

Ĉu ne kredinde, ke ankaŭ por ni homoj la renaska jartempo havas signifon eternan, bazan al nia naturo -- signifon alian ol pri "planoj por nova ofensivo?" Ne malofte la periodo de l'burgonoj portas al inteligentaj homoj ondon da vekigantaj fortoj, inspiroj, sopiroj al spirita aŭ mensa kreado, intencoj pli riĉe plenumadi. Almenaŭ iom el tiu ĉi anima dinamiko ni kanalizu en direktojn favorajn al nia lingvo. Faru de nun ion pli ol ĝis nun. Portu stelon; E-e stampu ĉiun koverton por ĝin propagandil-igi; defendu E-on per letero al ĵurnalo almenaŭ fojon en jaro; pli uzu E-on en korespondado; elektu samideulon en la sovaĝejo por plumamiki, por ke li ne tro amare sentu sin izola for de la movado.

Ĝis la celebra numero en Oktobro!

F.R.B.

AKIRU OFICON --- KAJ TENU ĜIN.
(El "400,000,000 Customers", de Carl Crow.)

Tuj ekde la momento en kiu prosperas al li vidi sian nomon sur salajrolisto, la ĥino strebas fortikigi la pozicion. Se li skribis petleteron por la ofico, certe estas, ke li promesis esti fidela kaj diligenta; en la kazo de preskaŭ ĉiuj miaj dungitoj tiu promeso ricevis perfektan plenumon. Akirinte al si oficon, la neĥino ordinare emas tuj malstreĉi la fortojn, sed la ĥino tute ne! per mil manieroj li ekklopodas igi sin absolute necesa en sia nova vivĉirkaŭo. La plej frapan ekzemplon provizas la domservisto; tre intense li sekvas tiun politikon. Kvankam mi loĝis en Oriento jam 25 jarojn kaj dum tiu tempo havis ĉiam unu aŭ pli domservistojn, pretajn por bantigi miajn ŝulaĉojn, meti miajn pantoflojn aŭ ekbruligi mian cigaredon, miaj ennaskaj tradicioj tamen forte persistas en mi, kaj mi amas fari la proprajn personaĵojn, aŭ almenaŭ provi ke ankoraŭ mi estas kompetenta fari ilin kaj ke mi ne estus tute senhelpa se mi trovus min en lando senservista. Sed se mi, en la nuna momento, decidus ŝanĝi la vestojn sen helpo de mia domservisto, mi trafus en malfacilojn. La kolumo, butonoj, ŝtrumpoj estus netroveblaj -- ien lokitaj ĉi mia facila ekprenoj. Post iom da vana serĉo, mi devus sonorigi al servisto Ching. Se mi penus ĝui botelon da biero laŭ la kutima maniero -- mem irpreni ĝin el glaciŝranko -- tre-tre probable la botelmalfermilo estus tiom zorge elvidigita, ke mi denove devus sonorigi. Ĥina servisto neniam plendas pro troaj sonorigoj. Lia devo estas zorgi pri vi, kaj li faras tion gaje-bonvole, negrave kiel koleriĝema vi povas esti. Ju pli li priservas vin des pli li sentas sian oficon sekura. Kio maltrankviligas lin, tio estas: kiam vi ĉesas fari la sonorigojn kaj ekfaras aferojn per propraj manoj.

La oficeja servisto ne havas oportunon kaŝi butonojn aŭ botelilojn, sed en aliaj kaj pli gravaj manieroj ankaŭ li igas sin nemalhavebla. Mi memoras legi en iu "kiel-sukcesi" libro konsilon, ke bone estas priinstrui vian laboron al via subulo, por ke per tio vi povu grimpi ŝtupon pli alten. Mi perdis du oficojn antaŭ ol mi klarvidis la falssagon de tiu konsilaĉo, sed la ĥino eĉ ne dum minuto kredus ĝin. Lia teorio estas: "Se vi instruas amikon, tiu prenos vian oficon." Grandkomerculo neĥina iam asertis, ke la skribitaj paperoj de oficejo devas esti en tiel bona ordo, ke, se venus morto aŭ karcero al la ĉefoj, la aferoj de la firmo povus glate plui sen ajna halto. Mi ankaŭ favoras tiun ideon kaj donis jam multe da tempo al ĝia disvastigo inter mia oficularo. Ili ĉiuj konsentis, ke ĝi estas bona teorio -- por mi -- kaj stimulas min ĝin efektivigi. Sed ili neas, ke ĝi estas bona por ili, ĉar la ĥino kredas la malon, nome, ke oficejo devas esti tiel organizita, ke, se li foriras de ĝi, la tuta loko tuj falu en ĥaoson kaj tiastate restu ĝis li ricevos vokon reveni por malimpliki la aferon. Rezulto de tio estas, ke mi povas fari longajn feriojn, dum kiuj ĉio iras bone, eĉ pli bone, ol kiam mi sidas en la oficejo. Sed se ĥina stabulo devas hejmuŝi pro malsano, mi ordinare devas komisi iun viziti la enlitiginton por peti informojn, kiuj devus esti, sed ne estas, klaraj en la oficejaj dokumentoj.

Tre malofte oni povas emigi Ĥinon iri libertempon, ĉar, tion ĉi farinte, li devus antaŭe sciigi al alia homo tro da detala informo pri sia labormetodo. Li timas, ke en la tempo de sia reveno, tiu alia jam sukcesos okupi lian lokon, aŭ almenaŭ lernos pri lia laboro tiomgrade, ke ankaŭ li estas nemalhavebla en la firmo. Jen kial estas tiel malfacile aldoni al la salajrolisto homon alian ol membron de unu el la klanoj jam sekure establitaĵoj en la firmo. La kasisto, se lia devaro farigas tiel peza, ke li devas havi helpiston, certigas ke la novulo estu nevo, juna frato, aŭ iu parenco, kies danĝeran ambicion li povas, pere de familia disciplino, teni en ĝustaj limoj.

----- F.R.BANHAM. (Tradukis.)

ANGKORO en INDO-ĈINIO.

Okazis laŭ ĉies atendo. La Japanoj sin trovas en Franca Indo-Ĉinio. Ili diras, ke ili tien iris por "protekti" la landon. Tre esperinde, ke ilia speco de protektado ne kondukos ilin al la detruo aŭ eĉ ia ajn difekto al mirinda urbo, kiu estas antikva ekster la scio de homoj, tute sen postsigno de ĝiaj antaŭaj loĝantaroj, tamen preskaŭ perfekta - vera alvoko al la arkeologoj, kiuj ĝis nun povas klarigi al ni nenion el la enigmoj kiuj nin trafas.

Franca naturisto iam serĉis papiliojn en la ĵangalo de Indo-Ĉinio. Subite li hazarde alvenis antaŭ miriga vidaĵo. Ĉu li vidas mokantan fatamorganon? Ne! Estas ja la vero! Tie, antaŭ li, grandaj turoj -- turoj de plej granda, plej belega templo kiun li iam ajn vidis, kaj, eĉ pli mirinda, templo ankoraŭ perfekta, ĉiu ŝtono en sia ĝusta loko. Kun kreskanta miro, la naturisto atingis ŝtonan ŝtuparon. Nenian homon li renkontis, sed tordantaj serpentoj kuŝis en lia vojo. Panteroj glitis, senbrue, el siaj skulptitaj nestegoj. Vespertoj kaj strigoj flugis ĉirkaŭ lian kapon. Tutaj kolonioj da simioj babiladis al li dum lia movado laŭlonge de la trahakitaj koridoroj de tiu stranga soleca templo.

Li daŭrigis, kaj fine atingis la supron de la plej granda turo. De tiu alta pinto li rigardis malsupren. Li vidis mil aliajn grandajn kaj belegajn konstruaĵojn, kiuj levis siajn kapojn super la branĉoj de dikdikegaj ĉaparegoj.

Tiam li konstatis, ke li faris unu el la plej grandaj eltrovaĵoj de la historio -- ke li stumblis inter la konstruaĵojn de antikva perdita urbo, urbo kiu foje estis videble la fiera ĉefurbo de iu imperio, urbo pli granda ol Parizo laŭ amplekso, ~~laŭ~~ aparte pli belaj konstruaĵoj, kaj ankaŭ, ke li sola, el tutaj la milionoj da homoj en la mondo, scias, ke ĝi ekzistas, ĉar eĉ ne unu homo estas tie, kaj neniu ajn tien vojaĝas.

La naturisto rapide revenis al Francujo, kaj multe paroladis pri sia urbo, sed neniu kredis lin. Rigardate kiel freneza, li poste mortis.

Lia nomo -- Henri Mouhot. La urbo -- Angkoro.

Sed malgraŭ la nekredo de la francoj dum lia vivo, ili poste eltrovis ke ili mem, kaj ne Mouhot eraris, ke la urbo efektive ekzistas. Ni vizitu ĝin.

Ni antaŭen iras laŭ mallarĝa vojo, premita ambaŭflanke de dikega, mal-luma ĵangalo, sin sternanta ĉiuflanke multajn mejlojn, ĝis subite, kiel Mouhot, ni alvagas en maldensejon, kaj vidas tie, kion vidis Mouhot. Ni rapidas antaŭen, ĝis ni atingas la templan teraĵon kaj tiam observas la grandan amason de ĝi -- ĝi forviŝas la tutan horizonton. Kaj tiam, kun egala admiro, ni rimarkas la riĉecon de detalo al la akrecoj da skulptaĵo tiom delikata, al la centoj de eltranĉitaj fenestroj, la miloj da tranĉitaj galerioj, la multaj turoj, puŝantaj supren por renkonti la ĉielon -- la tuto potenca, belega, soleca preter kredo.

Por atingi la enirejon, ni promonas laŭ altigita ŝtona ŝoseo, dekdu futojn longa, kvardek larĝa. Tiu ŝoseo kondukas super kie estis, foje, sankta lago. La balustro konsistas el longaj ŝtonaj serpentoj, grandegaj kobroj kun sep kapoj, subtenitaj de ŝtonaj homoj. Ni rimarkas, ke sub niaj piedoj la trotuaro estas sulcita de antikvaj ĉaroradoj -- ĉaroj, kiuj, sendube, portis la reĝon kaj liajn eminentulojn al la adorado de la sanktejo.

Ni grimpas la krutajn ŝtupojn, kiuj kondukas tra la enireja pordo en la plej malsupra galerio, kaj interne ni trovas nin meze de la plej mirinda tapeto. Ĉi celo de la giganta konstruaĵo estas kovrita per skulptitaj dekoracioj, kiaj reĝoj, ridantaj dioj, kokoj, ĉenoj de dancantoj, kiuj tumultas sur la tuta supraĵo de la muroj kaj plafonoj.

La templo nomiĝas Angkor Vat. La urbo ĉirkaŭanta ĝin, nomiĝas Angkor Thom. Historiistoj nomas la pasintajn loĝantarojn "Khymeroj." Kiuj estis la Khymeroj? Kio okazis al ili? Kial tiu urbo, kun siaj palacoj, temploj, sia potenco kaj gloro, sia granda loĝantaro, estis subite forlasita en sia perfekto, kaj kiam ĉio ĉi okazis? Neniu scias.

Mirante, ni vidas malrapide subiri la sunon malantaŭ la okcidentajn arbpintojn. Krepusko rampas super la ĵangalon. Noktaj bestoj ŝteliras tra la mallumo. Ĉiu birdo ennestiĝas, krom nur la vespertoj, kiuj, fantomecaj, silente flugas super nin. Neniu rompas la kompletan, timigantan sensonecon, kiu falas sur tiun grandegan tombejon. Ankoraŭ unu nokto aldonas sin al la multmilionoj, kiuj forpasis de la tempo, kiam tiu ĉi mistera, nekredebla urbo de nuntago estis vivanta realaĵo.

Kiom da noktoj? Neniu scias.

----- L.E.BAILEY.

KELKAJ IMPRESOJ el MEKSIKIO

Ĝis la unua promenado, kiun mi faris en antaŭurba kvartalo de Meksiko, tuj altiris mian atenton iu aplaŭdsimila bruo, kiun mi aŭdis preskaŭ ĉiupaŝe. Maldiskrete mi proksimiĝis al iu pordo, kie aŭdiĝis tiu bruo, kaj tie ekvidis ses virinojn, kiuj staris ĉirkaŭ granda forno kaj platigis bulojn el farunpasta, frapante ilin per siaj manoj aplaŭdmaniere. Aro da rondformaj, plataj kaj maldikaj tortetoj kuiris sur granda forno. Tiaj tortetoj el maizfaruno konsistigas la ĉefan nutraĵon de l' Meksikia popolo. La tritika pano estas ĉi tie preskaŭalukso.

Kio donas specialan fizionomion al la ĉi-tieaj stratoj, tio estas la multnombraj ŝarĝportistoj. Jen unu kun ŝranko surdorse, alia kun lito, alia kun skribtablo, alia kun kestego en kiu premiĝas meleagroj. Evidente aŭtoj, ĉevaloj kaj azenoj ne povas konkuri kun tiuj dupieduloj, kiuj aspektas pli beste ol home. Ili ĉiuj estas klientoj de la pulke-ejoj (drinkejoj), marŝas nudpiede aŭ kun sandalaĉoj, kiuj kovras nur parte la piedojn kaj ebligas, ke oni vidu la amasiĝintan malpuraĵoj, kiu, kun la tempo, akiras aspekton de io normala, natura.

Tiuj portistoj estas ĉiuj aŭ indoj aŭ mestizoj. En iu historio pri la konkero super la lando fare de hispanoj, ni legis, ke ĝis tiam ĉevaloj, azenoj, muloj k.a. ŝarĝbestoj estis nekonataj en la Astoka Imperio. Homoj portis ĉion surdorse aŭ surŝultre. Jarcentoj forpasis; ĉevaloj, azenoj, muloj, bovoj ekzistas grandnombre en Meksikio; la kristanismo anstataŭis la idolanan religion, sed malgraŭ tio homoj estas ankoraŭ utiligataj kiel ŝarĝbestoj ĉi tie....

La spektaklo videbla surstrate en kelkaj kvartaloj estas io nepri-skribebla. Ĉiupaŝe oni tie kolizias kun vendisto, kies varoj (kelkfoje nur kelkaj fruktoj) sternas sur la trotuaro. La piedirantoj senĉese devas atenti por ne meti piedojn sur vendotaĵojn. Centre de la urbo oni estas senĉese tedata aŭ de vendisto de loteribilettoj aŭ de ŝuciristo. Ili svarmas kiel kulĵoj en marĉo.

Kontraste al la bone zorgitaj preĝejoj la stato de la ŝtataj lernejoj unuagrada estas vere mizera kaj apenaŭ kredebla; pordoj kaj fenestroj difektitaj, vitraĵoj rompitaĵoj, ĉio kaduka, malpura kaj senorda. Eĉ en Ĉilio, kie la vivnivelo de la popolo estas proks. la sama kiel ĉi tie, mi ne vidis tiel mizerajn lernejojn kaj nunjare ĵurnaloj raportis, ke en la Federa Distrikto, t.e., unu el la 28 "ŝtatoj" aŭ distriktoj de Meksikio, mankas loko en la lernejoj por 50,000 gelernantoj! Kiom por la tuta lando?

Oni bonvolu ne kredi, ke la tuta urbo havas la aspekton, kiun mi skizis. Estas agrablaj kvartaloj, kie la stratoj estas pavimitaj kaj pulketrinkejoj nevideblaj. Cetere, en la lando la grandaj ŝoseoj, sur kiuj ruliĝas aŭtoj kaj busoj, estas bone prizorgataj. La lernejoj por duagrada instruado estas relative bonaspektaj kaj estas pluraj instruoj mastrumataj de fremduloj. Tiuj ĉi homoj havas sian apartan tombejon, kiun ĉi tie oni nomas "panteon". La termino "cementerio" (tombejo) estas ŝajne tro vulgara por paradema popolo. Verŝajne la ĉiticuloj kredas, ke ili diiĝos postmorte kaj pro tio bezonas diejon. Bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas en Meksiko Esperantista "panteon" kaj tial mi ne deziras resti ĉi tie ĝis mia morto. Ĉinoj konsentas esti entombigitaj nur en sia lando kaj sekve la kadavro de tiuj kiuj mortas eksterlande estas veturigata al Ĉinio. Pro tio ne ekzistas ĉi tie "panteon" por ĉinoj, kvankam ili estas multnombraj kaj eĉ preskaŭ tute monopoligis la mastrumadon super la mezklasaj restoracioj.

Mi legas ofte en gazetoj, ke en 1910 la meksikia popolo faris revolucion kaj gajnis liberon. Mi ne scias kian; eble temas pri la libero ĵeti ĉian rubon surstraten, fumadi en tramo aŭ buso kaj bruadi tage kaj nokte. Aŭ ĉu temas pri la libero por laboristoj manifestacii surstrate, organizi festotagon honore al la armeo kaj ĉiaokaze krii: Vivu Meksikio!

La unuan de Majo la sindikatanoj havas liberon manifestacii, sed ne tiun foresti la manifestacion. Kiu forestas, tiu ricevas monpunon je tritaga salajro. La laboristaj gvidistoj formas la ebrion de nova

klaso; ili enspezas duoble pli ol kvalifita metiisto, kvarfoje pli ol simpla laboristo kaj certe dekoble pli ol la bestsimilaj portistoj. La gvidistoj ebrigas sin ne per pulkeo, sed per la luksaj biero, vino kaj brando. La prezidanto de l' respubliko, kiu ĉiam estas generalo, enspezas po 100 pesoj tage; deputito 30; kvalifita metiisto, proksimume 6; simpla laboristo 3; kaj la grandnombra ĉifonproletaro eble 1 aŭ 2. Sed Meksikio estas revolucia lando.....

Antaŭ preskaŭ jarcento (1846) Usono konkeris parton de Meksikio kaj tie la vivnivelo de la popolo estas konsiderinde pli alta ol en la nekonkerita, sendependa, suverena parto. Sekve, se mi estus Meksikia laboristo, mi dezirus, ke Usono denove invadu kaj konkeru la tutan landon. Sed mi certe ne havus la liberon diri tion publike al miaj samsortanoj.

La loĝejoj de kampuloj estas nur kabanaĉoj ne komparindaj al staloj en multaj aliaj landoj.

Turisto, kiun interesas nur pitoreskaĵoj, pentrus tute alian bildon ol la mian. Veturante en la ĉefurbo aŭte, li eĉ ne vidus la spektaklojn, kiuj ĉiutage naŭzas min. Li sendube rakontus pri la kolosaj piramidoj el Teotihuakan kaj el Colula, kiujn mi ankaŭ vizitis, kaj kiuj atestas pri la grado de kulturo de la Asketoj antaŭ la hispana konkero; li dirus sian emocion antaŭ la belaj pejzaĝoj, antaŭ la mirindaj sunmalleviĝoj k.t.p., k.s. Sed mi ne povas deteni min esti ĉefe interesata pri la vivo de miaj samgentanoj.

Antaŭ ol meti la finan punkton al tiu ĉi skribaĵo, konvenas diri, ke la meksikia popolo estas artema. Bonstataj viroj, kiuj ankoraŭ vestas sin per nacia kostumo, aspektas tre pentrinde kun sia larĝega ĉapelo diversforme kaj plurkolore dekorita, kun sia jaketo ankaŭ brile dekorita, kun siaj pantalonoj alĝustigitaj al la formo de l' gamboj kaj kiuj same havas dekorajn. Sed tiuj bildoj nur de tempo al tempo prezentigas al mi, dum ĉiutage miaj okuloj vidas ĉifonulojn, mia nazo flaras malbonodoron kaj miaj oreloj aŭdas kriaĉojn el la pulke-trinkejoj.

----- E.LANTI.

LA SKOTOJ.

En la nordo de la insulo Granda Britujo loĝas gento nomata La Skotoj. Sude de ili, loĝas gento el Saksonoj, nomata La Angloj. La Skotoj multe aldonas al la gajo kaj ĝojo de la Angloj per sia abunda humuro, preskaŭ 99 pro cent senkonscia.

Unu Skoto diboĉis dum tuta sabata nokto, kaj dimanĉo matene, venante hejmen, lin petis iu sinjorino fajfi por ŝia ~~brando~~. Li tiris sin kun la tuta digno, kiun Skoto kapablas, kaj diris kun riproĉa tono: "Virino, ĉu estas tiu ĉi tago por fajfado?" ("Wurman, is this ony day for whustlin'?")

La loka riĉulo eniris la preĝejon kaj serĉis sidlokon kun iom da bruo. Je kio la pastro interrompis la Diservon, kaj diris "Bonvolu sidiĝi, sinjoro McPherson, ni vidos viajn novan pantalonon kiam la adorantaro disigĝos." (Juist sit down, Mr. McP., we'll see your new breeks gin the kirk cooms oot.")

Skoto vojaĝanta volis fumi, kaj petis alumeton de Skoto sidanta kontraŭe, kiu metis ĝin apud la unua Skoto. Tiu ĉi trovis, ke li

tute ne havas tabakon; do la unua Skoto reprênis la alumeton, dirante "Do, vi ne bezonos la alumeton."

La katoj per siaj okuloj montras la horon. Se la okuloj montras unu horon, kaj tion oni diras al Skoto, li tuj montras indigne la horlôgon; jam estas la dua kaj duono!

Karlo Lamb havis portreton de belulino, kiun liaj amikoj nomis per ne tre saĝa nomo "My Beauty," kiu povas esti aŭ "Mia Belulino," aŭ "Mia Beleco." Lamb unu fojon montris tion ĉi al Skoto, kaj demandis lian opinion pri "My Beauty." La Skoto respondis, ke kvankam li havas tre altan opinion kaj estimon pri la literatura kapablo kaj fardo de sinjoro Lamb, li neniam donis al si konsideri liajn personajn pretendojn.

Boswell iam demandis al Johnson: "Kion vi opinius, sinjoro, se la proksima granda Angla leksikono, estus verkita de Skoto?" "Sinjoro," respondis Johnson, "por esti ŝercema, ne necesas esti maldeca."

Antaŭ nelonge en Skotlando oni elpensis aparaton por kapti ŝtelistojn de ombreloj. Ĉe la ŝtelo elfalas knaba ludglobeto, plej mal-kara, el argilo. La ŝtelisto estas ĉiam trovata rampanta sur kvar piedoj sur tero, kun alumetoj serĉante la ludglobeton.

En la urbo Kirkcaldie unu Skoto diboĉis en sabata vespero, falis en foson apud la tombejo, kaj vekigis nur en dimanĉa mateno, kiam la gardisto de la diligenco sonis per sia korno. La Skoto prenis tion por la lasta Trumpeto, kaj, kredante sin nepre unu el la Elektitoj, kiuj nepre iros ĉielon, li leviĝis kaj staris. Jen li rigardis la tombejon. El tuta Kirkcaldy li estis sola elektito, sola kiu iros ĉielon. Skuante la kapon, kun ĉagrena esprimo, li diris: "Tio ĉi estas mizera montro por Kirkcaldy."

Foje mi rakontis tion ĉi en Esperanta kunveno, kaj la Skota sekretariino leviĝis kun severa mieno, kaj protestis, ke la preciza nomo de la urbo estas "Kircaudie."

----- A.DELSUDO.

LETEROJ al la REDAKTORO.

NORD-AUSTRALIAJ ESPERANTO-PIONIROJ.

Queensland (Kuinzland), aŭ Esperante Kvinlando, estas plene ignorita en la artikolo sub "Australio" en la Enciklopedio de Esperanto eldonita de "Literatura Mondo" (Budapeŝto). La jenaj linioj de la plumo de iama agemulo por nia afero en la Norda Stato povus ~~interesi~~ multajn, precipe la veteranojn. (Redak.)

Antaŭ jam multaj jaroj la E-o Klubo en Brisbano proponis premion por traktajo pri "La Influo de Aŭstraliaj Kondiĉoj sur la Karaktero de Junaj Australianoj." Mi kredas, ke tiu estas la unua E-a konkurso por tuta Australio, kaj mi gajnis la premion. Mi forgesas la daton. Estis ankaŭ konkurso pri traduko de "We of the Never-Never," verko de S-ino Aeneas Gunn, kiun mi malgajnis. Eble la protokola libro de la klubo en Brisbano donas plenan informon pri malnovaj E-aj pioniroj, ekzemple, Cadell, Fewings, Mason-Beatty, F-ino Fraser (tre sperta kaj entuziasma), P.W.Pears, polica magistratano en Warwick, kie li varbis min. S-ro Pears kaj mi kune kun klubanoj en Brisbano verkis romanon

Esperante. Ĉiu verkis po unu ĉapitro kaj la libreto rondiris al ĉiuj verkantoj.

Mi ne renkontis pli ol du-tri anojn de la klubo en Brisbano, sed mi plurfoje vidis F-inon Fraser, kiu estis ĉiumaniere bonkorulo kaj multe faris por E-o. Sendube ŝi estis plej grava el samideanoj kaj meritas ĉefan atenton rilate Kvinlandon. Ŝi mortis tuj post reveno de E-a Kongreso en (mi pensas) Sidnejo. Mason-Beatty, Fewings, Cadell, Pears --- ĉiuj mortis.

La 9an de Marto 1910 starigis E-a grupo en Warwick. Prezidanto, P.V.Pears, sek-io kaj kasisto, C.C.Dornbusch. Ankaŭ ĉeestis unuan kunvenon Kanoniko (poste Episkopo) Hay kaj D-ro Hankins. La fina kunveno okazis la 21an de Julio 1910.

Mi kontribuis artikolojn al "Sciencia Gazeto" (ĉ. 20 dum 1913-14) sub redakcio de Charles Verax, kaj al "Ondo de Esperanto" (Rusujo), kaj donis verketon "La Universala Ritmo" al "Esperanto Triumfonta," 3an de Septembro, 1922. Mi opinias, ke mi ne estis samideano antaŭ 1909.

Ĉu internacia lingvo povas alporti la pacon? "La homoj estas sociemaj bestoj; ili kunvenas por malpaci;" "la lingvo estas donita al ni por kaŝi niajn pensojn," kaj ni klarege parolas unu al la alia kiam ni malpacas, kaj nur tiam. "La lingvo estas ne nur bazo de nia penspovo, sed ankaŭ la punkto el kiu niaj malkomprenoj kaj eraroj elvenas" (Haman). "Klarevidente estas, ke la vero kaj la malvero loĝas nur kun tiuj vivantaj kreitaĵoj, kiuj povas uzi la parolon" (Hobbes). Eble post ankoraŭ mil jaroj ni estos vere civilizitaj.

Pardonu min en tio, ke mi ne povas rememori E-ajn pasintaĵojn. Mi neniam estis en la "fluejo" sed ĉiam troviĝis en "postakvejo."

CONRAD C. DORNBUSCH.

de P. SCHWERIN.

Mi volas atentigi vin pri eraro en la poemo "Aneto en ĝardeno" (No.10 "RONDO"). En la lasta strofo "Li" rilatas al la suno; tio estas malkorekta, ĉar en multaj naciaj lingvoj la suno estas "ina". Vi eble scias, ke kelkaj filozofoj eĉ diferencigas la kulturojn de la popoloj laŭ tiu percepto pri la sekso de suno-luno (kulturcentro kun li-suno kaj ŝi-luno, kulturcentro kun ŝi-suno kaj li-luno). El tio evidentiĝas, ke en internacia lingvo oni povas uzi nur "ĝi" rilate al la suno.

A. E. A. AFEROJ.

SALUTAS VIN LA PREZIDANTO. Karaj samideanoj, Kiel via nova Prezidanto mi deziras esprimi dankon, ke vi tiel honoris min, kaj mi esperas, ke mi povos gvidi la Asocion al pli alta nivelo en la evoluo de la movado sur nia kontinento. Mi petas al ĉiuj, ke ili helpu la komitaton, kaj nian gazeton LA RONDO plenumi tiajn devojn, kiaj necesas por pluaĵ sukcesoj.

Sendube ni havas multajn entuziasmulojn inter ni, kiuj nun agas sindone, kaj kiuj laŭ la kapabloj povos plen-sukcesigi ĉiun fakon en nia Esperanto-viva, se ili estos pretaj unuigi por la komuna bonfarto. Mi nun petas (ne necesas petegi mi estas certa) ke ĉiuj ge-

fratoj esploru siajn kapablojn, kaj serĉu la agadkampon, kie ili povos plejbone agi, ko-operu, kaj eĉ kritiku saĝe kaj helpeme. Ni fariĝu feliĉa rondo kunligita al la mond-movado.

Mi diras al la ĉefurbaj kluboj, al la pioniroj, al ĉiuj miaj gekorespondantoj, al ĈIU INDIVIDUO leviĝu, agu, forgesu malagrablajn-ojn. Koncentrigu viajn peŝadojn al la celo atinginda, atingebla.

Vianome, mi tre dankas Ges. C.C.Cowling, niaj eksprez. kaj ekssek. por la granda laboro ĝis nun farita por nia movado, kaj esperas, ke ili ankoraŭ povos multe helpi. Via fratece,

ALLAN TURNER. SHEPPARTON. VIK.

ADRESARO. Kiel ni sciigis vin en Aŭgusto, la komitato decidis pretiĝi adresaron por la tuta Aŭstralio. Ĝi enhavas la nomojn de ĉiuj samideanoj konataj de A.E.A., aŭ pri kiuj avizos nin la diversaj grupoj. Ni esperas montri per mallongigaj informoj pri interesoj, asocioj, ekzamenoj, laboro farita por la movado k.t.p.. Ankaŭ sin trovos en la adresaro la nomoj de tiuj personoj kiuj favoras la lingvon eĉ se ili neniam lernis ĝin, kaj ankaŭ lernintoj, kiuj nun ne age partoprenas klubon.

Nur per la helpo de ĉiu grupo, efike sukcesos la adresaro, kaj tial ni petas la kunlaboron de ĉiu aŭstralia grupo ĉu aŭ ne ili aliĝis la landan asocion. Al tiuj, kiuj helpas ni reciproke ekspedos ekzempleron de la libreto. Niaespere, ĝi aperos en la nova jaro, kaj ni petas sekretariojn sendi listojn, por atingi la subskribinto ne pli malfrue ol la 15an de Novembro.

Jen ekzemplo de la informoj dezirataj:-

J.T.Smith. - Prez.W.E.S; Dip.B.E.A.; Del.I.E.L; interesas fotografado; korespondos kun alilanduloj k.t.p.; adreso.

ALIĜINTAJ GRUPOJ. Ni deziras ricevi informojn pri la organizado, kunvenejoj, k.t.p., de la aliĝintaj grupoj. Ĉu la koncernaj sekretarioj bonvolu sendi al ni tiujn informojn. Ni ankaŭ volonte ricevos novaĵojn de grupaj aferoj por publikigi en LA RONDO.

KOTIZOJ. A.E.A. -anoj kaj legantoj de LA RONDO, renovigante viajn kotizojn uzu la novan aranĝon por duobla kotizo -- 5ŝ. ĉiujare por ambaŭ organizaĵoj.

G.H.HILLERMAN, Box 630C., G.P.O. HOBART, TAS.

(Iom alivorte la supra letero de S-ro Allan Turner aperis en la Aŭgusta n-ro. Ni represas ĝin por legantoj ial ne vidintaj ĝin en tiu numero.)

Pro dekobligo de franka imposto "Heroldo de Ĉinio" ne pluŝ povas eniri Aŭstralion.

KASO de LA RONDO.

ABONOJ kaj KOTIZOJ.
 S-inoj Grant, Hill,
 F-inoj E. Godfrey, A. Godfrey
 T. James, S-roj O. Davies,
 Knox-Walker, Costa, Ling,
 Spencer, Williams..1/6....£-.16.6
 S-ro Alan Shain..... 5.6
 F-ino Bostock..... 2.-
 S-ro McCartney Noake..... 4.-
 F-ino Mitchelson..... 3.6
 S-ro Gustave Millar..... 3.-
 F-ino D. Cade..... 1.-
 vendoj..... 4.3
 £1.19.9

Deficito 8/7

£2. 8.4ELSPEZOJ.

Deficito de Julio.....£-.6.4
 Luo de Dup..... 5.-
 papero..... 8.6
 sablonaĵoj..... 8.3
 bindpingloj..... 1.3
 poŝto..... 6.6
 inko..... 12.6
£2. 8.4

W. ADDIS,

25 Greville Avenue

Flinders Park

Adelaide

S. AUS.

ATENTU! Malnovaj E-istoj! Ĉu vi povas doni koncizajn informojn pri pioniroj de E-o en Aŭstralio? Precipe pri homoj laborantaj antaŭ 1909. Kio pri Collingridge, Barrington, kaj vizito de D-ro Pollen al Aŭstralio ĉ. 1904?

Klubsekretarioj nepre sendu siajn raportojn pli frue!

S-ro E. HANKS, 736 Sydney Rd., Coburg, N14 Victoria, deziras aĉeti la "Enciklopedio Vortareta" de Verax.

NEKROLOGO. En 27 Julio, ĉe Hawthorn, Viktorio, Emma, fratino de mortanta John Henry Pyke.

RESPEKTOKLINE NI KONDOLENCAS!

LINGVA NOTO.SAMA KIEL ----- MALSAMA OL.

Eĉ progresintoj devas atenti jenan noton:-

Ĉe neegalecaj komparativoj oni uzas OL, ekzemple: Tiu propono estas malsama ol la mia; Li estas malpli inteligenta ol ŝi; La formo de la lingvo estos alia ol tiu, pri kiu ni nun laboras.

Ĉe egalecaj komparativoj oni uzas KIEL; La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj; Via opinio estas la sama, kiel la mia.

Sed ĉe "diferenca", kiu estas sinonimo de "malsama", oni rajtas uzi OL, DE, JE. Krome, notu "samtempe kiel, samtempe kun" (Plena Vprtaro).

PRI LA TRADUKARTO. (G. GORDON, F.B.A.)

Flulegebleco kaj tuja komprenebleco estas nepra karakteraĵoj de bonega stilo. Antaŭ ĉio oni devas tiel konstrui, ke la leganto ne devu interrompi sian legadon por analizi nesimple konstruitan frazon aŭ strangan, ne tuj kompreneblan kunmetaĵon. La ordinara homo nepre juĝos stilon en libro aŭ artikolo per la grado de facile je kiu li legas la libron.

De kiam mi komencis traduki mi ĉiam gvidas aŭ penas gvidi min per la principoj enhavataj en mia "Konsiletoj al Tradukontoj", kaj neniam mi konsideras tradukon finita ĝis kiam, formetinte ĝin por kelke da tagoj, mi mi legis kaj relegis ĝin kelke da fojoj kun la celo trovi, ĉu estas eble fari plibonigaĵojn en elekto de vortoj aŭ konstruo de frazoj, por certigi fluecon en voĉa legado kaj tujan kompreneblecon por la ordinara aŭdanto.

Kiel ĉe naciaj lingvoj, tiel ankaŭ ĉe Esperanto, eleganta verkado plej ofte estas rezulto de multa legado kaj, iagrade, imitado de la stilo de bonegaj verkistoj. En Esperanto neniu egalas Zamenhof, kaj mia opinio, por la plimulto da Esp-istoj la plej helpaj verkoj estas liaj prozaj originalaĵoj en "Fundamenta Krestomatio." Mi rigardas "Marta" kiel aparte altvaloran pro tio, ke ĝi estas traduko de moderna romano verkita en nuntempa lingvaĵo.

ANEKDOTO. Sensperta vojaĝanta komizo unuafoje komencis varbi mendojn en okcidenta Kvinlando. Ĉe urbo Winton, li renkontis veteranan sam-profesiulon, kiu demandis al li, kian sperton li havis.

"Tre malbonan," respondis li, "oni insultis min en ĉiu loko, kiun mi vizitis."

"Tio estas stranga," diris la alia. "Mi estas sur la vojoj jam kvardek jarojn, dum kiu tempo mi vidis miajn specimenojn ĵetitaj en la straton; oni prementis min per la nuko kaj flugigis min malsupren de la ŝtuparo. Ke mi estis rulita en la defluilon, mi ne neas, sed insultita -- neniam!"

----- OWEN DAVIES. (Trad. ALVOKO AL BRITAJ PARLAMENTANOJ.)

Manchester kaj District E. Society sendis al 17 parlamentanoj rezolucion rekomendantan, ke post la milito oni enkonduku E-on en ĉiujn terenojn kiel devigan temon en rekonstruata Eŭropo.

Respondis tre amike: J.R.Clynes, Clement Davies, K.C., Philip Noel-Baker, Wilfred Roberts.

Montris intereson: Lord Cranborne, Vernon Bartlett, Lord Cecil, Godfrey Mander.


Avizis pri ricevo: Lord Lytton, Lord Davis.

Respondis malfavore: George Benson.

El la ses, kiuj ne respondis, almenaŭ du aprobas nian lingvon.

Oficina Organo de la A.E.A.

La Ronda.



Oct 1941

Nº-ro 13

Eldonita de F.R. Banham
2 Banchory St. Essendon W5 Vic AUSTRALIA.

REDAKTORA BABILADO.

En unu tago antaŭ proksimume dek du monatoj mi rigardis kun bedaŭro faskon de maŝinskribitaĵoj. Tio estis tradukaĵoj, kiujn mi amekolektis dum 1924-31, jaroj en kiuj mi partoprenis kurson de S-ro George Gordon. Pro ofta priserĉado en ili la paperoj, malpezaj kiel neĝeroj, iom grave ĉifoniĝis kaj jam minacis dis-erigi ĝis kompleta nelegebleco.

Mi decidis refari la tuton. Komencinte la taskon, mi ricevis, ĝuste en tiuj tagoj, petleteron de aliŝtata fraulino, kiu deziris konsilojn pri BEA'a ekzameno. Inter aliaj aferoj mi rekomendis al ŝi ricevi de mi de monat' al monato kopiojn de la kursfolioj de S-ro Gordon. Ŝi konsentis tion, kaj post nelonge ĉirkaŭ dek Esp-istoj streĉis la cerbon super la tradukaĵoj de la Nov-Zelanda majstro. Sed je tio la afero ne volis staradi. Ekzumis en la kapo ankoraŭ ideo pri plua paŝo - ke mi aldonu al la kursfolioj, se spaco por tio, netajn notojn pri la movado en tiu ĉi kaj aliaj landoj.

Mia bonkora korespondantino, jam kolegino, opiniis tian "novaj-servon" utila, kaj en eble tro facilindulga momento sin proponis kiel presistinon por la laboro. Do fine eniris la mondon Okt-o 1940 LA RONDO forme de du folioj skribmaŝinitaj, reproduktitaj per gelatena metodo kaj falditaj en ok paĝojn. Sur ĝia fronto sidis kvinpinta stelo en du cirkloj. El ĉiuj cirkloj la interna prezentas nin mem, la Esperantistojn de Aŭstralio, kaj la pli granda la tutmondan movadon, kiu kompreneble enhavas nian. La Novembra kaj Decembra numeroj estis similaj, sed kudritaj.

Tiam INTER NI, organo de E-amikoj en Sud-Aŭstralio, kies unua numero aperis en Novembro 1939, konsentis for-meti la propran nomon kaj individuecon por formi parton de la nova gazeto. La "geedza" numero Jan-o 1941 kovrile portis miniatuurajn faksimilojn de la du eldonaĵoj, ankoraŭ reproduktita per la gelatena metodo.

Tiam pro manko de presgelateno kaj pro neceso pliigi eldonnombron en pli oportuna maniero, la fabrikantoj devis eksperimenti je nova, kaj pli rapida tekniko. Malgraŭ ke ili eĉ ne sciatis kiel manuzi ŝablonmaŝinon, laŭdace kaj sukcese ekprovis la nefacilan taskon kaj gajnis per tio ĝeneralan gratulon.

En la sep ŝtatoj la gazeto jam diskonigiĝis al viglaj E-istoj. Unu el tiuj, S-ro Hillerman, sugestis eblon, ke ĝi fariĝu oficiala informilo de la nova AEA, por kies fortikigo li tiel riĉe laboras. La ideo konkretiĝis kaj Julio 1941 LA RONDO aperis kun tiu digna rajto -- aferstato pri kiu, antaŭ dek du monatoj, la plej optimisma koncernato ne permesis al si eĉ reveti.

De pli ol unu urbo en Anglujo kaj Ameriko venis al ni laŭdaj vortoj pri nia entrepreno, kio ankoraŭ pli fortigis en ni konvinkon, ke LA RONDO ne malgrave efikos sur la vivon de Esperanto en nia lando, portante al ĝi praktikan helpon kaj spiritan instigon en la por ĝi ne tre favora nuna tempo.

Ni petas niajn legantojn rimarki, ke en tiu ĉi numero, ni sukcesis havigi al ni verkaĵon el ĉiu ŝtato. Tio estas plezuriga atesto pri la disvastiĝo de nia gazeto.



SALUTE.

OKT. 1941.

Kun glacio surkape
 mi sidas kaj ŝvitas...
 min sternas kanape:
 la cerbon agitas...
 cerbumas penege
 kaj tre profundege...
 la kialo, nu kia?
 por agado, ho tia!

Atentu! mi provos
 klarigi, se povos
 Jen mi deziranta
 per fraz' eleganta,
 per vortoj tuttrafaj
 kaj verdstele frataj
 saluti -- al kio?
 kaj kial -- al tio?

Ha! Ĉu vi scias
 per kalendaro
 aŭ ia notaro
 pri okazantaĵo
 ĝin mirondkrias!

Momentan silenton
 mi petas ardore,
 komplezan atenton
 donitan fervore...
 do, sen plua prokrasto
 kun taŭglingva ĉasto
 malkaŝigu l'afero
 al tuta la tero:-

Jen jam unu jaro
 de kiam la fondo
 de l'bonega LA RONDO!
 Aklamu per hurao!
 "Hura!" ekkriu,
 "Hura!" kaj "Vivu!"

Vivu por granda
 laboro propaganda!
 Kresku, vigla aganto
 por Esperanto!

Venku, ho! verve,
 sed tamen, nur serve!
 Kun lang' el mielo
 persistu por la celo!
 Vivu! Utilu!
 distru! kaj brilu!
 Ĉe nin unuigu!

Forpasis finiĝinta
 la jaro unua...
 Jen jam alveninta
 la rolo de l' dua...
 Laŭ obstina komplezo
 antaŭen tra l' ĝangalo
 de l' monda frenezo
 ĝis la nobla Idealo!

Saluton, LA RONDO!
 Bonŝancon, LA RONDO!
 Antaŭen, eĉ salte,
 nelace, senhalte!

(Ĉu mankas subskribo,
 de l'strofoj la ĝibo?
 Do, via tre amike,
 ja tre JOEDIKE!)

ASK-MONATO.

POLISO, KIU SAVIS VIVON.
(El "400,000,000 Customers," de Carl Crow)

Kiam mi unue ekloĝis en Ĥinujo la Manĉua dinastio ankoraŭ regis la landon; sidis sur la draka trono la knabo-imperiestro, nun matura homo kaj marioneta estro de Manĉukuo; Sun-Jat-Sen estis politika rifuĝulo, kaj la revolucia movado, kiu baldaŭ poste renversis la monarkion, estis tiel malforta kaj time kaŝita, ke malmulto el la ordinara popolo eĉ sciis pri ĝia ekzisto. Sed la Manĉuoj sciis pri la agado de la revoluciuloj kaj ilin aglookule observis. Revolucia sento povas flori nur per reklamo, kaj la plej malkara, plej efika formo estas la gazeta. Tial la reganta klaso suspekto rigardis la presaĵojn, kiujn oni povus eldoni nur en la fremdaj administroteroj, kie la leĝo havis iom da parolo, kiam temis pri senkapigo kaj malliberigo. Malgraŭ tiu protekto, la fervoro kaj kompetenteco laŭ kiuj la Manĉuoj elfaris kaj ekzekutis eldonistojn faris ilian okupon tre danĝera.

Mi diru pri iu Ĥino, kies asekura poliso montriĝis esti vera asekuro kontraŭ vivperdo. Arda revoluciulo, li decidis riski fondi gazeton en iu fremda administraciejo, klare tenante en penso la grandan nombron da samfakuloj, kiuj jam adiaŭis la kapon. Li kontraktis akcepti polison kun Brita kompanio kun kondiĉo, ke, se li perdus la kapon, lia familio ne falus en mizeron. Post iom, li verkis artikolon, kiu ofendis la altrangulojn. Malsaĝe vizitante ekster la sendanĝera regiono, li trafis en la manojn de la tiea mandareno, kiu ordonis lin en karceron. Fine venis verdikto, ke li perdu la kapon sen prokrasto. Sidante sur karcerbenko, li cerbumis sian malfeliĉon kaj serĉis eblaĵojn gajni liberon. Tiam ekvenis esperiga ideo. Li suferus nenian perdon per provo ĝin realigi.

"Ekĉelenco," li arde klarigis, kaŭrante humilaĉe sur la planko, "vi kompreneble povas forigi mian sensignifan kapon, sed tion farinte vi akre ofendus al la Angla reĝo, kaj sekvoj de tio povus esti por vi forte malutilaj."

La sugesto, ke la Angla reĝo koleriĝus pri ekzekuto de pediko kia Ĥina revoluciulo, kaj ke la longa brako de Brita venĝo povus atingi lin, furde perturbis la mandarenon, kiu demetis sian dignon dum sufiĉa tempo por demandi, kiel ŝajne nerilatata kaj tute sensignifa afero povus kaŭzi tian vastan kaj impresan efekton. Kun respektiga sinteno la eldonisto klarigis: Lia poliso kun la Brita kompanio devigas lin pagi ĉiu jarkvarono certan sumon dum li vivas; aliflanke, la kompanio estas sub leĝa devo pagi al liaj posteuloj mirige grandan sumon en la okazo se li mortos. Se li restus viva la kompanio konsiderinde profitus, sed se li subite mortus ĝi konsiderinde malprofitus. Se li mortus pro natura kaŭzo la kompanio ne havus bazon sur kiu fondi plendon, sed se lia kapo forhakiĝus per ordono aŭtoritata, ĝi tre verŝajne protestus en severega tono, ĉar per tia morto ĝi perdus enspezon, krom la kosto de enketo.

La Brita leono en tiuj tagoj havis kutimon muĝi multe pli laŭte ol ĝi faras nuntempe, kaj la plej laŭtaj muĝoj aŭdiĝis en la regiono Hankau, ĉar la valo Jancekjano estis rigardata kiel Brita "influsfero." La tieaj konsulejanoj jam antaŭe faris malagrablojajn por la mandarenon,

kiam ili trovis lin maljuste impostanta sur Britajn varojn, kaj kiam ĥinaj komercistoj rifuzis akcepti kargon bonfide liveritan al ili. La mandareno tial decidigis, ke la vortoj de la eldonisto tre povas enhavi veron, kaj li prokrastigis la ekzekuton ĝis li povos fari definitivan konkludon pri la afero post plua esploro. Depeŝo al Pekino ĉefurbo, kie la Ĥina Administracio por Eksterlandaj Aferoj verkis leteron al la Brita A.E.A., petante: ĉu la eldoniston oni povus senkapigi, ne kaŭzante per tio diplomaciajn komplikajojn? Dube estas, ĉu la aferon oni efektive sendis al la Londona Administracio por Eksterlandaj Aferoj, sed se jes, restas nekonata la Brita oficiala sinteno, ĉar antaŭ ol povus veni respondo la respublikana revolucio eksplodis, la karceroj malpleniĝis, kaj la eldonisto, eskapinte, fondis gazeton en Ŝanhaj, urbo en kiu li rakontis al mi la aventuron. Kiam diskonigis la afero, komencis por la vivasekuristoj periodo de eksterordinara prospero.

----- F.R.BANHAM. (Trad.)

FAMO kaj RIĈECO ATENDAS VIN.

(El "Readers' Digest" April 1941. Kondensita el "The American Magazine." William D. Coolidge.)

Unu el miaj amikoj entuziasme parolis pri la mirinda homa inventemeco. "Pripensu nur!" li ekkriis, "Ni konkeris la aeron, sklavigis la fulmon, detruis spacon....."

"Vere," mi interrompis, "sed ne forgesu la anatifon."

La anatifo estas simbolo de ĉiuj problemoj, kiujn ni ne solvis. Dum jarcentoj tiu eta mara organismo entreprenis multekostajn amuzvojaĝojn sur la kiloĵoj de niaj ŝipoj. Ĝi malrapidigas nian mardefendon kaj kostas al ni milionojn ĉiujare. Riĉaĵoj atendas la homon, kiu estas sufiĉe lerta, por superruzi ĝin.

Sherlock Holmes noniam atakis misteron, kiu estis same malhelpa kiel la Stranga Kazo de la Katod-Radio. Unutage mi decidis observi kio okazus, se mi ĵetigus fluojn da ĉi tiuj rapidegaj elektronoj, kiuĵ kutime estas firme sigelitaj en vakigitaj tuboj, eksteren en la liberan aeron. Sub ilia blua lumo la ŝelo de freŝa pomo bruniĝis. Muŝoj mortis. Acetilen-gaso fariĝis subtila flava polvo, kiun ni ne povis dissolvi en io ajn.

Tomas pri mirinda potenco. Sed ĝis nun ni ne povas kapti ĝin. Tamen antaŭ ol vi deklaras ĝin "utila", rememoru: kiam Michael Faraday unuafoje demonstraciis elektron al Gladstone, la Brita ĉefministro rimarkis: "Bone, sed kiun surteran utilon ĝi havas?"

La katod-radio ne estas senutila; ĝi nur estas ne-uzita. Iutage iu eltrovos ĝian kampon de aplikado, kaj eble nova mondo malfermiĝos antaŭ ni.

Antaŭ kelkaj tagoj gazetisto diris al mi, ke unu miliono da dolaroj atendas tiun, kiu eltrovos pli rapidan metodon, fari gazetgravuraĵojn. Mi povas rakonti al vi, kiamaniere oni devus procedi: trovu radion, kiu projektita tra foto-negativo al plato rapide gravuras tiun platon. Sed mi ne povas diri al vi, kian radion vi uzu nek kian platon. Alia miliono irus al tiu homo, kiu inventus simplan malkaran metodon, por fari bonajn paper-kopiojn de kolor-

fotoj.

La vorto "neeble" estas al sciencisto, kio sprono al ĉevalo. Unu el la neeblaĵoj dum jaroj estis perfekta kuniĝo inter vitro kaj metalo; ĉar sub la influo de varmo aŭ malvarmo ili kuntiriĝas aŭ etendiĝas laŭ malsamaj proporcioj kaj pro tio disiĝas. Sed antaŭ nelonge D-ro Albert Hull, de nia laboratorio, venis en mian oficejon kun granda vitro-cilindro rigide fiksita al metala cilindro. Li estis eltrovinta kombinaĵon de metaloj, kiu havas precize la saman etendiĝ-koefficienton kiel speciala vitro, kiun li evoluigis. Ĉar ni nun povas unuigi vitron kun metalo, oni povas fabriki multajn objektojn pli bone kaj pli malkare.

Lastatempe kliento resendis elektro-motoron, ĉar laŭ lia ri-proĉo "ĝi estas ĉirkaŭvolvita per senkovra drato." Ni havis mal-facilan tempon, antaŭ ol ni povis konvinki lin, ke la "nuda" drato estis sokure izolita. Kaj ni ne povis mallaŭdi lin pro lia skeptiko. Dum 30 jaroj estis preskaŭ neniu novaĵo en la izolado de drato; pene kaj malakcele ni devis uzi kotonon aŭ paperon, lakojn kaj emajlojn, kiuj facile fendiĝis. Nur antaŭ mallonge ni sciigis pri izoliga substanco, farita el karbo kaj kalko, kiun ni povis surmeti sur draton tiel, ke ĝi kvazaŭ fariĝis parto de tiu mem. Draton tiel tegitan oni povis bategi plata aŭ tordi milojn da fojoj, tamen la kovraĵo restis sendifekta. Tiu magia tegilo nun jam disvastiĝas en la industrio.

En 1916 Ameriko havis nur 19 industriajn esplor-laboratoriojn. Nuntempe, en preskaŭ 2000 laboratorioj vasta trezoro da geniaj cerboj kaj komplikaj mekanismoj arde laboras por nia nacia defendo, plibonigante la troŝargadon de aeroplan-motoroj, evoluigante lumjetilojn, tiel fortajn, ke en la lumstrio de unu el ili gazeto estis facile legebla en aviadilo, kiu troviĝis 12 mejlojn malproksime de la reflektoro. Aliaj projektoj estas tro sekretaj, por mencii ilin.

Mi cerbumis, kion ni faru, se nia grandega provizo de oro fariĝus senvalora, kiel kelkaj ekonomistoj antaŭdiras. Oro, la dorlotita aristokrato inter la metaloj, estas de malgranda praktika valoro. Iun tagon ni eble devos reporti ĝin en la laboratorion, kaj ellabori iun utilan servisto-taskon por ĝi. La homo, kiu eltrovos, kiel oni povas utiligi oron, eble ekhavas riĉecon.

Eble iutage vi aĉetos manĝaĵojn en arĝentlamenaj ŭjoj. Jam sciencisto al mi konata produktis kelkajn. Ni havas amasojn da arĝento, kiu povus anstataŭi stanojn ĉe ŭjoj, faktoro trece grava, se niaj provizoj de stano estus al ni baritaj.

La nova fluoreska lumo postulas pli bonajn materialojn. Televideo bezonas pli senteman kamero-tubon. Aviado postulas pli fidindan metodon, por fari blindajn alteriĝojn. Kaj jen estas la malnova revo, jungi la sunlumon. Ni jam uzis ĝin, por produkti vaporon kaj etajn elektrajn fluojn, sed eble iutage iu nova mirinda materialo, eksterordinare impresbla per sunlumo, plene malfermos tiun magian pordon.

Industrio kaj esplorado krias je lertaj homoj; famo kaj riĉeco kaŝiĝas en ĉiu provtubo, sub ĉiu mikroskopo.

Kaŝata en la montaj fortikaĵoj de Arabujo, troviĝas mirinda urbo. Ĝis kvindek mejloj ĉirkaŭ ĝi, sterniĝanta tie kaj tie ĉi, estas nenio krom dezerto de nudaj, krudaj montoj, kaj rokoj kanonoj. Sed, meze de tiu kruela dezerto troviĝas Petra, mirinda, magia urbo. Ĝia enirejo estas sekreta kaverno ĉe la fundo de treege granda fendo en la roko, kiu estas ambaŭflanke plafonita de nigraj krutegaĵoj, kiuj forfermas ĉielon kaj sunon. Ni moviĝu pli kaj pli profunde en ĉi tiun malluman fendon. Vespertoj flugas ĉirkaŭ niajn kapojn. La taglumo ofte malaperas. Ni ŝajnas piediri en mondo forlasita de Dio kaj homo. Sed ni povas facile vidi ke ne ĉiam estis tiel. La planko sub niaj piedoj estas pavimita per blokoj el mineja ŝtono, kaj estas momevidente, ke ili estas multe eluzitaj. Plue, ni scias, ke laŭ ĉi tiu korodoro, foje en- kaj elfluis la riĉeco de Arabujo. Tie ĉi, karavanoj ŝargitaj de silko, eburo, oro, kaj trembrilaj juveloj pasis muzike per tintaj sonoriletoj...neniam finiĝanta rivereto, kaj mense ni preskaŭ povas vidi la sekvantojn de iu grava reĝo reirantajn de Jerusalemo, kiuj, antaŭ multaj jarcentoj, plenigis ĉi tiun kanjonon per sia venado kaj revenado. Ni preskaŭ povas aŭdi la frapsonadon de iliaj militĉevaloj. Sed forlasante niajn revojn, ni rampu pli ol mejlon laŭ la fundo de la interkrutejo. Pli kaj pli malluma iĝas nia vojeto...kiel eble plej timiga!

Tiam, subite, ni turnas angulon de la kanjonon kaj tute neatendite, jen! Kia miraklo! El la malhela nigraĵo, eksaltas glora vizio de la krutaĵo direkte kontraŭ ni! Kruto skulptita laŭ granda, brila, belega, rozkolora templo! Tiel grandega, sed tiel delikate farita! Kaj sur la fasadon de la templo sin verŝas la radioj de la suno, kiel blindiganta flamego de lumo, tra la rokoj supre.

Tiu belega, juveleca templo estas konstruita de Grekaj artistoj kaj skulptistoj, por tiu celo ĉi tien alkondukitaj de la tiama reĝo. Ĝi estas tiel alta kiel dek-etaĝa domo, kaj cent futojn larĝa. Interne troviĝas granda salono, alta kvardek kvar futojn, kaj de la sama larĝeco. Trans la antaŭaĵo staras vico da graciaj kolonoj, super kiuj sterniĝas la kiel eble plej delikata kaj mirinda skulptaĵo -- girlandoj, floroj, dianoj. Kaj tiu belega, brila templo, tomo de fama reĝo, sidadas tie de antaŭ du mil jaroj.

Ni preterpasas la templotombon kaj baldaŭ vidas la grandan pelvobon en kiu estas konstruita la urbo mem. La muroj, tute ĉirkaŭe, altiĝas pli ol mil futojn, kaj ili estas tiel krutaj ke nenia malamiko povus malsuprengrimpri ilin -- estus tute maleble. Tiuj muroj estas komplete kovritaj per temploj, trezorejoj, tomboj, palacoj, senĉesa procesio, ĉiuj ĉizitaj el solida roko, ĉiuj grandaj, ĉiuj belegaj.

Ni esploras ĉiun angulon de la urbo, kaj kiam vesperiĝas kaj poste, noktiĝas, ni estas ankoraŭ tie. Sed nun, nokte, kia diferenco! Tamen ne malpli bela! Sub la sunbrilo, ni kredis, ke nenia povus aspekti pli belaj, la koral-koloraj skulptaĵoj. Nun ni vidas ilin eĉ pli belaj, havantaj belecon, kiun moligas la lumo de la steloj...beleco kiun vidis kaj ĝuis la okuloj de jam de longe mortintaj popoloj.

TEMAS PRI ARBOJ.

Antaŭ multaj jaroj la homoj, tute tra la mondo, uzis arbojn nur kiel materialon por konstrui domojn kaj diversajn konstruaĵojn ankaŭ pontojn, ŝipojn, boatojn, meblaron, k.t.p. Neniu imagis ke arboj enhavis ĉemiaĵojn utilajn, kiujn la homoj tre bezonas. Iuj eltrovantoj sciencaj eksperimentis kaj pruvis ke el ligno oni povas fabriki pulpon enhavantan fibrojn, ankaŭ per la helpo de mirindaj maŝinoj, lertaj metiistoj povas fabriki paperaĵojn diversajn el la pulpo. La tutmondaĵ gazetoj postulas milojn da tunoj de papero ĉiutage. Daŭrigante la eksperimentojn, sciencistoj faris gravan eltrovon pri iu silksimila materialo kiu nun estas farata el lignopulpo. Plue, oni povas fabriki ĉiajn diversajn ŝtofojn por vestoj. Pro la antaŭe menciitaj eltrovoj la fabrikistoj ĉiulandaj bezonas pli kaj pli da ligno el naturaj arbaroj kaj pro tio, en la daŭro de 15 ĝis 20 jaroj preskaŭ ĉiuj atingeblaj arbaroj estos konsumitaj. Tial, la arbaristoj en multaj landoj senprokraste klopodas denove planti arbojn en diversaj kulturejoj. Tamen, estas bone konata fakto ke en la pli malvarmaj landoj ĉe la norda duonsfero la forstaj arboj ne sufiĉe maturiĝas ĝis tri- aŭ kvardek jaroj. Ĉar la nuntempaj atingeblaj arbaroj sufiĉas nur dudek jarojn, post tiu tempo pli da ligno ne estos havebla kaj la diversaj el-lignaĵoj estos tre multekostaj. Feliĉe por la mondo, en kelkaj landoj ĉe la suda duonsfero, la grundo kaj tiea klimato bone taŭgas por la arboj. Ĉe Aŭstralio la forstaj arboj sufiĉe maturiĝas por pulpigo post dudekdu ĝis dudek-kvin jaroj. Ĉe Novzelando, meze de la pli norda regiono, la arboj maturiĝas post dekdu jaroj, kaj tie iu saga registaro jam plantis kaj plantadis milionojn da arboj, jam vastaj forstoj maturiĝis, kelkaj estas pretaj kiel ligno kaj aliaj por la pulpado. (forsto - metode flegita arbaro. Plena Vortaro)

----- Ho-Bo.

PRI KOOPERAJ SOCIETOJ.

Mi loĝas en Aŭstralio iom pli ol du jarojn, kaj sentas ĉagrenon pro tio, ke ne estas koopera movado en tiu ĉi lando. En Anglujo la koopera movado ne estas simpla komercaĵo sed ĝi estas kultura movado, kiu provizas plenaĝulan kaj junulan edukadon pri multaj aferoj. Membroj rajtas pruntepreni librojn el modernaj bibliotekoj aŭ legadi ilin en komfortaj ĉambroj de la lokaj societoj. Kursoj pri ĉiuj postulataj temoj estas ankaŭ provizataj; muzika edukado en ĉiuj fakoj, kaj ĵara Eisteddfod prezentas altan standardon en la dram- kaj parol-arto, ankaŭ en voĉa kaj instrumenta muziko.

En la komerco kooperanoj havas siajn proprajn bakejojn, laktejojn, k.t.p. kiujn ajna persono povas viziti aŭ inspekti. Ili havas siajn proprajn teplantejojn kaj ŝipojn. "Reynold's News", la ĉefĵurnalo el la multo da kooperaj gazetoj, sekvas forte demokratecan politikon. Tre grave, ke la tuta movado estas direktata de simplaj demokrataj anoj -- en ties propraj intereso. La celo de la movado estas la "Koopera Aŭtonomia Stato."

Ĉi tiu estas nur fragmento el tio, kion mi deziras diri pri ko-
opero.

----- W. HEWISON.

PRI KVINSLANDO.

En Kvinslando estas nur nemultaj Esperantistoj, sed ili estas entuziasmaj. LA RONDO estas tre helpa al ili. Tiu ŝtato estas granda kaj civitoj kaj arboj estas malproksimaj unu de la alia, kaj la Esperantistoj ne povas facile renkontiĝi. Ili bezonas gazeton, kaj LA RONDO forigas grandan mankon. La samideanoj de la Suda ne forgesu la disjetitajn samideanojn de la Nordo. Tiuj havas bonokazojn ne eblajn al ni: ili povas kunveni kaj povas instruiĝi per kontakto kun lertaj instruistoj.

La mondo estas en malĝoja stato. Estas granda laboro antaŭ ni.

"Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj."

Niaj signaldiroj estu - "antaŭen" kaj "unuigitaj". Tial ni konservu niajn idealojn kaj ne forgesu aliajn Esperantistojn ĉie. Nia tasko estas konservi esperon kaj amon inter la popoloj. Esperanto por ni ne estas nur amuzaĵo, sed ilo por servi al la homaro. Vivu Esperanto kaj la Esperantistoj!

----- W.V.RYMER.

GRANDANIMA DONACO POR NIA DATREVENO.

Kun funda plezuro ni informas, ke ni ricevis tre akceptindan kaj amikan donacon de kvin funtoj kiel "naskiĝtagan" estimesprimon al LA RONDO. La du donintoj deziras esti anonimaj, sed ni estas certaj, ke ĉiuj legantoj, kune kun ni, kore dankas al iliaj fantomoj. Ni uzos la monon kiel rezervon, el kiu ni povos ĉerpi de temp' al tempo por viŝi for ajnan negravan deficiton, kiu povos okazi en nia monata bilanco. Tiujn sumojn ni nomos "Celebra Donaco."

KASO DE LA RONDO.ENSPEZOJ.

S-roj R.Brown.....	£-	3.-
E.Shelton.....		3.-
Dornbusch.....		3.-
F-ino L.Kaj.....		1.6
Pastro Rymer.....		5.-
S-ino P.Byatt.....		5.-
F-ino P.Worden.....		5.-
A.E.A.....		6.-
F-ino Carrick.....		3.-
F-ino Trundle.....		5.-
Celebra Donaco.....		5.1
		<u>£2.4.7</u>

ELSPEZOJ.

Deficito.....	£-	8.7
Luo de Dup.....		5.-
Papero.....		6.-
Inko.....		10.6
ŝablonaĵoj.....		8.3
bindpingloj.....		1.3
poŝto.....		5.-
		<u>£2.4.7</u>

W.ADDIS,
25 Greville Avenue,
Flinders Park,
Adelaide,
S.AUSTRALIO.

A.E.A. AFEROJ.

BONVENIGO al M.E.K. kaj S.E.S.

La 27an de Aŭgusto Melbourne Esperanto Club decidis partopreni la landan asocion. Similan decidon faris Sydney Esperanto Society je la 4a de Septembro. Nome de la asocioj mi bonvenigas tiujn du malnovajn grupojn. Iliaj helpo kaj konsilo prosperigu la nacian asocion kaj en tiu maniero pligrandigu la influon de Esperanto sur nia kontinento. Ĉiu grupo en Aŭstralio nun kunhelpas en la laboro pretigi la movadon por postmilita progreso. Estas granda ĝojo al ni scii, ke la kluboj el la du pli grandaj urboj prenas al si rolon en la restarigo de tutlanda movado.

ALLAN TURNER - SheppartonVic.
Prezidanto A.E.A.

LA STATUTO. La Sekretario ricevis kelkajn bone elpensitajn proponojn por la nova statuto de A.E.A., kaj el ili la komitato esperas kunigi statuton justa kaj kontentiga al ĉiuj. Ni ankoraŭ deziras havi sugestojn; do, se en via kapo estas iu meritinda ideo, sendu ĝin tuj al la subskribinto. Voĉdonado okazos antaŭ ol la nova statuto fariĝos leĝa.

LA ADRESO de la SEKRETARIO. Bonvolu rimarki, ke la Sekretario ne plu loĝas en Hobart. La nova adreso aperas sube.

LA ADRESARO. Denove ni memorigas vin pri la pretigata adresaro. Jam atingis nin kelkaj novaj adresolistoj, kaj ni dankas la sendintojn. Detaloj aperis en la Septembra numero de LA RONDO. Klubaj Sekretarioj, bonvolu fari vian plejebilon por sukcesigi nian unuan verkon.

INDIVIDUAJ MEMBROJ. La Esperantistaj grupoj denove estas kunligitaj, kaj ni havas firman bazon por granda kaj forta asocio. Sed oni ne forgesu, ke la individuaj membroj estas gravaj. Por aliĝi al Internacia Esperanto-Ligo ni bezonas almenaŭ cent. Tial se via grupo aliĝis al A.E.A., ne diru al vi, ke vi faris ĉion eblan. Landa Asocio, kaj landa gazeto bezonas la helpon de ĉiu individuo. Nur per granda komuna peno ni povos denove firmigi la Esperantomovadon en Aŭstralio. Se vi ne povas persone agi kaj labori por la revigligo de Esperanto, vi almenaŭ povas sendi duoblan kotizon al A.E.A. kaj LA RONDO. Do, ne prokrastu, sed faru vian plej-oblon por la movado hodiaŭ.

KOTIZOJ. Abono al LA RONDO 3ŝ., kotizo al A.E.A. 3ŝ. Duobla kotizo al LA RONDO kaj A.E.A. 5ŝ. Sendu kotizojn al la kasistino de LA RONDO aŭ la subskribinto, kaj ne forgesu atentigi la adresiton pri duoblaj kotizoj.

(SEKRETARIO AEA) G.H.HILLERMAN,
C/o Bank N.S.W.,
Devonport, TASMANIA.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETO.

Kiel kutime tiu societo kunvenas la unuan kaj trian lundon, ĉiu monate, en la 'Overseas League' ĉambrego, Orient Line Building, strato William, Perth. Du novaj lernantoj aliĝis la lan de Septembro. Funkcias du grupoj -- lernantoj kaj pli progresemuloj -- gvidataj de s-ino Byatt, kaj la prezidanto, s-ro Masel respektive.

La Prezidanto insiste petas al la kursanoj ke tiuj nepre uzuan lernatan lingvon; kompreneble ĉiu el ni tion faras por ke ni akiru facilan kaj fluan parolstilon, helpate per legado de nia altestimata gazeto -- LA RONDO. Nia hon. sek., s-ro A. Chamberlain, klopodas starigi bibliotekon ĉe la nia kunvenejo; ĉiu ano rajtas pruntepreni esperantan libron, dek-kvartagojn. Oni pagas po tri-pencero kiel lupago por unu libro. La sekretario volas havigi librojn diversajn pri iujn temo, en bonordo, por sufiĉe malmultaj prezoj. W.E.S. ĉiam estas preta bonvenigi vizitantojn de aliŝtatoj kaj alilandoj.

Ho-Bo. (M. Byatt)

VIZITO ĉe la MELBURNA KLUBO.

En la lastatempo mi vizitis la Esperantan Klubon en Melburno. Mi ĝuis la travivaĵon kaj profitis de ĝi.

Mi eksciis, ke la Klubo renkontas en tre agrabla kaj oportuna ĉambro ĉe la centro de la urbo. Tiun ĉambron oni povas pligrandigi kiam necesas, per malfermigo de duoblaj pordoj en la malproksima muro, kaj troviĝas ankaŭ alia malpli granda ĉambro, kiu enhavas konsiderindan Esp. bibliotekon, por kiu S-ro Hearne estas la komplezema prizorgisto. En unu angulo de la kluba ĉambro kuŝas malgranda estrejo, kie estis mia malbonŝanco sidi, pro tio, ke ĝi estis absolute la sola loko kie troviĝis malplena seĝo. Tamen, tia sidloko donis al mi bonan vidaĵon al la viglaj klasoj amase sidantaj ĉe longaj tabloj. El ili unu klaso pretiĝis por la diplomo de la Brit. Esp. Asocio, ĉe alia klaso ĉiu ano havis ekzemplon de LA RONDO, kaj atente studadis ĝiajn paĝojn, eble por eltrovi se iu eraro eskapis la aglan okulon de ĝia klerega redaktoro. Ankoraŭ aliaj klasoj donis sin al la gramatika studado. Ĉe la malantaŭo de la ĉambro staradis aliaj anoj -- babilantaj sendube, sed certe per flua Esperanto, kaj jen afero ĉe tiu klubo, kiun mi multe admiris -- la praktikan uzadon de la lingvo oni konstante kuraĝigas, kaj tiuj, kiuj jam de longe flue ĝin parolas, ne estas tro-superuloj por interparoli kun tiuj, kiuj ankoraŭ estas nur lernantoj.

Mi havis du malkontentigaĵojn. Pro malkompreno rilate al datoj, mi ne ĉeestis vesperon ĉe la Konversacia Klubo, kiu, oni informis min, estas tre forta afero, kaj ankaŭ mi estis tro malfrua por ĉeesti la Cseh-klasojn de S-ro Hanks, kiuj jam finis la kurson. Tamen, dumtre agrabla vizito ĉe S-ino Hanks kaj li, S-ro Hanks donis al mi priskribon de la uzata metodo, tiel viglan, ke mi preskaŭ sentis min efektive esti en tia klaso. Li ankaŭ donis al mi aron de ok libretoj eldonitaj de la Cseh-Instituto. Tiuj estas

paroloj, tre lerte graditaj de la plej simplaj frazoj al sufiĉe kontentiga uzado de la lingvo. Troviĝas amuzaj ilustraĵoj tute tra la libretoj, kaj simpla felietono aldonas al ilia intereso. Mi opinias, ke la aro estus helpema kaj alloga al ĉiuj komencantoj.

Mi havis la privilegion viziti la ĉarman hejmon de S-ro kaj S-ino Banham, ankaŭ du vizitoj por Esperanta konversacio ĉe la hejmo de S-ino Hintze. Ĉiu vizito estis tre helpema kaj agrabla.

Dum tiaj entuziasmoj por la lingvo, kiajn mi renkontis ĉe la Melburna Klubo, daŭrigas ĝin subteni, la lingvo certe restos viva en Aŭstralio.

----- L.E.BAILEY.

PRI RADIKOJ UNUSEKSAJ.

Ekzistas en E-o certaj radikoj, kiuj povas esti aplikataj nur al in-seksuloj. Inter tiaj troviĝas Graved', Matron, Nimf'. Malgraŭ, ke la vortaroj preskaŭ, se ne tute, ĉiam donas "gravedulino", kelkaj praktikantoj opinias, ke laŭ la principo de sufiĉeco starigita de Rene de Saussure ni rajtas uzi simple "gravedulo". Pro kio do la vortaristoj enregistras la formon kun -in? Sendube ĉefe pro tio, ke, fidele pensante speguli sur siajn paĝojn la komunan lingvuzon, ili konstatas, ke la E-istoj prefere aŭ instinkte uzadas la -in-formon, pro ĉi ties pli forta elvoki-povo, kiu fulme ĵetas antaŭ la internajn okulojn la bildon de virino naskonta; mankas al simpla -ul la necesa pensasocio pri-ineca.

"Matrono" (samorigina kun "patrino"), kiu derivsence ni povas retroseki jam ĝis la Sanskrita "matr" (patrino), estas kun siaj derivaĵoj trovebla kun ina senco en tre multaj lingvoj. Konfese, Zamenhof uzis "matronino" ĉe Hamleto, p. 105:

Se la infer' sovaĝa povas boli

En membroj de granda matronino,

sed almenaŭ partakaŭze pro la metriko, logike nenecese, ĉar "matrono" ja povas signifi nur virinon (Komparu Marta p. 190; Fabeloj de Andersen, Vol.1, p. 19).

Al la korelativa "patrono", samorigina kun "patro", kaj dum jarcentoj virseksa, ni nun senhezite almetas la -in-sufikson, laŭ analogo patro-patrino, ĉar jam de longe estiĝis nova aldona signifo, kiu enprenas ankaŭ la virincjn.

La radiko "virg'" ne estas strikte in-senca, ĉar en certaj kuntekstoj ni povus uzi "virgulo"; virga tero kaj similaj estas oftaj.

Malfacile estas doni ekzemplojn de radikoj aplikeblaj nepre nur al la virseksaj; necesus por tio oficoj, funkcioj, naturaj apartaĵoj, malsanoj aŭ similaj, pri kiuj ni ne povus koncepti, ke virino povus ilin havi. "Kantor'", "sakristi(an)'", "pap'", eĉ "eunuk:" povas en kazoj de neceso alpreni la -in.

Ĉe la popolfabeloj, "fe'", "elf'", "kobold'" estas plejofte rigardataj kiel senseksaj; "nimf'", "parc'", "muz'", "gorgon'", "furi'" estas nepre inaj. "Silf'" (F.sylphe) estas elfo (Zam.); "silfino" (F. sylphide) estas elfino!

----- F.R.BANHAM.

KONATULO. Plena Gramatiko diras: "Kelkfoje oni uzas kunmeton kun participo: Instruitulo, konatulo. Tio estas superflua, ĉar la participa substantivo, per lingva konvencio, jam mem signifas individuon: konato, instruito." Sed Karl Minor diras, en "Homoj en Milito": "-ulo montras homon, kiu havas la karakteran econ esprimatan per la antaŭa parto de la vorto." Do estas diferenco inter 'konato' kaj 'konatulo', 'konatulo' estas homo, kiun 'ĉiu konas'; 'konato' estas homo, kiun mi (aŭ vi) konas." Tiu diferenco de opinio ŝajne okazas nur ĉe verbaj radikoj. Cox (par.272) diras, ke -ul signifas individuon karakterizatan de la ideo enhavata en la radikoj, kaj la radikoj estas uzata en adjektiva senco por komprenigi, ke la individuo estas "riĉa", "bona," k.t.p. F.R.B.

IU LEGANTO, elektemulo en aferoj muzikaj, petis min traduki titolon de populara kanto, la animtuŝa "Loving you is the best thing I do." Penante mutigi en nia spirito la sorĉe distran melodion, ni komencas:

(Peza sed korekta) Vin am(ad)i, jen la plej bona el ĉiuj aferoj,
kiujn mi faras.
Kiam mi vin amas, (aŭ. Amanta vin), mi faras
(plenumas) la plej bonan el ĉiuj miaj faradoj.
(Malpeze) Vin ami, jen mia plejbona afero
Vin ami estas mia plejbona afero.

Adjektiva aŭ adverba participo ne povas esti subjekto aŭ objekto de verbo; infinitivo povas. F.R.B.

"THERE and THEN." Ne "tie kaj tiam", sed "tuj".

ĈU HOMO POVAS esti unu el siaj fratoj aŭ samtempuloj?

En "John o' London's" (21-41) mi vidis la frazon: "Jefferson, la plej universala (pensulo) el ĉiuj siaj samtempuloj." Tio rememorigis min pri la bono konata linio en La Ekzercaro: "El ĉiuj siaj fratoj, Antono estas la malplej saĝa," kiu, kvankam nekomprenebla tamen certe estas nelogika. Mi sugestis kiel pli defendeblajn: Antono estas la malplej saĝa el la fratoj. Ĉiuj liaj fratoj estas malpli saĝaj ol Antono. Jeff. estis la plej universala (vasthorizonta) pensulo en sia tempo. El ĉiuj pensuloj en sia tempo, Jeff. estis la plej universala. F.R.B.

REFUTO al KONTRAJULOJ Iuj diras, ke neeble estas enkonduki internacian lingvon, ĉar la mondo estas tro inerta por ĝenerale akcepti ĝin -- ke nur miraklo kapablas baldaŭ alvenigi ĝin venkon. Tia "miraklo" tamen povus iufoje facile okazi. Ni ne antaŭvidas hodiaŭ kiaspeca ĝi povus esti.

Povus esti, ke iu amerika aŭ europa Krezo decidus investi sufiĉan kapitalon en tiun aferon, por poste regajni ĝin multoble; per sufiĉe da mono kaj konforma reklamo estus enkondukebla eĉ malpli grandioza afero ol Esperanto.

Aŭ povus esti, ke la Monda Poŝta Unio decidus favoran tarifon por esperantlingvaj presadoj kaj korespondataĵoj nefermitaj; se la

redukto estus nur 10%, ĝi jam sufiĉus por instigi la gravajn entreprenojn en sia reciproka interrilato.

Ĉiu unuopa el la nomitaj "mirakloj" sufiĉus por garanti la venkon de nia afero tutmonde. Kaj ja ekzistas ankoraŭ multaj aliaj ŝancoj kaj eblecoj. Ni do trankvile atendu la "miraklon", kaj samtempe ne pendigante la brakojn, sed daŭrigante labori diligente kaj fervore por nia ideo. La venko iam, iel certe venos.

"Heroldo de Esperanto"

12-9-37.

ERRORS:- (Septembro)

pĝ. 3.	linio 20	ĉio (ĉiu)
4	lasta linio	ebrion(embrion)
10	linio 12	konstruo da (de)
2	22	fatamorgano(~ n)
	34	abaregoj (arbaregoj)
8	22	noba (nova)
10	18	Krestomatio, rigardas
Red. Bab.	16 l. de la malsupro.	ricevos(ricevas)

ARABA ARITMETIKO. Arabo, sentante sin mortanta, venigis amikon por aranĝi testamenton. Lia havo konsistis el deksep kameloj. La unuenaskita filo devas heredi duonon de la bestoj, la dua filo trionon, kaj la plej juna naŭonon. Kape kalkulante pri kio estas duono de deksep kameloj, la Arabo mortis.

En sia dilemo la amiko petis konsilon de saĝulo, kiu diris;

"Permesu al mi prunti al vi unu kamelon. Per tio vi havus dekok kamelojn, kaj duono de dekok estas naŭ."

Tiel fariĝis la divido. La unuenaskita ricevis naŭ kamelojn, la dua ses, kaj la plej juna du. Je tio la administranto ekkriis:

"Jen, post divido de la havo, ankoraŭ restas unu kamelo."

Li do redonis la pruntitan beston.


MUZIKO POR KOMENCANTOJ. Juna studento petis al Mozart, kiel lerni komponi? Mozart rimarkis, ke la petanto estas tro juna por tiel serioze okupiĝi. La studento rebatis al Mozart, ke tiu ĉi estis multe pli juna -- nur kvar- aŭ kvinjara -- kiam li komencis komponi.

Mozart respondis: "Ho vere, sed vi devas rimarki, ke ne estis necese al mi peti alian homon, kiel komponi."

GENEZO: Se ni deziras fari novan mondon, ni havas jam preta la materialon. La unua mondo estis farita el haoso.

OfICIALA ORGANO de LA A.E.A.

La RONDA.



Nov 1941

Nov 1941

Eldonita de F.R. Banham,
2 Banchory St. Essendon W.S. VIC. AUSTRALIA.

REDAKTORA BABILADO.

"Jam venis tempo," diris Fok!
 "Paroli ~~paroli~~ multafere!
 "Pri ŝuoj, ŝipoj, sigelvaks",
 "Brasikoj, vizieroj!"

(Pardonpete al Lewis
 Carroll.)

Unu diferenco inter ĉi-milito kaj tiu de 1914 estas tio, ke nun neniu luktanta nacio uzas E-on en sia propagando. Kuŝas antaŭ mi diversaj oficialaj eldonaĵoj Francaj kaj Germanaj date 1914-18, kiuj tiam dissendiĝis al neŭtralaj landoj por prezenti propran vidpunkton. En la nuna kataklismo ne ekzistas en Eŭropo neŭtralaj popoloj; nacioj antaŭe logataj per tendencaj presaĵoj hodiaŭ portas jugon de konkerinto. Se la Germanoj venkos aŭ havigos al si kompromisan pacon favoran, la ŝancoj de E-o ricevos gravegan baton. La internaciismo ne povas vivi kun la Germanismo (Deŭtschtum). Aliflanke, se la Anglalingvaj nacioj frakasos Faŝismon, la prestiĝo de la Angla lingvo verŝajne tre altiĝos, ĝis grado, ke la demokrataj ĉefoj ne sentos paciencon klini oreton al E-aj pretendoj. La voĉo de Rusujo ankaŭ povus tiam aŭdiĝi, sed de post la falo de Trocki E-o en tiu lando ne ricevis ŝtatan subtenon, kaj malfacile estas koncepti Stalinon kiel porbatalanton por nia afero; lia lingva tezo sonas alie.

Ĉu povas esti, ke amiko H. Byatt en Okc. Aŭs. konscie, obeeme sekvis la bonan konsilon en la Septembra Babilado kaj tujege elplumigis trafikajn leterojn al siaurbaj gazetoj? Post konsidereto ni opinias, ke ne. Jam longjare li estas fervora ink-uzanto por nia afero kaj bele scias ĝin defendi en la publika presforumo. Pri tio mi havas ateston en eltranĉaĵlibro. Li lastatempe skribis: "Lipe-mallaboremaj Aŭstralianoj devus ricevi korektadon jam en la lernejoj." Ja! Kial do ne instrui E-on tie? La plenaj vokalsonoj, kiuj devigas la parolanton malfermi la lipojn, efike kuracus lip-mallaborem kaj produktus perfektan prononcon.

S.A.T.-anoj! Ankoraŭ vivas Prof-o Waringhien, kunaŭtoro de P.V. kaj P.Gram., sed militkarcerito en Germanujo. Banmer estas en Lyon, malsana. Bartelmes estas bankoficisto en Dusseldorf.

Preskaŭ la fintuŝojn ni faris al historia resumo de E-o en Aŭstralio, kiu aperos kun adresaro post ne longe. Mankas nur informoj pri Ok. Aŭs., sed post iom pli da serĉo inter densa tipeto de malnovaj gazetoj ni kompilos noton.

----- F.R.B.

LA KNABO ESTAS PATRO DE LA VIRO.

Mi unue vidis lin en jaro 1872. Tiam li estis, eble, deksejjara, kaj lernanto ĉe la fama lernejo Farrow. La afero, kiun mi priskribas, okazis en vilaĝo Ledgmere. Kelkaj vortoj pri la aspekto de angla vilaĝo en tiu tempo eble interesos al vi. Kvankam

Ledgmere kuŝas ne pli malproksime ol dudek kvin anglajn mejlojn de Londono, ĝi estis, tiutempe, vere kampara loko. Ekzistis nenia fervojo apuda, nenia tramo, nenia por vojaĝantoj publika veturilo krom ŝarĝeveturilo, kiu iris al Londono du fojojn en ĉiu semajno. La vilaĝo sin etendis laŭ la ĉefa vojo. La supra parto de la vilaĝo estis ĉe la piedo de kruta deklivo el longa monteto. Tie sin trovis la vilaĝa pumpilo, al kiu vilaĝaninoj iradis ĉerpi akvon, - kaj gaje babiladi. La butikoj ne estis ĉiuj kune. Oni vidis jen butikon, jen du-tri domojn, jen ankoraŭ butikon, kaj sammaniere la vilaĝo estis konstruita ĉe ambaŭ flankoj de la vojo, ĝis la malsupra parto. La butikoj konsistis el apotekejo, spicejo, forĝejo, panejo, selejo, botvendejo, frizejo kaj aliaj butikaĉoj, kies mastrinoj estis maljunuloj. Tie, oni povis aĉeti fadenojn, butonojn, skribpaperon kaj sukeraĵojn en pakajetoj tiel malmultekostaj kiel kvaronpencaj. La plej novan butikon okupis fotografisto. Tiutempe la fotografado estis nova arto. Anstataŭ la nuna fulmrapideco, la fotografisto devis admonu, "Nun ridetu, mi petas," dum tri minutoj, ĉar la fotografisto mem preparis siajn klisaĵojn per la malsek-klisaja metodo, kiu estis tiel malrapida, ke la bildo ne aperis sur la klisaĵon ĝis tiu longa tempo. La vilaĝa gastejo estis iom loĝinda. Ĝi lokiĝis meze de la vilaĝo, kaj ĉar ĝi staris malantaŭ la linio de la strato, ĝi havis antaŭ ĝi malgrandan areon da herbo. Flanke estas vojeto al la ĉevalaj staloj, kaj al negranda lageto, kie ĉiam naĝis aro da anasoj. La hotelestro estis dikkorpa, ruĝvanga viro, kiu dum li sidis sur la benko antaŭ la fenestro ĉiam fumis longan argilan pipon, kaj ŝajnis personigi kontentecan kaj ĝojecon. Alia grava persono estis la kuracisto. Lia domo sin trovis ĉe la malsupra parto de la vilaĝo, kie la vojo akre kurbiĝas en direkto al alia vilaĝo. Antaŭ ol oni malsupreniris la monteton alkondukantan al Ledgmere oni vidis la pordegojn ĉe la eniro de la parko de ŝia moŝto, Lady Toversly, kies aro de altgradaj bovoj estis fame konata. La teraĵo de ŝia moŝto sin etendis grandan distancon, kaj la tuta vilaĝo apartenis al ŝi. Malantaŭ la vilaĝo estis la "Fair Field", (Kermesa Kampo) granda kampo, kie unufoje jare oni havas grandan vendon de ĉevaloj, kaj interalie ludis en provizora teatro, nomata Richardson's Show, tiajn sango-kirlajn tragediojn, kiajn mi iam vidis, nome "Rinaldo the Remorseless," (Rinaldo la senindulga), aŭ la "Wandering Warlock of the Ghastly Gorge," (Migranta sorĉisto de la kadavra abismo)! La infanoj ankaŭ povus vidi Pulĉinelon, kaj por ĉiu la foiro estis vilaĝa festotago. Apud la "Fair Field" estis la "Common," loko kie la vilaĝanoj povis kulturi legumojn. Tie malgrandaj infanoj iris ĉe la tagiĝo, kaj dum la tuta tago, per ilo farita el du pecoj de ligno, nomata "clappers", fortimigis la birdojn el la frukto-portantaj kreskaĵoj.

Sed ni turnu al tiu, kiun mi nomis "lin". Kvankam li estis inter la malpli junaj de la Farrow-aj lernantoj, lia moŝto Alfred (1) (ne necese estas eldiri lian familian nomon) estis malbonkreska, sed fortika kaj agema, kaj lia vizaĝesprimo estis aroganta. Li ne rigardis homojn rekte en okuloj, kaj donis senton, ke li estas malica, ruzema, eĉ malbona. La Farrowaj knaboj . . . kaj la filoj de la

butikistoj nur malofte rekontiĝis, sed iam kaj iam, dum la post-lernejaj horoj, okazis bataloj, kiuj devis eltiri el la lernejestro gravan admonon kaj ordonon skribi centojn da linioj; siaflanke, unuj el la vilaĝ-knaboj portis blue-kontuzan okulon. Alfred ne estas kuraĝulo, kaj unufoje ricevis batadon de la buĉistido, kin surprizis lin kiam li ĵetis en la strata polvo la manĝaĵon, kiun infaneto portis al sia pliaĝa frato ĉe la birda timigejo. La Farrowaj knaboj ĉiam vizitis la "foiron" sub la gvido de du tri "ushers", (malsuperaj instruistoj). La foiro okazis tuj post la reveno al lernejo el ferio, kaj la knaboj posedis sufiĉon da mono por aĉeti kukojn, partopreni sportojn ĉe la budo de pafilettoj, ktp. Kiam venis hejmira tempo, oni eksciigis, ke Alfredo ne alestas, kaj nur post serĉado tra la tuta foiro oni trovis lin, ebria, kun du ciganoj, kiuj havis loĝveturilon sur la rando de la foiro, kaj al kiuj Alfred donis monon por aĉeti drinkon por la trio. De tiu tempo oni ne plu vidis Alfredon inter la Farrowanoj.

Miaj gepatroj vojaĝis al Nov-Zelando, kaj ĉar mi estis ankoraŭ tre juna - nur lernbubo - mi preskaŭ forgesis la Farrowajn lernantojn kaj ilian nigran ŝafon. Nebuliĝis mia rememoro pri la bona apotokisto, kiu tiel malŝatis la harmonion, ke li ĉiam donis al mi gliciridon, kiam mi fajfante eniris lian butikon. Mi ne plu pensis pri la babilema grupo ĉe la pumpilo, aŭ pri la bruegamaj fojnfartistoj, kiuj sin okupis per diskludo sur la verda placo antaŭ la vilaĝa gastejo. Mi atingis mian deksekan jaron, kaj estis provizore subkomizo en oficejo de faktoro, kiu zorgis pri la luado de domoj. Inter la domoj de kiuj li devis ricevi la lupagon estis dekkelkaj duĉampraj domaĉoj, kiuj ĉiam estis ŝloŝitaj kaj neokupataj kiam la lukoĉtisto iris al ili. Tial, foje, mi estis komisiita viziti ilin je neordinaraj horoj, por ke la ŝuldantoj estu surprize kaptitaj. Unu dometo estis okupata de lavistino kaj ŝia edzo. Ŝi estis juna virino, malklerulino. Ŝiaj vestoj ĉiam estis malpuraj kaj ĉifonaj. Kiam mi vidis ŝin ŝi estis babilema, kaj promesema, sed neniam mi povis kolekti la lupagon, nek vidi la edzon. Fine ni malesperis kaj forte pensis, ke ni devus ordoni ilin el la domo, kiam, neatendite, mi renkontis la lavistedzon. La horo estis iomete post la tagmezo. la Antaŭa pordo estis ŝloŝita. Nu, mi pensas, mi provos la malantaŭan. Ho! Mirindaĵo, la pordo estis nur duone malfermita kaj mi aŭdis iun parolanta. Mi frapis sur la pordo kaj iu diris, "Eniru." Kiel dirite, tiel farite. Mi vidis junan homon, malaltkreskan sed iom dikan. Li sidis sur malplena kandelkesto, liaj kruroj sin etendis antaŭe, liaj brakoj sin trenis ĉi liaj flankoj, kvazaŭ paralizitaj. Lian korpon la muro subtenis kaj lia kapo kuŝis sur lia brusto. Liaj okuloj estis sangstriitaj. Mal-longadire, li estis ebria. Li ne povis klare paroli, kaj mi lasis lin daŭrigi lian konversacion kun li mem, kiel li sin okupis tiam, kiam mi eniris. Tio estis la fino. Oni decidis formariĝi la paron dum la venonta semajno. Mi ne povis forgesi la renkonton. Ŝajnis al mi, ke mi lin vidis antaŭe, sed mi konvinkiĝis, ke mi eraris. Mi provis elpeli ĉiujn pensojn pri li el mia animo, sed iam kaj ree returne venis la penso, ke foje por mi li estis bone konata. Kiam

la oficejo malfermiĝis la proksiman sabaton venis la edzino, nov-vestita, iome pura kaj kun la mono por la lupago. Ŝi diris, ke ŝia edzo ricevis leteron el Anglujo antaŭ tri tagoj kaj ĝi enhavismonon. Fulmrapide mi divenis la enigmon. Mi jam antaŭe vidis la edzon kun ciganoj en la vilaĝa foiro!

(1) Li estis filo de baroneto, kaj portis titolon "the Honorable Mr....."

----- C.W.BALLARD, D.B.E.A.

Dear Mr. Banham,

I consider that neither "baronet" nor "The Honorable" are translatable, having no international equivalents. I should print or write them in italics or between quotation marks.

Of course the statement in the sentence is erroneous, for neither elder nor younger son of baronet has right to prefix "The Honorable."

Yours very truly,
GEO. GORDON.

PENSVAGĴOJ.

"Les Miserables" de Hugo. Romano kolosa, kiu, malgraŭ perdo de koloro eĉ en la plej sukcesaj tradukoj, tumulte skuas la animon. Kian trezoron Lafcadio Hearn estus doninta al la Angle-parolanta mondo se li elfrancigus tiun monumenton al la homa grandeco! Ne nur la senco sed ankaŭ multe el la spirito de Hugo iel transpasus la baron inter la du lingvoj. "La Crime de Sylvestre Bonnard," kiun Hearn revestigis Anglen por siaj samlingvanoj, estas vera majstraĵo.

Toleremo: Neniu povas esti efektive larĝmensa aŭ larĝanima sen tio, ke li ankaŭ havas sinceran kredon aŭ sintenon al la mistero kaj signifo de la ekzisto. Multaj homoj karakterizataj de firmaj konvinkoj ofte ŝajnas mallarĝmensaj al aliaj, kies supraĵeco, indiferento, aŭ anima sensentemo malebligas, ke ili tenu iun ajn altan kredon -- cinikuloj, nenion-admirantoj al kiuj la principoj de siaj kunhomoj aperas fanatikaj, antisociaj.

Estas malfacile diri je kiu punkto vera toleremo fandiĝas en simplan indiferenton. "Toleremo" ĉe multaj nur signifas maleston de religia sento; estas tre facile, "toleri" tion, kion ni rigardas kun kompleta senintereso. Tia falsa larĝmenseco tre ofte iras man-en-mane kun kruela maltolero rilate ĉiutagajn aferojn, politikon, socian vivon, nome, rilate aferojn pri kiuj ĝia posedanto povas iagrade senti kaj kompreni. Vaste troviĝas homoj, kiuj laŭte tantamas pri sia "larĝmenseco", tamen sklave kredas al tiu animvenena kaj abomena dogmo, ke "ĉiu homo estas koruptebla, se nur la subaĉeta mono estas sufiĉa."

Pura tolero estas malofta virto; ekĝermas ĝinur en justamaj kaj kompreni-volaj koroj.

La ĝeneralan indiferenton de homo al homo ni klare vidis per la malmulto da novaĵoj en la Europa gazetaro pri la milito inter Bolivio kaj Paragvajo. Komparu la spacon donitan al la Etiopa lukto kun tiu al la sudamerika. La unua havis rektan influon sur la sorton de la Eŭropaj popoloj; la dua ne. Tial, malgraŭ ke la homperdoj en la Gran Chaco milito estis unu el ĉiu kvin soldatoj, kompare kun unu el dek en la milito de 1914-18, neniu en Eŭropo, ekster manpleno da pacistoj kaj internaciemuloj, donis al ĝi eĉ la plej malgrandan atenton.

Birdoj: Mi preparis apud rata truo kaptilon en la ĝardeno, sed ĝi klakmortigis kompatindan birdon. Ĉe la kadavreto solene staris, kvazaŭ funebre, iu amiko-birdo. Tiu ĉi aspektis tiel strange homa ensia malfeliĉo, ke mi droniĝis en pensoj. Dum kelkaj tagoj la okazaĵo, per aliaj signoj kaj simboloj, direktis la fantazian kuradon de miaj scenĝoj.

Devas esti bona kaŭzo por tio, ke homoj tra la jarcentoj rigardis birdojn kiel mesaĝportantojn el alia mondo. Antaŭnelonge birdamanto mortis en Melbourne. Dum kuŝis en la tombejo la ĉerko de tiu moderna Francisko de Assisi, venis birdoj, kiuj mistere ronde flugis ĉirkaŭ la loko, kiun okupis la mortinto. La vido forte impresis kelkajn ĉeestantojn, kaj la afero gazete raportigis.

Signifa estas la praa instinkto, kiu jam de la komenco igis homojn diri: "Birdeto tion flustris al mi." Ĉie konata Germana fabelo rakontas pri krimo vidita de birdoj, kiuj en la manoj de l' justeco fariĝas instrumento per kiu la murdintoj ricevas punon.

Birdoj portis manĝon al la profeto Elija ĉe la torento Kerit. La Spirito de Dio malsupreniris kiel kolombo.....Birdoj!

----- F.R.BANHAM.
LONDONO KATEDRALO --- SANKTA PAULO.

Kompetenta esplorado pri la stato de la katedralo, St.Paŭlo, en Londono montras, ke la difektaĵo farita per bomboj, kiuj surfalis sur tiun belan konstruaĵon, entute ne estas grava. Tamen, tie kaj tie la muroj multe suferis kaj malfortiĝis, kaj estas tre cikatroplenaĵoj. La difektaĵo ŝajnas esti nur loka. Testoj faritaj per tre precizaj instrumentoj pravas, ke la eksplodo ne malbon-efikis sur la ĝenerala stabileco. Antaŭ kelkaj jaroj spertuloj timis, ke eble la katedralo kolapsos pro nesufiĉa stabileco ĉe la bazo, ĉar tiu mondfama konstruaĵo estas starigita sur sablo, ne sur roko. Eminenta arkitekto, Sir Christopher Wren, konstruis tiun pezegan konstruaĵon sur bazo kiu sube etendas ĝis nur kvar futoj kaj ses coloj sub la kriptoj. Malsupre de tiu bazo troviĝas malseka sablo kiu pli sube etendiĝas ĝis dudek futoj antaŭ ol la Londona argilo estas atingata. Laŭ pli moderna metodo iu arkitekto nuntempe klopodus

etendi la bazon tute tra la malseka sablo, entute dudek-kvar futojn pli profunde ol la nuna subkonstruaĵo. La malseka sablo restas tia per kelkaj etaj riveretoj trafluantaj tra ĝi ĝis la rivero Thames. Tamen, se tiuj iam sekigus, danĝera stato povus estiĝi. En 1911, iuj arkitekturistoj konstatis, ke iuj el la ok kolonoj, kiuj subtenas la grandegan kupolon, ekkomencis iomete malleviĝi, sekve la kupolo jam sin klinis sudokcidenten. En 1914 spertuloj ekkomencis ripari difektitajn kolonojn.

Malavare, la publiko donacis grandan sumon -- £450,000 -- por pagi necesan elspezegon. Tiu grandega kupolo havas 148 futojn diametre kaj pezas, laŭ takso, almenaŭ tridekdu milojn da tunoj. La kolonoj el Portland ŝtono ne estis solidaj, sed konsistis el nur ŝtona ŝelo kaj interne de rubmasonaĵo. En la daŭro de multaj jaroj, iuj el la kolonoj malleviĝis ĝis kvin coloj el la perpendikularo. La riparmetodo estis enmeti per kompresata aero cementgriaĵon en la rubmasonaĵon: la fina rezultato montris, ke ĉiu kolono fariĝis solida maso.

En 1930 la tutlaboro estis finita kaj dum du semajnoj oni kunvenis ĉiutage en la katedralo por dankfesti la okazon. Kaj nun ankoraŭ venas bomboj.

----- HO-BO.

IUJ ASERTAS, ke Esperanto sonas malbele pro la multaj -aj kaj -oj sonoj, aŭ pro tro multaj siblaj sonoj. Sed kutime la samaj kontraŭuloj opinias la grekan lingvon belsona ĝuste pro la samaj diftongoj (aj kaj oi) tre oftaj en ĝi. Kaj ĉiuj slavaj lingvoj havas multe pli da siblaj sonoj ol Esperanto, kaj ili ankaŭ ne mankas al aliaj lingvoj, ekz. la germana.

Pri la diftongoj jen du ekzemploj el la malnova greka: Pollói toi ontos eugéneis eisin kakói (sentenco, kiun oni lernas jam frue en la gimnazio). Atentu, ke la plej multaj diftongoj estas akcentitaj. Aiéi de malakóisi kai haimylíoisi logoisi (el la Odiseo). Kaj kelkaj en la germana: Einem reinen Wein einschenken; die Glocken läuten die Weihanacht ein; sei mein Weib und blieb mir treu (proksimuma prononco: zaj majn vajb unt blajb mir troj).

Ankaŭ pri siblaj sonoj ekzemplo el la germana: Täuscht das Licht des Monds mich nicht? (tojŝt das liŝt des monc miŝ niŝt?) Tiu ekzemplo estas el la teksto de la "Freischütz", opero de Carl Maria von Weber; kiam tiu opero estis la unuan fojon prezentata en Parizo (germanlingve) kaj Agathe estis prononcinta la suprecititan frazon, la tuta teatropubliko komencis eksibli. ("Heroldo de Esperanto", 12-11-37.)

Instruisto: Kion vi konsideras esti la plej elstaranta kompetentaĵo de la antikvaj Romianoj?

Johano: Paroli la Latinon.

LETEROJ al la REDAKTORO.

"Pen Y Graig."

29 Hill St.

W.Hobart.

Tas.

La 22an de Okt.1941a.

Al Sro F. Banham,
Redaktoro de la Rondo.
Melburno,

Estimata sinjoro,

Ĉe la 4a ĉiujara kunveno de T.E.A. estis unuvoĉe konsentita, ke ni sendu al vi persone, kaj al Fino Addis, kaj F-ino Bailey niajn salutojn, bondezirojn, kaj korajn gratulojn pro la sukceso de via gazeto "LA RONDO".

De la komenco ni rigardis kun aprobo, kaj ĝojo ĝian progreson, kaj pligrandiĝon. Precipe ni ĝojis, kiam ĝi fariĝis la oficiala organo de A.E.A. Jam de longe Aŭstraliaj Esperantistoj sentis la mankon de tia gazeto, sed nun, dank' al vi, kaj viaj kunlaborantoj, tiu manko ne plu ekzistas.

S-ro Banham, Fraŭlino Addis, Fraŭlino Bailey, kaj aliaj laborantoj por LA RONDO, gesamideanoj, bonvolu akcepti ĉi tiun leteron, kiel esprimon de nia danko kaj estimo pro via sindona laboro por LA RONDO, kaj per ĝi, por la lingvo mem.

Ĉiu ano volas al vi sukceson.

Antaŭen "La Rondo."

Sincere via,

GORDON CHATTERTON,

Hon Sek. Tasmania Esperanto Asocio.

Kara F.R.B.,

Fervoran gratulon pro la oficialiĝo de via bulteno. Estas bonege, ke A.E.A. nun havas oficialan organon, kaj, ke tiu organo estas la neriproĉebla LA RONDO. Antaŭen!

Frate via

JOAB ELJOT.

Eĉ en tiuj ĉi tagoj, kiam infero eksplodas en nia mondo, kvazaŭ bolanta lafo el vulkano, ni memoru, ke kontraŭ ĉiu ofendo al la humaneco estas cent agoj de heroeco. Trad. F.R.B. el "Sweet Thames, run softly (Belmaĉa Tamizo, dolĉe fluu), Robert Gibbings.

"TE DEUM PRI LA ORDINARA."

Ĉi tiu estas traduko de "Te Deum of the Commonplace" de John Oxenham, "bona homo, kiu faradis bonajn agojn," kiel priskribis Marty South la amatan Giles Winterborne en "The Woodlanders" (Hardy). Lia vivo estis lia plej bela poemo, kaj, mortinte en la lasta jaro, li lasis faskon da dolĉodoraj memoraĵoj pri sia homamo sur nia tero.

La ritma tradukaĵo de nia lingve dotita samideano, Joab Eljot, fidele redonas la mirindan maron da diverskoloraj esprimoj, ofte en manieroj tre trafaj. Vere li estas lerta ĵonglisto kaj arteca vortoludisto.

Te Deum estas preĝo, dankdono de sentema homo pro la miriadformaj fenomenoj de la Naturo -- la sezonoj kaj iliaj karakterizaĵoj, kiuj tiel ravas la okulojn de la preĝanto -- pro la konsoloj kaj inspiraj instruoj de la religio, eĉ pro "duboj kondukantaj al des pli granda fido" kaj "la tuta paradokso mistera de la vivo", kiuj adorigas lian spiriton.

Legantoj rigardos la poemon en la lumo de sia aparta ismo aŭ filozofio, tial diverse opinios pri ĝi; sed nur trefunde religia homo kun forte evoluinta ŝatkapablo pri la belo, povus plene partopreni la korvibrantan ekstazon de la aŭtoro.

Kuraĝa provo, pri kiu mi povas kompari nur la tradukon de "In Memoriam" (Tennyson), kiun faris A. Styler en 1914. Nia ŝtorkora amiko ne cedis antaŭ la malfaciloj de nuntempa eldonado; li simple "presis" ĝin per propraj manoj, sub formo kiu respegulas lian konatan paciencon kaj amon al la perfekteco. Pelata de la postuloj de korekta ritmo, la tradukanto foje elektis vortordon, kiu povas necesigi zorgan legadon, kiel ĉe:-

"ruĝiĝo rozfloreca -- krevanta la Krepusko" (ne "Krepuskon!")

(.....la krevanta Krepusko);

aliloke li donas nekutiman senco al laŭ kaj aliaj prepozicioj:-

"lagoj laŭ argentsildoj" (simile al, kiel/se, kvazaŭ).

Tiu ĉi modele neta broŝureto sendiĝos al ĉiu, kiu petos ĝin kaj aldonos poŝtmarkon por pagi afrankon. Adreso: J. Eljot, 2 Cambridge Street, Willoughby, N.S.W.

----- F.R.B.

GRAVA INFORMO! AĈETU DUM VI POVAS!

Esperanto-Biblioĵo ĉe The Bible House, Flinders-Lane, Melbourne, 12/9, 18/6, kaj tre luksa eldono 30/-. La Novaj Testamentoj vendebaj ĉe tiu firmo estas bedaŭrinde la unua eldono (3/5 ĝis 15/-).

Ĉe S-ro Rawson, Exhibition-St., Melb., Millidge Dictionary Esperanto-English, 13/6 (aldonu afrankon en ĉiu mendo). Negranda stoko.

Evangelio de Sankta Johano kaj tiu de Skta. Marko, ses pecoj por ĉiu ĉe F. Banham, 2 Banchory St., Essendon W5, VIC. (afrankon li pagas. "A Key to Esperanto (Angla)", tri pecoj (same).

LA KUKOLOJ.

Kukoloj estas familio de birdoj kiuj disiĝis tra la tuta mondo. En Aŭstralio, laŭ la oficiala kontrol-listo de birdoj, ekzistas dek-kvar specoj. En Eŭropo printempo estas konata kiel la tempo de la kukoloj, kaj poetoj kaj natur-amantoj verkis multon pri iliaj notoj. Tre bonvena estas la unua "Kuk-u! Kuk-u!" en la nordaj arbaroj, ĉar ĝi anoncas la finon de la vintro.

En Britujo estas nur unu speco kaj tiu speco estas la sola kiu kantas "Kuk-u!" En Aŭstralio neniu el niaj kukoloj iam kantas "Kuk-u!"

La intereso de naturistoj pri kukoloj venas de la fakto, ke la plimulto el ĉi tiuj specoj ne konstruas nestojn sed serĉas taŭgajn nestojn apartenantajn al aliaj birdoj kaj tien enmetas la ovojn. La ovoj estas ofte tre malsimilaj al tiuj de la vera posedanto de la nesto, sed plejparte la birdo ne rimarkas la trompon. Ekzistas dubo pri kiamaniere la kukolo metas siajn ovojn en la elektitajn nestojn. Ĉu ĝi unue demetas la ovon sur la teron, kaj poste, je oportuna momento dum la posedanto forestas, portas ĝin al la nesto, aŭ ĉu ĝi estas demetita rekte en la neston? Sed ofte la kukolo elektas neston tiel malgrandan ke ĝi ne povas eniri.

Se ekzistas dubo pri kiel la ovo eniras la neston, vere ne estas dubo pri la farado de la kukolido, ĉar tio estas ofte observita. Tuj post la elkoviĝo de la juna kukolo ĝia konduto estas mirinda. Ĝi malrapide, sed metode, metas sian dorsan sub la korpojn de la aliaj birdidoj kaj, unu post la alia, elĵetas ilin el la nesto. Tiu instinkto tre mirigas scienculojn ĉar ili ne komprenas kiel malgranda birdido, nur unu tagon elkovita, povas aĝi tiel precize, ĉar la rezulto estas, ke la du aŭ tri elĵetitaj birdidoj mizere mortas.

La kukoleto, do, gajnas la tutan nutraĵon kiun la gepatroj de la murditaj idoj portas al la nesto. Foje okazas, ke du kukoloj metas ovojn en la saman neston. La unua kukolo elkovita elĵetos la alian kune kun la veraj idoj de la posedanto de la nesto. Poezia justeco!

Inter niaj kukoloj troviĝas en norda Aŭstralio unu (angle: Pheasant Coucal) kiu neniam estas parazita, ĝi ĉiam konstruas neston kaj bone prizorgas siajn idojn. Malgraŭ la cititaj malbonaj agoj de la kukolo, ĉiuj dekkvar specoj estas laŭleĝe protektitaj en Aŭstralio, ĉar ĉiuj estas tre valoraj birdoj por la terkulturisto. Ili vivas per la manĝado de insektoj kaj raŭpoj. Per enketo sciencistoj trovis ke ili detruas nekalkuleblan nombron de tre malutilaj insektoj kiuj minacas la vivrimedojn de la terkulturisto.

----- E.S.HANKS.

CITAĴO EL LETERO DE SERĜENTO EN LA MEZA ORIENTO.

"Antaŭ du noktoj Jerry (prononcu: ĝeri --moknomo por Germanoj) superflugis laŭ sia kutimo, sed anstataŭ la mezpezajn bombojn li komencis faligi la plej grandajn.

"Mi kuŝis en la lito kiam la petolaĵoj komencis, sed kiam niaj pafiloj ekkrakis mi kaj amiko supren-kuris por vidi ĉu aŭ ne ili fal-

igis iujn el la malamikaj aeroplanoj. Subite ni aŭdis la bonekonatan akra-sonon de falanta bombo kaj ni kuregis en nian tertruon.

"Ni pensis, ke ĝi trafos nin, kaj ni rigardis unu la alian -- ĝi povus esti lasta rigardo. Malsupren ĝi flugfalas kaj frapegis la teron -- sed ne eksplodis!

"Prezentu al vi, kiel ni estis dankemaj!

"En la mateno ni sciigis, ke ĝi falis iom da distanco for de ni kaj estis el la plej granda speco.

"La kaŭzo de ĝia neeksplodo videbligis kiam la bombtrua roto elprenis la meĉaĵon kaj interne trovis papereton sur kiu estis skribita: 'Bonŝancon! Ĉi tio estas la plej bona, kion mi povas fari.'

"Per tio evidentigas, ke ni havas almenaŭ kelkajn amikojn en malamikaj landoj."

OWEN DAVIES. (trad. el
Aus. Women's Weekly.)

A SOLDIERS' CAMP.

La ideo "camp" estas ofte en la penso de E-istoj nuntempe. Sed ili penas traduki ĝin en diversaj manieroj, ofte neĝustaj aŭ nekontentigaj. Unue, ne traduku ĝin per "bivako", kiu estas laŭ Plena Vortaro "kampa haltejo sub libera ĉielo (Millidge aldonas "without tents"). Ĝi devenas de la Germana Beiwacht (by-watch), kiu esence signifas noktan gardostaron de tuta armeo kun bataliloj pretaj, por malebligi malamikojn surprizon. Kompreneble oni ankaŭ uzas ĝin ĉe manovroj militludaj. "Bivako" estas deviga, provizora afero.

Due, ne ĉiu "camp" estas tendaro. Tiu ĉe Puckapunyal estas plejparte, se ne tute, el barakoj, lignaj ĉambroj kune konstruitaj.

Plena Vortaro kaj Wuster donas "kampadejo" (G.Feldlager), kampadi -- loĝi en tendoj, stariginte provizorajn loĝejojn aŭ tendoj por trupo aŭ armeo (Ekz., La Romanoj, knabskoltoj, kampis en tiu valo). Millidge donas kamploĝejo, tendokampo (tented field, camp).

Por tiuj kiuj havas Esp-an Biblion kaj konkordancon, mi aldonas, ke la substantivo "camp" okazas almenaŭ 66 fojojn, kaj verbe 4. La baza senco tute ne ŝanĝiĝis de post la tempoj de la antikvaj Hebreoj. En Traduko 15 Gordon tradukis la "camps" de Malajaj fiŝistoj per "kabanaroj," ĉar li supozis, ke ili ne havis tendojn.

Resume, mi rekomendas uzi "tendaro soldata" aŭ "tendokampo" se efektive temas pri tendoj; "barakoj" se temas pri provizoraj kampkonstruoj (hutments). Nepre ne uzu "barakoj" kiam vi volas traduki "barracks", kiu estas "kazerno", soldiers' permanent quarters, barracks, casern. Sed por la ĝenerala termino "camp" uzu "kamploĝejo" aŭ "kampadejo."

----- F.R. BANHAM.

MARISTO, reveninta por iom libertempoj, devis konsulti kuraciston pro dolora gorgo. Post ol esplori, la kuracisto konsilis lin gargari per sala akvo. "Peston! Ankoraŭ da tiaĉo! Mi enmariĝis pro torpedo jam tri fojojn!" ekkriis la maristo.

A.E.A. AFEROJ.

STATUTO. La proponita nova statuto de A.E.A. baldaŭ estos preta, kaj ni sendos kopion al ĉiu ano. Ĉiu membro kaj grupo bonvolu studi ĝin, por ke vi povu voĉdoni pri ĝi. Baldaŭ (se ankoraŭ ne) vi ricevos voĉdonilon de la Sek. Estas grave, ke ĉiu kompletigu ĝin, kaj sendu ĝin al la Prezidanto, S-ro A. Turner, P.O. Box 81, Shepparton, VIC. antaŭ ol la 15a de Decembro. Por fariĝi leĝa la statuto devas ricevi aprobon de 90% de la tuta membraro. Tial, se tro multaj forgesos voĉdoni la proponita statuto ne povos fariĝi leĝa. Atentu al la afero, ni petas!

ADRESARO. Tiuj, kiuj laboras super la indekso-kartoj bonvolu sendi la kartojn al la Sek. tuj kiam eble.

A.B.C. PAROLADOJ. Ĉiun dimanĉon vespere je 9.15 ptm. la Aŭst. Broadcasting Commission okazigas serion de paroladoj sub la titolo "To-morrow's World." Ĝi estas plena diskuto de la problemoj de la postmilita mondo. Via Asocio metis esperantistajn opiniojn antaŭ la redaktoro. Responde, tiu sciigis, ke opinioj kiaj la niaj sin trovos en la diskuto, kiu temas pri internacia interkomunikado.

ERARA RESPONDO EN GRAVA GAZETO. En la lasta tempo responde al demando pri Esperanto, la "Bulletin" erare sciigis la demandinton, ke ne estas Esp.-klubo en Sydney. Via Asocio tuj atentigis la redaktoron pri al eraro. Tiu dankis nin pro la informo; rekte avizis la demandinton; kaj korektis la eraron en sekvanta numero. Se de tempo al tempo vi rimarkas similajn erarojn, aŭ bonokazojn por atentigi la publikon pri nia movado, tuj avizu la Sek., por ke via Asocio povu ĝustigi la aferon.

KOTIZOJ. Pagante kotizojn per poŝtmonbileto, bonvolu lasi vaka la nomon de la urbo en kiu la ricevinto kontantos ĝin. Se vi sendos poŝtmarkojn, sendu 1 - pencajn poŝtmarkojn. (Ni preferus la poŝtmonbileton). La duobla kotizo al LA RONDO kaj A.E.A. estas 5s. Ĉiun ricevitan monon ni kvitanco en LA RONDO, kaj sendos leteron-kvitancon nur kiam estas aliaj aferoj respondendaj.

G.H.HILLERMAN. (SEKRETARIO A.E.A.)
C/o Bank of N.S.W.,
DEVONPORT,
TASMANIA.

AKCEPTINDA ERO DA SAĜECO.

Por kune tenadi la numeraron de LA RONDO pura kaj neta, oni aĉetu telebinditan kovrilon dikan, kiu havas risortodordon kapablan forte kunpremi la aron. Jen bonega libro por librobreto aŭ portado al la kursejo.

KASO DE LA RONDO.ENSPEZOJ.

S-ro K. Coller.....	\$3--
" G. Gordon.....	3--
" O. Davies.....	2--
" Drummond.....	1-6
" Macartney Noake..	2--
" P. Holmes.....	1-6
S-ino Rawson.....	1-6
" Hintze.....	1-6
F-ino Telfer.....	5--
" K. Hennessy.....	1--
S-ro J. Pullar.....	1-6
" M. Cohen.....	1-6
Vendoj.....	6--
Celebra Donaco.....	8-11

\$1-19-11ELSPEZOJ.

poŝto.....	\$9-6
papero (Kurso).....	4-8
papero (LA RONDO).....	7-6
ŝablonaĵoj.....	12--
bindpingloj.....	1-3
luo.....	5-0

\$1-19-11

W. ADDIS, (Kasistino)
25 Greville Avenue,
Flinders Park,
ADELAIDE,
S. AUS.

NEKROLOGO.

PROFESORO OTTO SIMON: Mortis pro apopleksio en Seattle, Usono, 12 Aprilo, 1941. Naskiĝis en Vieno 1876, fariĝis profesoro de matematiko kaj fiziko 1898 en Ung. Hradisch, tiam ĉe la komerca akademio en Vieno ĝis 1930. Li E-istiĝis 1902, vizitis la unuan Kongreson en 1905, Lingva Akademiano 1906-36. Post la mondmilito li fariĝis eldonanto de "La Socialisto", kaj kunlaboris ĉe la Esp. Encik. Kiam la Germanoj invadis Aŭstrion li iris Svedujon, de kie li vojaĝis lastan Novembron al Usono. En tiu lando li povis resti nur kelke da monatoj, ĉar la morto vokis lin. Toleremo kaj bonkoreco lumis el li, kiu mem estis viktimo de maltolero kaj kruelo. Ripozu li en paco tie fore en fremda tero!

ĈEKOJ AU POŝTAJ MONBILETOJ? Ni forte konsilus al legantoj, ke ili pagu nepre per poŝtaj monbiletoj (postal notes) aŭ per monmandatoj (money orders); ĉar ĉe la bankoj oni postulas ŝanĝpagon je la ĉekoj, kio konsiderinde deprenas de la valoro. Ekzemple, ĉe okŝilinga ĉeko el Kvinlando ni devis pagi unu ŝilingon. En tiu kazo la bonvola abonanto verŝajne antaŭvidis la aferon, ĉar lia ĉeko devus esti nur sepŝilinga, sed la fakto restas, ke iu E-isto estas perdinto. Tial pagu per la malkare haveblaj poŝtaj montrandoniloj, kaj lasu ilin senskribaj.

Bank note - Bankbileto aŭ Banknoto.
Money order - poŝtmandato
Postal note - poŝta monbileteto
Paper money - paperciono

6/12/41


Oficiala Organo

de la A.E.A.



LA ROMDO

Kristnaskajn
Salutojn.



WA LES RGT

Decembro 1941

Nro. 15

KRISTNASKAN SALUTON al NIAJ MULTAJ LEGANTOJ! 1941.

Nia dua Kristnasko! Dank' al Dio kaj Liaj modestaj periloj!
Amikoj, estu de ni feste salutataj!

Denove Kristnasko por homaro al kiu taŭzas la koron la obtuza tondro de kanonoj, la ŝira krio de funebrantoj. Ho, se mi povus skribi en alia humoro, pri alia aferstato, ĝojante kun vi pri nacioj, kies membroj, sane instruitaj per liaj teruraj lecionoj, jam firmdecidas fari kuragan provon sekvi la vojon de reciproka helpo!

Ĉu vi kredas, ke tiu bela tago povos veni, vere venos? Se vi ne, via Esperantisteco sidas en danĝero velkiĝi malespere en nenifaradon. Fidante, ke iam, iel, la anĝelkanto mutigos por ĉiam la muĝon de l' infero, ni forskuu la pesimisman kaj eniru la novan jaron kun tiu dia harmonio en la koro.

----- F.R.B.

FRUAJ TRAVIVAĴOJ.

El alkovfenestro, kie pendis iaj kokoj kaj viandopecoj, virino ekrigardis kaj diris: "Ĉu tio estas la juna sinjoro el Blunderstone?"

"Jes, sinjorino," mi respondis.

"Via nomo?" ŝi plue demandis.

"Copperfield, sinjorino," mi informis.

"Tio ne estas ĝusta," rimarkis la virino. "Estas mendita ĉi tie nenia manĝo por homo havanta tiun nomon."

"Ĉu ĝi estas Murdstone, sinjorino?" mi diris.

"Se vi estas la juna sinjoro Murdstone, kial vi unue donis alian nomon?" demandis la virino.

Mi klarigis al ŝi la aferon. Ŝi tiam ektiris sonorilon, kriante:

"Vilhelmo, en la manĝĉambro!" Je kio kelnero, por enkonduki min, rapidis el la kuirejo staranta sur la alia flanko de la korto kaj aspektis iom tre surprizata, kiam li sciigis, ke simple min li devas enkonduki.

La manĝejo estis granda, longa ĉambro, kun iaj grandaj landkartoj en ĝi. Mi dubas, ĉu mi povus esti sentinta min pli fremda, se la kartoj estus efektive transmaraj landoj kaj mi estus perdiĝinta en ilia mezo. Mi sentis min preni troan liberon dum, ĉap-en-mane, mi sidis sur la rando de seĝo plejapuda al la pordo; kaj kiam la kelnero metis tablotukon speciale por mi kaj starigis sur ĝi spicujaron, mi ruĝiĝis pro modesto.

Li portis al mi ŝafripejn kun legomoj, kaj prenis for la kovrilojn en maniero tiel abrupta, ke mi ekhavis timon, ke eble mi iel ofendis al li. Sed li multe trankviligis al mi la menson, per tio, ke li metis seĝon por mi al la tablo kaj diris afable: "Nu, sinjoro Giganto, venu ĉi tien!"

Mi dankis lin kaj ĉetabliĝis; tamen nur kun malfacilo mi povis uzi mian tranĉilon kaj forkon en maniero eĉ iomete lerta, aŭ eviti prispruĉon al miaj vestoj per la saŭco, dum tuta la tempo en kiu plaĉis al li staradi kontraŭ mi, gapante tiel fikse kaj igante min ruĝiĝi ĉiufoje, kiam mia rigardo trafis lian.

Li fikse rigardis min ĝis mi ekmanĝis en la dua ŝafripo, tiam diris: "Kvatonlitro da biero staras preta por vi. Ĉu vi volas ĝin nun havi?"

Mi dankis lin kaj diris "Jes." Je kio li verŝis ĝin al kruco en grandan glason kaj tenis ĝin kontraŭ la lumo, kio aspektigis ĝin bela.

"Mia Dio!" li ekkriis. "Ŝajnas al mi pli ol sufiĉe, ĉu ne?"

"Ja tiel ŝajnas," mi konsentis, ridetante, ĉar estis tre agrable por mi vidi lin tiel amika. Li estis brilokula, verukvizaga homo, kun kapo kovrita de hirtaj haroj, kaj dum li staris tie, kun unu mano sur la kokso kaj kun la alia tenanta la glason kontraŭ la lumo, li aspektis vero amika.

"Hieraŭ iu sinjoro estis ĉi tie," li diris; "dika sinjoro nomata Topsawyer. Eble vi konas lin?"

"Ne," mi respondis, "mi pensas, ke ne."

"En genupantalonoj kaj gamaŝoj, kun larĝgranda ĉapelo, griza surtuto kaj punktita koltuko," aldonis la kelnero.

"Ne," mi diris, modeste-hezite, "mi ne havas la plezuron lin koni."

"Li venis ĉi tien," daŭrigis la kelnero, rigardante tra la glaso, "kaj mendis glason da tiu ĉi biero -- insistis ĝin mendi malgraŭ mia averto -- trinkis ĝin kaj falis morta. Ĝi estis tro maljuna por li. Por diri la veron, oni faras malbone, permesante, ke ĝi estu tirita el barelo."

Aŭskultinte pri tiu kortuŝa akcidento, mi estis tre skuita kaj diris, ke mi prefere trinkus akvon.

"Nu, sciu," daŭrigis la kelnero, ankoraŭ rigardante tra la glaso, kun okulo fermita, "la estroj de tiu ĉi gastejo ne amas vidi aĵojn menditaj sed ne konsumitaj. Tio ilin ofendas. Sed mi trinkos ĝin, se plaĉos al vi. Mi jam kutimiĝis al ĝi, kaj la kutimo faras ĉion. Mi pensas, ke ĝi ne malutilos al mi, se mi ĵetos la kapon malantaŭen kaj eltrinkos ĝin rapide. Ĉu mi trinkos?"

Mi respondis, ke li tre komplezus al mi, se li trinkus; sed nur kondiĉe, ke li certe scias, ke li suferos nenian malutilon. Kiam li ĵetis la kapon malantaŭen kaj trinkis ĝin glutege, ekprenis min terura timo, ke mi vidos lin fali morta sur la tapiŝon, same kiel la kompatinda Sinjoro Topsawyer. Sed ĝi ne malbone efikis sur lin. Eĉ male, li ŝajnis esti pli vigla pro ĝi.

"Kion vi havas tie?" li diris, metante forkon en mian teleron. Ĉu vere ŝafripoj?"

"Ŝafripoj," mi konfirmis.

"Ĉielo!" li kriis; "mi ne scias, ke tio estas ŝafripoj. Verdire, ŝafripo estas la plej efika por nuligi la malbonajn sekvojn de tiu biero. Ĉu ne feliĉhazarda afero?"

Preninte ripon je la osto per unu mano kaj terpomon per la alia, li forte manĝis kun tre bona apetito, kio min bele trankviligis. Poste li prenis ankoraŭ alian ripon kaj unu terpomon. Kiam ni estis pretaj, li portis al mi pudington kaj, metinte ĝin antaŭ mi, ŝajnis mediti kaj droni en pensoj dum kelke da momentoj. "Kiel bongustas la pasteĉo?" li diris, revenante el sia revo.

"Ĝi estas pudingo," mi korektis.

"Pudingo!" li ekkriis, "Ĉu vere! Kio!" kaj, rigardante ĝin pli streĉe, "Ĉu vi volas efektive diri, ke ĝi estas farunbataĵa pudingo?"

"Jes, tia ĝi estas."

"Vere, bataĵa pudingo," li diris, prenante grandan keleron, "estas mia preferata pudingo. Ĉu ne feliĉa okazaĵo? Komencu, etulo; ni vidu, kiu el ni pli akiros da ĝi!"

La kelnero certe akiris pli ol mi. De tempo al tempo li instigis min havi pli, sed ĉar li uzis grandan kuleron kontraŭ mia negranda, havis pli fortan apetiton ol mi, kaj pli facile enbuŝigis ol mi, jam de la unua buŝpleno mi treniĝis malvenke kaj ne plu havis ŝancon egaliĝi. Mi kredas, ke neniam mi vidis homon tiel evidente ĝui pudington, kaj li ridis kiam ĝi fine konsumiĝis, kvazaŭ li ankoraŭ sentas la plezuron.

La kornsono de la diligenco en la korto ĝustatempe interrompis, igante min ekstari kaj hezite demandi, en la miksitaĵo fiero kaj modesthontemo havi monujon, ĉu estas io pagenda?

"Nenio plu, krom al la kelnero," li diris.

"Kion vi...kion mi devus...kiom mi devas...kio estas konvena pago al kelnero, mi petas?" balbutis mi, ruĝiĝe.

"Se mi ne havus familion, kaj tiu familio ne havus bovvariolon," respondis la kelnero, "mi ne akceptus eĉ sespenccon. Se mi ne vivtenus profundaĝan patron kaj amindan fratinton" -- je tio li videble emociiĝis -- "mi ne akceptus eĉ penckvaronon. Se mi havus bonan oficon kaj ricevus tie ĉi bonan trakton, mi al vi proponus monereton anstataŭ akcepti ĝin de vi. Sed mi devas vivadi per mangrestaĵoj kaj dormadi en la karbejo ---". Je tio la kelnero eklarmis.

Lia malfeliĉo tre impresis min, kaj mi sentis, ke rekompenco da malpli ol naŭ pencoj evidentigus veran ŝtonkorecon. Tial mi donis al li unu el miaj helaj ŝilingoj. Tiun li prenis per multa humileco kaj respekto kaj ĵete turnflugigis en la aeron por provi ĝian malfalsecon.

El la Kvina Ĉapitro de "David Copperfield" (Ch. Dickens.)
Kondensita kaj tradukita de F.R.BANHAM.

LAU SVEDA MELODIO. (Fundamenta Krestomatio, " p. 391)

Vi parolas lingvon nekonatan,	Your language strange to me's unknown;
Ne komprenas, kion diras mi.	My words on deaf ears fall, I see.
Tamen, frato, kanton nun faratan	But, friend, from tender heart has flown
Gaje kanti povas ambaŭ ni.	A song to charm our tied tongues free.

Ne atendu -- ĉiu minuteto	Delay this not -- each transient day
De mallonga vivo flugas for;	Of this brief life flies fleeting past.
Lernu, kun malmulta laboreto,	Learn now, not laboring, but in play,
Lingvon, kiun amos via kor'.	A song to which men's hearts hold fast.

K.SVANBOM.

(Trad. F.R.B.)

Svanbom estis paroĥa pastro, preposto en Sudersfors, Svedujo. Nask. 1870. Kunfondinto de E-a Klubo en Upsala 1891.

"LA RUBENO de la MANDARENO." (de Pearl Hanks.)

Dum li eniris la tramon James Glaster kaŝe ĵetis ekrigardon malantaŭen. La du grandaj viroj kiuj sekvis lin de la hotelo staris senzorge en la pasaĝera zono, kaj li denove komencis esperi. Povas esti, ke ili ne intence sekvis lin. Sed tuj post la ekiro de la tramo, la viroj ŝajne ŝanĝis la penson, kaj ambaŭ saltis en la tramon kaj staris rekte malantaŭ Glaster. Ties koro faris subitan salton, kaj lia stomako skuiĝis, sed li regis sin sufiĉe por sidi senmove.

"Pagu, petas! Pagu, petas!" ripetadis la konduktoro, ŝovante sin tra la pasaĝeramaso dum li kolektis la veturpagojn.

Glaster metis tremantan manon en la poŝon kaj eltiris sespencan moneron. "Kvar," li sukcesis balbuti. Li ne sciis kien li iras sed li bezonis tempon por pensado.

La eta, malmola objekto, ĉirkaŭvolvita per ŝamo, kiun li metis en sian ŝuon antaŭ nur duonhoro, kvazaŭ brulas truon sub lia instepo. Se li nur povus elhoki ĝin, kaj faligi ĝin en la straton! Sed la du viroj staris silente malantaŭ li. La konduktoro ne petis de ili veturpagon, do, ŝajne ili jam montris al li sian insignon -- aŭ eble estis tiel klare al li kiel al Glaster mem, ke ili estas detektivoj, Povas esti ke ili ofte veturas trame, starante silentaj apud ŝtelisto -- atendente --. Glaster tremis. Li komfortis sin per la penso ke li ne havas ŝtelistan aspekton, ĉar neniam antaŭe li ŝtelis ion -- nu, do, preskaŭ nenion. Nur kelkajn cigaredojn, eble ankaŭ poŝtukon, aŭ kravaton, jen kaj jen en la ĉambroj de la gastoj... sed neniam li ŝtelis ion, kies valoro oni venigus policiston. Sed nun, lin minacis juĝo de kvin ĝis dek jaroj en malliberejo, ĉar en lia ŝuo kaŝiĝas rubeno kiun iu ĉina Mandareno testamentis al sia dolortita filino.

"La flava serpento!" pensis Glaster, "Malbenon al ŝi! Tentante respektindan hotelpordiston kaj implikante lin en tian danĝeron! Kial do, ŝi rajtas esti en la lando -- ŝi, ĉina dancistino? Ĉu ni nur ŝajniĝas konservi Aŭstralion blanka?"

Li preskaŭ larmis memorante kiel facile la afero okazis. Ŝi kvazaŭ ŝovis la juvelon sub lian nazon. Malbenon al ŝi! Oni povus pensi ke ŝi vere volis ke iu ŝtelu ĝin. Glaster ne konis la verkaron de Shakespeare, do li ne murmuris:-- "Ofte oportuna ilo tentas homon al la krimo..." sed li malfeliĉe cerbumadis, kio okazos kiam la tramo atingos la finstacion. Ĉu mano ekkaptos lin ĉe la ŝultro dum li lasas la tramon? Kvankam la korpo de Glaster sidis senmove, lia menso ĵetis sin tien kaj reen, kiel rato en kaptilo, serĉante ian fendeton tra kiu ĝi povos elrampi.

Subite li vidis lumradion. La tramo haltis antaŭ stratkruciĝo. Ĉe la kontraŭa angulo brilis elektra neona signo, kun blua sago montranta al la flanko strato. Super la sago brilis la esperiga mesaĝo: "Al la Banejo. Varma Akvo."

Memorante la agmanieron de la detektivoj, Glaster sidis kviete ĝis la tramo ree ekrapidis. Tiam li, sen averto, elsaltis kaj kuris la mallongan distancon al la banejo. Li eniris tra la svingpordoj kaj, haltinte momenton por regi la spiron, iris al ĝiĉeto kaj luis ŝlosfakon. La ŝlosilo kiun li ricevis havis elastan brakumon. Tra-

pasinte koridoron, Glaster ĝojis trovi ke li estas sola en la tualetejo, kaj senvestante sin en febra rapideco, li enŝlosis sian vestaron en la ŝranketo kaj metis la juvelon kun ĝia ŝama volvaĵo sub la brakumon. Liaj dentoj kunkladis dum li iris al la kahelita naĝejo kaj, sen tiri atenton de ĉiuj, enĝlitis la akvon.

Iom post iom li perdis sian ekcitatecon. La komforte varma akvo malstreĉis liajn membrojn kaj trankviligis liajn nervojn. Li naĝis sencele tien kaj reen, kaj ĵus komencis gratuli sin pro la sukceso de sia lerta ruzo, kiam, subite, li vidis la du detektivojn starantaj ĉe la pordo de la tualetejo.

Denove Glaster sentis skuigon en la fundo de la stomako, sed li regis siajn tremantajn membrojn kaj daŭrigis la naĝadon. Li estis certa ke ili jam traserĉis lian vestaron, kaj baldaŭ ili traserĉos lin mem. La juvelo sub la elasta brakumo premis lian brakon kiel tornikedo. Subite ideo frapis lin. Li naĝis malrapide en direkto al la detektivoj ĝis li atingis lokon kie dum momento la muro de la naĝejo ŝirmis lin, tiam li plunĝis al la fundo dum li eltiris la rubenon de sub la brakumo, kaj ĵetis ĝin en la angulon.

La multaj naĝantoj maltrankviligis la surfacon de la akvo, sed eĉ se ĝi estus trankvila oni ne povus travidi ĝin pro la koloro de la disinfektilo. Glaster sentis kvazaŭ li liberigis sin de granda ŝarĝo. Nun li estas preta suferi la ekzamenon kaj li deziras ke ĝi estu finita. Li lasis la akvon kaj paŝis al la tualetejo. La detektivoj apartigis sin por ke li iru inter ili, sed ne haltigis lin. Kiam la pordo fermiĝis post li ili rigardis unu la alian.

"Nu," diris la pli juna, "tio estas tio! Li certe ne kaŝas ion. Kion ni faru nun, Morris?"

"Ni ne bezonas malŝpari pluan tempon pro li," respondis la kunulo, "la naivulo preskaŭ mortas pro timo, ĉar ni sekvadis lin. Li certe ne kuraĝus plani ŝteli juvelon."

La pli juna paŝis al la rando de la naĝejo kaj rigardis la vaporantan akvon.

"Aspektas bone, la varmo logas min. Ĉu ni naĝu?"

Morris kapneis, "Ne nun. Vi iru al la oficejo kaj diru ke mi revenos. Mi deziras unue intervuji la dancistinon mem. Mi suspektas ke la afero estos pli facile solvebla de tiu flanko."

Kiam ili lasis la banejon ili vidis Glaster antaŭ ili. Li rapidis al la tramstacio, kaj lia timema aspekto kaŭzis cinikan amuzon al la detektivoj. Sed enirante la tramon Morris aĉetis vesperan gazeton kaj ne plu ĝenis sin pri la mizerulo.

Li trovis tutan kolonon dediĉitan al la afero de la ŝtelita rubeno. En la mezo estis bildo de la bela ĉina dancistino, en unu de la graciaj pozoj kiuj ĉarmis la publikon en aliaj ĉefurboj, kaj en kiu oni vidos ŝin hodiaŭ vespere dum ŝia unua prezentado en Melburno. Li legis ke ŝi devenis de longa vico da noblaj prapatroj, ĉinaj Mandarenoj. Tamen la familio suferadis multe pro la ŝanĝoj de la lasta duonjarcento ĝis fine ili heredis preskaŭ nenion krom la familioj tradicioj. La plej trezora posedaĵo de la dancistino estis rubeno, kiun ŝi ricevis de sia atestimita patro. Ĝi estis destinita por ŝia edziĝa juvelaro, kaj devas resti nemuntita ĝis ŝi, iam en estonta

tempo, pretigos tion.

Hodiaŭ posttagmeze ŝi rakontis al gazetisto la kutimojn de sia fora hejmo, kaj la historion de sia rubeno, sed kiam ŝi malfermis la jadan skatoleton por montri sia trezoron, jen, nenio estis tie! La gazetisto, flarante bonan sensacion, telefonis ne nur al sia gazeto sed ankaŭ al la Kriminala Enketa Departemento, kaj post tre mallonga tempo la detektivoj persekutis suspektulon.

Pro tio ke F-ino Moon estis ĵus laŭdinta la bonkorecon de la aŭstralia publiko, kaj la belecon de Melburno -- kiel ŝi vidis ĝin kiam la vagonaro atingis Spencer Straton, la forŝtelon de la rubeno estis speciale bedaŭrinda, kaj espereble la polico baldaŭ kaptos la ŝteliston.

Detektivo Morris estis skeptikulo. "Ŝia unua prezentado en Melburno," li komentis, do la afero estas por ŝi bona reklamo. Valoras almenaŭ ducent funtojn."

Ĉe la angulo de la ĉefpoŝtoŝicejo la detektivoj lasis la tramon, kaj denove Morris trovis ke li sekvas Glaster. Ambaŭ iras al la Grand Hotelo -- Glaster por deĵori, kaj Morris por intervui la ĉinan dancistinon.

Farinte demandon ĉe la oficejo, li supreniris per la lifto kaj frapetis sur la ekstera pordo de la luksa ĉambraro. Mezaĝa, duonĉina virino akceptis lian vizitkarton kaj silente mangestis al komforta brakseĝo, antaŭ ol malaperi tra la interna pordo. Sed Morris ne sidiĝis, ĉar li bone sciis ke detektivo staranta estas multe pli impona ol detektivo sidanta en malalta, mola brakseĝo, el kiu li nur kun granda peno povos eltiri sin. Li ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Evidente F-ino Moon tuj aranĝis hejman atmosferon. Sur la muroj pendis kelkaj kadritaj bildoj de ĉinaj Mandarenoj -- eble la noblaj prapatroj de la sinjorino. Du porcelanaj vazoj prezentis fazanojn kun rozkoloraj plumoj. Sternita sur iu meblo estis bela drapiraĵo el karmezina silko. Peonioj kaj krizantemoj multkoloraj intermiksiĝis sur ĝia surfaco kaj en la mezo, brodita per ora fadeno, sin montris terura drako. Pro ĝiaj kvinungaj piedoj Morris sciis ke ĝi estas el la plej alta rango, kaj li sentis intereson.

Tamen, iu forta, dolĉaodoro densigis la aeron kaj ĝenis lin. Ĝi ŝajnis trapenetri lian cerbon kaj konfuzi liajn pensojn. Ĉagrenis lin ankaŭ ke ĝi prezentis al lia memoro bildojn, kiuj estis tro nebulaj por komprono, sed persistaj. Li skuis la kapon por forigi la nebulecon, kaj, iom stulte ĉirkaŭrigardante, li eltrovis la fonton de sia turmento. En tripeĉa, latuna vazo brulis incenso. Morris spirblovis; li tre deziris malfermi la fenestron kaj enlasu freŝan aeron, sed dum li ekpensis, ĉu li faru tion, la interna pordo apertigis kaj la dancistino mem eniris.

"Vi deziras paroli kun mi, Sinjoro Mu...", ŝi rigardis la karton kiun ŝi tenis en la mano, .. "Sinjoro Morris, ĉu temas pri mia rubeno?"

La detektivo pretigis notlibron. "Jes, Fraŭlino Moon. Ĉu vi bonvolu informi min pri la detaloj de la poliso kiu asekuras vian juvelaron? Precipe mi deziras scii je kia valoro oni taksas tiun rubenon!"

La voĉo de F-ino Moon tremetis dum ŝi respondis. "Mi neniam asekuris tiun rubenon. Mi ĉiam tenis ĝin ĉemane, do mi ne atendis ke mi

perdu ĝin."

La detektivo detale registris en sia menso la aspekton de la dancistino. Digna figuro, sendube. Ŝi staris rekta kaj svelta kiel juna arbo, kaj starante tie, li sentis sin tro giganta. La brilo, nigra hararo, kiu volvigis ĉe ŝia nuko, kontrastis kun la kremkoloro de la glata haŭto. Li rimarkis la arkformajn brovojn, la kurbaĵn ruĝajn lipojn. La linioj de ŝia robo emfazis ŝian gracilecon, kaj ĉiu moveto kaŭzis ondĉtan lumon sur la ora brodaĵo, kiu trembrilis sur la ruĝa silko kiel pava plumaro flirtanta en la venteto. Ĉe ŝia gorgo estis broĉo el ora filagrano kiu tenis en la centro grandan rubenon.

"Vi posedas kelkajn rubenojn, ŝajne. Ĉu la ŝtelita similis tiun en via broĉo?"

Senvole ŝi levis unu delikatan manon al sia gorgo, kaj Morris vidis kun surprizo ke ŝi tremetis. Certe pro io, F-ino Moon estis timema. Malgraŭ ke ŝi posedis orientan belecon, ŝi ne posedis orientan trankvilecon.

"Ne, ĝi estas diferenca. Ĝi estis dum longe en la ringo de la patroj de mia patro, miaj althonoraj prapatroj. Al mi ĝia valoro ne estas kalkulebla per mono. Ĝi estis la lasta donaco de mia moŝta patro." Ŝi haltis paroli. Dum unu momento la nigraj okuloj kiuj renkontis la rigardon de la detektivo entenis timon kaj peton. "Ho, ĉu vi ne vidas kiel ĝi turmentas min? Mi mem ne intencis peti helpon de la polico. La Aŭstralianoj estas tiel bonkoraj -- mi kredas ke eĉ ŝtelisto, se tiu scias la historion de mia rubeno, volonte redonus ĝin. Mi ne dezirus punigi lin se mi nur ree havus mian trezoron. Vi anoncu tion, ĉu ne, Sinjoro Mu.," ŝi denove ekrigardis lian karton..."Sinjoro Morris?"

Morris fermis la notlibron kun klako. Li sentis sin agacita. Lia nomo estas sufiĉe simpla, - kial ŝi daŭre fuŝas ĝin? Li estis momente iom malica. "Nu, mi faros raperton al mia superulo kaj lasos la decidon al li, Fraŭlino Goon - er - Moon."

Sendube, timo ekflamis en la malhelaj okuloj, sed Morris estis tro ĝenita per la incenso por ellabori la klarigon. Krom tio, tiu drako ĝenis lin. Ŝajnis al li ke lia cerbo entenas pri ĝi memorbildon kiu ŝvebas inter la konscio kaj subkonscio.

Li ĝojis esti denove en la freŝa aero kaj havi viglan marŝon al la oficejo de la Kriminala Departemento. Lia frua suspekto fariĝis certeco. Li konvenkiĝis ke la dancistino neniam posedis tian rubenon, kaj li prezentis tiun opinion al sia supera oficisto.

"La perdisto preskaŭ mortis pro timo sole ĉar ni sekvodis lin, malgraŭ ke li havis nenion kaŝindan; sed tiu ĉi ino timas ĉar ŝi deziras kaŝi ion alian -- mi ne scias kion. Mi kredas ke baldaŭ ŝi trovos rimedon por esti el la afero. Ĝi estis entute ilo por reklami ŝin."

La estro ĝemotis. "Jen, bona afero ke ĉia varieta teatrulo uzas la Departementon kiel reklaman agentejon. Mi tre volonte faros ekzemplon el unu. La nuna estas la tria kazo de post pasinta.." Interrompis lin la zumado de la telefono.

Dum li aŭskultis ĝin, cinika amuzo montriĝis en lia sagaca viz-

ago. Fine li turnis sin al Morris. "Vi certe aŭdos kun intereso ke la rubeno de Fraŭlino Moon mistero revenis. Ŝi ĵus trovis ĝin en la incensvazo. Ŝi tre dankas pro nia helpo, ĉar ni timigis la ŝteliston tiom ke li redonis ĝin. Nun ŝia trezoro estas sekura, kaj ŝi volas pardoni lin."

Morris gruntis kolere. "Pardoni lin! Se li iam ekzistus, ŝi ŝuldas al li eble ducent funtojn pro la reklamo. Mi bone sciis ke la tuta afero estas ruzo."

"Nu," konfesis la estro, "ni ne havas ŝancon pruvi ion kontraŭ ŝi, do ni devas rigardi la aferon kiel finitan. Tamen, mi gratulas vin, Morris, pro tio ke vi tuj travidis la trompaĵon. Vi ja estas tre lerta oficisto."

Detektivo Morris iris tra la strato en bona humero. La estro ne ofte donas laŭdon, sed tiu komplimento estis sincera. Bildoj de rapida promocio ŝvebis antaŭ li -- sed subite dispecigis ilin memoro pri la ĉina drako, kiu elspiris fajron sur la grundo el karmezina silko.

Tiu drako turmentis lin, sed nun ĝi liberigas sin de la nebuloj. Li imagis ke li ree vidas ĝin, sed nun ĝi rampas tra mallarĝa strato, svingante la kapon de flanko al flanko, dum fajro kaj fumo spruĉas el la naztruoĵoj, kaj la granda, ruĝa lango elpendas el la terura faŭko. Viroj kun lancoj kuris ambaŭflanke, protektante la homamason kiu retiriĝis rigardante la longan, tordiĝantan korpon, tegitan per serpentaj skvamoj, sed irantan per centoj da homoj kruroj.....

Morris haltis subite kaj staris kun la buŝo malfermita por momento, tiam li ekkriis, "Bendigo!" Vidante la scivolemon de preterpasantaj homoj, li daŭrigis marŝi, kun larĝa rideto. Do, li ekkomprenis la aferon. F-ino Moon! Li bone sciis ke ie, iam, li konis ŝin. Memorbildoj ordigis sin: la montoj da mineja elfosaĵo ĉirkaŭ la mineja urbo; la draka procesio per kiu la Ĉinoj festis sian Novjaron; la fruktvendejo tenita de bonhumora Ĉino, kun blanka edzino kaj kremkolora filino. Maljuna Goon, amiko al ĉiu knabo. Tre ofte Morris mem ricevis kiel donacon, krakfajraĵon, aŭ manplenen da akaridoj.

"Nu, nu," murmuris Morris, "malgranda Mario Goon! Jen la kaŭzo de ŝia timo. Filino de Mandareno!" li ridis, "Ŝi neniam vidis Mandarenon, nur mandarinojn en la fruktvendejo!" Li memoris aŭdi ke la familio transloĝis al Darwin. Do tio estas sufiĉe fora por ke ŝi nomu sin "Fremda Sinjorino." Li ne malestimis ŝin pro la trompeto; li bone komprenis ambicion. Ŝi ne necesis ĉagreni sin pro li - li ne volis malkovri ŝian sekreton. Tamen, ŝi riskis malfeliĉon, aranĝante tiel trompi la policon nur por reklamo.

Kontente la pensoj de Morris revenis al liaj propraj aferoj. Li havis honoron el la okazo, kaj faris malbonon al neniu, krom eble la hotelpordisto kiu certe suferis grandan timon. Pensante pri tiu pordisto, Morris memoris la banejon. Li havas liberan horon, kial ne naĝi? Enirante nordenirantan tramon, li feliĉe revis ĝis li atingis la bluan sagon, kaj post nelonge li estis plunĝanta en la varman akvon. La naĝejo estis preskaŭ homplena kaj aro da knaboj konkursis inter si, farante naĝajn lertaĵojn. Pro la feliĉo de sia animo, Morris imitis ilin.

55.

Ili plunĝis kiel fokenoj, kaj rondiris kiel "Katerinaj" fajrorad-
oj, kaj fine, ruladis sin kiel flotantaj ŝtupoj, elblovante la spir-
on kun granda bruo tra la akvo. Morris faris bone, sed en tiu lasta
lertaĵo, lia forta provo elĵetis, ne nur la spiron, sed ankaŭ la art-
efaritan dentaĵon. La spiro iris supren, sed la dentaĵo, malsupren
Li ridis je si, kaj malsupren naĝis serĉante ĝin. Movante la manon
sur la fundo, li trovis malgrandan, rondan objekton. Ludglobeto,
ŝajne - sed ne, la eksteraĵo estis mola kaj glita. "Ŝamo," li pensis
- kaj subite li spasmospiris. Farante tion, li entiris akvon en siajn
pulmojn kaj devis rapide supreniri, tusante kaj disŝprucante.

"Kio estas?" demandis alia naĝanto maltrankvile. Sed Morris regis
sin sufiĉe por respondi, "Nenio grava; nur ke mi perdis la dentojn!"

Li malsupreniris denove, kaj ĉi foje li revenis kun la buŝo en
ordo, sed la cerbo ankoraŭ ĝenita.

Dum li vestis sin, li maltrankvile penis ellabori la aferon.
Laŭ la Departemento, ĝi estas jam finita. Se li telefonus F-inon
Moon, ŝi certe restus fidela al sia diro ke ŝi jam rericevis la ju-
velon. Ŝi pretas oferi ĝin ol toleri malkovron de la vera historio
de siaj prapatroj. Ŝi dezirus eviti alian intervujon kun li. Li
pensis venĝeme pri Glaster, kiu tiel erarigis lin. Neniu pretas
atesti pri ties krimo.

Morris rememoris sian propran raporton. Estas nun la vico de
Detektivo Morris havi skuiĝon en la fundo de la stomako - Detektivo
Morris, kiu eldiris sian opinion ke Glaster ne kapablas ŝteli juvel-
on - kiu estis certa ke tiu juvelo neniam ekzistis - kiu bone sciis
ke la dancistino planis la aferon kiel reklamon, kaj kiu - plej akra
memoro ol ĉiuj - ricevis komplimenton de la estro pro sia klara vido.
Jes, ja, Detektivo Morris sentis sin tre malsana. Ho, se li ne estus
trovinta la malbenitan rubenon, se li nur povus faligi ĝin en la
stratkanaleton! Li kaŝe ĵetis ekrigardon malantaŭen. Neeble! Iu
marŝis sekvante lin. Sed, ĉiuokaze, iu stultulo certe trovus ĝin,
kaj transdonus ĝin al la polico. Morris ĝemetis. La tento ĝenis
lin nur momente; li bone sciis ke li faros sian devon.

James Glaster deĵoris kiel kutime en la vestiblo de la Grand Ho-
telo, sed li estis tre perpleksita. La administracio de la hotelo
tre ĝojis pro la raportita retrovo de la juvelo, sed Glaster sentis,
kvazaŭ en siaj ostoj, ke por li la afero jam ne finiĝis. Guste kiam
li cerbumadis, ĉu riski alian viziton al la banejo, li levis la okul-
ojn - kaj vidis Detektivon Morris venanta al li.

Neniu alia estis en la vestibulo, kaj Glaster restis en sia loko,
pro tio, ke liaj kruroj subite malfortiĝis. La detektivo staris
rekte antaŭ Glaster kaj rigardis venĝeme en la teruritan vizaĝon.
Post kelkaj minacplenaj momentoj li parolis: "James Glaster, mi
bezonas vin."

La konvulsia skuiĝo de lia viktimo ŝajnis liveri al li diablan
ĝojon, kaj li daŭrigis, "Mi bezonas vin porti ion al F-ino Moon."
Li transdonis al li koverton, "Vi iru tuj al ŝia apartemento, metu
tion ĉi en ŝian propran manon, kaj restu ĝis ŝi malfermas ĝin." Li
haltetis kaj liaj okuloj traboris la mizeran perdiston, dum li al-



Depost, kiam mia filino faras stenotipion, ŝi multe progresas ĉe la fortepiano. Imagu, kara amikino, ke ŝi sukcesas ludi la "Funbran Marŝon" de Chopin en 48 sekundoj...

(Teksto kaj desegno de F-ino Jonckheere.)

Kl. Stenotypie et Progres.

Refarita de
L.E.B. kaj G.A.H.

TROPEZAJ ANĜELOJ. Aviada inĝeniero kontrolis anĝelojn sur Kristnask-aj salutkartoj kaj trovis ilin tre nescience desegnitaj. Anĝelo peze 175 funtojn (li kalkulis) devus havi 25-futan flugil-etendon kaj bezonus kuri du mejlojn por bona de-teriĝo (take-off.).

DU ANGLAJ IDIOTISMOJ.

(1) Franca sinjorino iom konfuziĝis, eksciante, ke ŝia Angla amikino estas "up, but not down yet." (jam ellitiĝis, sed ankoraŭ ne eldormĉambriĝis.)

(2) "Wot I says is this: when you're up to what they're up to, then it's up to you." (Punch): "Jen kion mi diras: kiam vi scias, kion ili celas, tiam vi devas agi mem."

ANTIDISESTABLISHMENTARIANISM: la plej longa vorto en la Angla lingvo? Kiel traduki en Esperanto?

donis signifoplene, "Mi scios ĉu ŝi ricevos ĝin bonorde aŭ ne."

Detektivo Morris restis ĝis Glaster supreniris en la lifto, tiam li turnis sin kaj lasis la hotelon. Li akre sentis ke tri personoj, Mario Goon, la pordisto, kaj li mem, havas almenaŭ unu komunan deziron -- neniam plu aŭdi ion pri la Mandarena Rubeno.

REGO VENCESLAS.

Staris Reĝo Venceslas
Vintra en vespero;
Ĉie neĝon vidis li,
Altan sur la tero.
Jen aperis malriĉul'
Per lunlumo hela,
Kolektante lignon en
Frosto la kruela.

REGO.

"Ho, paĝi', jen kamparan';
Diru lian nomon:
Diru, kie povos ni
Trove lian domon?"

PAGIO:

"Malproksime li, Sinjor',
Loĝas sur la monto,
Apud rando de l'arbar'
Kaj la sankta fonto."

REGO:

"Vino kaj viandon ni
Portos en la domon:
Ne hodiaŭ la malsat'
Premos tiun homon."

Do la reĝo kaj paĝi'
Iris en vespero
Tra la brua, frosta vent'
Akra la vetero.

PAGIO:

"Nokto pli malluma nun,
Pli sovaĝa estas:
Timon sentas mia kor'
Forto ne plu restas."

REGO:

"Vidu, kie paŝas mi:
En la signojn paŝu,
Por ke vintra vent' al vi
Furiozon kaŝu."

Post la reĝo la paĝi'
Zorge do paŝadis:
En la signoj de l'sanktul'
Varmon li trovadis.
Ho Kristanoj, se al vi
Estas ia riĉo,
Helpu al la senhavul';
Benos vin feliĉo.

Ni memoru, amikar',
Pri la malriĉuloj
En Kristnaska tempo, kaj
Estu donemuloj:
Ĉar la paco de l'homar'
Estas nia revo,
Amo al aliaj ja
Estas nia devo.

-----Anonima. Trad.

GABRIEL D. LEWIS..

EL LA SEPT-OKTOBRA "BRITISH ESPERANTIST."

Tre interesa citaĵo el Ĉapitro vi de "INTERNATIONAL TRAMPS" (Hutchinson & Co. 7/6) de T.F. Johnson, iama Assistant High Commissioner of the League of Nations for Refugees. En ĝi li diskutas la Naciaran Ligon kaj ĝian decidon pri Esp-o. kiun, li asertas, ĝi formis influate de naciaj ĵaluzoj. Esperanto ne estas juste juĝata laŭ siaj meritoj. La nova mondo postmilita denove devos fronti la demandon pri I.L. kaj se ĝi agos saĝe, milionoj da homoj, precipe infanoj, parolos helplingvon facilan tra la tero. Johnson piké kritikis la Francajn Lig-oficialulojn, kiuj ofte senskrupule kaj artifice antaŭen-igis la pretendojn kaj avantaĝojn de la Franca lingvo.

"Esperantaj Flugfolioj" (E.Lentz, 82 Blenheim Place, Aberdeen, Scotland, aperas regule. Literaĵoj bonstilaj. 3p.)

Valorega tripaĝa kritiko nefavora al "THE NEW TESTAMENT IN BASIC ENGLISH." La aŭtoro ŝajne M.C. Butler, kiu antaŭ jaroj verkis frakas-an pamfleton kontraŭ la pretendoj de Basic al internacilingva rolo. Ĉiu E-isto devus aĉeti la pamfleton kaj la numeron de B.E. en kiu la kritiko aperas. Esperanto House, Herongate, Rickmansworth, Herts.

S-ro Ernest Dodge, de la Esperanto Ass. of North America, en "Education", Januaro, verkis trafan "Esperanto as an Instrument of Mental Training." La numeron oni reprints, sed la novaj ekzempleroj ankau facile vendigis. Resumo.

Ĉe la Liverpool Univ. por la Premio Buchanan (25 funtoj) la peco tradukenda estis: The Return of the Native, ĉapitro 1, ĝis fino de la 7a par.

Oni ankoraŭ tenas Diservon en Esp-o, ĉe Ilford. London. Esperable la sam-oj denove povos kunveniĝi en la fama St. Ethelburg la duan dimanĉon en ĉiu monato, kiel antaŭe. Pro milito ili devas portempe fermi la preĝejon.

Brian Price-Heywood dronis vojaĝe de Pembo Anglujen pro malamika ago. Li estis Kvakero, bonfara homo, licenciatato de B.E.A., lerta plumisto. Ni klinas la kapon.

A.E.A. AFEROJ.

KVITANCOJ. Bonvole pagis la duoblan kotizon S-ro M.C.TRUNDLE, S-ino J.W.LANGTREE, F-ino V.COX. (Dankon, Fraŭlino, pro adresoj.)

ADRESARO. Dankon al ĉiuj helpantoj. Jam estas pli ol 400 nomoj en la indekso. Se vi povas helpi per la nom-adresoj de Suda Pacifika Insuloj, bonvolu sendi liston al la Sek. Ni enmetos ĝin en la adresaro. Se pro ia kialo iu persono volas, ke sia nomo ne aperu en la publikigota adresaro, bonvolu avizi min tuj, por ke mi arangu tion.

LA PROPONITA STATUTO. Membroj bonvolu korekti sur via ekzemplero la jenajn erarojn:- Par. 7 Respondeca. "represantos" devus esti "reprezentantos". "Okazi" devus esti "okazis".

Par 13 elekto. La lastaj kvar linioj de la unua parto devus esti:- "Grupo, kiu aliĝis dum la oficperiodo, elektas komitatanojn aŭ komitatanojn por la resto de tiu periodo. Komitatano restas dum la tuta oficperiodo, escepte se li ne plu apartenas al la grupo, kiu elektis lin.

Par 21 kalkulo de voĉoj. En la 1a, 4a kaj 5a linioj aperas la vorto "Asocio". En ĉiu kazo ĝi devus esti "Grupo". La tria frazo de tiu paragrafo devus esti "por nov-aliĝinta grupo validas la nombro, por kiu ĝi jam pagis, sed almenaŭ la minimuma nombro, kiu rajtigas al aliĝo."

Unu membro, helpeme kritikante, diris ke la kotizo de individua membro (3ŝ) estas alta rilate al la grupo-kotizo. Jen la kialo:- En la nova jaro ni esperas varbi sufiĉe da individuaj membroj por ebligi nin aliĝi al I.E.L., kiel Landa Asocio. Tial el la 3ŝ, la Asocio pagos 1ŝ al la gazeta kaso (se li ne abonas ni devas sendi ĉiujn informojn rekte al la membro); 8 pencojn al I.E.L., (la kotizo de tiu persono, kiel Asocia membro(A.M.) de la ligo). Do restas al A.E.A. ĝenerala kaso nur 1ŝ 4d., per kiu ni pagas la diversajn elspezojn.

SALUTO. Pro la Prez. kaj Komitato mi deziras al ĉiu membro kaj alia samideano gojan Kristnaskon kaj Prosperan Novjaron. Al la Mondo pacon. En Aŭst. ankoraŭ estas multaj samideanoj, kiuj ne aliĝis al A.E.A. kaj ne abonas LA RONDON. En la nova jaro ili ĉiuj subtenu nian movadon.

KOTIZOJ. Pagi la duoblan kotizon estas grave helpi Esperanton. Ni bezonas ĉiun subtenanton. LA RONDO - 3ŝ. Individua membro A.E.A., 3ŝ. Duobla kotizo al ambaŭ - 5ŝ. Sur poŝtmonbileto lasu vaka la urbon en kiu oni kontantos ĝin.

G.H.HILLERMAN, (Sek. A.E.A.)

C/o Bank of N.S.W.

Devonport, TAS.

KASO de la RONDO.

ENSPEZOJ.

S-ino Langtree - donaco.....	ŝ10 -d.
<u>Kotizoj kaj abonoj.</u>	
S-inoj Motteram, Jones, Wood..	3ŝ... 9.-
S-ino Langtree.....	3.-
" O. Glenie.....	1.6
F-ino Stremple.....	3.-
D-ro Caldero.....	3.-
S-roj A.Chamberlain, McDonald,	3ŝ... 6.-
" W.Lamb, A.Boyle, K.Moxton,	3ŝ... 9.-
S-ro Macartney Noake.....	5.-
" J.Meehan.....	2.-
vendoj.....	2.3
	<u>£2.13.9</u>

ELSPEZOJ.

poŝto.....	ŝ8.6d.
papero.....	9.2
inko.....	10.6
ŝablonaĵoj.....	10.8
bindpingloj.....	1.6
luo.....	5.-
	<u>£2. 5.4</u>
mono en la	
kaso 8/5	
W.ADDIS	<u>£2.13.9</u>
(kasistino)	
15 Greville Ave.	
Flinders Park,	
S. AUS.	

LASTMOMENTE.

S-ino E.M.Hill, 2/6, (donaco Kristnaska), F-ino Smith 3/-,
S-ro Rutland 3/-, S-ro Hearne 5/-, S-ro Crowe 3/-.

PREĜETO.

Dum argēntvoĉe vokas
tintiloj de l' Noelo,
kaj tra l'aero flotas
la eĥoj de l' Krist-celo,
el ĉi infero-flamo,
diabla buĉ-tamtamo,
konduku nin, ho Amo!

"Do, en Amo vi rekonu
la vojon de l' ĉielo,
kaj, vanvoĉe ne plu sonu
ni, tintiloj de l' Noelo!"

J.E.

el LA ETA HEROLDEKO
Dec: 1941 A.D.

PROFONITA
STATUTO DE
AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

1. ĜENERALAJ PRINCIPOJ.

1. TITOLO. La nomo de la asocio estas; AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.
2. KONSISTO. La asocio konsistas el Esperantistaj organizaĵoj kaj individuaj membroj.
3. CELOJ. Ĝiaj celoj estas; disvastigi la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto; kreskigi inter ĝiaj membroj fortikan senton de solidar-eco, kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj; zorgi pri la kunagado de Esperantistaj organizaĵoj.
4. NEUTRALECO. A.E.A. ESTAS neŭtrala rilate al religio, politiko kaj sociaj demandoj. En ĝi viroj kaj virinoj estas egal-rajtaj kaj elektoblaj al ĉiuj oficoj.
5. LINGVO. La oficiala lingvo de A.E.A. estas la Zamenhofa Lingvo Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia fundamento kaj per sia literatura kaj teknika verkaro.
6. ADMINISTRA JARO. La administra jaro estas kalendara jaro.
7. OFIC-DAURO. Ĉiuj honoroficoj daŭras du jarojn; la ofic-havantoj estas reelekteblaj.
8. RESPONDECO. Pri la agoj de siaj represantoj, oficistoj, ktp., la asocio estas nur tiom respondeca, kiom tiuj agoj okazi laŭ la kompetentecoj, kiujn por ĉiu ofico difinas la statuto aŭ la regularoj. Tiu ĉi statuto kaj la regularo estas devigaj por ĉiuj membroj.

2. MEMBRECO.

8. MEMBRO-KATEGORIOJ. La asocio enhavas jenajn kategoriojn de membreco:-
 - (a) Grupaj Membroj (G.M.) are aligitaj de la aliĝintaj grupoj.
 - (b) Individuaj Membroj (I.M.) individue enlistigitaj de A.E.A.
9. AKCEPTO DE MEMBROJ. Kiel Individua Membro povas esti akceptita ĉiu honorinda persono. La estraro rajtas malakcepti aliĝpeton. Se malakceptita kandidato tion speciale deziras, oni informas lin pri la motivo.

10. ALIGKONDIĈOJ. Ĉiu Aŭstralia Grupo Esperantista povas aliĝi al A.E.A. se ĝi havas kvin membrojn, se ĝi estas laŭorde organizita kaj se vidiĝas klare, el ĝia statuto, ke temas pri asocio nautrala.

4. EKSIGŬ KAJ EKSIGŬ.

11. EKSIGŬ. Esperantisto aŭ Esperantista grupo, kiu dum la kuranta jaro, malgraŭ averto, ne pagis la koncernajn kotizojn, estas konsiderata kiel eksiginta.

EKSIGŬ. Esperantisto aŭ Esperanta grupo, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de A.E.A., aŭ ne plenumas siajn devojn al A.E.A., povas esti eksigata laŭ decido de la Komitato, post esploro.

5. KOMITATO.

12. KONSISTO. La gvidado de la Asocio estas konfidata al la Komitato de A.E.A.

Ĝi estas elektata ĉiun duan jaron kaj konsistas el:-
Komitatanoj A., elektataj de la aliĝintaj grupoj.
Komitatanoj B., al-elektataj de la komitatanoj A.

13. ELEKTO. Ĉiu aliĝinta grupo kun dek ĝis dudek membroj elektas unu Komitatano, kaj plian por ĉiu komencita dudek. La nombro de la Komitatanoj de ĉiu grupo restas sen ŝanĝo dum la oficperiodo, sed la eksigintaj kaj la mortintaj povas esti anstataŭataj. Grupo, kiu aliĝas dum la oficperiodo elektas Komitatano aŭ Komitatanojn por la resto de tiu periodo, ĉecepte se li ne plu apartenas al la grupo, kiu elektis lin.

Por certigi al la asocio la kunlaboradon de spertuloj pri administro aŭ propagando, kaj de samideanoj tutlande konataj, la Komitatanoj A povas kompletigi la Komitaton, elektante pliajn komitatanojn B per sekreta voĉdono ĝis la kvarono de sia propra nombro.

Ĉiuj Komitatanoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj.

14. ROLO. La Komitato;
elektas inter siaj membroj la Prezidanton, la Vic Prezidanton kaj la Estraron;
nomas la Sekretarion.
Fiksas la ĝeneralan agadon de A.E.A.,
akceptas grupojn;
starigas la regularojn.

15. PREZIDANTO. La Prezidanto de A.E.A. reprezentas la Asocion kaj subskribas kun la Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Komitaton, la Estraron kaj la Kongresojn. En urĝaj okazoj li havas la kompetentecon de la Estraro al kiu li raportu plej baldaŭ.

6. ESTRARO.

16. KONSISTO. La estraro de A.E.A. konsistas el la Prezidanto, la Vic-Prezidanto, la Sekretario kaj du pliaj Komitatanoj.
17. ROLO. La Estraro, kiu estas respondeca al la Komitato; decidas konforme al la intencoj de la Komitato pri ĉiuj aferoj superantaj la kompetentecojn de la Prezidanto, Sekretario kaj Redaktoro; okazigas Kongresojn kaj Konferencojn; Kreas novajn servojn aŭ aranĝojn; prizorgas la aliajn aferojn al ĝi komisiitajn de la Komitato.
18. LABORMANIERO. La Komitato kaj la Estraro laboras per cirkuleroj, aŭ private aŭ en gazeto.

VOĈDONADO. En voĉdonadoj validas la plimulto de la voĉdonintoj; okaze de voĉegaleco decidas la Prezidanto. Decidoj kiujn partoprenis malpli ol duono de la Komitato aŭ de la

Estraro, devas poste esti submetataj al nova voĉdono, en kiu sufiĉas la plimulto de la voĉdonintoj.

KOMISIOJ. Por esplori iujn problemojn, aŭ por la plenumo de difinitaj administraj taskoj, la Komitato kaj la Estraro,

povas elekti inter aŭ ekster si reprezentanton aŭ specialajn komisionojn kun kontrolpovo, sed ne rajtas transdoni al ili siajn kompetentecojn.

7. GAZETO.

19. GAZETO. La Asocio rajtas eldoni proprajn revuojn. La ĉefa Redaktoro estas nomata de la Komitato. La Asocio rajtas subteni kaj kunlabori Gazetojn kiuj helpas la Asocio-laboron.

8. VOĈDONOJ KAJ ELEKTOJ.

20. OKAZIGO. Ĝenerala Voĉdonado de la aliĝintaj grupoj okazas; Se la Komitato ĝin decidas, aŭ, okaze de urĝeco, la Estraro. Se aliĝintaj grupoj reprezentantaj kvaronon de la membraro de la aliĝintaj grupoj ĝin postulas. Tiu voĉdonado povas nuligi ĉiujn elektojn kaj decidojn,

ŝanĝi la statuton kaj dissolvi la Asocion; plie ĝi povas esprimi sin pri demandoj submetitaj de la Komitato.

21. KALKULO DE VOĈOJ. Ĉiu aliĝinta asocio havas nombron da voĉoj egalan al la nombro de siaj membroj.
Por voĉdonado validas la nombro de la membroj, por kiu la aliĝinta asocio pagis en la jaro antaŭ la voĉdonado.
Por nov-aliĝinta asocio validas la nombro, kiu rajtigas al aliĝo.
En voĉdonado validas la plimulto de la voĉoj esprimitaj. Por ŝanĝi la statuton aŭ dissolvi la asocion necesas tri kvaronoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe, ke tiuj lastaj voĉoj reprezentu almenaŭ duonon de la membraro de la aliĝintaj grupoj.

22. KONTROLO. La ĝenerala voĉdonado estas skriba. La Prezidanto fiksas la tempolimon kaj kontrolas la voĉdonilojn.

9. DISSOLVO.

23. En okazo de dissolvo de la asocio la restanta havaĵo estas deponata tri jarojn, favore al Esperantistoj, kiuj intencas fondi similan asocion. Se tio ne okazas, la havaĵo estas donacata al alia Esperanto-Organizaĵo, kiun indikas la decido pri dissolviĝo.

10. KOTIZOJ.

24. KOTIZOJ. La kotizoj estas;
Individua membro -- tri ŝilingoj.
Individua membro, kun gazeto -- kvin ŝilingoj.
Grupoj -- ses ŝilingoj ĝis 72 membroj kaj unu plia penco por ĉiu plia membro. La Estraro rajtas ŝanĝi la kotiz-normon.

